

Sándor Szathmári

Vojaĝo al Kazohinio

Prezento kaj antaŭparolo

Unua parto Gulivero inter la Hinoj

Unua ĉapitro

La patrio de l' aŭtoro estas minacata de danĝeroj. La aŭtoro decidas dediĉi siajn servojn. – Li estas postenigata sur la krozoŝipon Invincible kaj ekiras al Ŝanghajo por defendi la kulturon. – Renkontiĝo kun la italaj militŝipoj. – La ŝipo estas submarigata per torpedo, sed la aŭtoro feliĉe albordiĝas.

Dua ĉapitro

La aŭtoro vekiĝas en Kazohinio. – Renkontiĝo kun la hinoj, kiuj helpas lin grandanime, sed miskomprenas lian dankemon, kies kaŭzon li ankoraŭ ne povas malkovri. – Lia alveno al la stranga ĉefurbo de la hinoj. – Ili traktas malinde la anglan valuton. – La pudorsento de la aŭtoro estas kruele tretata en koton. – Liaj spertoj en la restoracio de la hinoj kaj sur la strato. – Lia gvidanto invitas lin al sia loĝejo.

Tria ĉapitro

La aŭtoro estas observata de kuracistoj. – Li estas lokita en hospitalo inter la belohinoj kaj estas instruata pri la hina lingvo. – Krome li ekkonas la koncepton de la kazoo, kiu estas la fundamenta principo de la lando, pli ĝustadire: ĝia stato.

Kvara ĉapitro

La aŭtoro estas ellasita al la urbo, kie li spertas tre strangajn aferojn. – La hinoj absolute ne konas la monon, tamen ili estas riĉuloj. – La diskuto de l' aŭtoro pri la mono kaj pri la produktado. – Li ekkonas la stratojn, parkojn, la manĝejon kaj la bibliotekon. – Lia fiaska esploro pri la historio kaj moralo de la hinoj.

Kvina ĉapitro

La aŭtoro parte ekkonas la sekreton de la hinoj. – El ĉi tiu ĉapitro malkovriĝas, ke la hinoj havas nenian ŝtatorganizon. – La strangaj opinioj de Zatamon pri la justeco, amo, animo kaj beletristiko. – Malfacila ŝakludo kun Zatamon. – Konfuza klarigo pri la kazoo.

Sesa ĉapitro

La aŭtoro partoprenas en la publika vivo de la hinoj kaj okupiĝas per kuracista praktiko. – La mirinda kuracista scienco de la hinoj. – La aŭtoro fariĝas senkulpe mortiginto, post kio li forlasas

sian postenon. – La hinoj koten tretas la infanan animon. – La aŭtoro fariĝas teklaboristo, sed la enuo preskaŭ puŝas lin en katastrofon.

Sepa ĉapitro

La aŭtoro konatiĝas kun hina virino, en kiun li intencas konstrui animon. – Liaj eksperimentoj fiaskas. – La aŭtoro estas denove portata al la hospitalo.

Oka ĉapitro

La aŭtoron turmentas la nostalgio kaj amare li plendas al Zatamon. – Zatamon diras strangajn deklarojn pri lia patrio, sed la aŭtoro pravas la pravecon de la eŭropa kulturo. – Zatamon parolas pri la behinoj, kiuj jam aspektas al la aŭtoro multe pli simpatiaj. – Li petas, ke oni enkonduku lin inter la behinojn.

Dua parto

Gulivero inter la Behinoj

Naŭa ĉapitro

Ĉi tie ni venas al la plej malfacilaj tagoj de la aventurplena vojaĝo de l' aŭtoro, kiujn li pasigis inter la behinoj. – Ĉi tiu ĉapitro pritraktas la strangaĵojn de la unua tago.

Deka ĉapitro

La aŭtoro aliĝas al la konao, kies signifo ankoraŭ ne estas klara al li. – Lia spiritaliaĵo estas perforte forprenata. – Li ricevas strangan postenon. – La groteska teorio de la behinoj pri la nutreco de la ŝtoneroj. – Ni ekscias la signifon de la vorto “lamik”. – La strangaj ekonomiaj opinioj de la behinoj. – La fendologio.

Dekunua ĉapitro

La aŭtoro venas en la skoro-n. – Ni konatiĝas kun la manieroj de la deformiĝo de la pensado. – La behinoj falsas la geometrion. – La konflikto de l' aŭtoro pro la infana bruho, kiun li senintence ruinigas.

Dekdua ĉapitro

Nun ni konatiĝas kun pli grava stadio de la behin-malsano: kun la kipu. – Malsamopinio inter Zemoki kaj Zerable kaj ĝiaj sekvoj. – La manieroj de la malbonigo de la seĝo. – La superŝnuristoj. – Iu behino predikas la sanan cerbon. – Ni ekscias, ke la kipu estas por la pulmo. – Disputo pri la brusto de la virino kaj pri la papili-bilevoj. – La historio de iu fama mufruko.

Dektria ĉapitro

Preciza regulo pri tio, kiam estas la behinoj konsekvencaj. – Strangaj spertoj de la aŭtoro pri la kvadrato kaj pri la brulanta domo. – La humoristoj de la behinoj, nome la fozoj kaj iliaj deklaroj. – Kion nomas la behinoj kreaĵo? – La saĝuloj de la behinoj, la makruoj kaj ilia malĝoja sorto. – La aŭtoro preskaŭ eldonas siajn vojaĝnotojn.

Dekkvara ĉapitro

La aŭtoro klarigas la strangajojn de la konĉo kaj de la namuko. – La maniaĵo de la flavoreluloj kaj de la bluoreluloj, kiu influas ankaŭ la aŭtoron. – La tragika sorto de la Liftmajstro kaj de la Bulmajstro. – La konfuza parolado de la namuko dum la konĉo. – La naŭva eksperimento de l' aŭtoro fiaskas, sed li tamen sukcesas sendifekte forlasi la konĉon. – La aŭtoro vane provas kompreni la strangajn spertaĵojn.

Dekkvina ĉapitro

La aŭtoro konatiĝas kun la plej stranga manio de la behinoj: kun la reguloj de la manĝado de la virinoj. – Ni ekkonas ankaŭ la kuriozan kutimon de la grandrustoj. – La aŭtoro estas preskaŭ tradraŝata ĉe la ŝukko. – Li senĉese ofendas la manĝregulojn de la virinoj, kaj pro tio li travivas multajn misaventurojn kaj suferojn.

Deksesa ĉapitro

Nun ni alvenas al la plej malĝojiga ĉapitro de la aventuroj de la aŭtoro, kiam el la behinoj eruptas la furiozatako, nomita bukuo. – La aŭtoro preskaŭ fariĝas ĝia viktimo. – La parton pri la bikruo publikigas la aŭtoro nur kun rezervo.

Deksepa ĉapitro

La aŭtoro estas portata al la ŝtiparo, sed preskaŭ mirakle li liberiĝas, poste li plenumas gravan, sed malĝojigan mision, kiu finiĝas per la tragedia pereco de multaj behinoj.

Dekoka ĉapitro

En ĉi tiu ĉapitro fine solviĝos la sekreto de la stranga vivo de la hinoj. – Ni ekkonos, kio estas la behineco kaj la kazoo. – La aŭtoro estas profunde ofendita de Zatamon, kaj tio lin instigas al definitiva decido.

Deknaŭa ĉapitro

La aŭtoro eksperimentas pri la hejmenveturo, sed Zatamon ne kunsentas. – Fine li mem pretigas al si boaton kaj sukcese eliras al la maro.

Dudeka ĉapitro

La aŭtoro venas en uraganon. – Li feliĉe renkontas la Terrible. – Liaj kamaradoj kore akceptas lin.

Klarigoj

SÁNDOR SZATHMÁRI

VOJAĜO AL KAZOHINIO

Eldono de
SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

67 avenue Gambetta
FR-75020 PARIS

– 1998 –

Tiu ĉi eldonaĵo estas la 191-a, aperinta en la kadro de la broŝurservo de SAT.

La unua eldono de "Vojaĝo al Kazohinio" aperis ĉe SAT, en 1958.

Kontrolita de la Literatura Komitato

Prezento de la libro

La aŭtoro komencis sian laboron super tiu ĉi verko en la jaro 1935. Baldaŭ venis al li la ekkono, ke la ĝenerale humana tendenco antaŭdestinas la libron al esperanta eldono, kaj tial li tuj komencis verki ĝin esperantlingve. La plej danĝera formo de l' malamikeco estis laŭ lia konvinko la Naciismo. La ekzisto de la nacioj estas la plej murda veneno de la homaro. La vivo de l' homaro povus komenciĝi kun la morto de la nacioj. Esperanto estas laŭesence la antipodo de l' militemularo. Oni ja povas mensogi eĉ Esperante, sed la reciproka interkompreniĝo de la homaro povas alporti nur bonajn rezultojn kaj la venkon de la vero super la mensogo.

Post pluraj prilaboroj en 1938 la esperanta teksto jam estis preta por eldono. La eldonejo "Literatura Mondo" en Budapeŝto akceptis ĝin, kaj Kolomano Kalocsay reviziis kaj korektis la tekston laŭ lingva vidpunkto. Nu, la disvastiĝo de l' hitlerismo malebligis la ekziston de l' eldonejo nomita, kaj en 1939 iu amiko elmigrante al Francio kunportis la manuskripton al SAT, kiu inklinis jam tiutempe al eldono ĝia. Sed la milito renversis ĉiujn planojn.

Tiam la aŭtoro serĉis eblecon por hungarlingva eldono, – Hungario ankoraŭ restis ekster la milita kirliĝo. Unu konata verkisto hungara, Karinthy, favoris lian libron, sed li mortis; pluraj eldonistoj interesiĝis, sed devis submeti la manuskripton al la cenzuro; fine ĝi aperis, en kripligita formo (la plej bonaj partoj estis forstrekitaj), en 1941 en 3500 ekzempleroj. Reeldono eblis nur postmilite, en 1946: plej granda malhelpo estis papermanko. La dua eldono estis pli ampleksa, la forstrekitaj partoj estis ree enskribitaj, kaj aldonitaj estis pluraj novaj ĉapitroj, ĉar multaj legantoj miskomprenis, ĉe la unua eldono, la celon de tiu libro.

La dua eldono ankaŭ rapide elĉerpiĝis, kaj la ŝtatigitaj eldonejoj ne entreprenis trian eldonon (ja eĉ la vendado de la libro estis malpermesita). La tria eldono, en malgranda eldonkvanto, fine tamen aperis en 1957, dum SAT decidis favore al la eldono de la originala, nome esperanta verko.

Ni ne dubas, ke al la esperantistaro plaĉos tiu ĉi libro, kiu en sagaca formo kritikas la statojn kaj kondiĉojn en nia socio. Kaj ili facile rekonos, en la priskribo de tiuj aŭ aliaj homtipoj, la karakterotrajtojn troveblajn en ĉiuj popoloj senescepte; ja la aŭtoro ne celis ofendi tiun aŭ alian popolon, sed kiel kuracisto konscienca atakis la radikojn de l' malbonoj plantitan funde ĉe ĉiuj loĝantaroj de la tero.

* * *

La aŭtoro, jam en la jaro 1935, klare antaŭvidis la progresojn de la tutmonda scienco; Julio Verne imagis la lunvojaĝon per kanono, Mor Jokai la aeroplanon kun frapadantaj flugiloj, kiujn movas statika elektro. Szathmári nur malmulte eraris: li korekte antaŭvidis ankaŭ la uzadon de l' aluminio por konstruado de domoj, la vastiĝon de uzado de artefaritaj materialoj por vestoj, mebloj, ktp.

Kaj ŝajnas al ni konvene publikigi ĉi-loke fragmenton el la postparolo al tiu verko de Dezső Keresztury: "Menciinde estas, ke la romano en 1935 intencis prezenti la teknikan civilizacion de la hinoj pli progresinta je ĉirkaŭ unu jarcento rilate al nia. La du jardekoj pasintaj de tiam superis ĉiun tiaman fantazion. La trotuaro moviĝanta en tri rapidogradoj, la pordo malfermiĝanta per si mem pere de nevidebla radio, la plastika kino, la telefono kiu fiksas la sciigon sur rubandon, la tipvestaĵo kudrita per kungluado, la gumrada reltramo, – jam ĉio realiĝis. La antibiotika radioforno estas jam proksime al realiĝo en la antibiotikaj medikamentoj same kiel la vidanta telefono en la televido. Sur fotoj ni vidis jam tian aparaton, kiu dum kor-operacio anstataŭas la laboron ne nur de la koro, sed ankaŭ tiun de la pulmo..."

Ni ne dubas, ke tiu ĉi romano, tiel proksima al niaj ideoj trovos plaĉon de ĉiuj esperanto-legantoj en la mondo.

La eldonantoj.
Parizo, en februaro 1958.

Pretekste de antaŭparolo

Kara leganto, la "Vojaĝo al Kazohinio" estas amuza legaĵo. Tion cetere mi ne bezonas emfazi, vi mem rimarkos dumlege per viaj oftaj ekridoj kaj ekridegoj.

Sed tiam, leganto, mi avertas vin: la libro estas insida. Formetinte ĝin, vi ne liberiĝos de ĝi; vi sentos, ke ĝi lasis en vi hoketojn de problemoj.

Fakte, la libro estigas en la leganto ion, kion oni povus nomi "stato post la ellego de Kazohinio". Ne estas malfacile rekoni tiujn, kiuj suferas je tia stato: diru al ili ion el la lingvo hina, aŭ behina, ekzemple "kazoo", "ketni", aŭ "kipu", ili tuj ekpalpebrumos al vi, kiel al komplico aŭ havanto de komuna sekreto, kaj post unu horo vi rimarkos, ke vi estas droninta en nefinebla diskuto.

Eĉ pli danĝere, se renkontiĝas tri aŭ kvar tiaj infektitoj.

* * *

– Vi, kompreneble, multe ridaĉis super tiu libro – diras Konter. – Tamen, mi diras al vi, ĝi estas terura, senreviga, dezerta verko.

– Kaj ĉu vi ne ridaĉis? – demandas Preter.

– Nu jes, mi konfesas, ke mi ridis. Sed poste, se oni pripensas, oni emus plori. Kia pesimismo! Tiuj hinoj ne estas homoj. La perfektan socion la aŭtoro povas imagi nur kun nehomoj.

– Al mi plaĉus la vivo de la hinoj – diras Malger. – Tre simpatia estas ilia klara konscio, interhelpo, nepra fidindeco kaj precipe tiu senkomplikeco en la rilato kun la hininoj. Tamen tio, ke ili ne ludas ŝakon...

– Nu jen, – interrompas Konter – al vi mankas la ŝako, sed al mi mankas la muziko, al aliaj io alia, entute multo alia, por ke oni povu elteni tiun perfektan vivon.

– Ekzemple, – daŭrigas Super, – iom da babilado spicita per disputo aŭ klaĉo, aŭ iom da klaĉo spicita per survangoj, aŭ iom da rajta individua, familia aŭ nacia fiero, kaj iom da gloro sporta, ĉasa, milita kun trofeoj kaj tikle tintaj medaloj. Laŭ mia opinio, la aŭtoro estas prava. En perfekta socio

ne povas ekzisti embarasaj faktoroj, oni do devas elimini unuavice la danĝeran rivaladon, sed ankaŭ la kapricajn humorojn. Tie devas regi la pura racio.

– La glacia racio, – replikas Konter. – La sterila racio. Por kio servos tiu racio? Por vivteno, Vivo por vivo. Vivo kiel celo de si mem. Tio estas vegetado!

– Jes, jes – gratas sian verton Malger. – Mi scias jam kio mankas tie. La ludo! La senkulpa, kara, dolĉa ludo. Sen ludo la vivo estas ne nur nehoma, sed ankaŭ nenatura. Ĉio ludas en la naturo: la plumo de la kolibroj kaj sur la kristaloj la irizaj lumvibroj, kiel skribis forgesita poeto.

– Aha! El la sako elŝoviĝis la ŝako! – ridas Preter.

– Mi avertas vin, kara Malger – fingre minacetas Super. – La ludo tute ne estas sendanĝera. Ĝi estas pasio. Ĝi estas kiel eksplodema materialo. Ĝia bazo kaj ĉefa viviganto ja estas la rivalado, la konkurado. Ankaŭ la ŝakludantojn ekscitas ĉefe tio, kiu gajnos la ludon, kiu estos la ĉampiono. Kaj ĉu paroli pri la futbalo ekzemple? Sen la leĝo kaj la polico futbal-publiko regule mortbatus unue la ludgvidanton kaj poste unu la alian: Kia trejno de batalemo!

– Vi estas ŝajne la advokato de la aŭtoro, – rimarkas Preter. – Sed kiel povus esti danĝera la muziko?

– Mi povus diri – respondas Super, – ke la muziko, en la formo de marŝkantoj, povas servi kiel vekanto kaj ekzaltiganto de batalemo. Tio tamen estus elturniĝo. La muziko vere ne estus danĝera en la formo de larĝaj arioj kaj enlulaj akordoj. Sed en la perfekta socio, pli ĝuste en la socio, kiu kapablas esti perfekta, mankas por la muziko, se tiel diri, la aero.

– Tion mi kredas ja, – kapjesas impete Konter. – Ankaŭ al mi mankus la aero tie, kie regas tiu terura plago, la ekonomiozo. “Primum vivere, deinde philosophari” – diris la latinoj: unue vivi, poste filozofi. Sed en tiu hina socio – unue vivi kaj poste nenio.

– Jes, jes! – krias Preter. – Kaj mi povas diri, ke inter la behinoj la vivo estas malfaciligita kaj ofte terura, sed tamen pli interesa.

– Dankon! – triumfas Super. – El la sako nun do elŝovas sin la behino!

– Ne fieru hina moŝto! – protestas Malger. – Pri tio parolu, kial mankas la aero por la muziko?

– Bone, sed paciencu, se mi parolas iom longe. La aŭtoro verŝajne rezonis jene: la nuna tekniko povus certigi abundon al ĉiuj, tamen granda parto de la homaro vivas mizere. Ties kaŭzoj estas unue stulta akaparemo de la potenculoj, due kverelema inter homoj, gentoj, nacioj, sistemoj pro naciismo, religio, ideologio. La kverelema homaro preparas sin por batalo kaj tial konsumas egan kvanton de laborforto, energio kaj materialo por senproduktaj kaj detruaj celoj, por armado. La homaro do agas kontraŭ sia intereso, anstataŭ feliĉo kaj riĉo elektas la malfeliĉon, malriĉon, eĉ la danĝeron de la plena ekstermiĝo. Kial?

– Kial? – respondas Malger. – El ekonomiaj kaŭzoj. La mondo dividiĝas...

– Dankon, ne daŭrigu! – interrompas Super. – Ni ĉiuj scias tion. Sed ĉu ne strange, ke la homo, el ekonomiaj kaŭzoj ruinigas sin ekonomie?

– Sofismo! – protestas Konter. – Oni ne devas diri: “la homoj”, “la homaro”, sen distingo. Oni diru: “la potenculoj”, “la simplaj homoj”, “la monopolistoj”, “la proletoj”...

– Bone, – daŭrigas neŝanceleble Super – sed tiuj potenculoj, kies intereso estas la armado, estas tre malmultaj, kaj ili ne povus prosperi sen la subteno kaj helpo de la hommilionoj, kies intereso ne estas la armado...

– Sed kio pri la muziko, pri la muziko? – urĝas Preter.

– Tuj venos ĝia vico, – diras Super. – La aŭtoro konkludas verŝajne tiamaniere: ĉio postulas, pli ol iam ajn, la pacan kunlaboron kaj interhelpon, kaj tamen oni obstine, pli ol iam ajn, preparas sin por reciproka ekstermo, aŭ jam ekstermas unu la alian. Tio estas evidente malracia, sekve ne povas

deveni el materiaj, ekonomiaj, do realaj kaŭzoj, sed nur el spiritaĵoj, sentimentaj motivoj, ĉe kiuj ĉiaspeca ĥimero kaj absurdo estas imagebla. Kaj la aŭtoro opinias, ke li trovis ties motivojn en la batalinstinkto de la homo. Tiu batalinstinkto mem ja devenis el ekonomiaj kaŭzoj, el la lukto por vivo kaj iam ĝi estis nepre necesa por la vivteno de la homo. Nuntempe ĝi estas jam nenecesa, superflua, eĉ ege malutila, sed plu vivas en la homo kiel atavismo. Ĝi estas unu el la plej potencaj instinktoj de la homo, enestas en ĉiu amuzo, arto, plezuro, venenas la tutan sentan vivon...

– Vi forgesas – interrompas Konter, – ke la homo, el ekonomiaj kaŭzoj, evoluigis en si ankaŭ alion: la kunlaborem, la emon je reciproka helpo. Sen ĝi la socio ne povus ekzisti, la homo ne povus vivi. Tial ankaŭ ĝi fariĝis forta instinkto.

– Jes, – replikas Super. – Tiamaniere vere estiĝis klana, komuna, genta, patriota amsento, kiun tenas varma la ardo de malamo kontraŭ aliaj klanoj, komunumoj, gentoj aŭ patrioj...

– Sed tamen – malcedas Konter, – tiuj unuiĝoj fariĝis pli kaj pli grandaj dum la homa historio, kaj nun iamaniere ili jam ĉirkaŭfermas la tutan terglobon, la malamo pli kaj pli perdas sian lokon...

– Kaj la amo paralele malvarmiĝas, – konkludas Super.

– La muziko, amikoj! – interkrias ree Preter. – Kio pri la muziko?

– Atendu iom, – nervozas Super. – Mi ne povas fini, se vi ĉiam interrompas mian parolon. La aŭtoro opinias, miaopinie, ke la interhelpemo povas definitive venki nur, se ĝia kontraŭo, la batalemo, definitive ekstermiĝas. Sed kiel mi diris, la batalemo, la rivalado venenas la tutan sentan vivon, eĉ kun iom da troigo, oni povus diri, ke ĝi estas identa kun tiu senta vivo. Efektive, se ni rigardas la diversajn artojn kaj ludojn, ni vidos, ke ili havas tri ĉefajn fontojn: unue la deziron elstari, distingiĝi, superi, venki, due, la deziron kolekti, hamstri, alproprigi, senproprigante la aliajn, trie, la deziron emocii por la sentoj vekataj de la plenumiĝo aŭ neplenumiĝo de la antaŭaj deziroj. Tio sama validas pri la amo kaj pri la tuta ama poezio. La sentoj do estas nefidindaj, la homo devas liberiĝi de ili. Sed la muziko sen sentoj ne estas imagebla. Tial mi diris, ke en la sekura socio mankas por ĝi la aero.

– Oni povas diskuti pri tio, ĉu ne ekzistas sendanĝeraj sentoj, – diris Malger.

– Oni povas diskuti ankaŭ pri tio, ĉu ne povas ekzisti muziko sen sentoj, kiel nura ludo per sonkombinaĵoj – daŭrigas Konter.

– Oni povas diskuti pri ĉio – konkludas Super.

– Sed la mondo de la hinoj estas terure enuiga, ĝi estas la morto mem, – plendas Preter.

– Tio estas mondo sen antagonismoj kaj suferoj, – deklaras Super.

– Kia antidialektiko, imagi la mondon sen antagonismoj! – krias Konter. – La aŭtoro propre estas filozofia idealisto, adepto de Schopenhauer. “La mondo kiel volo kaj imago”. Oni devas sufoki la volon por esti feliĉa. Tio estas ja budhismo, laŭ kiu la Nirvano estas la pleja dezirindaĵo.

– Stulta vi estas, amiko! – incitiĝas Preter. – La aŭtoro estas materialisto, eĉ el la plej rigora speco.

– La aŭtoro estas ekzistencialisto, – deklaras Malger. – Li pravas, ke la senta vivo alportas katastrofon, la racia vivo estas neeltenebla por la homo. Nenie estas savo.

– La aŭtoro estas socialisto-homarano, – diras Super. – Lia kritiko estas akorigita kontraŭ la individuisma dispartigo kaj precipe kontraŭ la homa malpacemo. La hinan mondon li ne kondamnas – rememoru pri la sceno, kiam Gulivero ĉe sia forveturo el Kazohinio rerigardas kaj ne povas kontraŭrigardi la sunon.

– Sed tie estas kontraŭdiro! – protestas Konter. – Homneeltenebla mondo ne povas esti homidealo.

– Nu, la aŭtoro eble troigas, kiam li forĵetas el la perfekta mondo ĉiun senton kaj ĉiun ludon. Li eble volas per tio pli efike averti, ke ĉiuj sentoj kaj ĉiuj ludoj estas suspektindaj, ke la homo, se li ne volas plene ekstermiĝi, kiel la behinoj, devas bridi siajn pasiojn, prudenti pri siaj deziroj, nobliĝi pri siaj ludoj. La hinan saĝon kaj trankvilon kaj malvarman perfektecon li montras kiel idealon, je kiu

ni devas klopodi, sed kiun neniam ni povas atingi, kaj ankaŭ ne estas dezirinde, se ni plene ĝin atingus, ĉar tiam ni ĉesus jam esti homoj – supozante, ke la homa esto estas iaspeca dezirinda, absoluta valoro. Do, amiko Preter ludu plu senzorge ŝakon, Konter kaj Malger aŭskultu muzikon, ankaŭ mi mem ja havas, mi konfesas, mian amatan ĉevaletan. Sed ni rekonu, kion hungara poeto esprimis jene: “kun tigro ni dormas.” Kaj ni klopodu ĉeni tiun tigron, sed ankaŭ la simiojn kaj aliajn bestojn, en ni embuskantajn. Jen estas, laŭ mia opinio, la instruo de la libro.

– Tro longe ni lasis vin prediki. Mi tuj refutos, – krias Konter...

... ..

Tamen, ĉi tie ni forlasas la ŝtelaŭskultatajn kvar diskutantojn; dio scias ja, kiam ili finos sian parolbatalon pri la senbatalema socio. Ili havas kvar diversajn opiniojn pri la libro. Diskrete mi diras al vi, ke mi havas la kvinan. Do, mi lasas la decidan opinion al vi, kara leganto, kiu havos verŝajne la sesan.

La problemo estas nur, kian opinion havas la aŭtoro mem? Eble la sepan.

Nu, ĉu ne mi diris ja, ke la libro estas insida?

K. KALOCSAY

Unua ĉapitro

La patrio de l' aŭtoro estas minacata de danĝeroj. La aŭtoro decidas dediĉi siajn servojn. – Li estas postenigata sur la krozoŝipon Invincible kaj ekiras al Ŝanhajo por defendi la kulturon. – Renkontiĝo kun la italaj militŝipoj. – La ŝipo estas submarigata per torpedo, sed la aŭtoro feliĉe albordiĝas.

La leganto, kiu dediĉis al miaj antaŭaj verkoj – malgraŭ ilia modesta valoro – bonvolan priatenton, nun certe surprize ekscias, ke mi – post tiom da aventuroj kaj grava sufero – denove ŝipvojaĝis al la oceanoj.

Ankaŭ mi povas aserti, ke nun, reveninte el Kazohinio kaj pripensinte la travivitajn suferojn inter la hinoj, sed precipe inter la behinoj, mi havas tute la saman konvinkon.

Ĝuste pro tio, – ne por senkulpigo, sed nur por klarigo – estu permesite al mi mencii, ke ĉi-okaze min instigis al la vojaĝo ne nur mia malbenita aventurama sango, sed ankaŭ la defendo de Granda Britio kaj de la kristana civilizacio. Kaj mi demandas la kulturitan Leganton: ĉu ekzistas ia ajn pli deca destino por angla ŝtatano, ol marŝadi sub la standardo de Lia Majesta Moŝto kaj servi la grandiozajn ideojn de la humaneco kaj de la kristanismo kontraŭ iliaj obstinaj malamikoj?

Eble meritas ian senkulpigon la fakto, ke mia vojaĝo al Kazohinio gvidis min al tute nekonataj provincoj kaj rezultigis tiel eksterordinarajn travivaĵojn, kiajn neniuj el miaj homfratoj spertis antaŭe. Sed precipe la ekkono de la behina malsano vekis en mi la esperon, ke mia vojaĝo ne estis tute senfrukta kaj ke mi, per la priskribo de miaj travivaĵoj, tamen povas iome utili al mia patrio kaj al la kuracista scienco, laŭ miaj modestaj kapabloj.

Mi konjektas, ke la Leganto kelkfoje akceptos mian rakonton kun dubo kaj ĝuste pro tio mi jam nun deklaras, ke mi en mia priskribo ĉiam klopodis persisti al la severe objektivaj faktoj.

Tamen mi tute ne estos surprizita, se kelkaj partoj de mia jena libro okazigos pridubon. Kazohinio situas tiom malproksime de mia patrio kaj de la eŭropa civilizacio, ke la tieaj kutimoj, kaj precipe la behina malsano ĉe ni estas tute nekonataj kaj, – se mi ne estus vidinta tiujn per miaj propraj okuloj, – eble mi ne povus kredi tiujn.

Nun, kiam mi finlaborinte miajn vojaĝnotojn, tamen publikigas jenan libron, tiu fakto pruvas nur mian neĉesigeblan nostalgion al la objektiva verdiremo, kiu – eĉ malgraŭ la minaco de la pridubo – tamen instigis min al la priskribo de la veraj okazintaĵoj.

* * *

La homaro, savita el siaj pekoj, skribis la 1935-an jaron, kiam la kabineto de Lia Majesta Moŝto venis al la konkludo, ke ĝi devas plej verŝajne deklari defendmiliton kontraŭ Italio.

Kredeble mi ne bezonas klarigi al la Leganto, ke la kaŭzo de la disopinioj estis la malamika konduto de Italio kontraŭ la libereco de la etiopia popolo.

Italion gvidis en tiu agado sendube la intenco pli vastigi sian nacian grandecon kaj tian intencon povas akcepti ĉiu angla ĝentilhomino nur kun respekto, eĉ de la malamiko. Por eviti, ke la Leganto min akuzu pri neobjektiveco, mi rapidas deklari, ke tion rekonis ĉiu honesta ŝtatano de Granda Britio. Precipe profundan impreson faris en niaj animoj la entuziasma oferemo de la itala ĉefpastraro, kiam ili donacis al la altaro de la patrio sian monon, valorajn pastorbastonojn kaj juvelŝtonajn orkrucifiksojn por aĉeti tankojn, bajonetojn kaj brulbombojn por la noblaj celoj.

Kortuŝite ni legis entuziasmajn episkopajn epistolojn, en kiuj ili ne ĉesis kuraĝigi per stimulaj vortoj la kamparanojn, la spicistojn, la pasteĉfritistojn, fiŝistojn, doklaboristojn, almozpetulojn, ŝafistojn, glaciaĵistojn kaj kandelfaristojn sen ras- kaj klasdiferenco, ke ili iru en la tranĉeojn por disvastigi inter la nigruloj la kulturon kaj la puran kristanan civilizacion, dum la pastraro senĉese preĝos

hejme al la Savinto kaj al la Sankta Virgulino de Loretto, por ke la favoro de la Ĉielo subtenu iliajn armilojn por ilia nobla destino.

Ni volonte rekonis ankaŭ la mirindan sinoferon de la italaj soldatoj, kies heroan kuraĝon kaj ceterajn honestajn virtojn ĉiu fidela kaj firmkaraktera brita ŝtatano devas imiti kiel brillan ekzemplon. Kompreneble sub angla flago kaj kontraŭ la italoj.

Do, mi emfaze ripetas, ke ekzistis nenia disharmonio inter mia patrio kaj Italio pro la *kielo* de la aferoj. Nur la *kialo* okazigis kelkajn bedaŭrindajn disonancojn.

Nome, Italio pravigis sian abisenan agadon per la argumento, ke ili intencas liberigi la abisenojn de la subpremado kaj disvastigi inter ili la kulturon. La evidenta malvereco de ĉi tiu argumento devas ridigi ĉiun prudente pensantan homon, antaŭ kiu estas konataj la falsaj bombastoj, uzataj de la sagaca diplomatio de aliaj landoj.

Mi ne volas peki per la eraroj de la antaŭjuĝoj, kiel tiuj vojaĝantoj, kiuj ne hontas supermezure troigi la gloron de siaj patrioj sub la masko de scienca priskribo. Tamen, eĉ gardante la devigan respekton al fremdaj landoj kaj ankaŭ la regulojn de la ĝentila modesteco, mi povas rimarki, ke tiu aserto de la italia diplomatio estas nur falsado de la aferoj kaj tia eraro, kian angla ŝtatano neniam farus.

Nome, estas afero evidenta kaj ĝenerale sciata, ke la oferpena, sed nobla laboro, liberigi la tropikajn popolojn kaj disvastigi la kulturon ĉiam estis la honora tasko de Anglio. Por pruvo estas sufiĉa menci la multajn koloniojn de Malantaŭa Hindio ĝis la buroj, kiujn popolojn liberigis *mia* patrio el la subpremo per la kosto de malfacilaj bataloj.

Kaj, kvankam anglan ĝentilhomon ne interesas la materiaj rilatoj de la aferoj, tamen mi ne povas prisilenti tiun mian opinion, ke Italion verŝajne influis en sia decido krom la kulturo kaj la libereco ankaŭ la kafoplantaĵoj kaj naftokampoj de Etiopio.

Tial la ministerio de Lia Majesta Moŝto decidis, ke post la aprobigado de la kontraŭitalaj sankcioj ĝi deklaras defendmiliton kontraŭ Italio.

Por certigi la eŭropan ekvilibron kaj pacon, urĝe estis senditaj en Egiption kelkaj divizioj, ekipitaj per aeroplanoj, tankoj, flamĵetiloj kaj brulbomboj kaj al la Mediteraneo estis senditaj kelkaj grandaj militŝipoj, akompane de torpedorompŝipoj kaj submarŝipoj.

Tion la itala gazetaro kompreneble akceptis kun granda malkonsento, asertante, ke nian patrimon influis eble, krom la menciitaj celoj, ankaŭ la posedavido, kaj ke Anglio envias al la malriĉa itala popolo eĉ tiujn kelkajn abisenajn minejojn kaj petrolfontojn, kiuj – kvankam ili tute ne interesas la italojn, – tamen estas menciindaj, kiam temas pri angloj.

Eble la detalaĵoj jam tedas la Leganton, sed mia severa decido estas persisti ĉe la objektiva vero kaj ĉiam laŭtigi mian modestan voĉon, kiam ajn trafas neinda kalumnio mian patrimon, ĝiajn militŝipojn, tankojn, aeroplanojn kaj ĝenerale ĉiujn grandiozajn kreaĵojn, kiuj distingas la homon de la rabobestoj.

Do, por ke mi ne perdu la fadenon de mia rakonto, en la sama tempo okazis, ke la krozoŝipo “Terrible” de Lia Majesta Moŝto, kiu ankris sur la ĉinaj akvoj, estis hejmenvokita por esti sendata al la Mediteraneo kaj anstataŭe estis komandita la malnova kaj kaduka krozoŝipo “Invincible” por reprezenti per sia ĉeesto la standardon de Lia Majesta Moŝto kaj la justajn pretendojn de mia patrio.

Sed ankaŭ la tasko de la Invincible ne estis facila, ĉar la interesoj de mia patrio estis minacataj ankaŭ de oriente de la japana disvastiĝo, eĉ pli, la ĉina popolo ribeladis kontraŭ la koncesiaj zonoj, reprezentantaj la kulturon kaj civilizacion, por kies defendo la Invincible devis deĵori en Ŝanhajo.

Mia patrio estis decidinta sekurigi la civilizacion ankaŭ oriente, sed tion nun malhelpis la itala konflikto, kiun Japanio fervore fruktuzis kaj ankaŭ ĝi mem komencis sekurigi la civilizacion en norda Ĉinio, provizore en harmonio kun la regularo de la Ligo de la Nacioj kaj kun mia ŝatata patrio.

Do, la Invincible devis anstataŭi la Terrible, parte ĝuste pro ĝia kadukeco, por ke, se eble la japanoj ĝin dronigus, la malgajno ne estu tro granda kaj ni ne devu rigardi tiun agadon malamika, evitante tiel la superfluan konflikton.

La intenco estis severa militsekreto, sed iom post iom ĝi fariĝis konata inter la maristoj, kiuj pro tio unu post la alia petis libtempon aŭ translokigon. Post la rifuzo de tiuj petoj ili dizertis unu post la alia.

La ministraro devis uzi alian metodon, ĉar estis timinde, ke la trude surŝipigata soldataro dizertos en Ŝanhajo. Do, ili promesis duoblan salajron al la soldatoj kaj altsuman vivasekuron.

Mi servis tiutempe sur la krozoŝipo Trafalgar, kiel ĥirurgo, kaj foje mi menciis la aferon al mia edzino.

Mia edzino, kiu estis ĉiam la ideala modelo de la edzina fidelo kaj de patrino, kiu laŭmaniere de fervora kaj virta vivkunulino, neniam laciĝis min senĉese admoni per siaj konsiloj kaj stimuladoj pri miaj edzaj devoj, – tuj komprenis la situacion kaj instigis min senprokraste peti translokigon al la Invincible.

Ŝi klarigis entuziasme, ke en Ŝanhajo mi ne havos elspezojn, ne povos pasigi miajn posttagmezojn kun miaj sentaŭgaj amikoj en la klubo, nek facilanime malŝpari mian monon per dominoludo, sed mi povos ĉion hejmensendi por subteni mian ŝatatan familion. Eĉ pri la sorto de mia familio post mia morto mi ne havos zorgojn, ĉar krom la pensimono, ankaŭ la abunda vivasekuro donos sufiĉan fundamenton al ŝi kaj al mia familio, por ke ili gardu mian memoron laŭ mia rango.

La noblaj vortoj de mia milda kaj amata edzino kaj la alvoko de mia adorata patrio same instigis min peti mian translokigon al la Invincible, kion mi fakte ricevis post unu semajno.

Post unu plua semajno jam okazis ankaŭ la ekveturo. Mia edzino toleris la dolorojn de la adiaŭo kun animforto, konvena al patriotino tiom, ke eĉ al la haveno ŝi ne akompanis min por min ne malĝojigi superflue per siaj larmoj, sed por plifortigi sian dolorantan animon, ŝi rapidiris al sia modistino, provi la robon, menditan por la postmorgaŭa kvinhora teo de sinjorino Eric Palmer, el mia unua duobla salajro.

Cetere la ekiro okazis sen ia sensacio. Je la 4-a de oktobro, post apenaŭ duonhora enŝipiĝo, la Invincible levis la ankron kaj post kelkaj ĉapsvingadoj kaj triobla hip-hip-hura, ni navigis al la maro.

Jam je la oka de oktobro ni traveturis la Gibraltaran markolon. Post pluaj kvar tagoj ni venis al Malto, kie ni enŝipigis oleon kaj nutraĵon, sed jam la saman tagon ni pluiris kaj je la 14-a ni alvenis al la Sueza kanalo, tra kiu, krom ni, ĝuste tiam pasis pluraj italaj transportŝipoj, akompanataj de kelkaj torpedo-rompŝipoj kaj de la kirasa krozoŝipo “Il Duce”, kiu nomiĝis antaŭe “Liberta”, sed pro la postulado de la dankema popolo, liberigita de la malnova, subpremanta reĝimo, oni rebaptis ĝin, kion la noblanima kaj altruista diktatoro, malgraŭ sia tuta modesteco, ne povis malhelpi.

La ĝojon de la renkontiĝo kun la italaj militŝipoj ni manifestis reciproke laŭ la plej ĝentila maniero. Ni ambaŭ surmastigis la standardon de la alia nacio, klinis la propran flagon kaj pafis solenajn kanonsalvojn, parte por interpreti niajn amikajn sentojn, parte, ke la alia vidu, ke ni havas municion.

Mi ne volas tedi la Leganton per la priskribo de nia vojaĝo sur la Ruĝa Maro, kvankam, precipe apud Adeno, ni ĝuis kelkajn mirinde belajn panoramojn. Mi daŭrigas la priskribon, ĉe la momento kiam ni alvenis la Hindan Oceanon.

Nia vojo kondukis longe laŭ la ekvatoro, ĉar ni devis atingi la celon de la vojaĝo sen ia sensacio kaj tiel ni klopodis laŭeble eviti la kutimajn ŝipliniojn. Nia sekvanta stacio estis Singaporo, al kiu ni devis veni per ĉirkaŭiro de la insulo Sumatro.

Nia ŝipo tranĉis la ondegojn de la Hinda Oceano jam de ok tagoj, kaj ni jam esperis alveni al Ŝanhajo sen ia akcidento. La ŝipestro sin preparis inde reprezenti per nia ŝipo la anglan kulturon, kaj pro tio li tuj enkarcerigis du maristojn en malluman ĉelon kaj unu alian li minacis per

militjuĝistaro, ĉar ili ne frotis siajn mantelbutonojn dece brilaj kaj ili ne tenis la pafilon sufiĉe streĉe ĉe la parada inspektado.

Ĉio iris en la plej bona ordo. Ni jam briligis la kanontubojn, la muroj estis farbitaj, kaj fine ni aspektis tiel timige, kvazaŭ ni estus ĵus venintaj el la doko, kie ni estis tute modernigitaj.

Vespere, ĉirkaŭ la sepa horo mi staris apud la mezferdeka kupolo. Apud mi kontente frotadis siajn manojn mia amiko ŝipleŭtenanto, kaj el la ŝipanaj ĉambroj sonis monotona kanto, akompanata de harmoniko kaj kastanjeto. Ia malnova kanto, lernita en Barcelono. (Por ke la lerta leganto ja ne akuzu nian bravan oficiraron pri neglektemo, mi rapidas rimarkigi, ke tiam ankoraŭ ne eksplodis la hispana civilmilito, sekve mia patrio ankoraŭ eĉ ne subskribis la kontrakton pri neinterveno).

Subite, sen ia ajn antaŭsigno, mi sentis akran ekpuŝon. Niaj helicoj retotiris la ŝipon per plena kontraŭvapor. Mi aŭdis senordan kriadon kaj kuradon.

Timigite mi ĉirkaŭrigardis kaj subite mi ĉion komprenis.

Sur la mara surfaco alproksimiĝis longa streko kun terura rapideco. Dum momento mi esperetis, ke ĝi eble preterkuros la pruan, sed vane.

Mi havis nur tiom da tempo, ke mi povis min terenĵeti en la angulo apud la kajuto kaj en la sekvanta momento jam terura puŝego ĵetis min al la kontraŭa muro kaj mi preskaŭ surdiĝis pro la tondrego.

Mia kapo zumzumis pro la granda frapo kaj nur manpiede mi povis elrampi. Apud mi kuŝis mia amiko leŭtenanto, kovrita de sango kaj laŭte ridegis:

– La stultuloj!... La stultuloj!... – li sufokiĝadis. – Nun ili nepre kredas, ke ili faris bonan kapton! Kiel ni superruzis la sentaŭgulojn! Bonege estis briliĝi la dekcolajn tubojn!... Oni devas krevi de la rido!

Li estus ankoraŭ daŭriginta, sed intertempe li mortis, kaj mi rapide grimpadis al la poŭpo, kiu ankoraŭ elstaris el la maro. Iu maristo ankoraŭ ĵetis post ni en la savboaton kelkajn savzonojn, alia sukcesis enĵeti ĉirkaŭ kvardek funtojn da konservajoj, sed poste ni rapide surakviĝis kaj forremis, por ke ni evitu la kirlakvon, estiĝantan sur la loko de nia ŝipo.

Mi ne volas tedi la Leganton per la detalaĵoj. Ankaŭ sen tio li povas imagi, kiel ni pasigis la sekvantan mallumegan nokton malsupre, sur la suda hemisfero, malproksime de ĉiu ŝiplinio, kaj kiom afliktis nin, kiam je la dua post noktomezo ne venis plu respondo al nia krio, kaj ni devis konstati, ke ni perdis la kontakton kun la ceteraj boatoj.

Sencele, konfuze ni remadis ĝis mateno kaj, kiam la suno leviĝis, ni vidis nenion krom akvo kaj akvo.

Maljuna maristo persiste asertis, ke en ĉi tiu regiono ekzistas marfluo, en kiun ni eniĝis per nia stulta remado, kaj tiel ni venis ankoraŭ pli profunden.

Senesperiginte mi malbenis mian aventureman sangon, kiu, post tiom da sufero, denove min logis al la maro, kaj preĝe mi petis la senlime kompateman Sinjoron de la Ĉielo, ke nur unufoje ankoraŭ Li savu min kaj mi neniam plu surŝipiĝos.

Mian malesperon mildigis nur la certa scio, ke mia adorata edzino kaj familio heredos nomon de heroo, kiu sur la ĉefa placo de Southampton, gravurite en ŝtono montros al la fremdaj ŝtatanoj la lokon, kien ili devas meti la florkronon. Post la interpaciĝo nepre alvenos eĉ la marministro de tiu ŝtato, kiu nun nin torpedis, kaj li oferos entuziasmajn frazojn pri la gloro de nia heroismo. Ĉi tiu scio plenigis nin ĉiujn per fiereco. Ni konvinkiĝis, ke angla patrioto ne povas pli multe deziri de la vivo kaj ni atendis kun suprenlevitaj kapoj kaj kun kantado nian glorplenan malsatmorton.

Nome, la konservoj je la kvara tago elĉerpiĝis. Ni malfermis la lastajn du skatolojn tagmeze, eltrinkis la lastan guton da akvo, kaj ni pretiĝis al malsatmorto.

Sed feliĉe, ĉe sunsubiro, ni trafis en uraganon, kiu iom post iom pli fortiĝis kaj fine iĝis tiel furioza, kiel eĉ la plej maljunaj maristoj ne rememoris. Eĉ mi mem povas ĝin kompari nur al la monzun-ventego, kiu kaptis min apud la Molukka-insuloj dum mia vojaĝo al Brobdingnag.

Kun malfirmaj koroj ni ĉiuj surkroĉis la savzonojn kaj post duonhoro, kiam la savboato malaperis en la ondoj, mi provis miajn ŝancojn kun la zono ĉirkaŭ mia talio.

Post plua duonhoro la uragano eksilentis. Uzante la okazon, mi klopodis min fiksi per la ŝnuroj de la zono.

Kiam fine ektagiĝis, mi vidis neniun ĉirkaŭ mi, sed kun tiom pli granda ĝojo de mia malfirma koro, je la distanco de du mejloj aperis antaŭ miaj okuloj la bordkonturoj de insulo.

Mi eknaĝis, streĉante mian tutan restintan forton. Al miaj brakoj donis novan forton la scio, ke mia nomo, en ŝtonon gravurite, anoncos mian heroan morton kaj eĉ dum mia vivo! Ankoraŭ pli: mi neniam vidos mian adoratan edzinon!

Post kvarhora terura fortostreĉo fine mi sukcesis atingi la bordon, kie pro la ekstrema laco, mi tuj terenfalas kaj endormiĝis.

Unua ĉapitro

La patrio de l' aŭtoro estas minacata de danĝeroj. La aŭtoro decidas dediĉi siajn servojn. – Li estas postenigata sur la krozoŝipon Invincible kaj ekiras al Ŝanhajo por defendi la kulturon. – Renkontiĝo kun la italaj militŝipoj. – La ŝipo estas submarigata per torpedo, sed la aŭtoro feliĉe albordiĝas.

La leganto, kiu dediĉis al miaj antaŭaj verkoj – malgraŭ ilia modesta valoro – bonvolan priatenton, nun certe surprize ekscias, ke mi – post tiom da aventuroj kaj grava sufero – denove ŝipvojaĝis al la oceanoj.

Ankaŭ mi povas aserti, ke nun, reveninte el Kazohinio kaj pripensinte la travivitajn suferojn inter la hinoj, sed precipe inter la behinoj, mi havas tute la saman konvinkon.

Ĝuste pro tio, – ne por senkulpigo, sed nur por klarigo – estu permesite al mi menci, ke ĉi-okaze min instigis al la vojaĝo ne nur mia malbenita aventurama sango, sed ankaŭ la defendo de Granda Britio kaj de la kristana civilizacio. Kaj mi demandas la kulturitan Leganton: ĉu ekzistas ia ajn pli deca destino por angla ŝtatano, ol marŝadi sub la standardo de Lia Majesta Moŝto kaj servi la grandiozajn ideojn de la humaneco kaj de la kristanismo kontraŭ iliaj obstinaj malamikoj?

Eble meritas ian senkulpigon la fakto, ke mia vojaĝo al Kazohinio gvidis min al tute nekonataj provincoj kaj rezultigis tiel eksterordinarajn travivaĵojn, kiajn neniuj el miaj homfratoj spertis antaŭe. Sed precipe la ekkono de la behina malsano vekis en mi la esperon, ke mia vojaĝo ne estis tute senfrukta kaj ke mi, per la priskribo de miaj travivaĵoj, tamen povas iome utili al mia patrio kaj al la kuracista scienco, laŭ miaj modestaj kapabloj.

Mi konjektas, ke la Leganto kelkfoje akceptos mian rakonton kun dubo kaj ĝuste pro tio mi jam nun deklaras, ke mi en mia priskribo ĉiam klopodis persisti al la severe objektivaj faktoj.

Tamen mi tute ne estos surprizita, se kelkaj partoj de mia jena libro okazigos pridubon. Kazohinio situas tiom malproksime de mia patrio kaj de la eŭropa civilizacio, ke la tieaj kutimoj, kaj precipe la behina malsano ĉe ni estas tute nekonataj kaj, – se mi ne estus vidinta tiujn per miaj propraj okuloj, – eble mi ne povus kredi tiujn.

Nun, kiam mi finlaborinte miajn vojaĝnotojn, tamen publikigas jenan libron, tiu fakto pruvas nur mian neĉesigeblan nostalgion al la objektiva verdiremo, kiu – eĉ malgraŭ la minaco de la pridubo – tamen instigis min al la priskribo de la veraj okazintaĵoj.

* * *

La homaro, savita el siaj pekoj, skribis la 1935-an jaron, kiam la kabineto de Lia Majesta Moŝto venis al la konkludo, ke ĝi devas plej verŝajne deklari defendmiliton kontraŭ Italio.

Kredeble mi ne bezonas klarigi al la Leganto, ke la kaŭzo de la disopinioj estis la malamika konduto de Italio kontraŭ la libereco de la etiopia popolo.

Italion gvidis en tiu agado sendube la intenco pli vastigi sian nacian grandecon kaj tian intencon povas akcepti ĉiu angla ĝentilhomo nur kun respekto, eĉ de la malamiko. Por eviti, ke la Leganto min akuzu pri neobjektiveco, mi rapidas deklari, ke tion rekonis ĉiu honesta ŝtatano de Granda Britio. Precipe profundan impreson faris en niaj animoj la entuziasma oferemo de la itala ĉefpastraro, kiam ili donacis al la altaro de la patrio sian monon, valorajn pastorbastonojn kaj juvelŝtonajn orkrucifiksojn por aĉeti tankojn, bajonetojn kaj brulbombojn por la noblaj celoj.

Kortuŝite ni legis entuziasmajn episkopajn epistolojn, en kiuj ili ne ĉesis kuraĝigi per stimulaj vortoj la kamparanojn, la spicistojn, la pasteĉfritistojn, fiŝistojn, doklaboristojn, almozpetulojn, ŝafistojn, glaciaĵistojn kaj kandelfaristojn sen ras- kaj klasdiferenco, ke ili iru en la tranĉeojn por disvastigi inter la nigruloj la kulturon kaj la puran kristanan civilizacion, dum la pastraro senĉese preĝos

hejme al la Savinto kaj al la Sankta Virgulino de Loretto, por ke la favoro de la Ĉieloĵ subtenu iliajn armilojn por ilia nobla destino.

Ni volonte rekonis ankaŭ la mirindan sinoferon de la italaj soldatoj, kies heroan kuraĝon kaj ceterajn honestajn virtojn ĉiu fidela kaj firmkaraktera brita ŝtatano devas imiti kiel brilan ekzemplon. Kompreneble sub angla flago kaj kontraŭ la italoj.

Do, mi emfaze ripetas, ke ekzistis nenia disharmonio inter mia patrio kaj Italio pro la *kielo* de la aferoj. Nur la *kialo* okazigis kelkajn bedaŭrindajn disonancojn.

Nome, Italio pravigis sian abisenan agadon per la argumento, ke ili intencas liberigi la abisenojn de la subpremado kaj disvastigi inter ili la kulturon. La evidenta malvereco de ĉi tiu argumento devas ridigi ĉiun prudente pensantan homon, antaŭ kiu estas konataj la falsaj bombastoj, uzataj de la sagaca diplomatio de aliaj landoj.

Mi ne volas peki per la eraroj de la antaŭjuĝoj, kiel tiuj vojaĝantoj, kiuj ne hontas supermezure troigi la gloron de siaj patrioj sub la masko de scienca priskribo. Tamen, eĉ gardante la devigan respekton al fremdaj landoj kaj ankaŭ la regulojn de la ĝentila modesteco, mi povas rimarki, ke tiu aserto de la italia diplomatio estas nur falsado de la aferoj kaj tia eraro, kian angla ŝtatano neniam farus.

Nome, estas afero evidenta kaj ĝenerale sciata, ke la oferpena, sed nobla laboro, liberigi la tropikajn popolojn kaj disvastigi la kulturon ĉiam estis la honora tasko de Anglio. Por pruvo estas sufiĉa menci la multajn koloniojn de Malantaŭa Hindio ĝis la buroj, kiujn popolojn liberigis *mia* patrio el la subpremo per la kosto de malfacilaj bataloj.

Kaj, kvankam anglan ĝentilhomon ne interesas la materiaj rilatoj de la aferoj, tamen mi ne povas prisilenti tiun mian opinion, ke Italion verŝajne influis en sia decido krom la kulturo kaj la libereco ankaŭ la kafoplantaĵoj kaj naftokampoj de Etiopio.

Tial la ministerio de Lia Majesta Moŝto decidis, ke post la aprobigado de la kontraŭitalaj sankcioj ĝi deklaras defendmiliton kontraŭ Italio.

Por certigi la eŭropan ekvilibron kaj pacon, urĝe estis senditaj en Egiption kelkaj divizioj, ekipitaj per aeroplanoj, tankoj, flamĵetiloj kaj brulbomboj kaj al la Mediteraneo estis senditaj kelkaj grandaj militŝipoj, akompane de torpedorompŝipoj kaj submarŝipoj.

Tion la itala gazetaro kompreneble akceptis kun granda malkonsento, asertante, ke nian patrimon influis eble, krom la menciitaj celoj, ankaŭ la posedavido, kaj ke Anglio envias al la malriĉa itala popolo eĉ tiujn kelkajn abisenajn minejojn kaj petrolfontojn, kiuj – kvankam ili tute ne interesas la italojn, – tamen estas menciindaj, kiam temas pri angloj.

Eble la detalaĵoj jam tedas la Leganton, sed mia severa decido estas persisti ĉe la objektiva vero kaj ĉiam laŭtigi mian modestan voĉon, kiam ajn trafas neinda kalumnio mian patrimon, ĝiajn militŝipojn, tankojn, aeroplanojn kaj ĝenerale ĉiujn grandiozajn kreaĵojn, kiuj distingas la homon de la rabobestoj.

Do, por ke mi ne perdu la fadenon de mia rakonto, en la sama tempo okazis, ke la krozoŝipo “Terrible” de Lia Majesta Moŝto, kiu ankris sur la ĉinaj akvoj, estis hejmenvokita por esti sendata al la Mediteraneo kaj anstataŭe estis komandita la malnova kaj kaduka krozoŝipo “Invincible” por reprezenti per sia ĉeesto la standardon de Lia Majesta Moŝto kaj la justajn pretendojn de mia patrio.

Sed ankaŭ la tasko de la Invincible ne estis facila, ĉar la interesoj de mia patrio estis minacataj ankaŭ de oriente de la japana disvastiĝo, eĉ pli, la ĉina popolo ribeladis kontraŭ la koncesiaj zonoj, reprezentantaj la kulturon kaj civilizacion, por kies defendo la Invincible devis deĵori en Ŝanhajo.

Mia patrio estis decidinta sekurigi la civilizacion ankaŭ oriente, sed tion nun malhelpis la itala konflikto, kiun Japanio fervore fruktuzis kaj ankaŭ ĝi mem komencis sekurigi la civilizacion en norda Ĉinio, provizore en harmonio kun la regularo de la Ligo de la Nacioj kaj kun mia ŝatata patrio.

Do, la Invincible devis anstataŭi la Terrible, parte ĝuste pro ĝia kadukeco, por ke, se eble la japanoj ĝin dronigus, la malgajno ne estu tro granda kaj ni ne devu rigardi tiun agadon malamika, evitante tiel la superfluan konflikton.

La intenco estis severa militsekreto, sed iom post iom ĝi fariĝis konata inter la maristoj, kiuj pro tio unu post la alia petis libtempon aŭ translokigon. Post la rifuzo de tiuj petoj ili dizertis unu post la alia.

La ministraro devis uzi alian metodon, ĉar estis timinde, ke la trude surŝipigata soldataro dizertos en Ŝanhajo. Do, ili promesis duoblan salajron al la soldatoj kaj altsuman vivasekuron.

Mi servis tiutempe sur la krozoŝipo Trafalgar, kiel ĥirurgo, kaj foje mi menciis la aferon al mia edzino.

Mia edzino, kiu estis ĉiam la ideala modelo de la edzina fidelo kaj de patrino, kiu laŭmaniere de fervora kaj virta vivkunulino, neniam laciĝis min senĉese admoni per siaj konsiloj kaj stimuladoj pri miaj edzaj devoj, – tuj komprenis la situacion kaj instigis min senprokraste peti translokigon al la Invincible.

Ŝi klarigis entuziasme, ke en Ŝanhajo mi ne havos elspezojn, ne povos pasigi miajn posttagmezojn kun miaj sentaŭgaj amikoj en la klubo, nek facilanime malŝpari mian monon per dominoludo, sed mi povos ĉion hejmensendi por subteni mian ŝatatan familion. Eĉ pri la sorto de mia familio post mia morto mi ne havos zorgojn, ĉar krom la pensimono, ankaŭ la abunda vivasekuro donos sufiĉan fundamenton al ŝi kaj al mia familio, por ke ili gardu mian memoron laŭ mia rango.

La noblaj vortoj de mia milda kaj amata edzino kaj la alvoko de mia adorata patrio same instigis min peti mian translokigon al la Invincible, kion mi fakte ricevis post unu semajno.

Post unu plua semajno jam okazis ankaŭ la ekveturo. Mia edzino toleris la dolorojn de la adiaŭo kun animforto, konvena al patriotino tiom, ke eĉ al la haveno ŝi ne akompanis min por min ne malĝojigi superflue per siaj larmoj, sed por plifortigi sian dolorantan animon, ŝi rapidiris al sia modistino, provi la robon, menditan por la postmorgaŭa kvinhora teo de sinjorino Eric Palmer, el mia unua duobla salajro.

Cetere la ekiro okazis sen ia sensacio. Je la 4-a de oktobro, post apenaŭ duonhora enŝipiĝo, la Invincible levis la ankron kaj post kelkaj ĉapsvingadoj kaj triobla hip-hip-hura, ni navigis al la maro.

Jam je la oka de oktobro ni traveturis la Gibraltaran markolon. Post pluaj kvar tagoj ni venis al Malto, kie ni enŝipigis oleon kaj nutraĵon, sed jam la saman tagon ni pluiris kaj je la 14-a ni alvenis al la Sueza kanalo, tra kiu, krom ni, ĝuste tiam pasis pluraj italaj transportŝipoj, akompanataj de kelkaj torpedo-rompŝipoj kaj de la kirasa krozoŝipo “Il Duce”, kiu nomiĝis antaŭe “Liberta”, sed pro la postulado de la dankema popolo, liberigita de la malnova, subpremanta reĝimo, oni rebaptis ĝin, kion la noblanima kaj altruista diktatoro, malgraŭ sia tuta modesteco, ne povis malhelpi.

La ĝojon de la renkontiĝo kun la italaj militŝipoj ni manifestis reciproke laŭ la plej ĝentila maniero. Ni ambaŭ surmastigis la standardon de la alia nacio, klinis la propran flagon kaj pafis solenajn kanonsalvojn, parte por interpreti niajn amikajn sentojn, parte, ke la alia vidu, ke ni havas municion.

Mi ne volas tedi la Leganton per la priskribo de nia vojaĝo sur la Ruĝa Maro, kvankam, precipe apud Adeno, ni ĝuis kelkajn mirinde belajn panoramojn. Mi daŭrigas la priskribon, ĉe la momento kiam ni alvenis la Hindan Oceanon.

Nia vojo kondukis longe laŭ la ekvatoro, ĉar ni devis atingi la celon de la vojaĝo sen ia sensacio kaj tiel ni klopodis laŭeble eviti la kutimajn ŝipliniojn. Nia sekvanta stacio estis Singaporo, al kiu ni devis veni per ĉirkaŭiro de la insulo Sumatro.

Nia ŝipo tranĉis la ondegojn de la Hinda Oceano jam de ok tagoj, kaj ni jam esperis alveni al Ŝanhajo sen ia akcidento. La ŝipestro sin preparis inde reprezenti per nia ŝipo la anglan kulturon, kaj pro tio li tuj enkarcerigis du maristojn en malluman ĉelon kaj unu alian li minacis per

militjuĝistaro, ĉar ili ne frotis siajn mantelbutonojn dece brilaj kaj ili ne tenis la pafilon sufiĉe streĉe ĉe la parada inspektado.

Ĉio iris en la plej bona ordo. Ni jam briligis la kanontubojn, la muroj estis farbitaj, kaj fine ni aspektis tiel timige, kvazaŭ ni estus ĵus venintaj el la doko, kie ni estis tute modernigitaj.

Vespere, ĉirkaŭ la sepa horo mi staris apud la mezferdeka kupolo. Apud mi kontente frotadis siajn manojn mia amiko ŝipleŭtenanto, kaj el la ŝipanaj ĉambroj sonis monotona kanto, akompanata de harmoniko kaj kastanjeto. Ia malnova kanto, lernita en Barcelono. (Por ke la lerta leganto ja ne akuzu nian bravan oficiraron pri neglektemo, mi rapidas rimarkigi, ke tiam ankoraŭ ne eksplodis la hispana civilmilito, sekve mia patrio ankoraŭ eĉ ne subskribis la kontrakton pri neinterveno).

Subite, sen ia ajn antaŭsigno, mi sentis akran ekpuŝon. Niaj helicoj retrotiris la ŝipon per plena kontraŭvapor. Mi aŭdis senordan kriadon kaj kuradon.

Timigite mi ĉirkaŭrigardis kaj subite mi ĉion komprenis.

Sur la mara surfaco alproksimiĝis longa streko kun terura rapideco. Dum momento mi esperetis, ke ĝi eble preterkuros la pruon, sed vane.

Mi havis nur tiom da tempo, ke mi povis min terenĵeti en la angulo apud la kajuto kaj en la sekvanta momento jam terura puŝego ĵetis min al la kontraŭa muro kaj mi preskaŭ surdiĝis pro la tondrego.

Mia kapo zumzumis pro la granda frapo kaj nur manpiede mi povis elrampi. Apud mi kuŝis mia amiko leŭtenanto, kovrita de sango kaj laŭte ridegis:

– La stultuloj!... La stultuloj!... – li sufokiĝadis. – Nun ili nepre kredas, ke ili faris bonan kapton! Kiel ni superruzis la sentaŭgulojn! Bonege estis briligi la dekcolajn tubojn!... Oni devas krevi de la rido!

Li estus ankoraŭ daŭriginta, sed intertempe li mortis, kaj mi rapide grimpadis al la poŭpo, kiu ankoraŭ elstaris el la maro. Iu maristo ankoraŭ ĵetis post ni en la savboaton kelkajn savzonojn, alia sukcesis enĵeti ĉirkaŭ kvardek funtojn da konservajoj, sed poste ni rapide surakviĝis kaj forremis, por ke ni evitu la kirlakvon, estiĝantan sur la loko de nia ŝipo.

Mi ne volas tedi la Leganton per la detalaĵoj. Ankaŭ sen tio li povas imagi, kiel ni pasigis la sekvantan mallumegan nokton malsupre, sur la suda hemisfero, malproksime de ĉiu ŝiplinio, kaj kiom afliktis nin, kiam je la dua post noktomezo ne venis plu respondo al nia krio, kaj ni devis konstati, ke ni perdis la kontakton kun la ceteraj boatoj.

Sencele, konfuze ni remadis ĝis mateno kaj, kiam la suno leviĝis, ni vidis nenion krom akvo kaj akvo.

Maljuna maristo persiste asertis, ke en ĉi tiu regiono ekzistas marfluo, en kiun ni eniĝis per nia stulta remado, kaj tiel ni venis ankoraŭ pli profunden.

Senesperiginte mi malbenis mian aventureman sangon, kiu, post tiom da sufero, denove min logis al la maro, kaj preĝe mi petis la senlime kompateman Sinjoron de la Ĉielo, ke nur unufoje ankoraŭ Li savu min kaj mi neniam plu surŝipiĝos.

Mian malesperon mildigis nur la certa scio, ke mia adorata edzino kaj familio heredos nomon de heroo, kiu sur la ĉefa placo de Southampton, gravurite en ŝtono montros al la fremdaj ŝtatanoj la lokon, kien ili devas meti la florkronon. Post la interpaciĝo nepre alvenos eĉ la marministro de tiu ŝtato, kiu nun nin torpedis, kaj li oferos entuziasmajn frazojn pri la gloro de nia heroismo. Ĉi tiu scio plenigis nin ĉiujn per fiereco. Ni konvinkiĝis, ke angla patrioto ne povas pli multe deziri de la vivo kaj ni atendis kun suprenlevitaj kapoj kaj kun kantado nian glorplenan malsatmorton.

Nome, la konservoj je la kvara tago elĉerpiĝis. Ni malfermis la lastajn du skatolojn tagmeze, eltrinkis la lastan guton da akvo, kaj ni pretiĝis al malsatmorto.

Sed feliĉe, ĉe sunsubiro, ni trafis en uraganon, kiu iom post iom pli fortiĝis kaj fine iĝis tiel furioza, kiel eĉ la plej maljunaj maristoj ne rememoris. Eĉ mi mem povas ĝin kompari nur al la monzun-ventego, kiu kaptis min apud la Molukka-insuloj dum mia vojaĝo al Brobdingnag.

Kun malfirmaj koroj ni ĉiuj surkroĉis la savzonojn kaj post duonhoro, kiam la savboato malaperis en la ondoj, mi provis miajn ŝancojn kun la zono ĉirkaŭ mia talio.

Post plua duonhoro la uragano eksilentis. Uzante la okazon, mi klopodis min fiksi per la ŝnuroj de la zono.

Kiam fine ektagiĝis, mi vidis neniun ĉirkaŭ mi, sed kun tiom pli granda ĝojo de mia malfirma koro, je la distanco de du mejloj aperis antaŭ miaj okuloj la bordkonturoj de insulo.

Mi eknaĝis, streĉante mian tutan restintan forton. Al miaj brakoj donis novan forton la scio, ke mia nomo, en ŝtonon gravurite, anoncos mian heroan morton kaj eĉ dum mia vivo! Ankoraŭ pli: mi neniam vidos mian adoratan edzinon!

Post kvarhora terura fortostreĉo fine mi sukcesis atingi la bordon, kie pro la ekstrema laco, mi tuj terenfalas kaj endormiĝis.

Unua ĉapitro

La patrio de l' aŭtoro estas minacata de danĝeroj. La aŭtoro decidas dediĉi siajn servojn. – Li estas postenigata sur la krozoŝipon Invincible kaj ekiras al Ŝanhajo por defendi la kulturon. – Renkontiĝo kun la italaj militŝipoj. – La ŝipo estas submarigata per torpedo, sed la aŭtoro feliĉe albordiĝas.

La leganto, kiu dediĉis al miaj antaŭaj verkoj – malgraŭ ilia modesta valoro – bonvolan priatenton, nun certe surprize ekscias, ke mi – post tiom da aventuroj kaj grava sufero – denove ŝipvojaĝis al la oceanoj.

Ankaŭ mi povas aserti, ke nun, reveninte el Kazohinio kaj pripensinte la travivitajn suferojn inter la hinoj, sed precipe inter la behinoj, mi havas tute la saman konvinkon.

Ĝuste pro tio, – ne por senkulpigo, sed nur por klarigo – estu permesite al mi mencii, ke ĉi-okaze min instigis al la vojaĝo ne nur mia malbenita aventurama sango, sed ankaŭ la defendo de Granda Britio kaj de la kristana civilizacio. Kaj mi demandas la kulturitan Leganton: ĉu ekzistas ia ajn pli deca destino por angla ŝtatano, ol marŝadi sub la standardo de Lia Majesta Moŝto kaj servi la grandiozajn ideojn de la humaneco kaj de la kristanismo kontraŭ iliaj obstinaj malamikoj?

Eble meritas ian senkulpigon la fakto, ke mia vojaĝo al Kazohinio gvidis min al tute nekonataj provincoj kaj rezultigis tiel eksterordinarajn travivaĵojn, kiajn neniuj el miaj homfratoj spertis antaŭe. Sed precipe la ekkono de la behina malsano vekis en mi la esperon, ke mia vojaĝo ne estis tute senfrukta kaj ke mi, per la priskribo de miaj travivaĵoj, tamen povas iome utili al mia patrio kaj al la kuracista scienco, laŭ miaj modestaj kapabloj.

Mi konjektas, ke la Leganto kelkfoje akceptos mian rakonton kun dubo kaj ĝuste pro tio mi jam nun deklaras, ke mi en mia priskribo ĉiam klopodis persisti al la severe objektivaj faktoj.

Tamen mi tute ne estos surprizita, se kelkaj partoj de mia jena libro okazigos pridubon. Kazohinio situas tiom malproksime de mia patrio kaj de la eŭropa civilizacio, ke la tieaj kutimoj, kaj precipe la behina malsano ĉe ni estas tute nekonataj kaj, – se mi ne estus vidinta tiujn per miaj propraj okuloj, – eble mi ne povus kredi tiujn.

Nun, kiam mi finlaborinte miajn vojaĝnotojn, tamen publikigas jenan libron, tiu fakto pruvas nur mian neĉesigeblan nostalgion al la objektiva verdiremo, kiu – eĉ malgraŭ la minaco de la pridubo – tamen instigis min al la priskribo de la veraj okazintaĵoj.

* * *

La homaro, savita el siaj pekoj, skribis la 1935-an jaron, kiam la kabineto de Lia Majesta Moŝto venis al la konkludo, ke ĝi devas plej verŝajne deklari defendmiliton kontraŭ Italio.

Kredeble mi ne bezonas klarigi al la Leganto, ke la kaŭzo de la disopinioj estis la malamika konduto de Italio kontraŭ la libereco de la etiopia popolo.

Italion gvidis en tiu agado sendube la intenco pli vastigi sian nacian grandecon kaj tian intencon povas akcepti ĉiu angla ĝentilhomino nur kun respekto, eĉ de la malamiko. Por eviti, ke la Leganto min akuzu pri neobjektiveco, mi rapidas deklari, ke tion rekonis ĉiu honesta ŝtatano de Granda Britio. Precipe profundan impreson faris en niaj animoj la entuziasma oferemo de la itala ĉefpastraro, kiam ili donacis al la altaro de la patrio sian monon, valorajn pastorbastonojn kaj juvelŝtonajn orkrucifiksojn por aĉeti tankojn, bajonetojn kaj brulbombojn por la noblaj celoj.

Kortuŝite ni legis entuziasmajn episkopajn epistolojn, en kiuj ili ne ĉesis kuraĝigi per stimulaj vortoj la kamparanojn, la spicistojn, la pasteĉfritistojn, fiŝistojn, doklaboristojn, almozpetulojn, ŝafistojn, glaciaĵistojn kaj kandelfaristojn sen ras- kaj klasdiferenco, ke ili iru en la tranĉeojn por disvastigi inter la nigruloj la kulturon kaj la puran kristanan civilizacion, dum la pastraro senĉese preĝos

hejme al la Savinto kaj al la Sankta Virgulino de Loretto, por ke la favoro de la Ĉieloĵ subtenu iliajn armilojn por ilia nobla destino.

Ni volonte rekonis ankaŭ la mirindan sinoferon de la italaj soldatoj, kies heroan kuraĝon kaj ceterajn honestajn virtojn ĉiu fidela kaj firmkaraktera brita ŝtatano devas imiti kiel brilan ekzemplon. Kompreneble sub angla flago kaj kontraŭ la italoj.

Do, mi emfaze ripetas, ke ekzistis nenia disharmonio inter mia patrio kaj Italio pro la *kielo* de la aferoj. Nur la *kialo* okazigis kelkajn bedaŭrindajn disonancojn.

Nome, Italio pravigis sian abisenan agadon per la argumento, ke ili intencas liberigi la abisenojn de la subpremado kaj disvastigi inter ili la kulturon. La evidenta malvereco de ĉi tiu argumento devas ridigi ĉiun prudente pensantan homon, antaŭ kiu estas konataj la falsaj bombastoj, uzataj de la sagaca diplomatio de aliaj landoj.

Mi ne volas peki per la eraroj de la antaŭjuĝoj, kiel tiuj vojaĝantoj, kiuj ne hontas supermezure troigi la gloron de siaj patrioj sub la masko de scienca priskribo. Tamen, eĉ gardante la devigan respekton al fremdaj landoj kaj ankaŭ la regulojn de la ĝentila modesteco, mi povas rimarki, ke tiu aserto de la italia diplomatio estas nur falsado de la aferoj kaj tia eraro, kian angla ŝtatano neniam farus.

Nome, estas afero evidenta kaj ĝenerale sciata, ke la oferpena, sed nobla laboro, liberigi la tropikajn popolojn kaj disvastigi la kulturon ĉiam estis la honora tasko de Anglio. Por pruvo estas sufiĉa menci la multajn koloniojn de Malantaŭa Hindio ĝis la buroj, kiujn popolojn liberigis *mia* patrio el la subpremo per la kosto de malfacilaj bataloj.

Kaj, kvankam anglan ĝentilhomon ne interesas la materiaj rilatoj de la aferoj, tamen mi ne povas prisilenti tiun mian opinion, ke Italion verŝajne influis en sia decido krom la kulturo kaj la libereco ankaŭ la kafoplantaĵoj kaj naftokampoj de Etiopio.

Tial la ministerio de Lia Majesta Moŝto decidis, ke post la aprobigado de la kontraŭitalaj sankcioj ĝi deklaras defendmiliton kontraŭ Italio.

Por certigi la eŭropan ekvilibron kaj pacon, urĝe estis senditaj en Egiption kelkaj divizioj, ekipitaj per aeroplanoj, tankoj, flamĵetiloj kaj brulbomboj kaj al la Mediteraneo estis senditaj kelkaj grandaj militŝipoj, akompane de torpedorompŝipoj kaj submarŝipoj.

Tion la itala gazetaro kompreneble akceptis kun granda malkonsento, asertante, ke nian patrimon influis eble, krom la menciitaj celoj, ankaŭ la posedavido, kaj ke Anglio envias al la malriĉa itala popolo eĉ tiujn kelkajn abisenajn minejojn kaj petrolfontojn, kiuj – kvankam ili tute ne interesas la italojn, – tamen estas menciindaj, kiam temas pri angloj.

Eble la detalaĵoj jam tedas la Leganton, sed mia severa decido estas persisti ĉe la objektiva vero kaj ĉiam laŭtigi mian modestan voĉon, kiam ajn trafas neinda kalumnio mian patrimon, ĝiajn militŝipojn, tankojn, aeroplanojn kaj ĝenerale ĉiujn grandiozajn kreaĵojn, kiuj distingas la homon de la rabobestoj.

Do, por ke mi ne perdu la fadenon de mia rakonto, en la sama tempo okazis, ke la krozoŝipo “Terrible” de Lia Majesta Moŝto, kiu ankris sur la ĉinaj akvoj, estis hejmenvokita por esti sendata al la Mediteraneo kaj anstataŭe estis komandita la malnova kaj kaduka krozoŝipo “Invincible” por reprezenti per sia ĉeesto la standardon de Lia Majesta Moŝto kaj la justajn pretendojn de mia patrio.

Sed ankaŭ la tasko de la Invincible ne estis facila, ĉar la interesoj de mia patrio estis minacataj ankaŭ de oriente de la japana disvastiĝo, eĉ pli, la ĉina popolo ribeladis kontraŭ la koncesiaj zonoj, reprezentantaj la kulturon kaj civilizacion, por kies defendo la Invincible devis deĵori en Ŝanhajo.

Mia patrio estis decidinta sekurigi la civilizacion ankaŭ oriente, sed tion nun malhelpis la itala konflikto, kiun Japanio fervore fruktuzis kaj ankaŭ ĝi mem komencis sekurigi la civilizacion en norda Ĉinio, provizore en harmonio kun la regularo de la Ligo de la Nacioj kaj kun mia ŝatata patrio.

Do, la Invincible devis anstataŭi la Terrible, parte ĝuste pro ĝia kadukeco, por ke, se eble la japanoj ĝin dronigus, la malgajno ne estu tro granda kaj ni ne devu rigardi tiun agadon malamika, evitante tiel la superfluan konflikton.

La intenco estis severa militsekreto, sed iom post iom ĝi fariĝis konata inter la maristoj, kiuj pro tio unu post la alia petis libtempon aŭ translokigon. Post la rifuzo de tiuj petoj ili dizertis unu post la alia.

La ministraro devis uzi alian metodon, ĉar estis timinde, ke la trude surŝipigata soldataro dizertos en Ŝanhajo. Do, ili promesis duoblan salajron al la soldatoj kaj altsuman vivasekuron.

Mi servis tiutempe sur la krozoŝipo Trafalgar, kiel ĥirurgo, kaj foje mi menciis la aferon al mia edzino.

Mia edzino, kiu estis ĉiam la ideala modelo de la edzina fidelo kaj de patrino, kiu laŭmaniere de fervora kaj virta vivkunulino, neniam laciĝis min senĉese admoni per siaj konsiloj kaj stimuladoj pri miaj edzaj devoj, – tuj komprenis la situacion kaj instigis min senprokraste peti translokigon al la Invincible.

Ŝi klarigis entuziasme, ke en Ŝanhajo mi ne havos elspezojn, ne povos pasigi miajn posttagmezojn kun miaj sentaŭgaj amikoj en la klubo, nek facilanime malŝpari mian monon per dominoludo, sed mi povos ĉion hejmensendi por subteni mian ŝatatan familion. Eĉ pri la sorto de mia familio post mia morto mi ne havos zorgojn, ĉar krom la pensimono, ankaŭ la abunda vivasekuro donos sufiĉan fundamenton al ŝi kaj al mia familio, por ke ili gardu mian memoron laŭ mia rango.

La noblaj vortoj de mia milda kaj amata edzino kaj la alvoko de mia adorata patrio same instigis min peti mian translokigon al la Invincible, kion mi fakte ricevis post unu semajno.

Post unu plua semajno jam okazis ankaŭ la ekveturo. Mia edzino toleris la dolorojn de la adiaŭo kun animforto, konvena al patriotino tiom, ke eĉ al la haveno ŝi ne akompanis min por min ne malĝojigi superflue per siaj larmoj, sed por plifortigi sian dolorantan animon, ŝi rapidiris al sia modistino, provi la robon, menditan por la postmorgaŭa kvinhora teo de sinjorino Eric Palmer, el mia unua duobla salajro.

Cetere la ekiro okazis sen ia sensacio. Je la 4-a de oktobro, post apenaŭ duonhora enŝipiĝo, la Invincible levis la ankron kaj post kelkaj ĉapsvingadoj kaj triobla hip-hip-hura, ni navigis al la maro.

Jam je la oka de oktobro ni traveturis la Gibraltaran markolon. Post pluaj kvar tagoj ni venis al Malto, kie ni enŝipigis oleon kaj nutraĵon, sed jam la saman tagon ni pluiris kaj je la 14-a ni alvenis al la Sueza kanalo, tra kiu, krom ni, ĝuste tiam pasis pluraj italaj transportŝipoj, akompanataj de kelkaj torpedo-rompŝipoj kaj de la kirasa krozoŝipo “Il Duce”, kiu nomiĝis antaŭe “Liberta”, sed pro la postulado de la dankema popolo, liberigita de la malnova, subpremanta reĝimo, oni rebaptis ĝin, kion la noblanima kaj altruista diktatoro, malgraŭ sia tuta modesteco, ne povis malhelpi.

La ĝojon de la renkontiĝo kun la italaj militŝipoj ni manifestis reciproke laŭ la plej ĝentila maniero. Ni ambaŭ surmastigis la standardon de la alia nacio, klinis la propran flagon kaj pafis solenajn kanonsalvojn, parte por interpreti niajn amikajn sentojn, parte, ke la alia vidu, ke ni havas municion.

Mi ne volas tedi la Leganton per la priskribo de nia vojaĝo sur la Ruĝa Maro, kvankam, precipe apud Adeno, ni ĝuis kelkajn mirinde belajn panoramojn. Mi daŭrigas la priskribon, ĉe la momento kiam ni alvenis la Hindan Oceanon.

Nia vojo kondukis longe laŭ la ekvatoro, ĉar ni devis atingi la celon de la vojaĝo sen ia sensacio kaj tiel ni klopodis laŭeble eviti la kutimajn ŝipliniojn. Nia sekvanta stacio estis Singaporo, al kiu ni devis veni per ĉirkaŭiro de la insulo Sumatro.

Nia ŝipo tranĉis la ondegojn de la Hinda Oceano jam de ok tagoj, kaj ni jam esperis alveni al Ŝanhajo sen ia akcidento. La ŝipestro sin preparis inde reprezenti per nia ŝipo la anglan kulturon, kaj pro tio li tuj enkarcerigis du maristojn en malluman ĉelon kaj unu alian li minacis per

militjuĝistaro, ĉar ili ne frotis siajn mantelbutonojn dece brilaj kaj ili ne tenis la pafilon sufiĉe streĉe ĉe la parada inspektado.

Ĉio iris en la plej bona ordo. Ni jam briligis la kanontubojn, la muroj estis farbitaj, kaj fine ni aspektis tiel timige, kvazaŭ ni estus ĵus venintaj el la doko, kie ni estis tute modernigitaj.

Vespere, ĉirkaŭ la sepa horo mi staris apud la mezferdeka kupolo. Apud mi kontente frotadis siajn manojn mia amiko ŝipleŭtenanto, kaj el la ŝipanaj ĉambroj sonis monotona kanto, akompanata de harmoniko kaj kastanjeto. Ia malnova kanto, lernita en Barcelono. (Por ke la lerta leganto ja ne akuzu nian bravan oficiraron pri neglektemo, mi rapidas rimarkigi, ke tiam ankoraŭ ne eksplodis la hispana civilmilito, sekve mia patrio ankoraŭ eĉ ne subskribis la kontrakton pri neinterveno).

Subite, sen ia ajn antaŭsigno, mi sentis akran ekpuŝon. Niaj helicoj retrotiris la ŝipon per plena kontraŭvapor. Mi aŭdis senordan kriadon kaj kuradon.

Timigite mi ĉirkaŭrigardis kaj subite mi ĉion komprenis.

Sur la mara surfaco alproksimiĝis longa streko kun terura rapideco. Dum momento mi esperetis, ke ĝi eble preterkuros la pruon, sed vane.

Mi havis nur tiom da tempo, ke mi povis min terenĵeti en la angulo apud la kajuto kaj en la sekvanta momento jam terura puŝego ĵetis min al la kontraŭa muro kaj mi preskaŭ surdiĝis pro la tondrego.

Mia kapo zumzumis pro la granda frapo kaj nur manpiede mi povis elrampi. Apud mi kuŝis mia amiko leŭtenanto, kovrita de sango kaj laŭte ridegis:

– La stultuloj!... La stultuloj!... – li sufokiĝadis. – Nun ili nepre kredas, ke ili faris bonan kapton! Kiel ni superruzis la sentaŭgulojn! Bonege estis briliĝi la dekcolajn tubojn!... Oni devas krevi de la rido!

Li estus ankoraŭ daŭriginta, sed intertempe li mortis, kaj mi rapide grimpadis al la poŭpo, kiu ankoraŭ elstaris el la maro. Iu maristo ankoraŭ ĵetis post ni en la savboaton kelkajn savzonojn, alia sukcesis enĵeti ĉirkaŭ kvardek funtojn da konservajoj, sed poste ni rapide surakviĝis kaj forremis, por ke ni evitu la kirlakvon, estiĝantan sur la loko de nia ŝipo.

Mi ne volas tedi la Leganton per la detalaĵoj. Ankaŭ sen tio li povas imagi, kiel ni pasigis la sekvantan mallumegan nokton malsupre, sur la suda hemisfero, malproksime de ĉiu ŝiplinio, kaj kiom afliktis nin, kiam je la dua post noktomezo ne venis plu respondo al nia krio, kaj ni devis konstati, ke ni perdis la kontakton kun la ceteraj boatoj.

Sencele, konfuze ni remadis ĝis mateno kaj, kiam la suno leviĝis, ni vidis nenion krom akvo kaj akvo.

Maljuna maristo persiste asertis, ke en ĉi tiu regiono ekzistas marfluo, en kiun ni eniĝis per nia stulta remado, kaj tiel ni venis ankoraŭ pli profunden.

Senesperiginte mi malbenis mian aventureman sangon, kiu, post tiom da sufero, denove min logis al la maro, kaj preĝe mi petis la senlime kompateman Sinjoron de la Ĉielo, ke nur unufoje ankoraŭ Li savu min kaj mi neniam plu surŝipiĝos.

Mian malesperon mildigis nur la certa scio, ke mia adorata edzino kaj familio heredos nomon de heroo, kiu sur la ĉefa placo de Southampton, gravurite en ŝtono montros al la fremdaj ŝtatanoj la lokon, kien ili devas meti la florkronon. Post la interpaciĝo nepre alvenos eĉ la marministro de tiu ŝtato, kiu nun nin torpedis, kaj li oferos entuziasmajn frazojn pri la gloro de nia heroismo. Ĉi tiu scio plenigis nin ĉiujn per fiereco. Ni konvinkiĝis, ke angla patrioto ne povas pli multe deziri de la vivo kaj ni atendis kun suprenlevitaj kapoj kaj kun kantado nian glorplenan malsatmorton.

Nome, la konservoj je la kvara tago elĉerpiĝis. Ni malfermis la lastajn du skatolojn tagmeze, eltrinkis la lastan guton da akvo, kaj ni pretiĝis al malsatmorto.

Sed feliĉe, ĉe sunsubiro, ni trafis en uraganon, kiu iom post iom pli fortiĝis kaj fine iĝis tiel furioza, kiel eĉ la plej maljunaj maristoj ne rememoris. Eĉ mi mem povas ĝin kompari nur al la monzun-ventego, kiu kaptis min apud la Molukka-insuloj dum mia vojaĝo al Brobdingnag.

Kun malfirmaj koroj ni ĉiuj surkroĉis la savzonojn kaj post duonhoro, kiam la savboato malaperis en la ondoj, mi provis miajn ŝancojn kun la zono ĉirkaŭ mia talio.

Post plua duonhoro la uragano eksilentis. Uzante la okazon, mi klopodis min fiksi per la ŝnuroj de la zono.

Kiam fine ektagiĝis, mi vidis neniun ĉirkaŭ mi, sed kun tiom pli granda ĝojo de mia malfirma koro, je la distanco de du mejloj aperis antaŭ miaj okuloj la bordkonturoj de insulo.

Mi eknaĝis, streĉante mian tutan restintan forton. Al miaj brakoj donis novan forton la scio, ke mia nomo, en ŝtonon gravurite, anoncos mian heroan morton kaj eĉ dum mia vivo! Ankoraŭ pli: mi neniam vidos mian adoratan edzinon!

Post kvarhora terura fortostreĉo fine mi sukcesis atingi la bordon, kie pro la ekstrema laco, mi tuj terenfalas kaj endormiĝis.

Kvara ĉapitro

La aŭtoro estas ellasita al la urbo, kie li spertas tre strangajn aferojn. – La hinoj absolute ne konas la monon, tamen ili estas riĉuloj. – La diskuto de l' aŭtoro pri la mono kaj pri la produktado. – Li ekkonas la stratojn, parkojn, la manĝejon kaj la bibliotekon. – Lia fiaska esploro pri la historio kaj moralo de la hinoj.

Do mi, kiel modesta lernanto, aŭ laŭ ili “belohin”, estis minacata de la danĝero, ke malgraŭ mia diplomo, ricevita de la oksforda universitato, mi estos, por mia honto, envicigita al iu malsupra lernejo.

Kvankam mi devis sperti ilian pli perfektan natursciencon, tamen mi, kiel fidela filo de mia patrio, bone sciis, ke en la mondo ekzistas ne nur rigidaj faktoj, sed ankaŭ patriotaj devoj kaj tiel mi singardeme evitis antaŭ ili rekoni ilian pli vastan scion, por ke mi ne donu senbazan kaŭzon al ilia vana nacia fiereco.

Do, por eviti tian maljustaĵon, mi ĝentile menciis al Zatamon mian diplomon, kiu malgraŭ mia tuta modesteco, tamen pravas iom da lernado kaj scio. Kaj mi ne forgesis mencii, ke la ignoro de tio signifus ankaŭ malestimon al mia patrio.

Sed Zatamon respondis, ke la lernado estas ĉies privata afero: ĉiu scias mem, kian sciencon li ne konas. Mia belohina stato signifas nur tion, ke mi povas ion ajn demandi de iu ajn, kaj la demandito respondos.

Tiel mi eksciis, ke mi eĉ ne estas ligita al la hospitalo. Mi povas iri ien ajn en la urbo, nur mi devas kunporti la legitimaĵon pri mia belohina stato, ĉar sen tiu mi ne ricevus respondon al ĉiu mia demando.

Ĉi tiu respondo iome surprizis min kaj ĵetis antaŭ mi ankoraŭ pli da mallumo al ilia, jam eĉ sen tio ne tro delikata ĝentileco. Zatamon ĉi koncerne diris nur, ke la superflue demandantan la hinoj rigardas behino.

Pro tio mi ankoraŭ pli miradis, kaj mi demandis ĝian kaŭzon, sed lia respondo min trankviligis.

– Nome la behinoj, – li diris, – ofte haltigas la preterirantojn kaj ekparolas pri la plej diversaj neestantaj, do kaziaj aferoj.

Nun li elprenis sian notlibron kaj el tiu legis kelkajn partojn:

– Ekzemple iu behino asertis, ke ni ne rajtas manĝi la prunon, sed ni devas ĝin meti sur la ŝrankon kaj rigardadi. Kiam aliaj demandis la kaŭzon, li respondis: “Ĉar ĝi estas blua”. Iu alia asertis, ke la arboj kutimas paroli, kiun lingvon komprenas nur la adeptoj. Tria diris, ke la homo devas suferi, ĉar tio kvietigas la malsaton. La kvara postulis, ke tiuj, kiuj lin renkontas, metu siajn manojn sur siajn ventrojn. Kvina portis sur sia kapo dratan ringon anstataŭ ĉapo kaj al ĉiuj deklaris, ke ĝi estas al li pli konvena, ĉar li estas tiamaniere pli alta ol la aliuloj.

Mi gaje ridetis pri la stultaĵoj kaj trankviliĝis. Mi jam vidis, kion li celas kaj ankaŭ mi trankviligis lin, ke mi neniam havis inklinon al la frenezo.

Li skribis la legitimaĵon, kaj mi decidis eliri al la urbo.

La unua surprizo estis de tiu ekskurso, ke la hinoj ne havas monon.

Mi jam rimarkis dum mia unua vojaĝo per ilia fervojo, ke mia gvidanto ne pagis, sed tiam mi ankoraŭ ne povis imagi, ke la mono povas tute manki.

Nu, tion mi tuj eksciis, kiam mi venis al la stacio de la subtera fervojo.

Mi estis konvinkita, ke la fervojoj de tia kulturita urbo akceptas ankaŭ la fremdan valuton, do, miaj okuloj serĉis la kason. Kiam mi ĝin nenie vidis, mi intencis demandi la unuan hinon, sed mi devis

ekscii, ke malgraŭ mia fervora lernado, mi ne konas la nomon de la mono kaj de la kaso. Interese estas, ke tiu manko ĝis nun ne sentiĝis al mi.

Tamen mi sciis, ke mia patrio ĉiam ludis gravan rolon en la disvastiĝo de la kulturo kaj humaneco, kies brila pruvo estas niaj kolonioj kaj la internacia disvastiĝo de niaj tiafakaj vortoj, do mi turniĝis al la unua hin kaj diris:

– Money! Business!

Je mia plej granda miro, li ne komprenis. Do, mi elpreninte mian monujon, montris al li metalmonon kaj klarigis en lia lingvo, ke mi intencas ĝin ŝanĝi je la ilia, sed li respondis, ke ili ne havas tian.

Mi staris senkonsile kaj demandis, kiel mi povas tamen envagoniĝi, sed li simple turniĝis kaj min forlasis. Mi jam volis kolere protesti kontraŭ la senbaza fierego, kian eĉ en Hispanio mi ne vidis, sed mi subite ekmemoris pri la vortoj de Zaton kaj elprenante mian legitimaĵon, mi montris ĝin al li.

La hin tuj ŝanĝiĝis kaj detale, preskaŭ troabilante rakontis ĉiun teknikan detalaĵon de la envagoniĝo. Ke post la malfermiĝo de la pordoj mi devas enpaŝi, sidiĝi, ktp. Mi deklaris, ke mi ne estas idioto, mi demandas, ĉu mi devas doni al iu tiaspecajn metaldiskojn, por ke la vagonaro min portu.

Sed li respondis, ke kiu ne konas la detalaĵojn de la envagonigo, tiu ne estas nepre idioto, sed kiu scias, ke la vagonon movas elektro kaj tamen intencas ĝin ekmovi per metaldisko, ties sana menso jam estas iome duba kaj de tiu konvinko lin retenas nur mia belohina legitimaĵo.

Mi devas konfesi, ke mi multe penis, ĝis mi komprenis la absolutan mankon de la mono. Mi sciis ilian lingvon kaj tamen mi ne povis konversacii kun ili, ĉar iliaj sociaj rilatoj tiom diferencas de la niaj, ke je miaj demandoj ili parolis kutime pri tute aliaj aferoj.

La trajno alvenis, ni enpaŝis, kaj mia unua demando estis, kiamaniere ili faras la trafikon de la varoj.

Evidentiĝis, ke ĉio okazas sen mono. La fabrikoj kaj la agromio produktas la varojn, sed neniu ricevas salajron. La varoj kuŝas en la magazenoj, kiel publika rabaĵo, el kiu ĉiu forportas tiom multe, kiom li volas. Mi tute ne imagis, kiel ili povas subteni la ordon en tiu anarkio.

Imagu miaj Legantoj, kio okazus, se niaj fervojoj transportus senpage kaj sen konduktoro la pasaĝerojn. Se ne konsideri la nepran bankroton, ne estus tiom multaj vagonoj en la mondo, kiuj povus plenumi la multobliĝintan trafikon.

Mi demandis, ĉu ne okazas ĉe ili, ke la homoj sencele kaj superflue vojaĝas tien-reen.

– Ne, – li respondis, – tio jam estus kazi.

– Sed tiamaniere, sen konduktoro, tio tamen facile povas okazi!

Kompreneble mi devis klarigi, kio estas la konduktoro, je tio li respondis, ke ĝuste tio estus kazi, se iu homo estus sur la tramo nur por vojaĝi sencele kaj superflue tien-reen, kvankam la vagono povas iri ankaŭ sen li.

Mi devis denove klarigi, ke la konduktoro devas malhelpi ĝuste la sencelajn kaj superflujajn vojaĝadojn, al kio la homoj havas fortan inklinon.

– Sed kial ili farus? – li demandis. – Ja ĉiu havas okazon pasigi sian tempon per utila profesio.

– Nu, ekzemple, por ke ili, anstataŭ laboro, eliru inter la montojn, tie sidiĝu kaj vidu agrablajn pejzaĝojn.

Mi volis diri *belajn*, sed ili ne havas vorton eĉ por tiu ĉi koncepto, same, kiel por la turismo.

– Kiel povus esti agrabla, – li respondis, – se iu kun elripozitaj muskoloj, nenifare sidus en la arbaro? Kiu ne laboras, al tiu ne estas agrabla la ripozo.

– Nu, ne por sidi, sed ni supozu, por suprengrimpi al la monto, por ke tie lin bonfartigu la vido de la ĉirkaŭaĵo kaj de la floroj.

Eĉ por la ĝuo ili ne havas vorton.

Li ne komprenis. Pro tio mi rakontis, ke ĉe ni ekzistas, kiuj ne laboras kaj la degeneriĝon de la muskoloj evitas per sporto, el kio li konkludis, ke ili faras verŝajne malfacilan spiritan laboron kaj deklaris, ke por tiuj ankaŭ ili disponas pri publikaj sportsalonoj kaj arbaraj refreŝigejoj.

Sed neniel li povis kompreni, kial tiuj, kiuj eĉ spiritan laboron ne havas, ne staras apud la maŝinoj aŭ puŝas manĉaron, kiam tio estas multe pli racia kaj interesa, ĉar ĝi havas utilon, ĉar ĝi estas efektivaĵo, dum la sporto, farata por ĝi mem, estas nur imagita laboro, pala surogato de la vivo, el kiu tiuj malfeliĉuloj estas forbaritaj.

Mi rimarkis, ke en la plezuroj de la vivo partoprenas ĝuste tiuj, kiujn ni nomas riĉuloj kontraŭ la malriĉuloj, kaj la riĉuloj faras nenian laboron.

– Kaj kiuj estas nomitaj riĉuloj, kiuj malriĉuloj?

– Tiuj vortoj signifas la dividiĝon de la mono. Riĉulo estas al kiu venas multa mono, malriĉulo, kiu havas malmultan.

– Kaj laŭ kia bazo dividiĝas la mono?

– Laŭ tio, kiu estas riĉulo, kiu malriĉulo.

Li deklaris, ke tio estas iom konfuza kaj embarasa. Li postulis iaspecan “naturecan ekirpunkton” kaj eĉ post longa klarigado li komprenis nur tiom, ke ĉe ni kelkaj havas multan, aliaj malmultan monon. Post iom da cerbumado li ekkriis:

– Laŭ ĉi tio mono ne ekzistas!

– Kial ne?! – mi demandis surprize.

– Kio ne estas en la naturo, tio tute ne ekzistas.

Kaj vane mi montris mian monon, li nur pli konvinkiĝis pri sia aserto, ĉar, – li diris, – kiam ajn li petis monon, mi povis montri nur paperon, oron, aŭ arĝenton, sed neniam monon.

Mi neniam ŝatis la malspritajn vortludojn kaj nur mia ĝentileco detenis min esprimi mian opinion. Tial mi precipe demandis lin pri tio, kiel ili funkciigas la interŝanĝon de la varoj.

Li respondis, ke li ne scias, kial ni devus interŝanĝi ekzemple niajn jakojn, la lia estas ja same bona por li, kiel la mia al mi, sed, se tio estus necesa, kian rilaton havas al tio la mono.

– Ĉar la mono plifaciligas la interŝanĝon, – mi respondis, – kaj akcelas la ekonomian progreson.

Post tio li tuj ŝanĝiĝis, el sia poŝo li prenis notlibron kaj petis min pritrakti la aferon pli vaste, ĉar li intencas komuniki la utilajn lernotaĵojn al la kompetentaj ekonomiaj fakuloj.

Mi estis je lia servo tiom pli volonte, ĉar mi bone sciis, ke per la konigo de la pli progresintaj institucioj de mia patrio mi plialtigos ties gloron.

Mi detale klarigis, ke la monon eldonas centra banko en diversaj pecoj. El tiu ricevas ĉiu homo laŭ sia merito kaj ĝi estas samtempe legitimaĵo partopreni proporcie en la fruktoj de la komuna laboro. Mi rakontis la avantaĝojn de la mono, ke ĝi estas ŝanĝebla al iu ajn varo kaj tiamaniere ĝi ebligas en la varoj laŭplaĉan elektadon. La mono ebligas ŝanĝi la valoron de niaj venditaj aferoj en laŭplaĉa tempo, en laŭplaĉa divido aŭ per fojo, ktp.

Li esprimis la opinion, ke la interŝanĝo tamen ne povas plifaciliĝi per tio, se, kuniginte tion kun la monŝanĝo, ni duobligas la laboron. Sed, – li diris, – tio tute ne estas grava; li estas scivolema prefere pri tio, kiel la mono akcelas la produktadon.

Mi klarigis, ke tiamaniere multaj etburĝoj, kiuj aparte havas malmultan monon, povas unuiĝi kaj fondi fabrikon kaj nome tiel, ke ili aĉetas akciojn.

– Kaj kio estas tio? – li demandis.

– Tio estas alia grandioza inventaĵo de la homa cerbo. Alia papero, kiu estas donata kontraŭ la mono.

– Nu, tiel do la laboro de la interŝanĝo triobliĝis. Kie nun estas la faciliĝo?

– Tie, ke tiuj paperoj ekfunkciigas la fabrikadon.

Li rigardis min suspekta.

– Kiel vi opinias, – li demandis, – se mi asertus, ke mi povas de ĉi tiu sidloko stariĝi nur tiel, se mi antaŭe transdonas al vi unu folion el mia notlibro? Ĉu ne, tio havas nenian rilaton al la efektivaĵoj, sekve ĝi estas neestanta afero.

Min konsternis tia naiveco, sed mi klopodis reteni la ridemon. Sed vane mi klarigis, kiel la mono funkciigas la laboron; li respondis obstine, ke li jam komprenas la aferon, sed ŝajnas, ke mi ne komprenas, ĉar la sola kondiĉo de la ekfunkcio de la laboro estas laŭ ĉiu prudenta cerbo la ekfunkciigo mem de la laboro kaj tute ne la senfina interŝanĝado de la paperaĵoj, kiuj esence eĉ ne ekzistas en la realo kaj damaĝe estas inventi.

Mi dokumentadis, ke la mono reale ekzistas kaj ties brila pruvo estas la pasinta mondkrizo, kiam la produktado preskaŭ tute neniigis.

– Kaj kial? – li demandis.

– Ĉar ne ekzistis sufiĉa mono.

Post tio li denove demandis, kial ni eltrovas tian aferon, kiu ne ekzistas.

Mia pacienco jam elĉerpiĝis, indignite mi silentiĝis, kaj ankaŭ li ne plu demandis. Mi pensis, ke li estas ofendita.

Sed post kelkminuta silento li ekparolis per la sama, indiferenta tono:

– Kaj kiel vi povas certiĝi, ke malgraŭ la mono ne okazu kaziaj agadoj?

– Kiel mi komprenu tion?

– Tiel, ke neniu forprenu la proprajn de la alia kaj nenies propraĵo estu forprenata de la aliaj?

Mi miris, kiel povas ĉi tion demandi ĝuste li, ĉe kiu la varoj estas publika rabaĵo por ĉiuj kaj ĝuste pro tio tute ne povas ekzisti la koncepto de la propraĵo. Mi klarigis, ke ĝuste la mono certigas la socian ekvilibron, por ke ĉiu sciu, kio estas lia propraĵo.

Sed li klarigis per la plej naiva tono, ke li jam scias, kio konfuzas nian klarvidon. Kiam la riĉulo donas monon por la varoj, li havas la senton, kvazaŭ li ekvilibrigus ion, kaj eĉ, se li jam malproksimen transpaŝis sian propran parton, li ankoraŭ kredas, ke li restis inter la limoj de la kazo ekvilibro.

Li ege kompatis niajn riĉulojn, kiujn ni senigis de ilia klarvido, kiuj ne rajtas labori; ni devigas ilin forkonsumi la proprajn de aliuloj, pro kio la produktado malgrandiĝas kaj la mizero kreskas.

Mi akre protestis kontraŭ tio. Mi diris, ke ĝuste niaj riĉuloj subtenas la fabrikojn kaj funkciigas la produktadon, per kio ili donas panon al multaj malriĉuloj.

Tion li denove ne komprenis kaj mi klarigis, kiom grandan profiton signifas al la lando la homo, kiu havas multan monon. Kontraŭe, se iu envenas al ni el eksterlando sen mono, ni malpermesas al li labori, por ke li ne forprenu la panon de la aliaj.

Dum mi parolis, li exploreme rigardis mian vizaĝon kaj poste, anstataŭ respondo, denove li petis mian belohinan legitimaĵon. Multfoje li tralegis ĝin malkonfide kaj deklaris, ke mi jam verŝajne trolaciĝis de la hodiaŭa lernado; pli bone estus nun iri al la aero iom refreŝiĝi.

Mi akre protestis. Mi deklaris, ke mi ja posedas la tutan klarecon de mia cerbo kaj, ke tion, ke la diritaj ne estas stultaĵoj, pruvas, ke ĉio ĉi estas fakto kaj vero en la plej progresinta ŝtato de Eŭropo.

Sed li ne respondis.

Min kolerigis la fieraĉo kaj min retenis nur mia gasta situacio tuj postuli rehonorigon pro la ofendo.

Do, ni vojaĝis senvorte kaj alveninte la riverbordon mi laŭhazarde elvagoniĝis.

Mi iris al la surborda larĝa parko, kiu estis samtempe tipa ekzemplo de pedanta prizorgo kaj de neglekto. Spegulglate gladitaj ŝtoneraj vojoj kun arĝentkoloraj lampkolonoj, promenoj borderitaj kelkloke per subterigeblaj muroj kaj multaj gum-sidlokaĵoj seĝoj.

Aliflanke mi nenie vidis skulptitajn fontanojn kaj statuojn. Sur la herbejo kune kun la herbo kreskis la sarkindaĵo, la arboj estis nur neglekte tonditaj, kaj eĉ postsignoj ne estis videblaj de ornamfloroj. Sed la aero estis bonega.

Malgranda surfaco estis ĉirkaŭita per ŝnuro. Interne, inter la herboj, vidiĝis kelkaj junaj arboplantaĵoj. Apud la ŝnuro estis tabulo kun la surskribo:

“Ne estas utile enpaŝi ĉi tien.”

Iuloke mi trovis grandan senarbejon. Sole tie ĉi mi vidis tonditan herbon.

La senarbejo estis duonronde borderita per komfortaj, sunbanaj ĝardenlitoj, sur kiuj kelkloke sidis aŭ kuŝis homoj. Ĉirkaŭe estis kelkaj gimnastikiloj kaj elektraj maŝinoj, kies celon mi ne konis.

Sed plej interesa estis la meze staranta bufedo. Kranoj donis malvarman lakton kaj freŝigajn trinkaĵojn. Apude malvarmiga ŝranko, interne paperskatoloj, en ili diversaj kompaktaj manĝaĵoj.

Kaj la hinoj vice eniris, manĝis, ekprenis paperglasojn kaj trinkis, sed nenie troviĝis servista kaj kontrolista personaro.

Sur la sunbanaj seĝoj kuŝis duonvestitaj hinoj. La senmastra bufedo kaj la tuta medio vekis en mi la saman intiman impreson, kiel la rizkampoj ĉe mia alveno: kvazaŭ mi ne estus en publika placo, sed estus invitita al la ĝardenfesto de regalema grandsinjoro. Mi povas aserti, ke por miaj eŭropaj okuloj estis tre stranga vidi tian socion, kies ĉiu membro estas riĉa, ne havante unu pencon. Kvazaŭ la tuta socio estus unu familio sen financaj problemoj, sen skribitaj reguloj, sen limita teritorio, sen zorgoj pri la postenoj. Familia rondo, kie la familianoj libere iradas, se necese, helpas unu al la alia en la hejma laboro kaj ĉiu ĉerpas el la tablomeze starigita plado sian parton. Mi sentis varman, afablan kaj familian humoron, kompareblan al nenia homa sociordo.

Kaj al tio ĉi akre kontrastis la plena silento de la homoj.

La nova, freŝa impreso de la komuna, libera predo ravis ankaŭ min, kaj mi enstomakigis glason da fruktosiropo, sed mia bona edukiteco detenis min trouzi ilian regalemon. Mi sentis apud mi la ĝentilan dommastron, kiu, kvankam li – dece al ĝentilhomo – proponas la manĝaĵon, tamen ne tre ŝatas la trofrandeman gaston.

Starante apud la bufedo, mi rigardis la mutan iradon de la hinoj. Nekomprenebla kontrasto karakterizis la tuton. Tiu mirinda zorgemo pri la homoj, kiu ŝajnas montri la plej altan gradon de la varma, familia sento kaj tamen, ke ĉiuj estas fremdaj unu al la alia, ke eĉ unu saluton mi ne aŭdis. Unu simple ne ekzistis por la alia.

Mi intencis interparoli kun iu el ili por demandi pri ĉi tiu afero. Fine mi alparolis iun:

– Ŝajnas, ke ni havas belan veteron, – mi diris afable.

Li alrigardis min, dummomente li staris hezite, poste, ne trovante min inda por respondo, min forlasis.

Ilia konduto estas decide ofendema. Sed mi ne havis multan tempon meditati, ĉar ĉi-momente venis venteto kaj tuj miaj okuloj kunfermiĝis dolorplene. Eniris sablero kaj kiel ajn mi frotadis, mi ne povis ĝin forigi.

Klininte mian kapon, mi staris blinde, kiam dekstre kaj maldekstre du manoj kaptis miajn brakojn. Kiel tra miaj obstine kunfermiĝantaj palpebroj mi povis vidi, du hinoj min ekprenis kaj komencis min gvidi.

Tiom da ĝentileco tre kortuŝis min, kaj mi balbutis hezite kelkajn dankvortojn, kio estis despli malfacila, ĉar mi tute ne sciis la tiaspecajn vortojn.

Mi pensis, ke min ili gvidos al akvokrano, sed tiom pli granda estis mia surprizo, kiam elveninte al la strato, ili haltis, alvokis la unuan aŭton, min ensidigis kaj senvorte malaperis. La aŭto turniĝis kaj forportis min per granda rapideco.

Apenaŭ mi havis tempon por demandi, kien ni iras, kiam la aŭto jam haltis, la ŝoforo elhelpis min, kondukis en domon, kie li min transdonis al iu tria, kaj ankaŭ li malaperis.

Ĉi tiu kondukis min en ĉambron, plenan de kuraciloj, sidigis min en seĝon, post kio venis la kvara, kiu levis miajn palpebrojn, elmetis la sableron, poste diris: “preta” kaj ankaŭ tiu malaperis.

Mi staris en la kuracejo sola, senkonsila kaj ne sciis, kio devas ankoraŭ okazi.

Post ĉirkaŭ dekminuta atendo min tedis la afero kaj mi demandis de la unua renkontito, ĉu mi devas ankoraŭ fari ion alian, sed kiel ĉiu ĝis nun, ankaŭ ĉi tiu respondis ne al la demando, sed deklaris, ke tio estas mia afero kaj foriris. Post tio ankaŭ mi eliris el la domo.

Do, mi estis denove sur la strato, kaj kiam mi trapensis la antaŭaĵojn, la tuto ŝajnis al mi kvazaŭ aŭtomato, kiu kaptas la enĵetitan objekton, unu brako donas ĝin al la alia, la radoj ĝin purigas, kunfaldas, poluras, rulpremas, ĝis fine elfalas la preta varo, sed la tutan procezon estigis nek la objekto, nek la aŭtomato. Ĝi simple okazis.

Pasante tra iliaj stratoj mi esploris pli detale iliajn ekipaĵojn. Je kvindek-paŝaj distancoj estis publikaj telefonoj en niĉoj, konstruitaj en la murojn; ili funkciis kompreneble senpage. Mi vidis multajn magazenojn, kies enhavon anoncis surskribo kaj en kies interno ĉiaspecaj varoj, de dentpasto ĝis dinamomaŝino, kuŝis senmastre, sed en la plej granda ordo kaj ĉiu forportis tiom multe, kiom li volis.

Mi vidis poŝtoŝtampojn. Sed nur pakaĵojn oni enportis por ekspedigi. La pakaĵojn oni ne nur ne registris en notlibroj, sed la plej multaj objektoj tute ne estis envolvitaj. Ekzemple, de komplikita mikroskopo pendis slipo, sur kiu estis skribita la adreso. La hino ĝin metis sur la tablon kaj foriris. Krom la ekspedantoj neniuj ĉeestis en la oficejo.

Malantaŭe mi vidis du pordojn kun la surskribo: “direktigejo”. Sub tiu alia tabulo: “interne okazas spirita laboro”, kiu ĉe ni estus skribita: “eniro malpermesita”.

Post dekminuta atendado la tablo, ŝarĝita per pakaĵoj, ekmoviĝis kaj tra la pordo paŝis en la direktigejon, dum tra la alia pordo malfermiĝinta elvenis alia, malplena tablo. Tiamaniere sendube mankis la tumulto de la vicestarantoj ekspedantoj, sed mi neniel povis kompreni, kiel eblas plenumi tiom grandan trafikon sen notoj, kvitancoj kaj kontrolo.

Kvankam tre malfacile estis ilin paroligi, tamen min kuraĝigis ilia antaŭa servema konduto kaj mi demandis iun ekspediganton pri la afero.

Li respondis, ke se oni registras ĉiun sendaĵon en libro, tio ja ne helpus, sed malhelpus kaj malrapidigus la trafikon.

Moke mi demandis, ĉu ne okazas ĉe tia facilanima manipulado, ke pakaĵo inter dubaj manoj malaperas?

Sed li respondis tute seriozmiene, ke laŭ delonge pruvita fizika leĝo la materio neniam malaperas.

Denove mi havis la senton, ke ankaŭ ĉi tiu parolas pri aliaĵoj, sed poste mi spertis, ke fakte ili ne konas la ŝtelon. Tio plenigis min per sincera admiro kaj ankoraŭ pli mistera ŝajnis al mi ĉi tiu tuta, seneduka moralo, por kies konservado la teknikaj scioj en si mem neniokaze povas esti sufiĉaj. Io nepre devas esti malantaŭ la kulisoj, sed kio estas tio kaj kiel mi ĝin ekkonu?

Mi demandis, kiel oni alpoŝtigas la leterojn kaj telegramojn, kaj tiam malkovriĝis, ke ĉiu loĝejo havas sian propran tubpoŝtkondukilon, per kiu la leteroj alvenas la centron kaj de tie estas plusendataj al la tubo de la adresito. Li rimarkis, ke tiu procedo estas tre komplikita (por mi ĝi estis mirinde perfekta); kaj ke sekvontjare estos funkciigataj pli modernaj tubskatoloj, kiuj jam havos propran direktantan mekanismon, per kiu la skatolo trovas per si mem la adresiton. Cetere ili korespondas tre malmulte. La sciigojn peras plejofte la telefono. Se la serĉita numero ne respondas, la vokanto tamen enparolas la sciigon, kiun alia aparato fiksas sur metalrubando kaj reparolas en laŭplaĉa tempo.

Sed mia stomako atentigis min pri la tempo de la tagmezmanĝo, do, enirante la plej proksiman manĝejon, mi senĝene altablĝis kaj prenis mian manĝaĵon desur la kuranta rubando.

Post kelkaj minutoj ankaŭ iu alia sidiĝis vidalvide al mi, dum mi meditadis ĝuste pri tio, kion faras ĉi tie la homoj tuttage, se ankaŭ ĉi tie ne estas servistaro. Mi jam ekkonis ĉe ili la senkelneran sistemon, sed nun aperis nova problemo. Mi cerbumadis pri tio, kiel estas eviteblaj la ekonomiaj katastrofoj, se la homon de ĉie eligas la maŝino. Mi ekmemoris, kiel granda zorgo estas por nia registaro la okupigo de la senlaboruloj. Kiel multajn oficojn oni konservas nur el socialaj kaŭzoj kaj de kiom multaj maŝinoj devas esti la funkcio malpermesita, por ke ni certigu la panon por la ŝtatanoj. Kiom multaj perlaboras sian panon tiamaniere, ke ili kiel kelnero, kasisto, policisto, pastro, provoso aŭ soldato partoprenas en la nacia laboro. Kiom fruktodona estas la ekzisto de tiuj institucioj kaj terura estas la nura penso, kio okazus, se tiuj postenoj ĉesus, kaj la milionoj da homoj senlaboriĝus. En la industrio ja furiozas eĉ sen tio la senlaboreco.

Alparolante mian tablokunulon, mi menciis al li ĉi tiujn aferojn, sed li respondis, ke ne estas utile per superflua babilado malŝpari la tempon.

Kiom neantaŭkalkulebla estas ilia servemo! Iom post iom mi spertis, ke se mi demandas ilin pri iliaj sociaj institucioj, ili eĉ troe min orientas pri ĉio, sed se mi mencias miajn individuajn pensojn, aŭ se mi ekparolas pri niaj hejmaj institucioj, ili eĉ ne taksas miajn vortojn indaj al respondo. Sed min incitis la problemo kaj, montrante mian belohinan legitimaĵon, mi sukcesis lin paroligi.

Do mi demandis, kiel povas tiom multaj homoj vivi nur el la produktantaj profesioj. Li miregis pri mia demando kaj nur post trifoja ripeto li kredis, ke mi demandas fakte pri tio.

– Sed eĉ nun mi ne komprenas, – li respondis, – kial necesas demandi pri tio. Se malpli multaj estus la produktantoj, nepre devus malpliigi eĉ la produktaĵo, sekve, ĝuste pro tio ni vivus malpli bone.

– Sed ĉu ne forigas la maŝinoj la homojn el la fabriko?

– Ni konstruas inter niaj maŝinoj tiom larĝajn vojojn, ke ni povas komforte preterpaŝadi.

– Vi ne komprenis ĝuste. La maŝino anstataŭas la laboron de multaj homoj, pro kio multaj homoj superfluigas, kaj pro tio la produktaĵo fariĝas parte nekonsumebla.

– Ni konstruas la maŝinojn ĝuste pro tio, ke ni havu ilojn por produkti pli multe. Aŭ kiel estas imageble, ke ni tial fabrikas vestaĵojn, por ke ni ne estu vestitaj?

– Sed kiel povas en la industrio labori tiom multaj homoj? – mi demandis.

Ĉi tion li denove ne komprenis.

– Ĉiu homo laboras tiom multe, kiom li povas per sia kapablo, – li respondis. – Se laboras pli multaj, ili produktas pli multe. Kio limigus la nombron de la produktantoj?

– La troproduktado. Ĉu ne minacas ĉe vi la danĝero de la troproduktado?

Li demandis, kio estas tio, kaj mi rakontis la mondkrizon, la bankrotojn, la amasajn maldungojn, sekve de ili la superfluon de la varoj kaj la ĝeneralan mizeron.

Li igis min plifoje ripeti mian rakonton, ĉar eĉ unu vorton li ne komprenis. Fine, kiam li iom tamen komprenis, li asertis, ke mi nepre observis ion malbone en mia patrio, ĉar mia rakonto havas grandajn mankojn kaj la menciitaj konceptoj havas nenian logikan interrilaton.

– Ĉar, – li diris, – kiel estus imagebla la ekzisto de tia socio, kie la sufokiĝo estus kuracita per la malpliigo de la aero? Kaj eĉ cetere, la superflua komplikado de simplaj aferoj montras la realaĵojn en falsa aspekto, dum sancerba homo klopodas prefere al la ekkono kaj ne al la mallumigo de la aferoj.

Mi akre protestis pro tia ofendema pritraktado de mia patrio, sed li anstataŭ respondo denove petis mian legitimajon, dubante tra legis ĝin plurfoje, poste ĝin redonis kaj diris, ke mi jam verŝajne laciĝis pro la lernado kaj rekomendinde estas promenadi kelkajn horojn en la freŝa aero.

Sed mi ne lasis min tiel facile ignori, akre protestis pro la frivola tono, postulis doni al mi la necesajn informojn, fine, ja, kiel mi scias, ĉiu devas respondi al la demandoj de la belohino.

Je mia energia postulado, li emis daŭrigi la konversacion, nur rekomendis, ke ni eble parolu en mia intereso pri “pli facilaj” temoj.

Sed min ofendis la aroganta ignorado kaj akre mi deklaris, ke ĉiuj ĉi aferoj, kiuj ŝajnas al li tre komplikitaj, en mia patrio estas publike konataj eĉ de la plej mallerta stratbalaisto.

Tiel mi revenis al la antaŭa temo. Al mi ŝajnis absurda, ke ĉe tiagrada maŝinigo de la ekonomia vivo la loĝantaro povu havi okupon en la industrio, kiam ankaŭ tiom multaj oficoj mankas. Do, mi opiniis, ke ili produktas por eksporto. Mi demandis pri tio, sed evidentiĝis, ke ili tute ne konas la navigacion. Li deklaris, ke sur la maro nenio kreskas, kial do tien iri?

Mi menciis al li, kiom progresigas la eksterlanda negoco la komunan bonstaton kaj kiom utile estus al ili eksporti buteron, grenon, farunon kaj aliajn aĵojn en mian patrion, per kio ili povus akiri grandan provizon de valora angla devizo.

Mi ricevis la surprizan respondon, ke ili satiĝas ne per tio, kion manĝas aliaj!

Neniel mi povis kompreni, kiel ili ne malsatmortas ĉe tia grandega malhavo de la ekonomia kapablo.

Sed post tio mi jam devis konstati, ke ĉiu plua diskuto estas senutila, ĉar inter ni etendiĝas ia granda abismo, kaj la animo de la hinoj havas ian misteran sekreton, sen kies solvo mi neniam povos komprenigi al ili miajn pensojn.

Do, mi leviĝis kaj foriris. Mi longe pensadis, kiel mi povos ekkoni ilin sen interparolado. Ĉar kiun ajn mi demandis pri ia ajn temo, mi ricevis konstante fremdajn kaj strangajn respondojn, sed ĉiam mirinde kongruajn. Ŝajne ili ne havis individuecon. Sed despli incitis min la problemo, kiaspeca spirito estas, kiu konservas en ili ĉi tiun mirindan disciplinon, kia ĉe ni eĉ en la armeo ne estas imagebla.

Fine mi venis al la konkludo, ke mi informiĝos per legado.

Mi volis havi ian etnografian libron, el kiu mi povas pli vaste studadi iliajn kutimojn kaj karakteron.

Mi haltigis la unuan hinojn kaj demandis, kie mi povus akiri libron, kiu pritraktas la naturon, vestojn kaj ĝenerale la vivmanieron de la loĝantaro. Per tia ĉirkaŭskribo mi volis esprimi la etnografion.

Responde li rimarkis, ke mi menciis tre multajn, diversajn temojn, ĉar ĉi tio apartenas parte al la anatomio kaj la funkciologio de la organoj, parte al la teksindustrio.

Vidante, ke ankaŭ ĉi tiu min ne komprenis, mi nur demandis, kie mi trovos bibliotekon.

Li estis tuj preta al mi servi, donis la adreson, sed el tio mi ne multe komprenis. Kiam li sciigis, ke mi estas fremda en la urbo, tuj li proponis akompanon. Ni sidiĝis sur tramon kaj li gvidis min ĝis la biblioteko.

Mi venis en grandegan, rondan, preĝejsimilan halon, kies murojn kovris en ĉirkaŭ tridek-jarda alteco unusola rondira amasego da bretoj, sur tiuj centmiloj da libroj. Antaŭ la bretoj, en diversaj altoj pendis malgrandaj balkonoj. Sur ĉiu balkoneto estis seĝo kaj eta tablo. En la plej multaj balkonoj legis hino. Baldaŭ mi ekvidis, ke tiuj balkonoj ankaŭ moviĝas. La hinoj direktis ilin sur horizontalaj kaj vertikalaj reloj, konstruitaj inter la bretaro kaj tiamaniere ili venis al la dezirita libro.

Interese mi havis la senton, ke ĉi tie estas granda bruo. Tamen nur la foliumado aŭdiĝis kaj neniel estis pli da bruo, ol en niaj bibliotekoj. Sed ilia publika vivo estas tiom silenta, ke mi miris, ke ankaŭ ĉi tie estas nur same silente.

Kelkloke inter la libroj anoncis grandliteraj surskriboj la opajn fakojn: “Etiletero”, “Celulozo”, “Albumino” kaj aliloke: “Nervokuracado”, “Stomakŝanĝado”, “Metamorfozigo de elementoj”, “Grenaŭtomatoj”, aŭ “Profundenvidiloj”.

Mi pensis, ke mia gvidanto fakte miskomprenis min kaj ke mi venis en la bibliotekon de la kuracistoj kaj teknikistoj, kvankam mi volis ekkoni la hinojn kaj iliajn kutimojn.

Feliĉe, meze de la ĉambrego mi ekvidis tablon kun la surskribo: “Informoj”. Apud ĝi sidis iu hino.

Alpaŝinte mi ripetis al la hino mian deziron, sed ankaŭ li respondis la saman, kion mia gvidanto.

Mi konvinkiĝis, ke tiamaniere mi neniel prosperos kaj mi devas komenci mian studadon ĉe iu alia fako, el kiu mi same povos ekkoni ilian vivon.

Mi decidis studadi ilian historion, kaj mi menciis, ke mi deziras tian libron, kiu pritraktas la okazintaĵojn de la pasinta tempo.

Li respondis, ke tio estas tre relativa kaj nedifinita temo. Ekzistas libro, kiu temas pri la geologio, alia kiu pritraktas la evoluon de la raso, aŭ de la nervosistemo, de la digestorganoj aŭ de aliaj.

Mi diris, ke ne tion mi deziras, sed tion, kiu pritraktas la pasintan tempon de la homoj.

Mi devis ripeti, sed ankaŭ duafoje li ne komprenis kaj min petis, ke mi nomu similteman libron.

Nun mi montris mian belohinan legitimajon, deklaris, ke mi estas fremdulo, ne konas ilian literaturon, do mi povas nomi nur la librojn de Eŭropo.

Por ekzemplo mi menciis al li la verkojn de Froude kaj Green el la historio de mia patrio, sed li petis min rakonti ion el iliaj enhavoj.

Mi parolis pri la epoko de Henriko VIII. Pri la edziĝo kun Anjo Boleyn, pri la bataloj de la reformacio, pri la ribeliĝo de la nordaj provincoj, pri la ekzekuto de Tomaso Morus, la episkopo de Rochester, Anjo Boleyn kaj Katarina Howard, pri la luktado de la reĝo, de la parlamento, de la princo de Norfolk kaj Cromwell, pri la disputoj de la transsubstantiatio, de la celibato, de la meso kaj de la konfeso.

Nature, la tuta rakonto ŝajnis al li nekredebla, sed mi jam estis alkutimiĝinta, ke li demandadis ĉe ĉiu frazo: “kial do ili faris ĉion ĉi?”.

Sed kiam mi finis, li miris pri tio, ke mi parolis pri la pasinto, kiel pri io efektiva kaj fine malkovriĝas ke ĉio ĉi ne estas.

– Sed estis! – mi respondis.

– Eble vi pravas, sed tiu vorto jam havas en si la fakton, ke ĝi ne estas. Kian sencon havas sin okupi pri imaginaraj aferoj? Nur la nuntempo ekzistas kaj se ni okupiĝas krom la nuntempo ankaŭ pri neekzistantaj aferoj, kial vi malŝparas ĝuste por la pasinta tempo tiel superfluan laboron? Sammaniere vi povus desegni geografiajn kartojn de neestantaj planedoj.

Mi rimarkis, ke ni ĉerpas el la pasinto multan utilan sperton por direkti nian agadon dum la estonto.

– Ĝi estas simila al tio, kvazaŭ post la matena vekiĝo ni englutus laksigilon, ĉar en nia sonĝo ni troŝarĝis nian stomakon per multa manĝaĵo, malgraŭ ke ni post la vekiĝo estas malsataj.

Tiel malkovriĝis, ke ili tute ne havas historion. Ĉiu rememoras nur la tempon, travivitan de si mem. Kaj el la prauloj postrestas por la idoj nenio krom kion ili kreis, ia nova ĥemia procedo, konstruaĵo, maŝino, sed pri ties eltrovinto scias neniu.

Do, mi trafis ree en la sakstraton. Kion alian mi ankoraŭ ekprovu? Mi jam spertis, ke ili ne havas beletristojn. Mi pene cerbumis, kian fakon elekti por klarigi al mi ilian vivon kaj mondkoncepton.

Mi petis pri filozofiaj verkoj, sed li denove demandis, kio estas tio. Kaj kiam mi parolis pri la homa pensado kaj pri ties reguloj, li direktis min senhezite al la nervokuracado, el kiu evidentiĝis, ke ili filozofion tute ne havas. Tiu fakto vere min surprizis, konsidere, ke ilia tuta vivo konsistis el la variado de la koncepto de la kazoo kaj kazi, el kio ĉiu normala cerbo estus konkludanta al filozofema nacio.

Mi demandis, kial ili eĉ unu vorton ne skribas pri ilia ĉefa problemo de sia vivo. Mi menciis, kiom multaj verkistoj kaj el kiom multaj vidpunktoj klopodas ĉe ni pritrakti la moralon, la moron, la diajn leĝojn kaj la juston.

– Tio, kio ekzistas, – li respondis, – ne bezonas pritraktadon kaj disputon. Kian sencon havas ekzemple pritraktadi, ke la cirklo estas ronda? Kaj se oni pritraktas ian geometrian figuron jen kiel rondan, jen kiel kvarangulan, tio povas okazi nur tiel, ke la pritraktata figuro tute ne ekzistas, ĉar, se ĝi ekzistas, ĝi povas esti nur tia, aŭ alia.

Min jam ege tedis la senfruktaj diskutoj kaj mi petis ian ekonomian libron, sed li demandis, kian produktan fakon mi bezonas. Mi klarigis, ke mi deziras informiĝi pri la socia sistemo de la produktado, sed li denove respondis, ke la sistemoj estas diferencaj laŭ la fakoj. Oni produktas alisisteme la tritikon kaj aliel la rizon, alimaniere oni teksas la ŝtofon.

Baldaŭ evidentiĝis, ke ankaŭ tia ne ekzistas. Ili simple ne havas ekonomian sociordon, same kiel filozofion, leĝaron, ŝtadadministradon, religion kaj beletristikon.

Mi miregis kaj ne povis imagi, kie mi serĉu ilian vivon. Mi jam ne mirus, se malkovriĝus, ke ankaŭ ili mem ne ekzistas.

Fine mi decidis legi nervokuracistajn librojn, esperante ĉerpi el la pli oftaj nervomalsanoj kelkajn konkludojn pri ilia anima vivo.

Do, mi sidiĝis en iu malgranda balkono kaj post la teknikaj instruoj de la informisto suprenleviĝis ĝis la alto de ĉirkaŭ tri etaĝoj kaj ekserĉis inter la libroj.

Sed el la titoloj mi ne multe komprenis. Iliaj fakesprimoj estis ankoraŭ ne konataj al mi. Fine mi laŭhazarde elprenis libron kaj ĝin malfermis. La titolo de la unua ĉapitro estis: “elektronfluo, strukturologio de pensado”. Sed krom la titolo mi komprenis nenion. Ĝi pritraktis la ĉelojn, la internajn fortojn en ili estiĝantajn. Poste sekvis la kalkuloj pri elastaj kunfrapiĝoj kaj osciladoj, sep milionoble pligrandigitaj mikroskopaj fotografiaĵoj, pri kies signifo mi eĉ konjekton ne havis, ĥemiaj formuloj kaj poste senfina aro da matematikaj deduktoj.

Plufoliumante mi trovis alian ĉapitron: “Cerboteknologio kaj nervomuntado”. Mi vidis la fotojn de strangaj mezuraparatoj, homojn, kiuj portas sur la brusto aŭ kapo malgrandajn metalskatolojn, pinĉilojn, tranĉilojn, eltiritajn kaj transplantitajn nervofibrojn. Poste sekvis paĝoj el maldikaj

metallamenoj, kiuj estis plenplenaj per miopige malgrandaj kvadratoj kaj la tuto vibris en kunfandiĝanta malpur-griza koloro. Subskribite, la vorto, por mi nekonata: “Bomeli”.

Mi devis malleviĝi al la informisto kaj peti lian klarigon. Li, alpaŝinte al mia tablo, suprenturnis ĝian dekstran parton kaj de tie elleviĝis aparato, simila al mikrofotografilo. La libron li enŝovis ĉe la demandita paĝo en la aparaton, kaj mi devis enrigardi tra iu lenso.

Mi ekvidis homan cerbon en vitra ujo, en kiun estis pikitaj multaj nadloj. Maldekstre blua lumstrio ĵetis lumon al tiu, ĉirkaŭe estis diversaj montrilaj aparatoj.

Nun la informisto premis butonon, kiam la montriloj ekmoviĝis, la cerbo iom post iom ricevis ruĝan koloron, poste aperis homa mano, kiu enverŝis la enhavon de iu botelo en la vitran ujon, la cerbo regajnis sian komencan koloron kaj la montriloj resaltis al siaj komencaj statoj.

Nature, mi komprenis nenion el la tuta sceno kaj ĉefe mi trovis nenion en la libro, kio estus interrilata kun ilia animo. Kaj vane mi klarigadis al la informisto, ke mi deziras ekscii ion pri iliaj pensaj, sentaj kaj ideologiaj cirkonstancoj; li respondis, ke ni pensas kaj sentas per nia cerbo, do, same pri la estiĝo kiel pri la kupliĝo de la pensoj, ĉiuj necesaj matematikaj formuloj estas troveblaj en la unua ĉapitro.

– Nature, – li daŭrigis, – se vi volas studi ankaŭ la radiumadon aŭ la superelektronan metamorfozon de la pensoj, tiam via libro ne sufiĉas.

Kaj precize li klarigis, kien mi devas leviĝi, el katalogo li legis al mi aron da titoloj, ke mi jam kaptuĝis pro la inundo de la nekonataj vortoj kaj haltigis lin.

Mi sentis min fakte en vakuo. Evidentiĝis, ke inter ni du mankas la interliganta ponto kaj eĉ esprimi mi ne povas mian volon. Longe mi serĉis la ĝustan esprimon, sed por la animo ili ne havas vorton kaj se mi estus parolinta pri koro, ili certe direktus min al la breto de la “sangcirkulado”.

Post kelkminuta pena cerbumado mi rezignis pri ĉia espero, senvorte turniĝis kaj forlasis lin.

Elveninte mi iradis kelkan tempon tien kaj reen. Poste mi alparolis hinon kaj interesiĝis pri bildekspozicioj.

Li respondis, ke en ĉiu libro troviĝas bildoj kaj demandis, kian fakon mi deziras studi. Responde mi rimarkis, ke mi serĉas pentritajn bildojn, sed el la gapaj okuloj mi vidis, ke ankaŭ li volas min forlasi, do mi rapide montris al li mian belohinan legitimaĵon.

Mi devis klarigi, kia estas la pentrita bildo. Kiam li komprenis, li diris, ke ni verŝajne ne konas la pli perfektan formon de la bildfarado, la fotografion.

Vane mi argumentis, ke la pentrado estas pli perfekta, ĉar ĝi figuras ne nur la surfacon, sed ankaŭ la enhavon kaj esencon de la aferoj; li respondis, ke ili estas ankaŭ en tio pli perfektaj, kaj el liaj vortoj mi divenis, ke li parolas pri la Rentgen-radioj. Li parolis krome pri iu nekonata afero, kiu vidas en la profundon de la tero kaj pri aliaj strangaj maŝinoj, kiuj malkovras al la homaj okuloj la internan strukturon de la materio.

En tiu punkto ni tre malfacile komprenis unu la alian. Mi intencis esprimi, ke la aferoj havas sentan esencon: tiun impreson, kiun ili vekas en nia animo, sed li rimarkis, ke aŭ la aferoj vekas en ni impreson, kongruan al siaj esencoj kaj ĉi-okaze la fotografio estas pli perfekta, aŭ en ni estiĝas pri ili deformiĝinta bildo, kaj tiam la difekto troviĝas ne en la aferoj, sed en ni.

Mi klopodis ilustrati antaŭ li la diversajn impresojn de la pentristoj, kiuj ne deformas la esencon de la aĵoj, sed, pli vere, volas pliprosimiĝi al ĝi. Sed li persiste asertis, ke la esenco de ia aĵo ne povas esti diversa kaj se estiĝas pri ĝi tamen diversaj impresoj, tiam, krom unu sola, ĉiuj ceteraj devas esti evidente falsaj. Li konsilis, ke la objektojn, kiuj havas por mi dubajn esencojn, mi portu al la ĥemia aŭ fizika instituto, kie mi ricevos pri ili precizan analizon.

Lace mi mangestis kaj deklaris, ke mi ne plu bezonas informojn, post kio li foriris.

Do, anstataŭ la solviĝo, la problemoj iĝis pli kaj pli konfuzaj.

Sed per ĉio ĉi mi eĉ pli incitiĝis por ekscii ilian sekreton. Antaŭ miaj okuloj interkroĉiĝis la dentradoj de mirinda mekanismo, kiuj plenumis sian laboron ĉe tia grado de precizeco, kian esprimi mankas la homa vorto. Tamen, kiel ajn mi serĉis, mi ne sukcesis trovi la risorton, kiu movas la tuton. Mi fakte sentis min kiel Keppler aŭ Pasteur, kiuj, ekkoninte la mirindajn Leĝojn, paŝon post paŝo konvinkiĝis pri la ekzisto de la Leĝdonanto, kiu tamen samtempe pli kaj pli malproksimiĝis de la sentoj. Lia voĉo mutiĝis en la dornarbusto, liaj okuloj ne ekbrilis en la fulmo, lia voĉo ne tondris inter la nebuloj kaj kovriĝis malantaŭ des pli densan mallumon, ju pli luma iĝis lia ekzisto.

Mia cerbo febre pulsas, kaj jam fakte pravis tiuj, kiuj konsilis al mi ripozon. La hodiaŭa lernado amasigis en mi tiom da problemoj, ke mi devis dormi je tio.

Mi petis la unuan hinon montri la altfervojon. Tiu servoprete alkondukis min, kaj mi ensidiĝis.

Hejmenvojaĝante mi tamen kunskribis kelkajn demandojn, decidante ke mi ĉion ĉi demandos al Zatamon. Li ja tamen estas nervokuracisto, kiu okupiĝas pri la animaj aferoj kaj ankaŭ min konas deproksime.

Kvina ĉapitro

La aŭtoro parte ekkonas la sekreton de la hinoj. – El ĉi tiu ĉapitro malkovriĝas, ke la hinoj havas nenian ŝtatorganizon. – La strangaj opinioj de Zatamon pri la justeco, amo, animo kaj beletristiko. – Malfacila ŝakludo kun Zatamon. – Konfuza klarigo pri la kazoo.

Zatamon jam ne tro zorgis min. La lingvon kaj la fundamentajn konceptojn de la hinoj mi jam ekkonis kaj pri la ceteraj mi estis konfidita al mi mem. La sekvontan tagon li ne vizitis min, nur triatage li alvenis, kio estis por mi tiom pli konvena, ĉar mi povis dume aranĝi miajn pensojn.

Mi estis konvinkiginta, ke sur la insulo regas tre demokrata, parlamenta estraro. Kiun ajn mi demandis pri miaj devoj, oni diris nur, ke mi povas fari laŭ mia plaĉo. Ĉi tie regis stranga miksaĵo de libereco kaj disciplino, kies interrilato provizore estis enigmo por mi.

Konsidere, ke min interesis precipe ĉi tiu problemo, mi demandis Zatamonon antaŭ ĉio pri ilia ŝtatorganizo. Sed kiam mi demandis, mi devis antaŭe rakonti al li, kio estas ĉe ni la ŝtatorganizo, kio la demokratio, kion signifas la diktaturo, parlamentismo, la elektado, nomado, ktp.

Mi emfazis per entuziasmaj vortoj la tradician parlamentan kaj demokratan regadon de mia patrio, sistemon, kiu ĉiam certigas al la popolo la rajton influi la fluon de sia propra vivo.

Kiam mi alvenis ĉi tien, Zatamon demandis, kian celon havas influi la fluon de la vivo. La vivo estas ja por tio, ke ĝi fluu, ne por ke ĝin oni influu.

– Por tio, – mi respondis, – ke oni certigu la liberecon. – Sed ĉi tion mi povis esprimi nur per ĉirkaŭdiro. Mi parolis al li pri la ĝeneralaj homaj rajtoj kaj pri la socia ekvilibro, sed li respondis, ke la libereco ne povas esti tio, kia mi ĝin klarigis, ĉar, se oni ĝin influas, ĝi jam devas ĉesi. Kaj nenian rilaton al la realo havas tia lando, kie la ekvilibro estas esprimita per tia sentimenta, do neekzistanta vorto, kia la libereco.

Por pli klare lumigi la koncepton de la ekvilibro, validan ĉe ni, mi menciis ĝian plej brilan formon, la justofaron, kiu per la justa puno de la krimoj restarigas la ekŝancelitan ekvilibron kaj certigas la trankvilan, pacan vivon.

Nun trafis min la surprizo!

Li neniel povis kompreni, kia diferenco estas inter krimo kaj puno. Eĉ post longa klarigado li konjektis inter ili nur kronologian diferencon kaj ne komprenis, kial ni faras diversajn vortojn por la sama koncepto, kiuj diferencas nur en sia kronologia vico, ke antaŭe estas la krimo, poste venas la puno, sed ĝi same povus esti ankaŭ inverse: antaŭe farus la juĝistoj kaziajn aferojn kaj per tio la krimuloj ricevas rajton “restarigi la ekvilibron” per la farado de aliaj kaziaj aferoj.

– Al mi ŝajnas, – li daŭrigis, – ke laŭ via opinio la kazoo kreiĝas tiel, ke ni faras samtempe ne unu, sed du kaziajn aferojn, dum laŭ ĉiu sobra pensado, la duobligo de la kaziaĵoj nur plifortigas ilian kazian karakteron.

Vane mi asertis, ke la juĝisto punas nur pro devo kaj pro kazoa intenco al la celo de la komuna paco kaj socia trankvilo, por ke li malpliigu la krimojn; li respondis, ke la krimuloj apartenas same al la homaro, kiel la juĝistoj, do ankaŭ ili estas ni mem.

– Aŭ kion vi opinias, – li diris, – se evidentiĝus pri la paseroj, ke ili kutimas reciproke detrui la nestojn unu de la alia? Ĉu vi akceptus la pledadon, ke tion faras ne la paseroj, ĉar tiu, kiu duafoje detruas neston, faras ĝin jam post la unua detruo? Kaj fine, kion vi opinias, se mi asertus, ke la reciproka detruo estas la certigo de la paca kaj trankvila vivo?

Pezan akuzon mi sentis piki el liaj vortoj, kiam li diris:

– Ne estas sufiĉe, ke vi krimas, vi eĉ punas ĝin!

Tiel evidentiĝis, ke ili havas nenian ŝtatorganizon. Ili konas nek la regadon, nek la parlamenton.

– Nur malsanaj cerboj bezonas diskuti pri siaj aferoj, – li diris. Bone scias ĉiu sancerba homo, kion li bezonas, do li iras al la magazeno, elprenas, kaj se la provizaĵo de la magazenoj malpliigas, tion ekscias la fabrikoj kaj kompensas. Kial diskuti pri tiu afero?

Do, ili havas nek parlamenton, nek leĝojn, kaj pri la justico ili eĉ konjekton ne havas. Ĉio iras laŭ sia vojo. Mi ne povis imagi, kiel eblas vivi sen direktantaj organoj kaj li siavice miris, kiel ni povas vivi en tia necerteco, ke aro da homoj, kiuj – laŭ li – havas nenian rilaton al la produktado, senĉese interbabiladas kaj ĝenas la produktadon.

Nun mi paŝis al la alia parto de la problemo, al la granda mistero. Al la demando de la senleĝa disciplino. Mi demandis:

– Diru: ĉu ne estigas mison la manko de la reguligo de la homaj funkcioj?

– Kiel mi komprenu?

– Ekzemple, iu praktika homo, kiu lerte kapablas eluzi sian utilon, eltrovas, ke li bone vivos laborante malpli kaj manĝante pli multe.

Li respondis preskaŭ kolere (se ili entute konus la koleron):

– Kiel li vivus pli bone? Se ni filozofus tiel, la produkto estus ne pli, sed malpli multa, sekve ni manĝus ne pli, sed malpli multe, kio tute ne estus pli bona. Sed kial vi nomas praktika kaj utilkapabla ĝuste tiun malkapablulon, kiu eĉ la piej simplajn matematikajn tezojn ne kapablas kompreni?

Mi sentis profundan respekton al ili, ĉe kiuj la honesto kaj la altruismo tiom naskiĝas kune kun la homo. Mi volis konfesi mian estimon, sed ankaŭ pri tio mankas la vorto. Nun mi miris, kiel do povas tiel honesta esti ilia ŝtato, se eĉ vorton ili ne havas pri tio. Mi povis nur angle diri, ke ŝajne ĉi tie ĉiuj estas honestaj kaj bonkoraj kontraŭ la aliaj.

Kompreneble mi devis klarigi la vortojn. Kiam li min – kvankam malfacile – komprenis, li esprimis la opinion, ke en nia patrio verŝajne troviĝas ankaŭ la malo de tiaj homoj. Ĝi estas tre verŝajna inter homoj, kiuj kreas apartan vorton por tiu, kiu la matematikon komprenas laŭ ties ĝusta senco.

Mi gapis al li konsternite.

Ne nur leĝoj ĉe ili ne certigas la honeston, sed ili tute ne scias, kio ĝi estas. La dentradoj interkroĉiĝas kun la plej ekzakta perfekteco, nenie okazas ekpuŝiĝo, nenie troviĝas grincanta lagro en la socia mekanismo kaj ĉion ĉi tenas en ekvilibro nur la komuna *animo*.

Mi intencis demandi lin pri la psikologiaj motivoj, sed memorinte pri mia librara fiasko, mi devis konsternite ekscii, ke ili ne havas koncepton pri la animo, ĝuste pri tio, kio ŝajnas plej lume brili ĉe ili sur la tuta mondo.

Sed tiam de kie venis ĉio ĉi kaj kio subtenas ĝin en ili?

Balbute kaj kortuŝite mi konfesis mian miradon. Mi sincere deklaris, ke mia cerbo fiaskis.

Mi rakontis, kiel multaj, diversflankaj kaj zorgemaj institucioj certigas ĉe ni la normalan fluon de la socia vivo, ke la leĝo, mono, justofaro reguligas la interŝanĝon de la varoj kaj eĉ plue, la infanoj dum longaj jaroj estas edukitaj pri moralo, bono kaj honesto, dum ĉe la hinoj nure la animo, la komuna spirito kuntenas la tuton kaj tamen pli perfekte.

Min kaptis vera oratora impeto parolante pri tio, ke mi tamen ne vidas la komunan fonton de ĉiuj ĉi aferoj: kie estas tiu animo, de kie ĝi venas kaj kio inokulas al ili ĉi tiun miraklon?

Li petis min pli detale priskribi la koncepton de la animo.

Mi respondis, ke la animo estas tiu abstrakta koncepto, kiu kapabligas la homon por bonfarado kaj kreado. Por ekzemplo mi menciis, ke ankaŭ ĉe ni ekzistas hospitaloj kaj aziloj por la maljunuloj.

– Kaj kion vi opinias, – mi diris, – kio igas la homojn konstrui hospitalojn? Nu, tio estas la animo.

– Hospitalon konstruas la masonisto per maŝinoj kaj betono, – li respondis. – Kiel miksiĝas ĉi tien la koncepto de la animo?

En la unua momento mi koleretis pro lia nekomprenemo. Sed mi ekmemoris pri mia iama klinika okazo: oni forigis la katarakton el la okuloj de iu sesjara knabeto, sed li tamen ne povis ekkoni la figurojn eĉ post semajnoj. Li klare vidis sian patrinon, sed tamen li eksciis nur el ŝia voĉo, kie ŝi staras.

Nome, en la cerbo de la infano ankoraŭ mankis la interrilato inter la bildoj kaj ties konceptoj. Li devis lerni la vidon ĝis monatoj, ĝis li povis finekzerci la interrilatojn.

Nun mi kredis, ke mi komprenas ĉion. Ĉi tiuj homoj edukiĝis en la rigidaj realaĵoj, do ili sentas la animon ne tiel kiel ni. Eble per aliaj sentorganoj, ne per siaj cerboj, ĉar ilia cerbo kapablas percepti nur la palpeblajn kaj gustumebajn aferojn.

Mia nuna tasko estas do la sama, kiu kun la vidigita knabo: mi devas konduki lin al la interrilato de la faktoj kaj la animo. Li certe havas koncepton pri ĝi, la kazoo estas ja la plej kompleta animo! Mi ellaboris veran strategian planon kaj mi demandis:

– Kial vi konstruas hospitalon?

– Ĉar ekzistas malsanuloj kaj maljunuloj. Por kio alia ni konstruus? Kial iras viaj malsanuloj al hospitalo?

Mi ne komprenis, kiel ĉi demando venas ĉi tien.

– Ĉar ili volas resaniĝi.

– Nu, kaj kiel vi povas demandi, kial ni konstruas hospitalon? Por ke ili resaniĝu!

Kompreneble mi ne estis venkita per tia banala aforismo kaj mi decidis ne lasi lin el miaj manoj.

– Tio estas nur la nuda celo, – mi respondis. – Sed ne la kaŭzo. Helpi niajn homfratojn kapabligas nin la animo, kiu estas la ligilo, pleniganta la interspacon inter la faktoj de la malsano kaj de la konstruado. Se diri ekzemplon, ĝi estas simila al la mortero inter la brikoj, sen kiu disfalus la muro. Do, ĉi tiu instigas nin al helpo. Ĉu vi jam komprenas, kion mi volas ekscii?

– Nun ankoraŭ malpli mi komprenas. Kial devas ekzisti interspaco? Se ĉe vi ne estas senpera kohero inter la malsano kaj la konstruado, sed interigigas fremda koncepto, ĉi tiu ne kunligas, sed disigas ilin same, kiel ĝuste la mortero estas heterogena materio inter la brikoj, kaj la fakto, ke io bezonas glumaterialon, dokumentas nur pri ĝia disfalema karaktero. La cemento ne bezonas glumaterialon, estante per si mem unusola kompaktaĵo kaj ĝuste tial ĝi estas pli perfekta.

– Ho, la homa animo ne estas fremda materialo, sed la tuta enhavo de nia vivo! Kial dezirus resaniĝi la malsanulo, se lia vivo ne havus animan celon? Kaj la esenco de la helpo estas ne la sensenta betono de la hospitalaj muroj, sed la animo. Ne sufiĉas la pinĉilo, medikamento kaj bandaĝo, la ĉefafero estas la *animo* de la helpo, kiu estas la sola motoro de tio kaj kiu estas pli saniga ol la sanigiloj. Kaj por kio ni vivus sen enhavo? Kian sencon havus resaniĝi por la monotona ĉiutaga manĝado, dormo kaj laboro, se nin ne ligus al niaj homfratoj la amikeco, amo, interesiĝo, se ĉiuj ĉi radiadoj de la animo ne varmigus kaj interesigus nian vivon kaj ne donus al la malsanulo deziron resaniĝi por vivi?

Nature mi devis ĉion parafrazi tiel, ke la interligajn animajn kroĉilojn mi komparis al la fortolinioj de la magneto. Post longa klarigado li deklaris:

– Nia korpo konsistas el atomoj, tiuj difinas niajn dezirojn, ĉar tiuj estas la reala mondo. Cetere ne estas imagebla, ĉar aliel ne povas ekzisti. Nome pri tiuj konceptoj, kiujn vi komparis al la fortolinioj de la magneto, post miaj detalaj demandoj vice evidentiĝis, ke tiuj estas nek atomoj, nek vibrado, sekve tiuj estas neekzistantaj aferoj. Kaj kio ne ekzistas, tio ne estas.

Terura estis tia rigida pensado, kies malvarmega atmosfero frostigis min. Tamen li petis daŭrigi mian rakonton, ĉar – kiel li diris, – tamen devas miaj vortoj enhavi ian realan sencon, nur mi ne povas esprimi.

Do, anstataŭ senfrukta ideologia disputo mi ekparolis pri mia patrio. Mi rakontis, kiel altvalora estas la bona amiko, kiu estas konfidebla eĉ en la danĝero, se ni bezonas defendon kontraŭ la malamo de niaj malamikoj. Kiom dolĉigas nian vivon la amikeco, la amata edzino aŭ la varma familia rondo. Kia feliĉo estas dum malvarmaj vintraj vesperoj ĉirkaŭsidi kun amatoj la fornon. Kristnaske, ĉe la festotago de la amo, aĉeti donacojn al iu, aŭ ĉe aliaj festotagoj inviti niajn amikojn, en kies rondo povas disvastiĝi sprita babilado pri teatro, arto, pri etaj okazaĵoj kaj kiom beligas la vivon, se ni ilin regalias.

Mi kompreneble devis aparte klarigi la amikon, malamon, edzinon, feliĉon, teatron, arton kaj regalon. Ĝoje mi vidis, ke Zatamon aŭskultis miajn vortojn tre atente, prenis notlibron kaj pri mia rakonto skribis notaĵojn al si. Mi jam komencis esperi, sed fine li deklaris, ke inter miaj vortoj li kredas malkaŝi kelkajn kontraŭdirojn.

– Mi esperis, – li diris, – lerni ion de vi, ĉar vi parolis pri ia kunlaboranta helpo, kiu ŝajnis montri al lerta matematika intelekto, sed mi eraris. Ĉar en via lando la kazoajn aferojn oni rigardas validaj nur por apartaj grupoj, kio pruvas, ke ĝi jam ne estas kazoo, ĉar kontraŭ aliaj vi ĝin ne plenumas. Se vi favoras iujn, kiujn vi imagas al vi pli proksimaj, tio estas farebla nur, se vi por la aliaj donas malpli aŭ nenion. Konklude, same la aferoj, donitaj al la amikoj, kiel la aferoj, nedonitaj al la eksterstarantoj, tute konformas al la koncepto de la kazi. Viaj amikoj ja ne ricevas la donaĵojn pro bezono aŭ bazo de la ekvilibro, sed – almenaŭ tiel mi komprenas el viaj vortoj, – sole tial, ĉar vi inventis la kazian koncepton: “amikeco”.

– Kaj koncerne la vorton “amo”, – li daŭrigis, – laŭ mia opinio vi intencas per ĝi signi ke al la homoj, starantaj ekster certa malvasta grupo, vi devas malpli korekte konduti, ol ili meritas laŭ sia natura ekzisto. Sed ĉi-okaze kial vi nomas la saman koncepton alifoje per la vorto “malamo”?

Min konsternis la nekomprenemo kaj mi komencis klarigi la diferencon, sed li persistis ĉe la aserto, ke kio estas trans la reciprokeco kaj ekvilibro, tio estas kazi kaj ne havas sencon ĝin dissolvi je du diversaj vortoj. Kaj se ni donas diversajn sencojn al tiuj du vortoj, tio pruvas nur nian konfuzan vidon.

– Aŭ, – li daŭrigis, – kial oni devas estimi la edzinon kaj amatinon super la valoro de ŝia natura ekzisto? Ĉiuj virinoj havas ja la samajn organojn! Krome, laŭ mia opinio, vi faras diferencon ankaŭ inter la infanoj laŭ tio, ĉu ili devenas el via semo aŭ el tiu de aliulo, kvankam ankaŭ infanoj el fremda semo devenantaj ekzistas tute same, sed vi la antaŭajn infanojn nomas viaj “propraj”, kvankam ĉiu persono estas nur la propraĵo de si mem, ĉar lia vivo naskiĝis al li mem, ne por la generinto. Kaj al tiaj infanoj vi alportas kristnaske donacojn, dum al la ceteraj ne. Krome ĉi tiun agon vi aspektigas tiel, ke vi donas trans la ekvilibro kaj reciprokeco, kaj eĉ pli, vi emfazas tion antaŭ la infano, kiel ion tre justan, kio estas duoble kazi. Nome, la infano same havas rajton pri sia propra parto el la komunaj bonaĵoj, kiel ĉiu alia kaj malĝuste estas ŝajnigi, kvazaŭ la infano ĝin ricevus de ni, kaj eĉ sen rekompenco.

Sed li ĉefe malpravigis la kristnaskon, el kio li opiniis, ke ni devas pli malami niajn homfratojn je aliaj tagoj. Vane mi klarigis, ke la kristnasko estis kreita ne por la malamo, sed por la amo, li persistis, ke la amo jam supozigas la ekziston de malamo, kiel la lumo la ombron kaj nur tie povas kreiĝi por ĝi aparta vorto, kie ekzistas ankaŭ ĝia kontrasto, ĉar tio, ke ni iun amas, jam enhavas en si mem, ke kontraŭ la aliaj ni devas konduti malpli utile, do, la amo estas jam per si mem kazi kaj alportas kun si la konfliktojn, koliziojn, putriĝon, zorgojn, malsaton, lavangsimilan akumuligon de kaziaj aferoj kaj per tio la ruiniĝon de la produktado kaj de la komuna bonstato.

Li opiniis, ke verŝajne ĉe ni estas multaj behinoj, kiuj, kvankam ili scias, kiom malĝuste ili agas, tamen klopodas pli manĝi, malpli labori kaj transŝovi la laboron al aliaj, ĉar ili estas inokulitaj per la veneno de la amo.

Li ne komprenis, kial ni nomas utila ĝuste tian staton, kiam ni havas malpli multe el la laboro kaj pli multe el la manĝaĵo. Niaj organoj bezonas ekvilibron kaj la troŝarĝo estas egale malutila, ĉu la muskolojn ĝi trafas aŭ la stomakon.

Mi jam vidis, ke tiamaniere li neniam lernos la esencon de la amo, do mi menciis, ke ni, eŭropanoj, estas ĉiuj la adeptoj de granda profeto, kiu antaŭ dumil jaroj deklaris, ke ni devas sendiference ami ĉiun nian homfraton, do la amo devigas ne nur kontraŭ malvastaj grupoj, sed kontraŭ la tuta homaro.

Mi rakontis, kiel bela kaj plezura igas nian vivon ties sekvado, la religia kredo, kiu plibeligas nian animon, ĝin plenigas per plezuro, kiu konsolas kaj donas azilon kontraŭ la sortbatoj, kiel edifa estas la konscio pri la senlima mizerikordo, kiu donas apogon al la animo.

– Ĉu ne estus pli simple sekurigi la vivon jam de komence? – li demandis.

– Kiel tiu demando rilatas al la temo?

– Sekurigi kaj fari ĝin pli elkalkulebla.

– Sed kial?

– Por ke vi ne devu rifuĝi el la malcerto al la malcerto. Konfuzaj kaj sencelaj kaŭzoj estigas nur konfuzajn kaj sencelajn efikojn.

Kompreneble per tio mi ne fariĝis pli saĝa. Mi respondis, ke lia respondo estas multe pli konfuza ol nia vivo, kiun la ĝenerala leĝo de la amo starigis sur firmajn fundamentojn, kaj kunligis la tutan homaron.

Li respondis, ke miaj novaj vortoj kontrastas kun la aliaj, diritaj pri la amo, sed li estas certa, ke inter tiuj du la antaŭa diris la veran situacion, ĉar, se la amo estus deviga kontraŭ ĉiuj niaj homfratoj, ĝi jam ne estus nomebla amo, same, kiel se la tuta surfaco de la tero suprenleviĝus al la alto de la Himalaja montaro, neniue asertus pri la tero, ke ties fina punkto estas montpinto, sed oni nomus ĝin ebenaĵo kaj ni eĉ ne havus apartan vorton pri la montpinto. Tamen li opinias, ke tiu profeto verŝajne estis hino, en kiu ekzistis la kazoo stato, nur ni ne komprenis la instruitajn matematikajn tezojn kaj faktojn, verŝajne tial, ke ni havas animon, kiu konfuzas la komprenon, kaj anstataŭ simple konsciiĝi pri liaj vortoj kaj transnaskiĝi al la stato de l' kazoo, ni serĉas en liaj vortoj “konsolon”, “belon” kaj “plezuron”. Evidentas, ke tiamaniere ni neniam havos vivon.

Kontraŭ tio mi akre protestis. Mi deklaris, ke la esenco de la homo tamen ne estas lia mano, piedo aŭ stomako, sed lia interna memo kaj la animo sin nutras per la belo kaj varieco, kiujn ĝi same bezonas, kiel la stomako la manĝaĵon.

Ĉi tion li diris tute nekomprenebla kaj petis min klarigi, kio estas la belo, kiun la animo hezonas kaj kio estas esence la animo, kiu bezonas ĝuste tiajn aferojn, kiajn la homo mem ne bezonas, dum mi tamen asertas, ke la animo estas la homo mem. Ĉar, – li diris, – mi klarigis ĝin antaŭe kiel glumaterialon de la agadoj, sed li konjektas, ke ĝi estas ne nura disigilo, kiu ŝoviĝas inter la faktojn de la efektiva mondo, sed ĝi havas ian memstaran estadon kaj ŝajnas esti tre konfuza afero. Ĝi kondutas kiel vivaĵo, mi atribuas al ĝi nutradon kaj digeston, sed tamen mi ne povas priskribi ĝian formon.

Nevole mi devis rideti. Mi rememoris pri iu el miaj malnovaj pacientoj. Tiu venis al la militŝiparo kiel mallerta doklaboristo. La bubo estis tre stulta, kaj lia militinstruo kaŭzis multan zorgon al liaj superuloj. Dum lia kuracado ankaŭ mi mem okupadis min pri lia instruo. Longe mi rakontis al li pri la glora destino de la angla militŝiparo, pri la brila pasinto de la Unuiĝinta Reĝlando, kaj mi priskribis, kiel dolĉan nutron ricevas nia animo el la tradicioj.

Fine, kiam mi demandis, ĉu li jam scias, kio estas la tradicio, li respondis:

– Ĝi estas eble ia pudingo.

Nun mi, havis proksimume la saman taskon kontraŭ Zatamon.

Por klarigi la sencon de la animo, mi menciis al li la plej eminentajn verkojn de la beletristiko: Hamleton de Shakespeare, Anna Karenina de Tolstoj kaj la Kreutzer-Sonaton, la Ferfabrikiston de Ohnet, la Sinjorinon de Kamelioj de Dumas, Per-Ginton de Ibsen kaj entute la klasikajn verkojn, kiuj penetras en la plej profundon de la homa animo, suprenportante kaj elmontrante la sekretajn risortojn de la kaŝe kirliĝantaj pasioj, precize analizante la misteron de la sekretplena Memo, la memkonfliktojn kaj subkonsciajn inhibiciojn, kiuj ofte disigas unu de la alia eĉ la plej serenajn animojn, pelas ilin al disonancoj kaj katastrofoj, eĉ pli, – kiel Raskolnikov, – al la murdo, sed sammaniere ilin interpacigas kun la malamiko kaj eĉ kun la morto. Mi akcentis, kiel profunda kaj preciza estas la milflanka karakterizo de la individueco de Anna Karenina, kiel granda travivaĵo estas ekvidi la tragedion de nia animo en la animbatalo, kiun doktoro Faŭsto aŭ Per Gint lukta kun si mem.

Li atente aŭskultis miajn vortojn kaj fine deklaris, ke ni verŝajne pereas en la abismo kreita de ni mem, ĉar anstataŭ, vidante la aferojn laŭ ilia klara realo, ni simple vivus, ni prefere ebrie erarvagadas en la labirinto de inkubaj problemoj, fermitaj en si mem. Li esprimis la opinion, ke la animo estas iu terura malsano, kiu konfuzas ĉion kaj malhelpas la elformiĝon de la kazoa egalpezo. Li nur miris, kial la animon, kiel ion fuŝitan kaj konfuzitan, ni devas senĉese analizi tra longaj libroj, anstataŭ, ke ekkoninte ĝian senutilon, ni forĵetus ĝin kaj serĉus alian aferon, per kiu ni povus vivi.

– Ankaŭ ĉe ni okazas, – li diris, – ke la fabrikado de la metilalkoholo, vitriolo aŭ celulozo fuŝiĝas. Malbone fabriki ĉiujn ĉi oni ja povas laŭ cent kaj cent manieroj, sed ni rigardus frenezulo tiun, kiu dediĉus sian vivon por priskribi, kia estas la malbona celulozo, laŭ kiom da manieroj ĝi povas malboniĝi kaj por kiom multaj celoj oni ne povas uzi ĝin. Niaj libroj enhavas nur la fabrikadon de la bona celulozo, pri kio ĉe vi eĉ unu linio ne estas skribita. Sed ĉefe mi ne komprenas, kial vi nomas kreaĵo kaj verko tion, se iu forŝparante de la kreado sian laboron, misuzas sian vivon por la analizado de malbonaj kaj maljustaj aferoj.

Mi vane protestis kontraŭ la aserto, ke tiuj estas malbonaj kaj maljustaj aferoj. Mi jam vidis, ke por ĉi tiuj homoj nur la pudingo estas nutraĵo, do mi jam intencis respondi nur al la demando, kial oni skribas la librojn.

Mi diris, ke ili estas skribitaj por distro, kiu bonfartigas la homon, do ni ĝin bezonas. Al la demando, kio estas la distro, mi menciis la legadon, ludon kaj babiladon. Kompreneble li deklaris, ke ankaŭ ĉi tiuj estas kaziaj aferoj.

– Ĉe vi eĉ la babilado estas kazi? – mi demandis surprizite.

– Ne estas tia la necesa interparolado. Sed kiel mi konjektas, vi parolas pri la parolado, farita por si mem, kiu, ĝuste tial, ne povas tiel bonfartigi la homon, kiel la kreanta laboro.

– Sed dum la postlabora tempo!

– Tiam ni bezonas ripozon. Aŭ kion vi opinias pri la homo, kiu alveninte laca al sia celo, sidiĝus, sed eĉ sidante movus laŭ paŝado siajn piedojn? Ĉu tio estus agrabla? Kaj por kiu tamen agrablas, tiu same devus trovi agrabla la superfluan, kiel la necesan paroladon, eble ĉi lastan eĉ plie kaj serĉus la okazon foruzi sian tempon de la neceso al la superfluo, dum la aliaj okupiĝas pri la necesaj, kaj produktas, kio jam ne estas kazoo. Se ni taksas la superfluaĵojn valoraj, tio estas la ĝermo, el kiu naskiĝas la kaziaj aferoj, kiujn vi nomis belo, distro, beletristiko kaj ceteraj sensencaĵoj.

Mi vidis el ĉio ĉi, ke propre li ne komprenas, pri kio temas, kaj mi rimarkis, ke radike diferencas la tempo ŝtelita for de la laboro kaj la freŝiga distrado, kiun oni faras post honesta laboro kaj tiu alcelas ĝuste fortigi la laborkapablon de la korpo kaj cerbo. Sed li obstine ripetis:

– El la kulto de neestantaj aferoj estas gajnebla nure malutilo, ĉar ni mem vivas en la estanta mondo.

Mi longe cerbumis pri ekzemplo de distro, kiu eĉ el la vidpunkto de la kazoo ne estus akuzebla. Fine mi menciis la ŝakludon, kiel la distron de la animo, kiu al neniuj estigas malutilon.

Mi desegnis la ŝaktabulon, poste sur malgrandaj paperpecoj la figurojn, kaj mi klarigis la regulojn, kio – mi emfazas, – estis malfacilega tasko. Neniam mi havis tiel neinstrueblan lernanton. Kiam mi klarigis jam tri fojojn, ĉe la kvara li denove demandis:

– Sed kio estas la celo?

– Elmeti la reĝon de la kontraŭulo, – mi diris kaj komencis denove klarigi.

Fine, post multaj ŝultrolevadoj, li konsentis ludi. Mi antaŭenpaŝis per peono kaj fingromontris, ke nun sekvas li. Li simple prenis mian reĝon, metis ĝin flanken de la tabulo kaj demandmiene min alrigardis.

– Kaj kian sencon nun ĝi havas? – li demandis stultmiene.

Mi kolereme ĝin remetis.

– Tio ne eblas tiom simple!

– Vi vidas, ke ĝi eblas!

– Sed vi devas plenumi la regulojn! Tiamaniere ĝi kompreneble ne havas sencon. Se vi ludas laŭregule, vi vidos ĝian sencon.

Ni komencis denove la ludon, kaj malfacile ni eĉ finis ĝin. Nature mi venkis.

– Kaj nun? – li demandis.

– Nun mi estas la venkinto.

– Kio estas tio?

– Mi gajnis.

Longe li pensadis. Evidente li ankoraŭ nun ne komprenis.

– Kaj kio estas tio? – ekvoĉis fine.

– Ke mi venkis.

– Vi klarigas unu vorton per la alia, kion vi verŝajne bezonas tial, ĉar neniuj el ili ambaŭ havas rilaton al la realo.

Li ne kapablis kompreni, kial ni faris – laŭ liaj vortoj – tiel longe kaj artifice la nenion, kiu eĉ tiam ne havus sencon, se mi estus jam komence elmetinta lian reĝon. Kaj li konkludis, ke ankaŭ nia tuta privata kaj publika vivo devas konsisti el komplikado de la nenio, ĉar niajn agojn direktas imagitaj idoloj. Se ni valorigas la nenion kiel realaĵon, el tio povas elkreski nur mizero, konfliktoj kaj akumuliĝo de kaziaj aferoj, kiuj ĉiuj devenas verŝajne el la malsano, kiun mi nomas animo kaj sentimento, kaj kiu nin retenas de la kreado.

Min afliktis la aroganta tono kaj mi kontraŭdiris, ke ĝuste la animo estas la naskinto de la kreitaĵoj. Tiu estas, kin nin flugigas, tiu la homojn suprenlevas de la griza humo kaj instigas al kreado.

Argumente mi menciis la pentradon, laŭdante la ravan grandiozecon de Mona Liza, la katedralojn, skulptaĵojn, la tombajn monumentojn, ornamajn marmorfrontojn de la publikaj palacoj, sed li obstine ripetadis:

– Ĉio ĉi tio pravas, ke vi foruzas vian energion de la kreanta laboro, ĝi elbalancas kaj flankenreligas ĝin. Nur tion mi ne komprenas, kiel vi povas nomi flugilo la jugon, kiu malhelpas vin en la facila travivo de la vivo, kiu pelas vin al erarvojoj, al la labirintoj de problemoj kaj al sensencaj konfliktoj? Ĉi tiu ŝarĝo ne nur ne levas, sed vin malhelpas en la progreso kaj vin premas malsupren, sed ne al la tero, kiu estas la sola, vera tereno de la vivo, sed sub la teron, kie vi ŝanceliĝadas en la mallumo kaj ne povas elgrimpi al la simpla, sunluma realo. Ties rezulto estas la multaj sortbatoj, malamo, mizero, beletristiko, necerteco, donaco, subpremo, amo, mensogo, pentraĵoj kaj ĉiuj tiuj vivŝarĝoj, kiujn vi rakontis.

Kaj mian tutan rakonton li rigardis nur dokumento pri tio, ke la sola maniero travivi la vivon estas la kazoo, la kunlabora helpo, kiam ĉiu, laborante por unu komuna celo, dediĉas sian vivon al la komuno.

– Ĉi tion, – li daŭrigis, vi nature signas per amo, sinofero kaj per aliaj strangaj, kun la realo ne kunligitaj vortoj, kvankam tiuj vortoj estas unue neestantaj konceptoj, due, iliaj rezultoj estas rekta kontrasto de la serena kazoo, kiu estas la sola maniero de la reala utilo kaj kiun vi ne konas.

Ĉi tiun akuzon mi jam absolute ne povis lasi sen refuto. Mi deklaris, ke en mia patrio ĉiu ŝtatano dediĉas sian vivon al unu komuna celo, ĉar ĉiu scias, ke per la perdo de la patrio perdiĝos ĉio. Mi menciis kiel la plej grandiozan ekzemplon de la komuneca ideo la armeon, rakontante la batalojn de niaj prauloj, per kiuj ili fondis la nunan mondhegemonion de mia patrio.

Zatamon dum iom da tempo atente min aŭskultis, sed sur lia vizaĝo pli kaj pli videbliĝis iaspeca maltrankvilo kaj fine ekstarante li deklaris, ke la hodiaŭa lernado verŝajne troŝarĝis mian cerbon, ĉar mi jam eĉ ne povas kompreni liajn vortojn, kaj miaj lastaj vortoj jam ne nur al la realo ne havas rilaton, sed eĉ inter si ne havas interligon.

Sed mi ne lasis min ekhalti. Denove mi komencis klarigi al li la majestatan taskon defendi la patron. Fine mi sukcesis komprenigi, ke troviĝas okazoj, kiam la civitano devas oferi sian vivon por vivan teni la patron.

Post tio li demandis, kio estas la patrio.

Mi diris, ke ĝi estas la komuno, do la sumo de la civitanoj. Sed tiam li jam miajn komencajn vortojn ne komprenis kaj demandis, kiel ni povas vivi sume kaj komune tiel, ke ni unuope ĉiuj mortas.

Mi senesperige mansvingis, el kio li konkludis, ke mi devas esti tre laca.

Li intencis foriri. Vane mi asertis, ke ĉio, kion mi rakontis, estas plene konforma al la reala vivo. Vane mi asertis, ke ankaŭ mi profesias per la kuracado de vundoj, kiujn antaŭe faris aliaj, li respondis, ke miaj vortoj fariĝas pli kaj pli kontraŭdiraj, kaj mi nepre observis ion malprecize en mia patrio.

Mi plenforte insistis reteni lin. Mi promesis al li ĉion klarigi, kaj tiam li nepre komprenos min.

Zatamon residiĝis.

– Sed kial vi ĉion ĉi faras? – li demandis.

– Ĉar ni kapablas senti.

– Ni havas la samajn sentorganojn, kiel vi, kaj tamen ni ne faras.

– Ĉar vi sentas la lumon, varmon, voĉon, sed la beaton ne.

– Kio estas do tio, kion vi nomas beato?

– La kontentiĝo de la animo.

– Do tion, ke la animo satiĝas?

– Ian tiaspecan aferon.

Li ekcerbumis.

– Ĉu via animo satiĝis dum nia ŝakludo?

– Ho jes, ĉar mi venkis. Nu, vi ekzemple ne sentas la ĝojon en tia afero.

– Kaj kiel vi sukcesas fari, ke ambaŭ ludantoj venku?

Malgraŭ mia deprimita humoro mi ekridetis.

– Kiel vi imagas tion? Ludo estas por ke ni ĝin ludu ne *por*, sed *kontraŭ* unu la alia.

– Kaj ĉu la malvenkanta ludanto estas ankaŭ beata?

– Tute ne. Tiu estas malbeata. Sed aliokaze ankaŭ li povas esti venkanto.

– Kaj kial malbeatigi la duonon de la ludantoj?

Ĉi demando – sincere konfesante – iome konfuzis min, kaj mi devis forte koncentrigi miajn pensojn por komprenigi la situacion.

– La afero estas jena, – mi komencis. – La beato signifas al la animo iaspecan energio-akiron kaj, kiel ĉiu energio, eĉ tiu devenas el ia nivel-diferenco: el la sukcesoj, kiujn akiris mi kaj ne aliuloj.

– Ekspliku tion pli kompreneble!

Por klarigi mi menciis al li la kutimajn ordenojn de la militŝiparo, mi rakontis pri la potenco de la faraonoj, pri la trezoroj de la maharaĝoj, kaj poste mi ekzempligis ankaŭ la poŝtmark-kolektadon.

– Kaj nu, – mi diris fine, – kian sencon havus la ordenoj, se sur ĉiuj brustoj pendus la samaj ordenoj? Kio bonfartigus la hindan maharaĝon, se ĉiu havus tute samkvantan diamanton aŭ la poŝtmark-kolektanton, se ĉiu havus Mauritius-poŝtmarkon?

Li kapneis.

– Ŝajnas, por la beato necesas la malbeato ne de unu homo, sed tiu de tre multaj.

– La beato, kiel energio, estas proporcia kun la akirita nivelo, kiu estas mezurebla nur per la situa rilato al tiu de aliaj. La ulo estas des pli beata, super ju pli multajn homojn li leviĝas, kaj tiu tute ne estas aliel imagebla. Sed ĝuste la deziro de la beato estas la risorto, kiu nin instigas al kreado kaj laboro. Sen tiu ni eĉ nun grimpadus sur la arbobranĉoj, kiel antaŭ jarmiloj.

Li deklaris ankaŭ tion tute nekomprenebla kaj konkludis, ke la beato estas ankaŭ neatingebla fantomo.

– Ĉar, – kiel li diris, – sekvas el la esenco de la aferoj, ke super ĉiujn homojn povas leviĝi maksimume unu homo, do la ceteraj estas memkompreneble ĉiuj malbeataj.

Li esprimis la opinion, ke la beato eĉ ne povas ekzisti, ĉar, se ĝi ekzistus, ĝi jam ĉesus esti.

– Kiel kompreni tion? – mi demandis.

– Ĉiuj viaj fiksjaj ideoj ĉesas ekzisti en la minuto de la efektiviĝo, kaj viaj imagitaj celoj, – kiujn vi kutimas nomi kulturaj klopodoj – diferencas de la realaj celoj ĝuste laŭ tia esenco. La malsatulo suferas nur tiom longe kiam li estas malsata, sed satiĝinte li sentas feliĉon, kaj lian feliĉosenton ne malaltigas la fakto, se aliuloj ankaŭ satiĝis, ĉar la stomakon kontentigas ne la malsato de aliaj, do, ne la koncepto de la niveldiferenco, sed la materia realeco de la satiĝo. Sed via animo nutriĝas nur el la malsato de aliaj. La admiralo fariĝus malbeata, se ĉiu fariĝus admiralo kaj la poŝtmark-kolektanto forbruligus sian kolektadon, se iu bonintencu registaro, kiu intencus akiri ĝeneralan beaton, sukcesus doni al ĉiuj civitanoj Mauritius-poŝtmarkon. Same, kiel la ĝeneraligo de la amo signifus ties ĉeson kaj ties transformiĝon al la kazoo, samtiel ĉesus la beato, se ĉiu povus atingi ĝin. Ĝuste tial estas senfrukta la klopodo de viaj filozofoj por elpensi la staton de la komuna beato. Do: ĉu estas imagebla tiaspeca afero, kiu estas nur ĝis ĝi ne estas?

Mi intencis interrompi liajn vortojn, sed li daŭrigis:

– Sed ni pripensu, ĉu entute materiale povas esti kontentigeblaj la kulturaj bezonoj? Nome, la klopodo de via animo estas neniam la helpo, sed la elrabado de aliaj, ĉar nur tiu donas niveldiferencon. Sed la stomako de via animo estas truhava sako, kies plenigo ne estas ebla. La amplekso de nia reala stomako estas strikte difinita. Ne povas eniĝi pli ol difinita kvanto de manĝaĵo kaj la troŝarĝo de la stomako estas same dolora, kiel la malsato. Ni malbonfartas same en la varmo, pli ol dudekkvar celsius-gradoj kaj malpli ol dekok gradoj, sed viaj kulturbezonaĵoj ne havas supran limon. Se viaj reĝoj veturas en oraj kaleŝoj kaj portas diamantornamajn vestaĵojn (kio estas jam per si mem nenecesa), ili tamen ne permesas al la popolo uzi sian restintan laborenergion

por la bonfarto de la fizika ekzisto de la popolo mem, sed ili konstruigas piramidojn por si mem, aŭ militiras kontraŭ la aliaj popoloj por subjugigi ilin kaj mizerigi ilin al la celo de la nivela diferenco. La animo instigas vin ĉiam nur por piedpremi kaj ne por helpi unu la alian kaj eĉ pli: tute sencele, ĉar la celo estas ja neatingebla.

– Vi nomas la beaton iaspeca satiĝo. Do, nur la korpa satiĝo estas atingebla, sed tio des pli perfekte. Se tiu estus via vivcelo, superfluigu ĉe vi la juĝisto, policisto, soldato, kaj la varoj povus esti eksponataj sengarde en la magazenoj al laŭplaĉa bezono, ĉar por kazoa homo havas nenian sencon eluzi la laborforton de aliaj por krei al si mem superfluaĵojn kaj tiel malpliigi la fortojn, kiuj kreas la necesajn objektojn.

– Iam vi asertis, – li daŭrigis, – ke la mono certigas la justan dividon de la varoj. Tute male: oni devas certigi nur la nejustan dividon de la varoj per la antaŭa divido de la aĉetilo. La realaj celoj estas facile atingeblaj sen la perforta regulado de la divido, ĉar niaj korpaj vivceloj estas vere malgrandaj, nur la fantomo de la beato de la animo pelas vin al interbatalaĉoj. La animo estas la baza kaŭzo de la senĉesa rabado kaj batalo.

Mi ne volis lasi senvoĉe ĉi falsan aspektigon de la animo kaj kontraŭdiris, ke ni povas atingi la animan beaton ne nur per la leviĝo super aliajn, sed ankaŭ per la memhumiliĝo kaj per la rezigno je la tera bonfarto. Por ekzemplo mi menciis la budaismon, kiu klopodas ĝuste por komplete venki la materiajn dezirojn. Mi menciis la joganojn, kiuj ne portas lanan vestaĵon, kaj ili povas ĝis semajnoj resti sen nutriĝo, dum ili suprenleviĝas per la flugiloj de la animo de sur ĉi dezirŝargata tero al ĉielaj sferoj.

– Mi ne primiras, – li respondis, – ke la animo estas tiom konfuza kaj en si mem disharmonia afero, tiom pli ne, ĉar inter la beato de la maharaĝoj kaj joganoj konstatas diferencon nur vi, kiuj kredas esti kontraŭtezoj ankaŭ la amo kaj malamo.

Daŭrige li deklaris, ke estus pli bone, se la jogano ne flugetadus, sed li restus sur la tero kaj senĝene nutriĝus per la viando de la sankta bovino. Ĉar, – kiel li diris, – nenia flugetado povas ŝanĝi nian fizikan ekziston, kaj el la vidpunkto de la kazoo estas same malutile, ĉu ni kripligas nian propran korpon aŭ tiun de aliaj, ĉar ĉiuj korpoj estas konformaj kaj realaj.

– La fakto, – li daŭrigis, – ke la animo pelas vin super aŭ sub aliajn, pravas, ke ĝi ne estas por la egalpezo kaj harmonio, sed ĝuste el tiuj, kiuj vin malekvilibrigas.

Li trovis karakteriza, ke maharaĝoj vivas ĝuste tie, kie la animoj de la joganoj flugetas en la alto, dum ili malsatas kaj iliajn korpojn mordadas pedikoj.

– Nia korpo konsistas el atomoj, – li ripetadis, – kaj tiun fakton ne povas ŝanĝi ia ajn anima flugetado. Por kazia intenco eble ni povas imagi, ke ni bezonas ne aeron kaj nutraĵon, sed malsaton kaj diamantojn, eĉ povas atingi renversiĝon de nia ĝojo al kontraŭnatura stato, kion vi prave nomas beato por distingi ĝin de la laŭnatura ĝojo, sed tamen vi ne povas aliformigi vian pulmon kaj digestajn organojn. Sed tio tute ne necesas, ĉar la postuloj de nia naturo estas tre facile kontentigeblaj, dum la kreado de la diamanto, piramido kaj ora kaleŝo estas ege malfacila, kaj ni povas ĝin fari nur por la malutilo de nia pulmo kaj stomako.

Li povis trovi nenian diferencon inter la vivoj de la maharaĝo kaj de la joganoj. Li nomis ambaŭ malsanaj.

– Do, kiel vi opinias entute pri la animo, – mi demandis, ĉar la disputo iom trolongiĝis, kaj mi jam intencis aŭdi la koncizan rezulton.

– La animo estas malsana, ĉar ĝi staras disonance al la korpo. Ĝis kiam vi ne povas la korpon biologie transformi kaj akordiĝi al ĝi. La animo ĉiam okazigos nur vian ruiniĝon.

Dum kelkaj momentoj mi luktis kun mi mem, mi intencis respondi kolere, kvankam mi sciis, ke mi nenion atingos per tio. Ke mi tamen sukcesis min bridigi, tio estis dankebla nur al tio, ke mi

ekkonsciis, ke nia disputo jam flankeniĝis de la temo, kaj pri la plej grava demando eĉ nun mi ne ricevis informon.

Li jam estis ĉe la pordo, kiam mi postkriis, ke mi deziras ricevi respondon nur pri unu demando.

Zatamon sin turnis, kaj mi demandis:

– Respondu: kio subtenas en vi la kazoan spiriton? Se ĉe vi ne estas justofaro, leĝo, edukado, kio tamen subtenas tion, kion vi nomas kazoo kaj ekvilibro?

– Kio subtenas la ekvilibron? La ekvilibro mem. Nur diferencaj pezoj ekbalancas la pesilon!

Do, li intencas denove eviti la respondon! Kaj per tiom facila aforismo! Tiu obstineco iom post iom vekis en mi la suspekton, ke li eble ja ne estas nekomprenema kiel li ŝajnigas, sed li kaŝas antaŭ mi zorge fermitajn sekretojn. Sed mi jam decidis ne lasi al li elgliton. Li nepre devas respondi al mia demando aŭ deklari, ke li ne volas malkaŝi la sekreton.

– Ĉu vi emas respondi al mia demando, aŭ ne? – mi donis al li la rektan demandon.

– Kion vi esence ne komprenas?

– Mi ne komprenas ĉi tiun perfektan kunlaboron! Ĉi tie neniuj havas deviantan, individuan celon. Kiel estas imagebla la senleĝa leĝo, la senmorala moralo? Kie estas la forto, kiu certigas la cirkuladon laŭ la orbitoj?

– Mi ne scias, – li respondis, – kiel eblas tion demandi. Kio igas la planedojn rondiri laŭ elipsaj orbitoj? Ĉu ne la planedoj mem, kies masgravito efikas tiel?

Poste li parolis pri tio, ke ankaŭ la gravitado ne estas io memstara, sed ĝi estas la planedo mem, sekve ĉio, kio okazas, tial okazas tiel, ĉar ĉio, kio estas, *ekzistas*. Poste li daŭrigis:

– Forto estus nur bezonata, se ni volus ŝanĝi la orbitojn, ĉar forton bezonas nur la elbalancigo de la ekvilibra stato. Ĉi tiun forton efikas ĉe vi la animo. Vi rigardas la kazon ŝtalforta leĝo de la kunlaboro kaj esploras la leĝdonanton, kvankam ĝi simple nur estas. Kompleta ordo povas deveni nur de io estanta per si mem, ĉar tion certe plenumas ĉiu afero. En la fiziko tiun oni nomas “la vojo de la plej malgranda kontraŭstaro”, kia estas ekzemple la perpendiklo por la libere falanta substanco. Ĉiu leĝdono estas per si mem malutila interveno, kiu signifas debalanciĝon, ĝermon de eraroj kaj necertecon, do: kazion.

– Eble ni ne parolu per kosmaj metaforoj, – mi diris, – ĉar tio deflankigas nian diskuton. Mi deziras informojn pri via socia sistemo.

– Vi parolas, kvazaŭ la homo ne estus ero de la kosmo. Laŭ vi la realo estas metaforo kaj mi jam tute ne miras, ke inverse vi rigardas viajn neestantajn problemojn estantaj realaĵoj.

– Kiel kompreni tion? Ĉu vi eble volas per tio diri, ke la gravitado kaj la kazoo...

– Jes, ili samas. Ankaŭ la homo vivas en la kosmo, do la kazoo ne estas leĝo aŭ kutimo, sed la realo mem de la kosmo, kun kiu ĝi esence identas. Ĉio kio ekzistas en la mondo, ekzistas laŭ la kazoo, ĉar la kazoo estas la ĝenerala realo. Kio estas ekster ĝi, tio ne ekzistas, ĉar ĝi estas kazio, kiu estas la neesto.

Longe mi pensadis pri liaj vortoj. Dece al korekta ĝentilhomo, tiujn mi volis ne refuti, sed kompreni. Mi denove trapensadis ĉiujn liajn frazojn, sed ju pli mi cerbumadis, des pli konfuzaj ili ŝajnis al mi.

Fine mi devis konvinkiĝi, ke iliaj doktrinoj estas nure kriplaj sensencaĵoj, tute nekompreneblaj por la logika, angla pensmaniero, kaj mi povas aserti, ke ĉiu kulturita civitano de mia patrio estus konkludinta la samon.

El la tuta konversacio mi ekkonis nur, kio *mankas* ĉe ili kaj al kio ili estas senkapablaj. Ege malmulte por kompreni la sekreton de la hina vivo.

Mi decidis provizore rezigni pri la esploro, konfidante la solvon de miaj problemoj al la tempo kaj al miaj personaj spertoj.

Sesa ĉapitro

La aŭtoro partoprenas en la publika vivo de la hinoj kaj okupiĝas per kuracista praktiko. – La mirinda kuracista scienco de la hinoj. – La aŭtoro fariĝas senkulpe mortiginto, post kio li forlasas sian postenon. – La hinoj koten tretas la infanan animon. – La aŭtoro fariĝas tekslaboristo, sed la enuo preskaŭ puŝas lin en katastrofon.

Iutage Zatamon komunikis al mi, ke mi jam verŝajne lernis sufiĉe kaj mi povas fariĝi valora ano de la hina socio. Li rimarkis, ke kvankam la strukturo de mia cerbo ŝajnas ne sufiĉe klara kaj verŝajne la perfektecon por la kompleteco de la vivo kiel staton mi ne atingos, tamen mi povas fariĝi utila ano, se mi klopodos pri la praktika vivo.

Li menciis, ke li okupiĝis pri kelkaj certaj behinoj, kiuj, kvankam ili malhavis la kazoan staton, tamen povis plenumi la taskon de la vivo. Ili kompreneble ŝanceliĝadis en siaj agoj, ĉar ilia cerbo malhavis la naturan kompason, sed la lernitaj metodoj tamen formis tiel iliajn agadojn, ke la nekuracista laiko ne povis rimarki la organan mankon, simile, kiel la surdmutulo ellernas la parolon el la lipoj de aliaj, kvankam la voĉon, kiun tiu elbuŝigas, li neniam travivas laŭsence.

Do, li komunikis ke mi jam povas forlasi la hospitalon kaj komenci la vivlaboron.

Do mi estis forsendita kaj mi ektremis pro mia estonto. Mi staris senkonsile, kaj mi demandis, kion mi devas fari. Mi ja ne povas scii, kie estas bezonata laborulo, kie mi povas havi postenon.

Sed li respondis, ke mi iru tien, kien mi volas, kaj ne deziru direktadon. Ĉiu mem scias plej bone sian kapablon kaj enmiksiĝi en la aferojn de la aliaj estus kazi.

Liaj vortoj min ja tute ne trankviligis; kontraŭe, min plenigis la plej granda necerteco. En mia patrio ĉiu diplomo de ĉiu lernejo havas fikse difinitan valoron, la civitano precize scias, al kiu posteno ĝi rajtigas, kiu estas la ĉefulo de tiu oficejo kaj kiu interrilatas amike kun tiu el siaj amikoj. Ĉio havas difinitan kaj klaran vojon; sed kion mi komencu ĉi tie, en la lando de la anarkio, elĵetite al la necerteco?

La unua problemo estis la loĝado. Ĉar la metodon akiri manĝaĵon mi jam sciis, sed pri la loĝcirkonstancoj mi eĉ palan ideon ne havis.

Forlasinte la hospitalon, mi longan tempon vagadis en la ĉirkaŭaĵo, poste mi iris en la arbaron, sed de tie la malvarmeta aero min repelis.

Fine, kolektinte mian tutan energion, mi enpaŝis iun domon. Mi intencis peti iun loĝanton, ke li donu al mi lokon por unu nokto. La hinoj estas facile gastigemaj (gastamaj oni vere ne povas ilin nomi) kaj espereble mi sukcesos akiri tranoktejon, kiel mi jam sukcesis ĉe mia alveno ĉi tien.

Mi malfermis ĉiun pordon. Tiuj estis kompreneble sen seruroj, kaj ĉe mia enpaŝo la logantoj eĉ ne turnis sin al mi. Ili neniun priatentas, ĝis la veninto ekparolas. La koncepton de la nedezirinda gasto ili same ne konas kiel tiun de la dezirinda.

La unua, al kiu mi enpaŝis, estis leganta. Mi ne volis lin ĝeni. La dua jam senveste kuŝis en la lito. En du loĝejoj mi neniun trovis hejme. Fine la trian mi petis doni tranoktejon.

– Kial? – li demandis. – Ĉu ne estas neokupita loĝejo?

– Ĉu estas? – mi demandis interesiĝe.

– Mi ne povas scii. Rigardu mem.

– Do, kiu registras la loĝejojn?

– Neniu, – li respondis, kaj forturnis sin.

Se mi montrus mian belohinan legitimaĵon, eble mi estus ricevanta informon, sed mi ne tro kuraĝis per ĝi demonstracii, ĉar mi estis lasita libera, kiel utila ano de la socio kaj, kiel posten-kandidato, mi

ne volis montradi, kion mi ne scias. Mi devas vivi el mia energio, do mi devas ellerni ĉion per mi mem.

Mi senvorte turniĝis kaj trairis la tutan domon.

Nu, ĉiu loĝejo havis loĝanton, aŭ la ekipaĵo montris, ke ĝi estas loĝata. Fine, en la dua etaĝo, sur la pordo mi trovis slipon:

“Mi transloĝiĝis.”

Mi malfermis la pordon. Ankaŭ tie ĉi ĝi estis neŝlosita. Mi ĉirkaŭrigardis, sed ĉio montris, ke ĝi estas tamen loĝata. Ĉiu meblo, la seĝoj, la lito estis en siaj lokoj. Jen, la lampo, la telefono, ĉio la sama kiel aliloke kaj, kiel en mia unua tranoktejo. Sed tiam kion signifas la slipo?

Mi turniĝadis embarasite. Sed, ĉar mi provizore neniun vidis, mi elturnis la liton el la muro, kiu jam estis pretigita por enlitiĝo kaj mi demetis miajn vestojn. Poste mi iris en la banĉambron por min bani en varma akvo, ĉar mi iom malvarmiĝis en la arbaro.

Jam estis malfrua vespero, mi ankoraŭ atendis la dommastron dum duonhoro, sed mi fariĝis tre dormema kaj ekdormis.

Nur post tagoj evidentiĝis, ke la loĝejo fakte ne havas dommastron kaj ili ĝuste tial surpordigas la slipon, ĉar cetere neniu povus distingi la loĝatan kaj neloĝatan ĉambron.

Matene mi precize trastudadis la ĉambron.

Krom la jam konataj aparatoj mi ekvidis kelkajn butonojn sur la muro. Ĉiu havis surskribon. Unu funkciigis la varmoregulilon, alia movis la fenestron. Iu butono havis la surskribon: “raporto”.

Mi premis ankaŭ tiun kaj scivole ĉirkaŭrigardis, sed nenio okazis. Post dek sekundoj malantaŭ mi voĉo min ektimigis:

– En ordo.

Mi ekskuiĝis, turniĝis, sed neniu estis apud mi, la megafono parolis el la muro. Mi atendis, kio sekvos, sed nenio okazis.

Tien-reen irante mi pensadis pri mia estonta sorto. La fenestron mi delasis, kaj surprizite mi ekvidis malsupre forŝvebadi centojn da aŭtoj, dum super mi serpentis la supra fervojo. Kaj el ĉio ĉi mi nenion aŭdis! La tuto ŝajnis, kiel senvoĉa filmo. Dume mi tute forgesis pri la megafono.

Nun malantaŭ mi io ekklakis. Mi turniĝis. En la muro malfermiĝis klappordeto, el kiu etendiĝis metalcilindro.

Mi aliris, ĝin ekprenis, post kio ĝi falis en mian manon.

Observante mi ekvidis, ke ĝi estas malfermebla.

Malferminte mi trovis en ĝi du pli malgrandajn tubojn. Unu enhavis lakton, la alia kelkajn pecojn da frukto. Post iom da hezito mi bonapetite tion formanĝis.

Ŝajnis, ke provizore ĉio estas en ordo. Mia malagrabla necerteca sento trankviliĝis. Mi ja povas tiel vivi ĝis iam ajn, kaj mi ne devas miksiĝi inter ili, kio ŝajnis al mi tre nedezirinda. Oni neniam scias, kiam oni ofendas inter ili la regulojn de la kazoo.

Post mia matenmanĝo mi denove iradis tien-reen, kaj agrablis al mi la sento, ke mi povas vivi senĝene.

Sed post du horoj la afero komencis fariĝi iom enuiga, kaj mi preskaŭ ekĝojis, kiam la pordo malfermiĝis kaj enpaŝis hino.

Li iom surpriziĝis, kaj mi pensis, ke la ĉambro tamen havas loĝanton, sed li poste trankvile paŝis al la muro, eltiris evakuan tubon kaj per tiu purigis la ĉambron. La banĉambron li el alia tubo traverŝis

per akvo. La ujon de mia matenmanĝo li remetis en la muron, poste li ekfunkciigis la ventolilon kaj foriris.

Nun mi estis denove ĉirkaŭita per silento, kaj mi daŭrigis la esploradon.

En la muro, malantaŭ alia klappordo, mi ekvidis grandan truon, similan al kamentubo.

Malsuprenirante al la partero, mi eltrovis ĝian destinton: ĝi finiĝis en granda kolekto, en kiun oni enĵetis la malpurajn tolaĵojn kaj el kie la lavistoj ilin verŝajne forportis. Apude, en ŝranko kuŝis la puraj tolaĵoj, elmetitaj por publika uzado.

Reveninte al mia ĉambro, kelkan tempon mi ripozis sur la lito, poste enuiĝinte mi eliris al la strato kaj tien-reen promenadis inter la grizaj, monotonaj muroj kaj malgraciaj arboj. Tagmeze mi manĝis en iu manĝejo kaj pripensadis, kiel mi povus pasigi la posttagmezon por agrable eluzi mian liberecon.

Mi planis elvojaĝi al la marbordo.

Alveninte mi plurfoje trairis la bordan promenejon, poste mi suprengrimpis al iu roko. La eterna ondado de la senlima maro igis min dormema. Do, mi dormis unu horon, kaj post la vekiĝo denove min turmentis la problemo, kion fari ĝis vespero.

Spirite malplene kaj senpense mi promenadis denove unu horon, poste mi sidiĝis sur benkon. Pro la enuo mi muelludis per miaj haluksoj; tion mi praktikis alterne antaŭen kaj inverse.

Mi ofte rigardis mian poŝhorloĝon, atendante la vesperon. Mi ekpromenis kaj kalkuladis miajn paŝojn, mezurante la distancojn laŭ plej diversaj direktoj, kaj mi bedaŭris, ke mi ne povis plu dormi.

Vera ĝojo estis por mi, kiam mi sentis malsaton. La manĝo ĉiam estas variaĵo. Mi revojaĝis al la urbo, vespermanĝis, poste hejmeniris kaj en la tomba silento enlitiĝis.

Matene, post matenmanĝo denove venis la purigisto. Ankoraŭ pli surprizite li ekrigardis min ol hieraŭ kaj demandis:

– Se vi havas posttagmezan laboron, kial vi ne diras, ke ni sendu la posttagmezan purigiston?

Mi embarase balbutis ion, ke tial kaj tiel, kaj ke mi forgesis. Li promesis anonci la aferon anstataŭ mi.

Poste mi rapide foriris kaj ĝis malfrua vespero vagadis sencele. Antaŭtagmeze mi sukcesis dormi unu horon sur la riverbordaj ripozlitoj; ankaŭ posttagmeze mi havis dormemon, sed mi jam ne kuraĝis kuŝi, ĉar tiam mi nokte ne povos dormi, kio estus eĉ pli malbona.

Tiel maturiĝis en mi la konscio, ke mi tamen devas serĉi laboron, ĉar la nenifarado ne estas longe tolerebla.

Kiel mi povus min okupi? Mi estas vundkuracisto, do mi intencis akiri postenon en ĉi tiu fako.

La sekvantan matenon mi iris al la hospitalo kaj serĉis la estraron. Sed pri tio neniuj sciis. Ili respondis, ke la hospitalo estas por kuraci la malsanulojn.

Al iu hino, ŝajnanta kuracisto, mi deklaris, ke ankaŭ mi estas kuracisto. Mi menciis mian diplomon, akiritan en Oksfordo, sed li ne sciis, kio estas tio. Mi devis malkovri mian devenon kaj ĝisnunan rolon kaj klarigi la signifon de la diplomo, sed tiam li demandis, kiel povis fremduloj konstati mian scion?

– Ĉar, – li diris, – la homo portas sian scion interne. Ĝin elekstere konstati ankoraŭ ne estas eble, sed eĉ ne estas necese, ĉar pri la lerteco, kiun iu ellernis, la lerninto havas la plej kompetentan scion. Cetere al mi ŝajnas, ke mi nenian rilaton havas al ĉi tiuj aferoj, do diru prefere, kion vi deziras de mi mem?

– Mi deziras havi postenon ĉi tie kaj labori.

– Tio estas via afero. Al tio respondu: kion vi deziras de mi mem?

Nun estis mi mem, kiu gapis. Se mi vivus dum dek jaroj inter ili, eĉ tiam mi ne povus ellerni iliajn komplikajn kutimojn.

– Komprenu, – mi diris, – mi estas kuracisto kaj mi volas labori.

Li denove respondis, ke tio estas mia afero!

– Ĉu ekzistas ĉi tie nenia sistemo?

– Tio dependas de la fakoj. Ni kuracas ĉiun malsanon per aliaj sistemoj.

Mia pacienco ĉesis. Eĉ la nekomprenemo havas limojn. Mi simple deklaris:

– Mi volas ĉi tie labori. Mi petas, enkonduku min en la ĉi tiean laboron.

Ĉi tiujn vortojn elbuŝigis nur la malpacienco. Tiam mi tute ne pensis, ke per ĉi tio mi trovis la ŝlosilon de la tuta hina vivo.

Mia kolego sen iu ajn surprizo kaptis mian brakon kaj klarigis la tutan ekipaĵon kaj la kutimojn de la sekcio.

Mi povas aserti ke, – kvankam mi vidis multajn mirindaĵojn ĉe la hinoj, – similan al tiu hospitalo eĉ sonĝe mi ne povas imagi, kaj dum mia kolego min kondukis, mi travivis miron post miro.

Tiu ne estis difinita kirurgejo. Ili klasifikas la malsanojn laŭ tute alia sistemo kaj la sekcio apenaŭ similis al hospitalo.

Nome, ni, pensante pri hospitalo, imagas vicon de blankaj, puraj malsanul-ĉambregoj. Vidante iliajn grandegajn konstruaĵojn ja mi pensis, ke ĉi tie devas kuŝi minimume dudekmil malsanuloj.

Nur poste evidentiĝis, ke la malsanul-ĉambregoj, – aŭ kiel ili nomas: dormo-ĉambregoj – okupas nur tre malgrandan parton de la konstruaĵoj kaj en tiuj estas nur kvar-kvincent malsanuloj.

Tio havas du kaŭzojn: unue, pro la vasta profilaktiko ĉe ili estas multe malpli da malsaniĝoj, due, la pli perfektaj kuracistemoj pli frue resanigas ilin.

La plejparto de la hospitalo similis prefere al fabriko. Kun mia kolego mi trairis la senfinan vicon de ĉambregoj kaj laborejoj. Ni karakolis tra gumplankaj balkonoj kaj serpentŝtuparoj, poste nin transportis liftoj kaj kurantaj rubandoj en la labirinto de maŝinoj kaj aparatoj.

Tra iu dika vitrotubo kumuluse ruliĝis flava vaporo, sub kaj super ni susuris arĝentkoloraj serpentaj tuboj, zumzumis motoroj, bruegis kompresoroj, ekbrilis signallumoj, dancadis montriloj. El la okulo de ia teleskopforma aparato ruĝa lumstrio balais kurantan rubandon, sur kiu vagadis vaporantaj boteloj. Aliloke super ni forŝvebis metala korbo, – en tiu senmova homa korpo. Antaŭ ĝi malfermiĝis la pordo de grandega metala barelo, el kiu subite bloviĝis blindiga flamo kaj la korbo rekte enportis la homan korpon. Poste la pordo fermigis.

Mi estis konvinkiĝinta, ke ĝi estas krematorio kaj kapturiniĝe mi devis ekscii, ke ĝi estas desinfektilo, ke la flamo ne estas flamo, sed radiado, kiu ekstermas kelkajn specojn de la virusoj kaj bakterioj, sed ĝi estas por la homaj histoj sendanĝera ĉar la malsanulo antaŭe estis imunigita.

Ĉi tiuj idiotkondutaj homoj estas minimume je cent jaroj pli antaŭe ol ni. Eĉ la nomojn de iliaj maŝinoj mi ne povis memorfiksi kaj demandi mi ja ne kuraĝis, nur terure ekpensis, kion mi faros ĉi tie tiel, ke mi laboru kaj tamen ne malkaŝu al ili mian senspertecon, ne donante bazon al ilia sensenca nacia fiereco.

Por eviti la honton, mi mensogis, ke mia speciala fako estas la dentkurado. Do, la tekniko de la plombado kaj de la eltiro tamen ne povis evolui al tiom mistika sorĉo, ke mi ne povus ĝin ellerni.

Mi devis hontiĝe ekscii, ke dentmalsano ĉe ili tute ne troviĝas, ĉar la manĝaĵo farita en la manĝejoj sub la gvidado de kuracistoj estas ne nur nutraĵoj, sed samtempe profilaktikaj medikamentoj, kiuj malebligas la evoluon de kelkaj malsanoj, inter ili tiun de la dentmalsanoj.

Mi jam cerbumis nur pri la preteksto de la eskapo, sed mia kolego neatendite rimarkis, ke por mi la plej bona okupiĝo estos labori en la dorm-ĉambregoj kaj asisti ĉe la operacioj, kio plej bone konformas al mia kapablo.

Lia rimarko ŝajnis al mi malica kaj estis vere ofenda, sed liaj trajtoj montris nek malicon, nek iun ajn pasion. Kaj mi devis koncedi, ke mi ne povas reiri al la nenifarado, kaj mi, – malgraŭ la honto, – akceptis lian proponon.

Ili montris mian ĉambron, mi survestis la blankan surtuton kaj klopodis labori, sed ĉiupaŝe mi tamen devis demandi.

Jam la unuan tagon mia kolego demandis min pri mia nomo. Surprizis min, ke ili entute interesiĝas pri la individueco de la laborantoj, sed evidentiĝis, ke nur la fakan gazeton ili volas sendi al mia adreso.

Kiam mi diris mian nomon, li respondis, ke ĝi ne estas nomo, ĉar ĝi havas kun mi nenian rilaton!

Mi estis konsternita, kiel li aŭdacas tion aserti; mi ja tamen pli bone scias, kiel mi nomiĝas, sed li obstine ripetadis, ke la nomo “Gulivero” havas nenian interrilon kun mi, ĝi estas sensenca konglomerato de literoj, sed li promesis al mi rememorigi mian nomon.

Se la rido ne estus rigardata kiel behinaĵo, nun mi vere povus ridegi, sed li per la plej serioza tono de la mondo, petis informojn pri la dato de mia naskiĝo kaj pri la adreso de mia loĝejo. Poste, transkalkulante mian naskiĝdaton al ilia tempkalkula sistemo, li diris:

– Nu, via nomo estas Zamono Nital.

Mi gapis buŝmalferme al li kaj nur post longa cerbumado mi malkovris la esencon de mia “nomo”: La litero “Z” signifas la personnonon, la sekvantaj la daton de la naskiĝo, la sekson kaj fakscion; la dua vorto signifas mian telefonnumeron, kiu samas kun mia loĝadreso. Do, la hinoj dum transloĝiĝo ŝanĝas ankaŭ la duonon de sia nomo.

Mi miris, ke ili ne havas propran nomon, kaj ili miris, ke ni ne havas propran nomon, nur sensencan konglomeraton de literoj, ne al ni apartenantajn.

– Por kio estas la nomo, – li demandis, – se ne eblas ekkoni el ĝi la personon?

Mi kontraŭdiris, ke el objektivaj datoj ja ne estas ekkonebla la persono kiel individua karaktero. Sed mi povis esprimi tion nur per ĉirkaŭdiro, ĉar ili ne havas vorton pri la karaktero. Sed eĉ tiam li respondis, ke mia patrio devas esti tre stranga lando: ĉe ili ja ĉiu homo tutsame enspiras oksigenon kaj sin nutras per karbohidratoj kaj albuminoj.

Kiel malproksime ili staris de la kompreno de la karaktero, same malproksime mi estis de ilia praktika scienco.

Komence mi laboris en la dormoĉambroj, sed mia laboro ne estis pli ol flegado. La dormoĉambro ĉirkaŭe konformas al la koncepto de nia “malsanul-ĉambrego”. Nun mi eksciis, kial ili nomas ĝin tamen dormo-ĉambrego.

Nome, ili ĉiun malsanulon endormigas, se la malsano estigas doloron. Ili pikas iaspecan elektran nadlon en la nukon de la paciento, per kio li profunde endormiĝas kaj estas vekita nur post la plena resaniĝo aŭ almenaŭ post forpaso de la doloroj. La hinoj simple tradormas la malsanon kaj dum la dormo estas arte nutrataj.

Iam mi portis kormalsanulon en la operacian salonon, kaj mirege mi vidis, kiel lia koro estas elprenita. En la aorton oni kroĉis tubon, kiu kontaktiĝis kun varmigita elektra pumpilo, poste lia korpo estis kunkudrita kaj la pumpilo subtenis tra tagoj la sangocirkuladon. Intertempe lia koro pulsadis en iaspeca fluidaĵo, kiu estis ĉiutage ŝanĝita kaj poste lia koro estis denove reoperaciita en lian bruston.

Mi devis konvinkiĝi, ke mi ĉi tie neniam estos rigardata kiel kuracisto. Kaj eĉ demandi mi hontis, timante, ke mi estos malestimata pro mia mallerteco; eble min trafos ilia justa mokado, kiel tio estas kutima inter kolegoj. Sed al miaj demandoj ili nur klarigadis per senpasia mieno, el kio mi nenion povis ellegi pri iliaj sentoj kontraŭ mi. Al tio, ke malantaŭ la lignaj mienoj estas nenia sento, eŭropa homo ja ne povas alkiutiĝi. Esplorante iliajn vizaĝojn, mi senĉese observadis la pasiojn, kaj el ilia malvarma konduto mi pensis, ke interne ili malestimas min. Preskaŭ plena kontrasto al ĝi estis la neimagebla servemo, per kiu mi estis helpata je ĉiu paŝo, sed sen iu ajn bonvola rideto aŭ afableco.

Ilia servemo min tiom erarigis, ke mi eĉ provis kun ili amikiĝi, sed al ĉiu mia provo la respondo estis nur rigida kaj senkomprenema rifuzo.

Ili diris, ke mi indiku precize, kion mi volas, ĉar tio, kion mi konfuze nomas amikeco kaj petas de ili, estas ia speco de nocio, do ne estas donebla.

Vane mi diris, ke mi volas nur, ke iu estu apud mi, kiu min apogas kaj kun mi interparolas; ili demandis, kion tiu faru kaj pri kio parolu. Ili faros ja ĉion, sed mi devas diri pozitivajn pri miaj intencoj.

Kiom ajn mi spertis jam pri ili, mi tamen akceptis iliajn vortojn kiel tiujn de trofieraj aristokratoj, kiuj per ĝentilaj pretekstoj elfermas la sintrudulon el sia rondo. Mi konsideris ilin kiel neesplorableblajn diplomatojn, eble ĝuste pro tio, ĉar ni alkiutiĝis, ke la senproblema vizaĝo kovras la plej grandan animan komplikecon.

La scienca kaj socia distanco igis tre ĝena mian, eĉ cetere malagrablan staton. Kiam en la operaciejo senbrue kaj kun horloĝa akurateco briladis la tranĉiloj el unu mano al la alia, mi nur ĉirkaŭsaltadis ilin, kiel servema hundeto, kaj la honto ekbrulis sur mia vizaĝo, kiam en la granda silento tamen eksonis voĉo, ĉar tiu instruis ĉiam nur min.

Kaj vane mi foliumis hejme la fakgazeton, kiun la tubpoŝto precize alportis al mia loĝejo, tiu estis por mi skribita en fremdplaneda lingvo. La tuto konsistis el matematikaj formuloj kaj absolute ne klarigis la efikon de la unuopaj medikamentoj, nur iliajn ĥemiajn formulojn, el kio mi nenion eksciis. Kaj miaj kolegoj similis al sfinkso.

Se ili almenaŭ riproĉus min, ĉio estus pli tolerebla. Sed la senpasia instrua tono, pri kiu mi neniam sciis, kio sin kaŝas post ĝi, la vakua nekomprenebleco de ilia animo tute rompis miajn nervojn.

Tamen ĉion ĉi superis okazaĵo, kiu tute ĝisekstreme renversis mian kristanan kaj humanan mondkoncepton.

Kun mia kolego ni vizitis agoniantan pacienton. Mia kolego esploris la dormantan malsanulon, poste li alvokis alian kuraciston kaj ankaŭ tiu esploris la homon. Fine li prenis ampolon el la ŝranko kaj transdonis al mi por envejna injekto.

Tuj, kiam mi injektis la fluidaĵon, la paciento je mia grandega hororo rigidiĝis kaj plenumiĝis la *exitus*.

Mi kuregis al mia kolego kun la ampolo en mia mano, asertante, ke ne mi ĝin interŝanĝis. Sed li kun la plej granda anima trankvilo respondis, ke ne okazis interŝanĝo: la stato de la paciento estis senespera kaj oni devis lin “ĉesigi”, do mi nur telefonu al la transporta sekcio.

Mi ekŝanceliĝis. Mi fariĝis murdisto!

Nur balbute mi povis elĝemi, kion la parencoj de la paciento opinios pri tia atenco, sed li respondis, ke al li apartenis nur unu mantelo kaj paro da ŝuoj, kiuj el higienaj kaŭzoj ĉiam estas forbruligataj.

Kaj la homoj mortas sen tio, ke iu ajn faligus pro ili larmon! Neniu konas siajn gepatrojn, ankaŭ la gepatroj ne sian filon kaj la agonianto jam estas rigardata nur balaaĵo, kiun oni devas forigi.

– Do, vi aŭdacas ignori la bazan celon de la kuracista destino? – mi demandis, kiam mi iome rekonsciiĝis.

– Kiaspecan celon vi pensas?

– La subtenon de la vivo ĝis la plejebla malproksima limo.

Mia kolego interesiĝe alpaŝis min.

– Ĉu en via lando tio estas la celo de la kuracista scienco?

– Kial en mia lando? Ĉie! Alia celo ne estas imagebla.

– Erare. La celo de nia destino estas savi la homaron de la suferoj. Nature, se eblas, ni devas ĉesigi la malsanon, se ne eblas, ĉesigi la malsanulon mem, sendolore, por evitigi al li la superflujajn suferojn kaj al ni la superfluan laboron, kiun ni devus forŝpari de aliaj, pli sukcesemaj kuracadoj.

Jam eĉ tiuj kruelaj vortoj ofendis mian humanan senton, sed mia kolego daŭrigis:

– Kaj krome ekzistas okazoj, kiam la resaniĝo povas nur parte sukcesi kaj okazigus suferplenan pluan vivon. Ĉefe, se la malsanulo perdas malfacile protezeblan korpoparton. Nome, se estus forigata nur lia koro aŭ pulmo, tiuj estas facile anstataŭigeblaj per transplantado aŭ per maŝinkoro, maŝinpulmo. Jam eĉ la orelo estas protezebla per maŝinorelo, alkroĉebla al iu ajn funkcia nervo kaj la surdulo rapide ellernas la novan manieron de la aŭdo. Sed ekzemple la protezado de la okulo estas nun ankoraŭ en eksperimenta stato. La ĝis nun pretigitaj fotoprotezoj estas alkroĉeblaj nur al sendifekta vidnervaro kaj krome, tiuj estas ankaŭ tre pezaj. Ankoraŭ pli malbone, se iu perdas sian piedon kaj devus eterne lamadi per artefarita piedo. Evidente, ni devas tian malsanulon ĉesigi.

Mi tremis pro teruro.

– Mirinde estas, – mi diris, – kiel oni entute kuraĝas enlitiĝi en viaj hospitaloj!

– Kial ne kuraĝi, se li scias, ke post la momento de lia enveno ĉesas liaj suferoj?

– Kaj ĉu la vivinstinkto?

– Vi certe pensas pri la vivinstinkto heredita el la besta pravivo. Tiu atavisma stato ekzistis ankaŭ ĉe ni antaŭ kelkmil jaroj, sed niaj nunaj instinktoj konformiĝis al la nuna medio. Vi menciis, ke ĉe vi ankoraŭ okazas la truiĝo de la dentoj. Vi scias, kiom da doloro ĝi kaŭzas. La malsanulo sentas emon por eltiri ĝin kaj vere, la truiĝinta dento neniam resaniĝas per si mem. Do, logike estus, se la doloron de la trua dento akompanus la ĝua sento de la eltiro. Sed anstataŭ tiu, la malsana dento reagas per akra doloro eĉ pro la ektuŝo, protestante kontraŭ la sole ebla kuracado. Do, en la naturo ja troviĝas kontrastoj kaj malkonsekvencaĵoj.

– Sed la vivinstinkto...

– Tio estis same malkonsekvenca. La malsanulo, jam furioza pro doloroj, tamen persistis al sia vivo.

– Ĉar ĝi estas natura instinkto.

– Jes, kiu estis akordiĝinta al la pramedioj. Sed nia civilizacio transformis nian medion kaj vivkondiĉojn. Se niaj instinktoj direktiĝus eĉ nun al la pramedio, jen, hodiaŭ ĝuste tio estus kontraŭnatura, ĉar pereigus nian vivon la interna kontrasto.

– Kaj tial vi mortigas homon? Jen, la vera kontrasto!

– Tial ni ne mortigas homon. Dum la prastato la homoj devis batali unu kontraŭ la alia por la nutraĵo, sed nuntempe ĝin produktas jam ni mem. Se niaj prainstinktoj ne estus evoluintaj paralele al la civilizacio, tiuokaze ni buĉadus nin mem ankaŭ nuntempe, kiam por la nutraĵo ni devas unu la alian ne mortigadi, sed apogi en la produkto. Ho jes, ni mortigadus unu la alian, eĉ ne sciante kial, per artefarite elcerbumitaj pretekstoj kaj samtempe ni devigus la senespereblan malsanulon al pluaj suferoj. Jen, ĝuste tio estus la kontrasto.

– Ĉu vi aŭdacas paroli pri tiaspeca kontrasto? Vi, kiuj servas la vivon per la ĉesigo de la vivo?

– Ne la vivo kaj morto estas kontrastoj, sed la vivo kaj la suferoj.

– Ĉi-okaze kial entute kuracadi ĉe vi? Se via celo estas sole elimini la suferojn, kial vi ne mortdormigas jam la ĵus naskiĝinton? Sekvante vian filozofion, oni nepre devas konkludi, ke la plej perfekta esto estas la neesto. En la neesto ja vere ne troviĝas kontrastoj, sed despli en via filozofio.

– Ni faris la vivon sekura kaj abunda, al kiu vivo ja meritas resaniĝi. La malsanulon kondukas al nia lia konsekvenca kaj al la nuna medio akordiĝinta instinkto, ĉar li scias, ke inter niaj kuracaj metodoj estas ankaŭ la morto. Kaj per tio mi respondis al via demando, kiel la malsanulo kuraĝas enlitiĝi en niaj hospitaloj. Sed viaj hospitaloj estas nur atavismaj torturkajeroj de iu primitiva epoko. Mi primiras, kiel oni entute kuraĝas enlitiĝi.

Nature, liaj vortoj ne povis min konvinki, kontraŭe, mi pli kaj pli teruriĝis pro la rigida kaj senindulga filozofio, por kiu la vivo de la homo estas neniel pli valora ol tiu de la bruto. Vere, nur senanimaj brutoj povas senvorte toleri la koten-treton de la individua vivraĵo.

Eĉ minuton mi ne povis plu resti. Mi elkuris kaj elvojaĝis malproksimen de la urbo kaj tie, kie neniu min vidis, mi ĵetis min altere kaj preĝpetis la Sinjoron de la Ĉieloj, ke li pardonu mian senliman kulpon, en kiun min puŝis ĉi tiu senkora, krimema raso kontraŭ mia intenco.

Sed per ĉi tiu okazaĵo jam vere plenpleniĝis la mezuro. Mi devis elekti alian profesion, kiu laŭeble konformu al mia fako, sed mi tamen ne devu mortigi.

Fine, kiel bonega solvo venis en mian kapon la ideo viziti iun universitaton, kie mi povas aŭskultadi, kiel pasiva studento. Per tio mi intencis parte plifortigi mian pozicion inter ili kaj forigi la enuon, sed ĉefe min gvidis la ideo, ke reironte al mia patrio, per mia lerteco mi povos fari grandajn servojn al mia patrio kaj al la kristana civilizacio. Nome, se mi povos redoni al la vivo eĉ tiujn soldatojn, kiuj nuntempe estas rigardataj kiel mortvunditaj.

Laŭ miaj kalkuloj, se mi povos nur trifoje plilongigi la vivon de ĉiu mortvundita angla marsoldato ĝis la finfina heroa morto, nia militŝiparo povus estigi per almenaŭ 70 procentoj pli grandan perdon al la malamikoj de mia patrio kaj de la kristana civilizacio.

Mi diris al mia kolego: ŝajnas, miaj scioj bezonas kompletigon, kion mi volas akiri en la universitato – kaj mi petis lian aprobon. La respondo denove estis, ke tio estas mia afero. Do, mi anoncis mian foriron, mian postenon transprenis iu hin kaj mi iris al la universitato.

Mi venis en grandegan domkomplekson, en kiu estis unuigitaj ĉiuj lernejoj, kaj mi tute ne povis konstati, kio apartenas al la lernejoj, kio al la ceteraj domoj de la urbo. Ni estas kutimiĝintaj al tio, ke la kunapartenantaj domgrupoj havas barilon. Nu, la Leganto imagu domgrupon kun ĝardenoj, kiun nek de la trotuaro, nek interne apartigas videbla limo kaj kie ne estas diferenco inter korto kaj strato.

Mi ne sciis, sur kia teritorio mi staris, kiam mi ekvidis manĉareton, ŝovatan de viro kaj sur kiu kuŝis vira kadavro sen ia kovrilo.

La vidaĵo min surprizis, sed mi jam estis kutimiĝinta ne trovi pudoron inter la hinoj, do, mi trankviliĝis, eĉ ĝojis, ke sekvante la ĉaron, mi trovos la medicinan fakultaton.

Do, mi postsekvis ĝin. La ĉaro proksimiĝis al pordo, kiu per si malfermiĝis antaŭ ĝi kaj ni alvenis koridoron.

Por mia plej granda surprizo, sur la koridoro mi vidis tute etajn infanojn kaj la hino sen ia ajn emocio traŝovis la kadavron inter ili. Kelkaj infanoj atente alturniĝis kaj sekvis la ĉaron.

Tio jam estis tamen pli, ol mi povis toleri sen konsterniĝo.

Sed ĝi estis nur la komenco. La vera surprizo trafis min, kiam la hino enŝovis la ĉaron en ĉambregon. Tie jam kuŝis sur tabloj tri senvestaj kadavroj, ĉirkaŭitaj per ambaŭseksaj senkulpaj etuloj!

En la gumgantaj manoj de la infanoj briletis tranĉiloj, kaj sen ia ajn emocio ili sekcadis la intestojn kaj seksajn organojn de la kadavroj!

Pro la terura vidaĵo haltis mia spirado, kaj tuj mi ekmalamis ĉi tiun tutan, teruregan landon.

Mi turniĝis al viro, kiu klarigadis al la infanoj. Mi demandis, ĉu tiuj infanoj fariĝos kuracistoj, kvankam ankaŭ tio ŝajnis al mi stranga, ke antaŭ la infanetoj oni malkovras en ilia sesa-oka jaro tion, kion la civilizita Eŭropo malkovras nur en dudekjara aĝo al la plenkreska animo.

Mi ricevis la respondon, ke tiuj infanoj ankoraŭ ne lernas fakan sciencon, nur la elementajn konojn, necesajn por la vivo. La medicinstudentoj estas en alia domo.

Mi ne povis ne demandi, kiel do venas la kadavro en infanajn manojn. Al tio li per la plej natura tono respondis, ke la instruo komenciĝas per ĉi tio. La homo devas antaŭ ĉio ekkoni sian korpon, ĉar ni estas sur la mondo por ni mem!

Ĉi tiu bruteca kaj senmorala kotmalpurigo de la senkulpa infana animo plenigis min per tiom da abomeno, ke mi senvorte turniĝis kaj ne estis plu scivola eĉ pri ilia medicina fako. Mi prefere rezignas pri ilia scienco, ol ke mi devu, kvankam nur per pasiva vido, suferi tiun frivolan senhonorigon de la homa animo.

La sekvantaj tagoj pasis denove en senespera enuo. Post la matenmanĝo mi devis foriri el mia loĝejo kaj rifuĝi al la arbaro, sed min ofte repelis de tie la pluvo aŭ malvarma vetero. Tiam la vagado sur la stratoj estis eĉ pli enuiga. Mi estis ĉirkaŭata de dek kaj dekmil homoj, kaj mi staris tute sola.

Mia sola distro estis priatenti mian stomakon: ĉu mi jam povus iom manĝi. La malsato kaj manĝo estis la sola varieco.

Se mi sidis, mi stariĝis, se mi staris, mi sidiĝis kaj senĉese cerbumis, per kio plenigi mian tempon. Bedaŭrinde la plumo taŭgas sentigi nur la fakte okazantajn teruraĵojn, kaj mi ne povas sufiĉe sentigi la enuon, kiam nenio okazas. Certe mi vane klopodus komprenigi ĉi tiun teruraĵon al la Leganto, kiu neniam travivis ion tian en la kolorplena kaj varia angla publika vivo.

Mi estis ekzilita en la nenion. Mi devis min okupi per io, sed tamen mi ne povis miksiĝi en ilian malhumanan kaj krimeman vivon. Mi volis akiri profesion, kiu laŭ sia naturo estas sendependa de iliaj malagrablaj kutimoj kaj kiun sen speciala lerteco mi povas ellerni. Sed ion mi devas fari, ĉar tiel ne estas tolereble.

Ekzistas du profesioj, al kiuj angla homo jam denaske inklinas: la navigado kaj la teksindustrio. La mondo konas nin pri nia navigacio kaj pri niaj ŝtofoj.

Kial tedi la Leganton per detaloj? Tiuj ĉi ja tute ne ekzistas. Ĉi tie la vivo ne *okazas*, sed simple *estas*. Se la homo naskiĝis, li estas ĝis la morto, poste estas aliaj.

Mi demandis la adreson de la teksfabriko. (Rimarkinde ĉe ili el ĉia fabriko ekzistas nur unu, sed grandega.) Eksciinte la adreson, mi aliris.

Mi venis en dekduetaĝan, tute vitromuran konstruaĵon, kie al la unua hino mi deklaris, ke mi laboros ĉi tie. (Mi jam estis lerta en la stilo.)

Post tio mi ricevis majstron, kiu portis min per lifto al la sepa etaĝo. Ĉi tiu konsistis el unusola, grandega halo, en kiu funkciis kvin-ses miloj da strangaj, sed tute egalaj teksmaŝinoj, kies klakado kuniĝis en ia muzika sono. Inter la senfinaj vicoj de la maŝinoj estis larĝaj vojoj. Mi paŝadis sur mola gumplanko, la plafono estis porcelansimila surfaco kaj la sunlumo, filtrata tra la laktaj vitromuroj, fakte donis la plej perfektan lumigon, kion mi ĝis tiam vidis.

La majstro kondukis min al la maŝinoj kaj klarigadis ilian funkcion.

Ĉio iris plej facile. Post unu horo mi ĉion tute ellernis. Mia laboro konsistis nur en la priatento de kvardek maŝinoj. La fadenĉenoj venis el la supra etaĝo tra la plafono al miaj maŝinoj kaj neniam elĉerpiĝis, ĉar supre ili estis postplektitaj per metodo al mi nekonata. Miaj maŝinoj konsistis preskaŭ nur el la tien-reen frapanta bobeno, kaj eĉ tiujn mi ne bezonis ŝanĝi, ĉar senfina rubando ilin alportis de la supra etaĝo al la bobenkesto.

Mi ne scias, kian materion ili uzis, sed dum mia ĉeesto neniam okazis ŝiriĝo de la fadenoj, kvankam la bobenoj kuradis minimume kvinoble tiel rapide, kiel ĉe ni. Ilia klakado superis la laboron de la plej rutina regiment-tamburisto.

La preta ŝtofo, siavice, migris tra la planko malsupren al la apreturejo, kie tra la aro de tondaj, lavaj, gladaj, brosj kaj aliaj maŝinoj ĝi vagadis de etaĝo al etaĝo, poste al la tajlorejo, kie premaŝinoj eltranĉis la necesajn formojn per unusola premo, kaj ili malsupreniĝis al la kudrejo, kie ia maŝino, kiu anstataŭis la kudromaŝinon, ĉirkaŭpasis laŭ la randoj de la vestoj kaj kungluis ilin. Ĉi tiu ligilo estis pli fortika ol la kudro.

Al la dekdua etaĝo oni suprenpremis tra tuboj la artefaritan krudmaterialon, sur la parteroj oni metis sur ŝarĝaŭtojn la pretan varon de la poŝtuko ĝis la vintra surtuto, kaj mi devis atenti nur pri la nedifektiĝo de la maŝinoj kaj ŝanĝi la foruzitajn partojn.

La majstro, vidante mian lertecon, puŝis sub min seĝon kaj foriris.

En la senfina halo senvoĉe laboris miaj kunlaborantoj, ĉirkaŭ cent hinoj. Inspektado tute mankis. La laborantoj plejparte sidis, kaj eĉ ĉe la enveno de la majstro ili ne stariĝis, kio ankaŭ pripensis min, kaj mi tiris malĝojigajn konkludojn pri ilia disciplino, kompare kun mia patrio, kie oni bone scias la valoron de la laborordo kaj disciplino, kaj ĝuste pro tio oni ne pretigas sidlokon eĉ por la trammaŝinisto.

Ĉe ĉi tiuj gravas nur, ke la ŝtofo pretiĝu, por ke ili havu per kio kovri siajn senanimajn korpojn, kaj neniel ili okupiĝas pri la pli altgradaj sociaj celoj, kiuj la homon distingas de la senmensa besto.

Mi devis rideti, pripensante, kiaspeca soldato fariĝus el tia komfortema hino, kaj el mia tuta koro kompatis tiun bravaspektan maristleŭtenanton, kiu volus ĉarpenti homon el tia estaĵo.

Do mi devus ĉi tie pasigi mian vivon!

Komence mi ne enuis, ĉar, kvankam mi ne povis demandadi, tamen mi multe ellernis pri ili per nura observado. Jam dum la unuaj tagoj mi eksciis, ke ĉi tie ĉio iras ankaŭ per si mem. Nenie mi vidis centran aranĝon, neniu dividis la laboron kaj tamen ia nevidebla ligilo kunigis la tutan grandan komponon al unu preciza horloĝmekanismo, en kiu ne troviĝas unu sola disonanca movo. Neniu laborejo havas superfluan, aŭ malmultajn laboristojn. La materialo ne estas registrata, oni prilaboras tiom multe, kiom la terkulturado kaj minejoj produktas, kaj ĉio tio direktiĝas laŭ la pleniĝo aŭ malpleniĝo de la magazenoj. La laborsferoj estiĝas same laŭ reciproka kunsento. Nek elektado, nek nomiĝo ekzistas, ĉion faras la individuo mem, kaj tamen ne okazas disputo.

Mi ankaŭ ĉi tie demandis, kiel estas konservebla la ekvilibro sen aranĝantaj kaj direktantaj organoj; kaj ili responde demandis, kiel estas konservebla la ekvilibro, se en la laboron de la homo miksiĝas fremda volo. Laŭ ili ĉiu homo havas sian kazon menson.

La kazoo aperis antaŭ miaj okuloj, kiel sesa senso de la homo, tamen ili neniam menciis kiel senson aŭ kapablon, sed kiel memkompreneblan realaĵon.

– Kial necesus aranĝanta forto? – ili diris. – Se oni scias, kio estas la diferenco inter la lav- kaj teksmaŝinoj, tiu neniam havos la ideon lavi per la teksmaŝino!

Ili tute ne sciis, kion mi demandis.

Sed mia laborejo estis en la urbo kaj mia loĝejo ekstere, apud la hospitalo, do mi devis serĉi novan loĝejon. Jam post la unua tago de mia nova laboro mi ekiris ĝin serĉi, sed en la ĉirkaŭaĵo nenie troviĝis tia malplena.

Fine mi ekhavis savantan ideon. Mi jam iome konis iliajn kutimojn.

Mi eniris proksiman domon, kaj sen ia antaŭparolo mi diris al la tie loĝanta hino:

– Mi volas loĝi ĉi tie. Elloĝiĝu!

(Imagu, miaj Legantoj, ĉi tion en Eŭropo! Sed mi sciis, ke ili ne konas la ordon, do mi bazu sur tio miajn kalkulojn: kaj mi ne eraris.)

Nome, la hino, sen ia ajn surprizo aŭ ofendiĝo, demandis:

– Kial?

– Ĉar mi laboras en la apuda teksfabriko, kaj ĉi tiu loĝejo estas por mi pli proksima.

La hino diris, ke li laboras en manĝejo de la tria strato de ĉi tie, trovis mian proponon kazoo, leviĝis, transdonis la loĝejon kaj foriris, por ke en la tria strato per la sama lakona kaj simpla metodo li eligu iun alian el ties loĝejo.

La elloĝiĝo konsistis el tio, ke en kofreton li enpakis dentbroson, sapon kaj du librojn; la tolaĵojn kaj la litotukon li ĵetis en la truon de la malpuraĵoj kaj lasis tie ĉiun meblon, lampojn, telefonon, vestkroĉilon, gimnastikilojn, ĉar ĉi tiujn li ricevos ankaŭ en sia sekvonta loĝejo. Nur la sapon kaj dentbroson ili forportas pro higienaj kaŭzoj.

Mi devas konfesi, ke la hina vivo havas ankaŭ bonajn flankojn, sed tamen ne ekzistas en Eŭropo tiu sensanga filistro, kiu tolerus tiun medion. Ilia vivmaniero rememorigis al mi la distilitan akvon, kiu ja estas pura, sed per la distilado oni forigis el ĝi ankaŭ la salojn necesajn por la vivo. Oni trinkas kaj trinkas, kaj ĝi ne kvietigas la soifon.

Post kelkaj tagoj mi denove falis en absolutan enuon. La teksmaŝinoj de la laborejo senĉese muzikis la saman monotonan kanton; miaj kunlaborantoj senvorte faris sian laboron. Se mi demandis ion, rigida, oficiala respondo min frostigis kaj fortimigis. La interparolo estis preskaŭ nebla. Mi faris mian senokazaĵan laboron preskaŭ reflekse, dum la animmortiga, senfina kanto de la maŝinoj sufoke premis miajn nervojn.

Min tedis vagadi sur la senornamaj, dezertaj stratoj, en kiujn ne alportis variecon statuo, kolono aŭ almenaŭ portalo. La stratoj estis signitaj per literoj de la alfabeto: “ab”, “ac”, “ad”, ktp. (Memkompreneble laŭ la hina alfabeto). Ĉiu strato estis la sama, kaj ĉiu kondukis precize perpendikle, aŭ paralele al la alia. Iliajn vicojn en regulaj distancoj interrompis parkoj.

Montrofenestron aŭ reklamon ili ne konas, kaj tiuj tute ne havas tie celon. Nur kelkajn pordojn “ornamas” la lakona surskribo “vestaĵmagazeno”, “malvarmaj nutraĵoj” aŭ “elektraj varoj”, sed interne neniu troviĝas krom la forportantoj. (Mi ja ne povas ilin nomi aĉetantoj.)

Tia estis la strato dumtage. Vespere ĝi fariĝis perfekta tombejo. Teatro, kino, gastejo, dancejo ne ekzistas. La alkoholon ili konas nur kiel medikamenton; pri la religio eĉ ĝian esencon ili ne konas; se mi ĝin mencius, certe ili rigardus min behino.

Je la deka horo vespere la stratojn ekkovras infera mallumo. Nokte nenia fabriko funkcias kaj mi devis hejmeniri al la same dezerta loĝejo, kie mi povis maksimume levadi la gimnastikilojn, sed ne havante rivalon, kun kiu mi povus konkuri, ankaŭ tio fariĝis enuiga.

Sekvis someraj monatoj. Iutage mi vidis, ke sur la stratoj multaj iradas tute senveste, nur sur la piedoj ili havas sandalon kaj de sur la ŝultroj pendas manvalizo. La unuan mi rigardis frenezulo, la trian, ke li estas nudisto. Fine, ekkuraĝinte mi demandis iun pri ĉi tiu, sed li tute ne sciis, kion signifas nudismo, kaj pluiris.

Sed tiam, kial ili iras senveste? Kiaj obscenaj frenezaĵoj kaj de kia sekto igas ilin konsterni la publikan pudoron?

Fine ankaŭ pri ĉi tiu mi demandis iun, sed verŝajne ankaŭ tiu miskomprenis min, ĉar li respondis, ke la vetero estas varma.

Mi kapskue rimarkis, ke kio ajn estu la esenco de ilia manio, en mia patrio la nudeco estus grave punata. Sed tiam li, gapante per grandaj okuloj, demandis, kiel ni povas eviti la nudecon: ni ĉiuj estas ja nudaj sub niaj vestaĵoj.

Lian stultan demandon mi ne taksis inda por respondo, do li foriris kaj mi konvinkiĝis, ke kiom ajn granda estas ŝajne la ordemo inter ili, tamen ne estas eble lasi la civitanojn fari libere laŭ siaj inklinoj, ĉar, – kiel montras la ekzemplo, – sen leĝoj eĉ en la plej memdisciplina socio aperas en la homo la sovaĝeco de la prabesto, kiu pli-malpli frue putrigas la kulturon.

Sed post kelkaj tagoj aperis la nudeco ankaŭ en la fabriko. De tago al tago pli kaj pli da laboristoj kaj laboristinoj venis senvestaj, nur kelkaj havis iom da vestaĵo. Feliĉe min neniu devigis sekvi ilian maldecan kutimon.

Ofte mi elvojaĝis al la marbordo, kie sur la belega strando, arego da homoj kuŝis, promenadis aŭ sin banis. Plejparte nudaj ankaŭ tie ĉi. Eĉ pli, multaj vojaĝis sur la tramo en la sama stato. Ilia tuta pakaĵo estis iu rimenligita gumsurtuto kun flanela subŝtofo. Krom ĝi nenion ili kunportis, konsidere, ke manĝaĵo estas ricevebla ankaŭ sur la strando; la fumadon ili ne konis, loĝeja ŝlosilo ne ekzistas. Ĉiu iris sola kaj senvorta.

Kvankam mia prudenta eŭropa intelekto profunde abomenis ĉi tiun obscenan kaj senhonoran kutimon, tamen mi devas konfesi, ke dum la unuaj tagoj min interesis la transportitaj, freŝaj kaj ŝtale elastaj virinaj staturoj kaj vekis en mi dezirojn. Sed post kelkaj tagoj jam tiom kutima fariĝis al mi la nudeco, ke ĝin mi eĉ ne rimarkis, kaj ili fariĝis ne nur ne pli dezirindaj, sed ili fakte perdis siajn ĉarmojn. Mi spertis, ke min pli interesas la virinoj, kies korpon kovras la incitplena vualo de la vestaĵoj. La nudeco simple ne havis interesaĵojn, kiuj povus inciti la fantazion de la viro.

Sed tiam kial ili senvestiĝas?

Ĉi tio estis la lasta, kio estis por mi novaĵo en Kazohinio. Mi jam plene ekkonis ilian tutan enhavon, kaj post tio mia vivo dronis en la enuo.

Vane mi serĉis libron. Kiel la Leganto jam scias, krom teknikaj, medicinaj, fizikaj kaj ĥemiaj libroj nenio ekzistas. Eĉ koncepton ili ne havas pri tiaspeca verko, kio donus ion al la animo. Eble mi tute ne bezonas diri, ke ili ne havis gazeton, se ne rigardi tia la presaĵon “Teksindustrio”, kiun la tubpoŝto en neregulaj intertempoj portis al mia loĝejo kaj en kiu la laboratorio de la fabriko sciigis la laboristojn pri la evoluo de la produkt-procedoj, Ĝi estis mia sola legaĵo, kiun mi vole-nevole trafolumis, sed pri kiu mi ankoraŭ pli enuiĝis, ol pri mia vivo.

Mi komencis pli kaj pli malami la hinojn. Iom ankaŭ ĝis nun mi malamis ilin, sed tiu sento nun fariĝis preskaŭ netolerebla. Kiam ili min senvorte preteriris aŭ per la plej oficiala koncizeco komunikis al mi siajn dezirojn aŭ dirindaĵojn, mi havis la nekontraŭstareblan impulson vangenfrapi ilin, nur por ke okazu fine io. Mi serĉis pretekstojn alparoli ilin. Mi demandis la numeron de tramoj, stratoj, ktp, ĉar ili respondas nur pri tiaj aferoj.

Miaj Legantoj, kiuj ankoraŭ nur gustumetis la enuon, tute ne povas imagi, kia estas la absoluta enuo. Ĉe ni oni konas la enuon nur el malsukcesaj somerumoj, kiam la grandurba civitano “ripozigas” siajn nervojn en malgranda, polva vilaĝaĉo kaj jam la trian tagon rekonas, ke pli facile oni povas freneziĝi pro enuo, ol pro ia ajn trolaboro. Sed ĉe ni eĉ en la plej malprogresemaj vilaĝoj okazas io, almenaŭ la dimanĉa diservo, kartludo ĉe la apotekisto, edziĝo, kegloludo, interbatado de kamparanoj en la drinkejo aŭ klaĉo.

Sed ĉi tie nenio okazis. Ne estis amiko, malamiko, ĝojo, malĝojo, rango, riĉulo, malriĉulo, kreado, progreso, do, per unu vorto: variececo. Ni diru jene: *vivo*. Ĉar kio alia estas la vivo, ol diferenco inter la hieraŭo kaj hodiaŭo, kiam oni atendas ion de la morgaŭo. La ekhalto kaj stagno estas morto.

Zatamon pravis: fakte ĉi tie oni sukcesis elimini la diferencojn kaj kontrastojn kaj ĉion ebenigi. En ĉi tiu “vivo” ne estis promontoro kaj valo, amo kaj malamo, blanko kaj nigro, nur senfina, griza vakuo, super kiu mortante defalas la migranta birdo. Ili eliminis la lumon, ĉar ĝi ekzistas nur kune kun la ombro. Sed kiel do ni vidas, se ĉio estas tute egale luma? Kaj, se ĉio estas silenta, por kio estas niaj oreloj? La vakuo igis min surda, blinda kaj paralizita.

Mi estis tute sola. Nek en la laborejo, nek sur la stratoj iu min alparolis. Mi ne povis ludi eĉ unu kartludon, ili ja ne konas la ludon. Mi pensis, ke mi pentros por mi ludkarton kaj ludos sole, sed kien mi kaŝu ĝin? Ja ĉiutage alvenas la purigisto, kaj se oni ĝin ekvidos, oni min rigardos behino.

Foje, apud la teksmaŝino, forgesinte mian staton, mi ekfajfis valson. Miaj kunlaborantoj ektime alkuris kaj mi rapide silentiĝis. Mi devis priatenti eĉ mian spiradon.

Mi deziris almenaŭ kunloĝi kun iu ajn, nur por ke iu estu apud mi, eĉ se li min ne alparolas; sed neniuj loĝas kun la alia en la sama ĉambro kaj mi tute ne kuraĝis menciigi mian deziron.

Mia sensocia ĉambro taŭgis nur pro tio, ke mi elploru mian doloron vespere post zorga fermo de la pordo. Mi alprenis mian vizaĝon al la kuseno kaj ploregis, ke mia koro preskaŭ fendiĝis. Sed mi devis atenti, por ke neniuj min aŭdu kaj ankaŭ tio ne donis trankviliĝon.

Mi kuradis tien-reen, kiel la sovaĝa besto, fermita en kaĝo, serĉante vivon, aeron. Mi staris tie, en la plej granda karcero, ĉar vane mi estis libera, se la aero ne estis libera ĉirkaŭ mi. Mi velkadis senamike, malplene, en la lando de la nenio, inter la senfina, enteriga kanto de la teksmaŝinoj kaj la tomba silento de mia ĉambro, kaj miaj vivenergioj forvaporigis en malplena, senenhava vivo, sen tio, ke nur unufoje mi povus diri, ke mi atingis ion.

Foje mi malvarmumis kaj dum tri tagoj kuŝis en febro, kaj ĉu vi kredas, ĉu ne, mi havis ĝojon per la malsano. Ĉar io okazis, kuracisto alvenis, kiu interesiĝis pri mia stato.

Memkompreneble li proponis min enportigi al la hospitalo kaj en la radia fornego mi resaniĝos dum dek minutoj.

Mi malakceptis, respondante, ke mi estas ankaŭ kuracisto; mi scias, ke mia malsano ne estas grava, ke mi resaniĝos ankaŭ hejme, ke li nur sendu unu kovrilon al mi kaj vizitu min ĉiutage.

Li surprizite esprimis sian miradon, kial mi persistas tian atavisman metodon, kiam mi post duonhoru povus sane reiri al la fabriko, sed fine li konsentis, kaj vizitis min krome dufoje.

Kiome mi bezonis iom da amo! Sed ankaŭ mia malsano forpasis, kaj mi fariĝis pli malsana resaniĝinte, ol mi estis en febro.

Malespere mi vidis, kiel pasas unu tago post la alia, formalŝparante la mallongan homan vivon. La tagoj kunfluis grize, mi ne sciis, ĉu du monatoj aŭ du jaroj forpasis. La hinoj ja ne havas kalendaron, similan al la nia: ne estis dimanĉo, festtago, jubileo, evento, amuzo, sortobato; unu tago pasis post la alia, grize, malplene, ne estis limŝtono, al kiu la homa animo povus sin apogi.

Iam, ekpensante, ke mi eble devas ĉi tie morti sen unutaga vivo, la ektimo tiel min trafis, ke hejmenirante mi ne povis endormiĝi. Mia baraktado komenciĝis hejme per malĝoja plorego, poste la malespero pli kaj pli superregis min tiel, ke mi ne povis plu min bridi. La kusenon, premitan sur mian buŝon saltleviĝante mi disŝiris en terura kolero kaj ŝirante mian hararon, frapante mian kapon per miaj pugnoj mi volis ataki ĉion kaj dispecigi je mil pecoj ĉiun meblon de mia karcero.

Nun ankoraŭ ia grandega animforto min retenis de la senprudentaj agoj, sed mi sentis, ke ĝi estas la lasta ŝarĝprovo de mia anima ekvilibro. Se baldaŭ ne okazos ia ŝanĝo, teruraj aferoj sekvos.

La sekvantan tagon mi apenaŭ povis ĝisatendi la finon de la laboro. Mi sidiĝis sur la rapidvagonaron, tien-reen flugis per ĝi, esperante, ke la rapideco okupos mian atenton. Sed mi devis krome imagi diversajn, multkolorajn bildojn: ke antaŭ mi staras la pordego de la infero kaj mi estas la maŝinisto kaj flugigas al la damno centojn da virinoj kaj infanoj. Mi elkuris al la arbaroj, plengorĝe kriegadis, kie neniuj min vidis kaj aŭdis, suprenkuregis, dum mia pulmo kaj muskoloj povis, poste mi kuris kun sovaĝa furiozo al iu arbo kaj pikadis ĝin per mia poŝtranĉilo.

Sed mi sentis, ke ankaŭ tio malproksimigis la katastrofon nur per unu tago.

Triutage mi akiris aŭton el la remizo. Ankaŭ ĝi estis komuna predo. Mi elveturis malproksimen kaj tie, kurigante la aŭton al arbo, mi rompigis ĝin tiel, ke mi, falinte al la fenestro, vundis mian vizaĝon. La unua aŭto ekhaltis, la ŝoforo min ensidigis, turniĝis, per freneza kurego portis min en la

Oni estas tre kripla kun tiu mankhava vortaro, en kiu troviĝas nur tiaj neperfektaj vortoj por la majestaj kaj ravaj aferoj. Ĉe ili estas ĉio nur kazoo kaj kazi, de kiuj mi jam satiĝis ĝis super mia gorĝo tiel, ke mi jam sentis min malsana eĉ aŭdinte ilin. Mia animo flugetis en la supraj sferoj de la sopiro kaj mia lango lamiris, katenite al ilia kripla lingvo.

– Jes, – ŝi respondis, – agrabla. Kion vi deziras?

– Kion mi deziras?! – mi diris senpacience. – Nenion! Varmecon! Mi volas al vi proksimiĝi!

– Ĉu al vi estas malvarme?

– Tute ne.

– Do, kial vi diras tamen?

Vidante la malplenajn okulojn, mi rememoris, kiam antaŭ la vestmagazeno virino detiris mian pantalonon, kaj mi estis konvinkita, ke tie ĉiu virino estas aĉetebla.

Sed kie estas eĉ la mono en ĉi tiu dezerto? Kiom da ĝojo estis hejme aĉeti donacon al la ĉasta kaj belanima knabino, kiom ĝojplena sento estis senigi nin de io kaj oferedoni ĝin al la amata karulino kaj ĝui, kiel ŝia koro pleniĝas per amo al ni. Sed ĉi tie ĉio estas preta, ĉio estas komuna predo, ne estas mono, ne estas donaco, oferdono. Kial amas la viro kaj kial la virino?

– Mi pensas pri ne tia varmecoj, – mi diris. – Mi volas simple vian proksimecon. Mi emas aŭdi vian voĉon...

– Kial? – ŝi interrompis.

– Por via voĉo mem. Mi volas havi iun, kun kiu ne pro neceso, sed por plezuro mi paroladas pri etaj stultaĵoj por pliagrabligi la vivon.

– Kiel vi opinias, ke la vivo pliagrabliĝus se per sensenca parolado ni senigas ĝin de ĝia senco?

Sed mi jam ege soifis la belon kaj ĝojon.

– Diru, – mi respondis per tremanta voĉo, – ĉu vi ne sentas kelkfoje, ke vi bezonas iun, kiu vin ŝatas, kiel trezoron, al kiu vi povas rakonti la aferojn agrablajn kaj malagrablajn al vi? Iun, kies persono estas al vi pli agrabla ol la aliaj? Mi ege bezonas iun, al kiu mi povas min kroĉi, kun kiu mi kunkliniĝus por babili mallaŭtajn vortojn kaj kies vortoj akvumus mian soifon. Rigardu la Lunon: dividiĝinte en mil pecojn ĝi luliĝas sur la akvo; rigardu la milionojn de la steloj, la vesperon, la maron, la senfinan nokton, kiu pelas la homojn unu al la alia kaj malfermas la korojn...

– Mi ne komprenas, – ŝi interrompis. – Tute ne daŭrigu. Sed, se vi jam ĉeestas, vi povus aranĝi mian deziron.

Miaj membroj denove ekstrems. Pli kaj pli mi sentis, ke ĉi tiu trompiĝo estos fatala kaj la interna streĉo krevigos siajn digojn.

– Disponu pri mi, – mi diris tremante.

– Vekiĝis mia deziro kaj ankaŭ krome, mi devas ankoraŭ naski du infanojn. Ĉu vi estas kapabla por seksa laboro?

Mi gapis al ŝi senkomprene. Mi ne volis kredi al miaj oreloj.

– Ĉu mi ne parolis pri tio sama? – mi demandis.

– Ne, – ŝi respondis instrue. – Vi parolis pri la maro, steloj, luno kaj nokto. Sed mi deziras kontentigon.

Mi konsterniĝis. Ĉion mi atendis, nur tion ne. Kaj kvankam mi estus devinta danci pro ĝojo, tamen mi sentis ian strangan, agacan guston malantaŭ la aferoj. Iamaniere min ne kontentigis tiu subita efektiviĝo. Ŝian spontan an sindonon mi sentis simila al tio, kiam mi eksciis, ke al iu krutega pinto de la Alpoj, al la turista sonĝo de mia junaĝo, oni konstruis dentradan fervojon.

Ho, kiom pli dolĉa estis la kiso, kiun mi sorbis iam desur la lipoj de niaj ĉarmaj knabinoj, kun kiuj ni antaŭe parolis pri teatro, modo kaj nur post semajnoj ni ektuŝis la temon, dume ni ambaŭ ruĝiĝis, parte pro la honto, parte pro la deziro.

Kiom dolĉe kaj ekscite estis atingi la malproksiman, malfermi la ŝlositan kaj ekkapti la rifuĝantan kapreolon, ĝis fine la knabineto, post longa protestado, okulferme ĝemetis: “Ne... ne...” kaj obeis. Kiel eblas ami sen tia dolĉa luktado?

Sed la deziro min instigis, ja de tiom longa tempo mi soifis la belon, ke por mi eĉ la panero estis reĝa donaco. Kaj por ne perdi eĉ ŝin, mi komencis klarigi, ke tio, kion mi deziras, ne nur ne estas la mala, sed ĝuste la pli kompleta kaj pli perfekta formo de ŝia celo.

Zolema (poste mi eksciis ŝian nomon) demande min alrigardis, mi karese aligis ŝin al mia flanko kaj daŭrigis:

– Imagu, ke la suno sur la ĉielo nur lumigus sed ne varmigus.

– Sen la sunvarmo la vivo ne estus ebla!

– Ĉu ne? – mi diris entuziasme. – La vivo estas vivebla nur laŭ sia senmanka kompleteco, ĉar kia ajn ĝia elemento mankas, ĉesas la vivo.

Ĉi tion ankaŭ Zolema konsideris perfekta kaj logika tezo, kiu tute konformas al la kazoo kaj mi ĝojis, ke mi trovis ponton al ilia kirasa animo. Mi ekparolis pri la altira forto, kiu varmigas la korojn kaj alproksimigas la homparojn unu al la alia.

Kiu povus priskribi mian ĝojon, vidante, ke Zolema aŭskultas miajn vortojn per brilaj okuloj! Ŝia atentema vizaĝo pli kaj pli proksimiĝis al la mia, ŝi spiradis pli kaj pli rapide, dum fine...

Sed tio ne estas tiel simple priskribebla! Okazis io simila al tio, kiam la ŝnurego estas jam metita sur la kolon de la kondamnito kaj subite alvenas la amnestia dekreto.

Eĉ hodiaŭ mi ne scias kiel okazis, sed niaj lipoj kuniĝis!

Kaj Zolema ne malobeis...

Eĉ ne nur ne malobeis, sed mi mem devis peti ŝin flankeniri ien ajn.

– Kial? – ŝi demandis.

– Povas veni iu.

– Ĉiu povas veni ĉi tien. Faras nenion.

– Sed mi ne volas vidigi nin. Mi volas resti kun vi sole.

– Kial?

Mia sango arde pulsadis, mi tute ne emis komenci novajn pritraktadojn. Mi petis ŝin veni kun mi sur la rokon, kie oni ne vidas nin, krome mi ne povas plenumi ŝian deziron.

Zolema montris iun proksiman domon.

– Prefere ni eniru tien.

Mi konsentis, sed urĝigis ŝin. Alvenante ŝi kondukis min en tute ĝeneralaspektan domon, kies loĝejoj estas ĉi tie tute egalformaj. En la loĝejo sidis iu hino apud la tablo kaj vespermanĝis. Zolema sidiĝis sur seĝon, la hino eĉ ne turniĝis al ni.

Kelkaj minutoj pasis en plej perfekta silento. Fine mi demandis:

– Kion ni atendas?

– Por ke li finu la manĝadon. Evidente li estas pli malsata ol ni, ne estus kazoo interrompi.

Vole-nevole mi devis atendi. La minutoj pasis en nervostreĉa malrapideco. Fine la hino ekstaris kaj komencis aranĝi la manĝilaron, sed tiam Zolema jam ekparolis:

– Foriru dum kelkaj minutoj.

Tiu nur nun turniĝis al ni.

– Kiam mi revenu?

– Mi sciigos vin. Sidiĝu sur la benkon apud la pordo, en la ĝardeno.

La hino foriris, Zolema deklinis la liton el la muro, malligis siajn robojn kaj, sen iu ajn enkonduko, ŝi ĵetis sin al miaj brakoj per tiom da ardo, ke mi devas eviti la detalan priskribon.

En ĉi tiu momento mi sentis, ke la tuta mia ĝisnuna luktado kaj suferado estis nur inkuba sonĝo, ĉar jen, mi ektrovis la ŝtonon de la filozofoj, la *panacea magna*-n, la Animon! Ĉiu guto de mia sango fariĝis unusola ĝojkrio. Ĉe la fino de la malluma tunelo svarmis la lumo al mi per reĝa brilego. Svarmis la sonoj kaj gustoj de la mateniĝo, kaj en mia koro ekstintis la fluge muĝanta simfonio de la vivo.

* * *

Bedaŭrinde mia ĝojo ne longe daŭris.

Post kvaronhoro ni foriris. Zolema komunikis al la hino, sidanta sur la benko, ke li jam povas reiri.

Mi demandis, kiu estis la bonkora dommastro. Evidentiĝis, ke ŝi eĉ ne konas lin, ŝi vidis lin nun unuafoje!

– Do, kiel vi kuraĝis min enkonduki kaj lin elsendi?

Ŝi alrigardis min.

– Vi mem volis, ke oni ne vidu nin kaj vi mem volis resti sole kun mi!

– Kaj li forlasis sian hejmon tiom simple, pro unu alvoka vorto?

– Nature. Vi aŭdis, ke mi petis lin.

Senmove mi gapis.

Sed Zolema, menciinte la malfruiĝon de la vespero, deklaris sian volon hejmeniri.

Mi ja proponis akompani ŝin, post kio ŝi demandis, kial mi ne iras al mia propra loĝejo. Klarigante, ke mi akompanas ŝin nur ĝis loĝejo, ŝi deklaris, ke havas nenian sencon fari superflujajn vojojn krom la necesaj.

Ĉi tiu respondo ekruligis en mi la lavangon de la problemoj. Se tion diras alia hino, mi konsideras tion kiel simptomon de ilia frostoplena anima vakuo, sed post la antaŭaĵoj mi ekkonis Zoleman tute aliel.

Do, ŝi ne kuraĝas sin montri kun mi! Eble ŝi havas iun viron!

Mi profunde rigardis en ŝiajn okulojn, petis ŝin konfesi sincere, kial ŝi ne volas esti akompanata.

– Kial vi akompanus min, se ni jam ne bezonas unu la alian?

Bedaŭrinde, la naiva sincereco, per kiu ŝi ĉi tiujn vortojn eldiris, konvinkis min pri la situacio kaj samternpe frostigis mian antaŭan entuziasman fantazion.

Sed mi ne lasis ŝin. Mi sentis, ke Zolema estas al mi la lasta eksperimento, kaj mi ne povas ellasi de mi ĉi tiun manon. Per malfacila koro mi devis returniĝi al la malnova sistemo, al mia belohina legitimaĵo. Mi neniam malŝatis pli naŭze paperon, ol ĉi tiun inversan morto-atestilon, kiu pravas al la mortintoj mian kompatindan vivantan staton.

Sed tiam mi ankoraŭ kredis, ke Zolema estas tiu, en kiu mi ektrovos ĉion, se mi ne senesperigōs tro frue.

Tiel Zolema restis kun mi, atendente miajn demandojn por instrui min.

Mi plektis miajn brakojn en la ŝiajn kaj ŝin rekondukante sur la marbordon, mi rakontis per brilaj vortoj pri la belega sentimento, kiu ĉe ni nomiĝas amo kaj kiu estas la krono de la boneco kaj sindono.

Ŝi respondis, ke tio en tia formo ŝajnas iom konfuza, mi priskribu detale, en kio manifestiĝas la sindono en la amo. Ŝi petis konkretaĵojn, kaj mi klarigis, ke ni, sekve de eknaskiĝinta sentimento, donas al la trovita parulo ĉiun nian eston kaj havon kaj dediĉas nin tute al tiu.

Tion Zolema nomis tre maljusta metodo, ĉar – ŝi diris:

– Per kio meritis la amato gajni de ni pli multe ol aliaj?

Vane mi diris, ke la amato donas al ni same ĉion sian, vane mi klarigis, kian plezuron kaŭzas la reciproka donaco, ŝi konkludis nur, ke laŭ tio du homoj asociiĝas por forpreni ion de aliaj kaj doni ĝin al si reciproke.

– Erare! – mi respondis. – Eĉ la plej malriĉaj homoj faras same, kiuj evidente ne forprenas de la aliaj, kion ili donacas unu al la alia.

Al tio ŝi respondis, ke tiel despli ne havas sencon la donaco, ĉar – ŝi diris, – kion ni gajnus, se ŝi donus siajn vestojn al mi kaj mi la miajn al ŝi?

– La esenco ne troviĝas en la praktika valoro de la objektoj, – mi provis klarigi, – sed en la amo, kiu akompanas la donacon kaj kiu plenigas nian animon per enhavo.

– Nun mi jam tute ne komprenas. Se mi demandas, kial estas la amo, vi mencias donacon de objektoj; se mi demandas, kial vi devas donaci, vi reiras al la amo. Sed kie estas la origina punkto, tiu fiksaĵo, kiu faras ilin ambaŭ logikaj kaj necesaj?

– Mi jam vidas, ke vi ne komprenas. La amo ne estas matematika ekvacio, kiun oni povas dedukti.

– Kial do vi okupiĝas pri ĝi?

– Ĝuste tial, ĉar ĝi ne estas simple deduktebla. Sed lasu, ke mi rakontu ĉion. Ĉe ni kun la homo naskiĝas iaspeca manksento, kiu similas al la malsato kaj se ni ĝin ne kontentigas, ĝi malsanigas nin.

– En la magazenoj...

– Ne interrompu! Tio ne estas en la magazenoj. Tion povas doni nur vi. Ne rigardu per tiel miregantaj okuloj! Nur vi povas doni. Tiamaniere, ke vi kondukas al mi bone, karesas mian hararon, brakumas min kaj parolas pri ĉio.

– Pri kio mi parolu?

– Pri ĉio. Vi demandas: ĉu ne alvenis nia printempo?

– Nun estas somero.

– Sed por ni printempo.

– La parolo servas nur por komuniki estantajn aferojn. Kiel ni povus komuniki tian, kia ne estas?

– Sed ĝi estas. Vi ankoraŭ eble ne komprenas, sed iam, se vi eble povos alproksimiĝi al mi, vi kredos. Nu, ne saltu tiel abrupte al mia brusto, tio en si mem havas nenian sencon. Ĉio devas kreiĝi per si mem.

Zolema promesis, ke se dependas de ĝi mia resaniĝo, ŝi ĉion faros kaj ŝi petis, ke mi, kiel kuracisto, detale priskribu, kion kaj kiel ŝi devas fari, pri kio kaj kiom ŝi devas paroli kaj ĉu ne estas eble ĉion ĉi ellabori per unu fojo por tuta monato, ĉar tiam ŝi havus pli da tempo por ripozi.

– Ne daŭrigu! – mi respondis kolerete. – Tio devas veni el interne.

Amara gusto plenigis min; en la antaŭan, belan ebrion miksiĝis disonanco, sed mi tamen konjektis, ke ŝi certe amas min, eble subkonscie. Ja de kie ŝi povus koni la nomon de la amo, se ŝi ankoraŭ tute ne aŭdis ĝin? Sed mi sciis nenion certan. Ŝi ŝajnis al mi mistera kaj tio des pli instigis min. Subite mi eksentis, ke mi estus kapabla devigi Zoleman al amo eĉ per bato.

Por retrovi mian perditan humoron, mi iris kun ŝi flanken de la vojo. Ni suprengrimpis la rokon, kiu etendiĝis super la maron. Sur ties elstaranta pinto ni sidiĝis sur la freŝa herbo.

Ĉirkaŭe silenta nokto, malsupre murmuris la maro, kies ebrigan, salan odoron mola venteto karesis al mia vizaĝo. Ĉirkaŭ ni lekantoj balancis siajn kapetojn. Krom ni neniue estis en la ĉirkaŭaĵo. La hinoj jam plejparte hejmenvojaĝis. La nudaj kruroj de Zolema tuŝis la miajn. Mia humoro revenis.

Subite mi ĉirkaŭbrakis kaj levante sidigis ŝin en mian sinon. Kiam mia mano tuŝis ŝian bruston, mi sentis, ke ŝi spiradas pli rapide. La ebrio denove min ekkaptis.

Deŝirante lekanton mi fiksas ĝin sur ŝian bruston. Ŝi silentis, nur ŝia koro frapadis pli rapide.

Etendante mian manon al la Luno, mi komencis okulferme, mallaŭte kanti la barkarolon de Offenbach.

Eĉ du-tri taktojn mi ne povis kanti. Zolema ekscitite interrompis min:

– Ĉu vi fartas malbone?

– Ne. Mi kantas.

– Kio estas tio?

Mi denove elreliĝis. Eĉ tion mi devis klarigi. Sed eble tamen estas en ili kapablo por la belo kaj noblo, nur ŝi ne konas, ja ŝi neniam aŭdis tiujn. Ĉu eble mi povos savi animon el la dezerto kaj ĝi fariĝos la mia?

Mi komencis klarigi la esencon de la kanto. Mi ekiris el la kromata gamo.

Ŝi ne povis kompreni, kian sencon havas la tuto, kial ni nomas muzikaj tonoj nur tiujn, kiuj havas inter si certajn rilatojn laŭ vibronombroj, kaj kial necesas tiel distingi la tonojn.

Kaj fine, kompreninte la strukturon de la muziko, ŝi ekkriis:

– Sed tio ja ne ekzistas!

Jen, kio estas la ĝenerala respondo ĉe ili. Ŝi ne povis kompreni, kial ni kreas aĵojn neekzistantajn en la realo (ĉi-okaze la gamon) nur, por ke ni plu kreu el ĝi alian.

– Kian sencon havas ia grupigo de la tonoj laŭ artefaritaj reguloj? – ŝi demandis.

– Ĉar la muziko estas bela.

– Kaj kion signifas bela?

– Arta.

– Vi klarigas unu sensencan vorton per la alia, kion vi verŝajne bezonas tial, ĉar neniuj el ambaŭ havas interrilaton al la realo. Kion vi profitas el la arto?

– La arto estas por si mem kaj nur senkultura homo povas meti la kontraŭdiron, ke la arto ne havas ekzistotaĵon, ĉar ĝi ne estas manĝebla. Se ĝi ŝanĝiĝus al buterpano, ĝi jam ne estus arto.

– Nur la homo estas por si mem, kaj ĉiu aĵo kreita de la homoj povas esti nur por la homoj. Ĝuste tiu estas senkultura homo, kiu kredas, ke estas inde perdaĉi nian tempon per okupiĝo pri aĵoj estantaj por si mem, eĉ pli, adapti al ĉi tiuj eĉ la homan vivon.

– Vi opinias tion nur, ĉar vi ne estas edukita al la arto, ĉar oni ne inokulis vin per ĝia trasantato.

– Eduki la homon devas nur la nerealaĵoj. El la fajro oni eltiras la manon eĉ per si mem, kaj nur edukita tiel iu kredas, ke la ŝtono estas nutra.

Pri la muzika gamo ŝi opiniis, ke ĝi similas al tio, kiel se ni kulturus frukton pro ĝia koloro, aŭ ni volus gustumi la sunradiojn. La voĉo estas por komuniki niajn pensojn, ne por ke ni konstruaĉu el ĝi neargumenteblajn sistemojn kaj sur tiu bazo ni konstruu eĉ alian neekzistantan etaĝon: la muzikon, pri kiu ni pene okupadas kaj diskutas, ĉu la pritraktata muzika komponaĵo konformas al la reguloj, fabrikitaĵ de ni mem, kiuj verdire eĉ ekziston ne havas, ĉar ili estas imagitaĵ.

Mi paciencas lasi ŝin paroli, ĉar ŝi ja ankoraŭ nenion scias. Mi denove komencis mian belan, animkonstruan laboron. Mi rakontis pri la muzikinstrumentoj. Pri la violono ŝi ankoraŭ aŭskultis, sed jam ĉe la trumpeto ŝi rimarkigis, ke ni verŝajne ne konas la sonobtuzigajn potojn, kiuj eĉ la plej orelŝiran bruegon mallaŭtigas ĝis tolerebla.

Do, mi estis denove ĉe la komenco. Nun mi devis klarigi, ke ni *intence* muzikas, kio iris tre malfacile en ŝian kapon. Fine, kompreninte, ŝi profunde ekmeditis.

– Do, ĉu ne estas sufiĉa en la fabrikoj la bruoj de la maŝinoj, vi funkciigas krome eĉ specialajn brumaŝinojn?

Mi deklaris, ke oni muzikas ne en la fabrikoj, sed post la laboro, ĉefe en silentaj parkoj sonas la placorkestro, per kies revigaj melodioj freŝiĝas la koro.

Tion ŝi jam absolute ne volis kredi. Ŝi diris, ke pereigi la silenton de la parkoj per brumaŝinoj estas barbarismo, simile al tio, kiel se oni starigus inter la arbustoj de la promenejo fum-farajn maŝinojn anstataŭ ĝoji pri la bona aero.

– Tiamaniere, – ŝi diris, – vi nepre tiom deflankiĝis de la realo al la labirintoj de vi faritaj, ke ne nur la neekzistantan vi rigardas estanta, sed eĉ la estantan vi kredas esti neestanta.

– Kiel tion mi komprenu?

– Ekzemple, ke morti estas pli bone ol vivi, ke la malsato estas agrabla...

– Tiajn stultaĵojn vi ne supozu pri ni! – mi kriis, sed ŝi daŭrigis:

– Ke la febromalsanulon oni devas meti sur glacieron, ke nian ŝuon ni devas plenigi per pikaj najloj, al la soifanto doni vitriolon, ke ni devas nian seksan laboron fari ne kun tiu, kiu havas tempon kaj inklinon, sed laŭ artefaritaj reguloj, ke la socio de la hinoj estas ne por tio, ke ni ĉiuj satiĝu, sed por ke ni mortu kaj malsatu pro ĝi.

Malgraŭ tuta ŝia malvarmecon kaj fremdeco mi pli kaj pli sentis, ke mi amas Zoleman. Mi komencis sperti, ke mi batas rigidajn murojn per miaj pugnoj, sed tio estis almenaŭ gimnastiko al miaj sekiĝintaj nervoj, kion mi tiom longe atendis kaj ĝuste tio vivigis la fajron en mi. Ŝia konduto iom rememorigis la malvarmecon, kiun simulas dekondukataj kaj honestaj knabinoj, montrante nekomprenemon, plifortigante tiel la sopiron en sia jam elektita parulo, devigi lin fari al ili proponon. Ĝuste tial mi altiriĝis pli forte. Ŝi estis mia kaj tamen ne mia, do mi devis ŝin akiri, atingi la malproksiman, malfermi la ŝlositan, peli la forkurantan. Tiam mi ankoraŭ ne konjektis, ke inter ili ne estas malproksima, fermita kaj forkuranta.

Mi eĉ menciis mian tiaman opinion al Zolema, kiu respondis, ke verŝajne ĝuste tial restas por ni fermite kaj neatingebla malproksime la perfekteco, ĉar ni emas peli nur la malproksiman kaj neatingeblan kaj nia emo daŭras nur, ĝis ni fakte povas ĝin atingi. En tiu momento ĝi fariĝas neatinginda kaj malplena, ĉar ni kuras ne pro la celo, sed pro la kurado mem. Ŝi esprimis eĉ sian konjekton, ke eĉ la proksima intence iu imagas malproksima, por ke ni ekzercu per tio niajn malsaĝajn kutimojn.

Tiam mi ankoraŭ ne kredis al ŝi, nur sentis, ke io mankas, sed mi ne sciis, ke ĝuste tial mankas, ĉar mi ĝin jam atingis.

Mi volis ŝin konatigi per nerekta vojo kun la delikataĵoj de la koro. Mi rakontis, kiun perfektecon kaj ĝojplenan trankvilon donas la scio, ke ni havas animan kunulon, kun kiu ni unuiĝas kaj ĉe kiu ni trovas komprenon.

Zolema min atente aŭskultis kaj poste demandis, kiel ni nomas en nia lingvo la komprenon. Ĉar, – ŝi diris, – se niajn seksajn organojn ni nomas kompreno, kiu vorto esprimas la komprenon mem kaj kial ni emas nomi ion per alia vorto.

Mi konsterniĝis.

Neniam vortoj maltrafis la celon tiel, kiel la miaj. La Leganto, kiu laŭ la antaŭaj ĉapitroj rigardas la hinojn eble strangaj, sed esence bonkoraj kaj ĝentilaj karakteroj, certe apenaŭ imagas, kiom da malĝentilaj kaj krudaj trajtoj kaŝiĝas malantaŭ la ŝajne klaraj, altfruntaj Afrodito-vizaĝoj. Mi povas deklari, ke en la liverpula marist-drinkejoj mi ne trovis tian obscenbuŝan velmajstron, kiu povas konkurenci kun la “pli ĉarma” sekso de la hinoj.

Mi provis klarigi, ke la kompreno ne samas kun tio, kion ŝi pensas: ĝi estas la koncepto de la unuiĝo de la animoj, el kio ŝi plue opiniis, ke laŭ tio la vorto “animo” signifas la seksajn organojn.

Kaj fine, kiam mi tamen sukcesis komprenigi la veran situacion, ŝi profunde kompatis miajn virinojn, kiuj do vivas mizeran vivon inter senescepte frenezaj viroj kaj responde al siaj sopiroj ili ricevas nur neestantaj kaj stultajn fantasmagoriojn.

– Do ĉe vi, – ŝi diris, – se iu virino honeste kaj sincere alvokas la preterirantan viron por seksa laboro, vi, anstataŭ ŝin kontentigi laŭ la reala vivo de la estanta mondo, paroladas al ŝi pri “koro”, “amo”, “anima kunulo” kaj pri aliaj, malice elcerbumitaj brutajoj.

Tiuj kanajlaj vortoj min kolerigis, kaj nur mia bona edukiteco rememorigis min, ke mi staras kontraŭ virino. Do mi devis kontentigi per tio, ke mi klopodis priskribi la moralon de niaj patri-filinoj laŭ la vera situacio.

Mi klarigis, ke nur nekulturita virino povas tiome perdi la moralan bazon, ke ŝi preferu la korpajn instinktojn al la animaj celoj.

Post iom da paŭzo ŝi demandis, ĉu miaj gepatroj apartenis al la kulturitaj, aŭ al la nekulturitaj homoj.

Kvankam la demando tute ne sonis laŭ la plej ĝentila formo, mi klopodis senindigne klarigi, ke miaj gepatroj idiĝis el la plej bonaj familioj, do ilia bona edukiteco estas neniel pridubebla.

Nun ŝi demandis, kiel nia raso plimultiĝas. Eksciante, ke same, kiel ili, ŝi miregis kaj nun jam ne komprenis la antaŭaĵojn.

En Zolema min plejmulte suferigis, ke ŝi neniam ridetis al mi. Mi klopodis atingi tion kaj la konscio pri la senfrukteco, pri mia senpovo min malesperigis. Nur nun mi ekkonis la esencon de la senespera amo: la amanto verdire volas havi ne tiun unu virinon, sed atingi per ŝi la idealon kaj lin pelas en senprudentajn agojn nur tio, se li ne povas en tia direkto fleksi la amatan virinon.

Min premis demando, kiun mi jam estis devinta mencii, sed mi tre hontis. Mi sentis min malaplomba kaj infaneca apud ŝi, kiel ĉiu, kiu donas sian tutan koron kaj dum li humiliĝas kaj petegas, la respondo estas nur klabobatoj de objektivaj sopraĵoj. Mi povis pensadi nur laŭ mia eŭropa cerbo kaj klarigi al mi ĉi tiun malvarme senperan malfermiĝon de la virino, do la Leganto ne miru, ke mi imagis malantaŭ la aferoj aliajn kulisojn. (Sen kulisoj kaj farboj ni ne povas imagi la mondon.) Vekiĝis en mi la ĵaluzo. Eble ŝi havas viron, – mi pensis, – la instinkto ja ne pereis en ili kaj absurde estus, se kun ĝi ankaŭ la altiriĝo ne ekzistus ĉe ili en ia formo.

Ni ekiris hejmen. Longe mi iris senvorte apud ŝi. Sed kiam ni venis al la tramstacio, tamen eliĝis el mi la demando:

– Diru: ĉu vi ne havas intiman interrilaton?

– Kiel tion kompreni?

– Kun viro.

– Alvenas la tramo, envagoniĝu!

Do, ŝi havas sekretojn, kiujn ŝi ne volas al mi komuniki!

Dum ni envagoniĝis, mil suspektoj trakuris mian cerbon. La plej aventurajn aferojn mi imagis kaj decidis ne lasi ŝin eviti la respondon. Post la elvagoniĝo ĉion ŝi devos konfesi.

Kaj Zolema tuj post la sidiĝo, por mia plej granda surprizo, tute trankviltone kaj laŭte komencis rakonti, kun kiuj kaj kiam ŝi faris “seksan laboron”, rimarkante, ke la plej multon de la nomoj ŝi jam forgesis aŭ tute ne sciis.

Tiujn vortojn ĉiu aŭdis ĉirkaŭ ni. Mia vizaĝo hontbrulis pro la publika malhonoro, kaj la vortoj kiel sagoj pikadis mian koron. La okulojn mi mallevis por ne vidi la ĉirkaŭsidantojn, plej volonte mi estus droninta sub la teron, kvankam en la tuta tramvagono nenio vizaĝo turniĝis al ni.

Unue mi provis silentigi ŝin per palpebruma signo, sed tion ŝi ne komprenis, do mi devis ŝin peti per vortoj por ne daŭrigi, post kio Zolema en la sama momento, sen iu ajn surprizo silentiĝis kaj eĉ unu pluan vorton ne diris.

Sed post la elvagoniĝo eruptis el mi la riproĉo. Mi senkaŝe deklaris, ke ŝia konduto estis tre maljusta kontraŭ mi kaj, se ŝi volas min helpi, ŝi ne faru plu tion.

Nun ŝi ne komprenis la komencan parton. Ŝi diris, kial mi demandis, se mi ne deziras respondon. Eksciinte, ke mi protestas nur pro la publikeco, ŝi deklaris, ke ŝi jam tute ne komprenas, kial necesas sekvi tiel komplikajn regulojn, kiuj havas nenian sencon. Fine ŝi trankviliĝis, ke mi estas kuracisto kaj petis min priskribi la kuracistan metodon, kion kaj kiel ŝi devas fari, kaj ŝi agos laŭ tio.

Kompreneble per tio eĉ pliakriĝis en mi la sento de la senpovo: kaj, por eviti ŝiajn pluajn batojn, mi rapide adiaŭis, petante ŝin nur, ke ni ĉiutage renkontiĝu, kion ŝi promesis, kaj ni disiĝis.

Mi ja konjektis ion, ĉar ili jam ofte senkaŝe deklaris, ke por ili individueco kaj individuaj ligiloj, do amo, tute ne ekzistas, aŭ se tiel diri, ilia amo apartenas al fremda mondo, kien mi neniam povos aliri. Sed tiam mi ankoraŭ ne povis tion imagi – same, kiel ni ne povas imagi estaĵojn, kiuj varmiĝas de malvarmo, grasiĝas de malsato aŭ malgrasiĝas de manĝo.

Al mi ĉio ŝajnis senlogika kaj neimagebla, kaj vane mi klopodis ĉi-nokte, turniĝadante en mia lito, aranĝi la cirkonstancojn en unu kompleta kaj organe kunligita tuto, ne sukcesis, simile al tio, kiel ankaŭ la kolorblindulon vane konvinkas la instruo pri la ekzisto de la koloroj, li neniam alproprigos tion sente, neniam havos pri tio intuicion.

La postan tagon ni renkontiĝis sur la marbordo. Malfacile ekiris nia parolado, sed mi jam ne povis reteni miajn sentimentojn. Per ekscititaj vortoj mi plendis, ke mi ne dormis.

Mi petis, ke ŝi, se ŝi jam ne konas la amon, almenaŭ faru por mia bonstato tion, kio estas farenda en tia okazo. Ŝi karesu, brakumu min kaj ĉefe ŝi ne serĉu alian viron.

Responde ŝi demandis, kial mi nomas la amon kunsento, se mi ŝin volas ne apogi, sed malhelpi en la vivo. Konklude ŝi opiniis, ke se ni en Eŭropo tiel kondutas al la amata virino, tiam la neamato ni verŝajne malhelpas en ĉiu sekso laboro.

La vortoj min profunde ofendis. Tremante pro ekscitiĝo, mi petis ŝin ne plu tiel paroli. Mi promesis, ke mi klopodos tute pleniĝi ŝian memon, por ke ŝi, ĉion trovante ĉe mi, trankviliĝu, kaj por ke mi superfluigu por ŝi la pluan serĉadon.

Sed tion ŝi jam tute malkonsentis.

– Vi mem deklaris, – ŝi diris, – ke vi estas malsana, do, se la amo estas fakte kunsento, tiam vi devas min apogi, por ke mi trovu pli taŭgan viron por mi, ol vi mem.

– Silentu! – mi kriis, kovrinte miajn orelojn per manplatoj. – Vi ne komprenas... ne komprenas! Absolute ne komprenas, do almenaŭ ne parolu pri tio.

Sed ŝi deklaris: kontraŭe, ŝia devo estas instrui la belohinon, krome havus nia kunesto nenian sencon.

Kaj ŝi jam komencis klarigi, ke mia metodo estas ne nur miaflanke kazia ago, sed mi intencas plue devigi ŝin al kaziaj agoj, se mi deziras, ke ŝi rifuzu la viron, kiu alvokus ŝin al sekso laboro.

Mi ne plu povis min bridati. Miaj lipoj tremegis kaj subite, perdinte mian prudenton, mi plenforte vangenfrapis ŝin.

Zolema metis sian manon sur sian vizaĝon kaj mirege min rigardis.

– Ho! – ŝi diris. – Tio ja doloras! Kial vi tion faris, se mi ne petis?

Mi ne plu eltenis, mi forkuris. Zolema eĉ per unu vorto min ne revokis. Mi sciis, ke inter ni ĉio finiĝis. Mi estas en karcero, inter grizaj, rigidaj muroj, kie mi vane kriadas, ne estas komprenemo.

Mi tute ne konjektis, kio sekvos ankoraŭ. Mia cerbo ŝiriĝis en cent pecojn. Mi malamis Zoleman, ŝia abomeninda objektiva certeco min ekstreme kolerigis. Mi pensadis inter febraj inkub-imagoj, kiel mi povus ŝin ofende humiligi, kvankam mi jam sciis, ke tio ne eblas, ĉar ilia malpleneco estas neofendebila. Poste, sen ia ajn transiro, mi malamis min mem, kial mi ne povas, komprenante la situacion, tiri la konsekvencojn kaj ne pensi, aŭ almenaŭ *ne tiel* pensi pri ŝi.

Mi jam ne scias, ĉu la nostalgio al mia patrio pelis min en la sekvanta tago al la marbordo, aŭ la subkonscia amdeziro, la pasio, kiu revenigas la homon ĝuste al la plej malĝojmemoraj lokoj.

Kaj tiam subite kaj senatende mi ekvidis Zoleman. Mia koro saltis ĝis la gorĝo, kaj mi ne sciis kion fari. Fine por eviti la honton kaj ĝenan situacion, mi volis rapide malaperi, sed ŝi postkuris kaj min postkriis, ke mi haltu.

Ruĝa de la honto kaj embaraso mi haltis, kaj ŝi per la plej indiferenta tono deklaris, ke ŝi alvenis en la kutima tempo kaj estas je mia dispono.

Kun mallevitaj okuloj kaj per ĉirkaŭdiroj mi demandis, ĉu ŝi fakte ne koleras, sed ŝi same trankvile petis min klarigi, kial mi ekbatis ŝin.

El ŝia tono sentiĝis, ke ŝi ne koleras, kaj tute ne supozas, ke mi batis ŝin pro kolero. Por ili la kolero estas kazi, kaj ĝin ili rigardas same absurda, kiel ĉe ni tion, se iu scienculo en siaj kalkuloj intence skribus 5, kiel la rezulton de 2×2 . Tiu aŭ eraras aŭ estas freneza. La kolero, kiel la naturajn aferojn falsanta afero, estas por ili same nekomprenebla, kiel la amo.

– Kial vi batis min? – ŝi demandis.

– Ĉar mi vin amas, – mi respondis singultvoĉe.

– Ĉe vi oni batas, kiun oni amas?

Pene mi klarigadis, ke tiu amo estas alia, el kio ŝi konkludis, ke ŝi tamen devas resti ĉe mi, pri kio mi tre ĝojis, kvankam ŝi tion diris nur, ĉar ŝi konsideris sia devo kuraci min el la “malsano”.

Post kelka meditado ŝi deklaris, ke en mian kuracmetodon verŝajne enŝoviĝis eraro, ĉar de kiam ni tiel eksperimentas, mia stato ne nur ne proksimiĝis al la kazoo, sed eĉ malproksimiĝis de tiu. Do prefere mi konfidu min al ŝi, kaj ŝi konigos al mi la “realon”, la laboron, la tezojn de la kazoo, sume la “sanajn” aferojn. Ŝi petis, ke mi vizitu ŝin en ŝia laborejo, kie mi vidos, kiel multaj interesaĵoj troviĝas en la kreanta laboro kaj kiel superflue estas okupiĝi pri tiaj sencelaj kaj malutilaj aferoj.

Certe, ja mi mem estus jam preferinta, ke almenaŭ, se mi jam ne vidas homojn ĉirkaŭ mi, mi povus demeti mian homan esencon, por ke mi blindiĝu, surdiĝu, ĉar tiel, en tia atmosfero, mi ne plu eltenos kun homa koro.

La sekvan tagon mi vizitis la laborejon. Ĝi estis longa, mallarĝa domo, el kiu ambaŭflanke branĉiĝis malgrandaj apudkonstruoj. Mi estis kondukata tra la koridoro de la longa konstruaĵo. Sennombraj pordoj estis, unu apud la alia. Fine mi enpaŝis tra unu.

Zolema staris dorsturne al mi kaj manipulis en longa trogo, kiu de maldekstre venis tra la muro el la apuda ĉambro kaj dekstre transiris al ĉambro alia.

Post mia enpaŝo ŝi turniĝis kaj signis per siaj kaŭĉukgantaj manoj, ke mi proksimiĝu.

Mi aliris, mia rigardo trafis la trogon, kaj pro abomeno mi ekŝanceliĝis.

Tie, interne kuŝis vira kadavro, parte jam dissekcita. Sur lia kranio mankis la hararo, lia buŝo estis ambaŭflanke tranĉita ĝis la oreloj tiel, ke lia mandiblo estis falinta ĝis la brusto. Liaj dentoj ĉiuj

elŝiritaj kaj tiu grandega, malfermita buŝo, kun la teruraj vundoj ĉirkaŭe sur la loko de la dentoj aspektis, kvazaŭ pro sufero, superanta ĉiujn inferojn, eksplodis el ĝi dolorkrio apokalipsa.

Sur ĝia korpo la haŭto estis laŭlonge distranĉita ekde ĝia mentono: aperis la ripoj kaj la intestoj.

Unu el ĝiaj okuloj estis elmetita. La alia min rigardis per larĝe malfermita hororo. Mi devis flankenturni ĝi. Mi ekkaptis Zoleman:

– Kion vi faras tie?

– Mi preparas la okulojn, – ŝi diris per la sama indiferenta objektiveco, krom kiu alian mi ne aŭdis ĉi tie, inter la lignohomoj.

– Vidu kaj atentu, – ŝi daŭrigis. – Se iu mortas, ĉi tien li estas transportata. Ĉi tio estas la kadavro-industriejo. La kadavro estas unue observita dum tri tagoj por eviti la ŝajnmorton. Poste ĝi ricevas injekton, por ke ĝi ne vekiĝu, se ĝi tamen estus vivanta. Tiel ĝi venas sub prilaboron. En la apuda konstruaĵo estas prilaboritaj la bovoj, porkoj, ktp, transe la fiŝoj, pli transe la kortbirdaro. El ilia korpo fariĝas plejparte nutraĵoj por la manĝejoj. La homsekcado estas pli simpla, ĉar ĉi tie mankas la buĉado. Ĉi tien venas la kadavroproduktado de la hospitaloj. La materio produktiĝas plejparte pere de malsanoj, aŭ per maljuniĝo, do ĝi ne estas taŭga por nutrado. Sed despli ĝi taŭgas por kuracaj kaj industriaj celoj. Mi laboras en la homa sekcado, kaj mia tasko estas eligi la okulojn kaj cerbon kaj transportigi tiujn al la apuda konstruaĵo.

– Jen, vidu, – ŝi diris, kaj malgraŭ mia tuta abomeno ŝi devigis min alrigardi. – Mi prenas ĉi tiun malgrandan diskosegilon elektran, nun mi tranĉas la haŭton sur la tempio, jene... sub ĝi malfermas la ostojn per la elektra segilo, jene... kaj la okulo facile eliĝas per kelkaj tranĉoj. Antaŭe per mansegilo tiu ĉi laboro daŭris kvin minutojn, nun la tuto bezonas tri minutojn kaj pli malmulta osto polviĝas. Nome, la osto estas tre utila materio. Oni fabrikas el ĝi glumaterialon kaj medikamenton.

– Do vidu, jen, kiel oni devas eligi la okulon, – kaj preninte ĝin en sian manon, ŝi montris al mi. – Precize izoli de la movmuskoloj tiel, ke eĉ la vidnervo ne estu sur ĝi.

El la manoj de Zolema rigardis al mi homo, kaj mi tremegis pro teruro. Mi estus volinta fuĝi, jam estis sur miaj lipoj, ke mi tion diros, sed ŝi daŭrigis:

– Kompreneble vi nun volas demandi, por kio oni uzas la okulon. Mi klarigos. Jen, mi metas ĝin sur ĉi tiun rubandon, nun mi premas ĉi butonon. Jen, la rubando ekmoviĝas, la okulo malaperas en la muro kaj transiras al la apuda ĉambro, kie ili kolektiĝas en ujo. Ĉiutage oni malplenigas la ujon, kaj en la sama ĉambro ĥemiisto prilaboras. Nome li ekstraktas el la vitrokorpo la substancon, kiu miksite en la manĝaĵon de senapetituloj, redonas la apetiton.

– Ĉu ili scias, el kio fariĝas ilia medikamento?

– Kompreneble! Tiaj elementaj konoj de la natursciencoj estas ĉe ni instruataj jam al la etinfanoj.

– Kaj ili rehavas per tio la apetiton?

– Jes. Tre efika medikamento. Sed atentu. La plej multajn partojn de la kadavro oni uzas por transplantado ĉe malsanuloj. Krome, en la diversaj organoj troviĝas multaj utilaj materialoj, kiuj en formo de injekto refortigas la malfortiĝintan organismon. La haŭton oni eĉ uzas en la ledfabriko por ledaj objektoj, el la intesto pretiĝas bonaj ŝnuroj, el la grasaĵo fariĝas sapo kaj nutraĵ-ekstrakto, el la cerbo...

Mi ne povis plu elteni. Mi interrompis:

– Kaj vi faras tion tiel senemocie? Ĉu vi ne malbonfartas?

– Super mia kapo funkcias ventolilo, – ŝi diris kaj suprenmontris. – Kie oni prilaboras la intestojn, tie oni portas eĉ gasmaskon.

Mi rigardis per abomeno ĉi tiun tielnomitan virinon.

– Ĉu la hinoj tiel respektas la homon? – mi demandis per obtuza riproĉo.

– Tiel! – ŝi diris fiere. – Eĉ unu atomo ne perdiĝas. Kiel oni prilaboras la homon ĉe vi?

Mi klarigis al ŝi la entombigan ceremonion, la funebron de la familio, nigran veston, larmojn, pastron, funebran veturilon, sonorilegon, ĉerkon, la enterigon, tomban monumenton kaj la ĉiujaran pian rememortagon, kiam la dankemaj parencoj starigas kandelon kaj floron sur la tombo de la amata mortinto.

Mi sukcesis nur tre malfacile klarigi la aferon, kaj kiam mi jam ĉion rakontis, eĉ tiam ŝi ne tute komprenis. Dum mi parolis, ŝi senĉese min ĝenis per siaj demandoj. Pri la sonorilego ŝi kredis, ke ĝi estas eksperimento por vekti la mortinton, la pastron ŝi rigardis kuracisto, kaj ĉiam ŝi serĉis ian celon: kial oni deŝiras la floron: la deŝirita floro ja sekiĝas kaj ne povas kreskigi semojn! Kial ni lumigas per kandelino, se la elektro estas pli bona? Kial ni ne funebras somere en blankaj vestoj, kaj se ni jam tamen portas nigran, al kiu utilas tiu: ĉu al la mortinto, al la pastro aŭ al la parencoj kaj kiel?

Mi devis trifoje ripeti, sed ŝi nur levadis nekompreneble la ŝultrojn: – kio estas la celo? – ŝi demandis pri ĉio.

Mi klarigis pri la honorigo al la mortinto, respekto al lia vivpasinteco.

– En la mortintoj estas nur ĥemiaj valoroj, – ŝi respondis, – kiujn vi ne respektas, ĉar vi ilin forĵetas, ne konsiderinte, ke la mortinto, enterigita tiel, estas minacata per la terura sorto de la ŝajnmorto. Ĝuste vi ne respektas viajn mortintojn.

– Ni respektas ne la ĥemiajn valorojn, – mi kriis, – sed tion, ke li iam vivis, ke li estis homo, kiu laboris, amis kaj utilis al la aliaj!

– Vi faras denove aferojn, kiuj ne estas, kaj eĉ tion vi faras renverse. La laboron de la homo oni devas respekti dum lia vivo, kaj ni respektas ĝin tiel, ke ni ĝin rekompencas per bona nutraĵo, loĝejo, vesto kaj komforto, sed vi mem diris, ke ekzistas ĉe vi homoj, kiuj tre malbone vivas, kaj ĝuste tiuj vivas malbone, kiuj laboras plej multe. Do vi nek dum la vivo nek post la morto respektas la homon laŭ ĝia merito.

Mi vidis kreski inter nin terurajn abismojn, kiujn mi neniam povos trairi. Iom post iom ŝi metamorfozis antaŭ mi. Ankoraŭ hieraŭ min erarigis ŝia perfekta homa staturo, ŝia beleco, dum nun mi komencis ŝin vidi moviĝanta aŭtomato. La bildo ŝanĝiĝis. Mi jam komprenis, ke mi havas interrilaton nur kun homaj korpoj, sed en tiuj ne troviĝas eĉ ero de homo. Plej ĝuste mi povus ilin nomi pensantaj objektoj. Kaj fine mi tute trakomprenis, ke Zolema kaj la ceteraj ne estas ia stranga speco de homoj, sed simple ne homoj. Ili estas io alia.

Nun eklumiĝis al mi, kie troviĝas la animo, kiun mi vane serĉis ĝis nun.

Nenie!

Nun mi ekkomprenis, ke la animo ja povas tute manki.

Sed tiaokaze kiuj, pli korekte *kioj* estas tiuj ĉirkaŭ mi? Kaj kio tamen subtenas ilian socion?

Mi demandis jam nur el scivolemo:

– Kial vi ne elektis pli virinan profesion?

– Ĉu ne tian mi faras? – ŝi diris mire. – Iam pro neceso, oni sendis min en la suĉinfan-edukejon, ĉar mankis sufiĉaj viraj laboristoj. Ankaŭ mi same levadis la litojn, la akvositelojn, portis malpurajn vestaĵojn al la lavejo, frotpurigis, gladis, kiel la fortaj viroj, sed mi ne longe kapablis. Mi vizitis la kuraciston por konsilo. Li deklaris, ke mi ne estas taŭga por tio kaj mi devas serĉi virinan laboron. Tiam mi venis ĉi tien.

Dum Zolema parolis, ŝi malgrandiĝis antaŭ miaj okuloj al nekredebla distanco. Mi vidis du objektojn: Zoleman kaj la buŝmalferme gapantan kadavron, kiu ne plu havis okulojn. La du objektoj pli kaj pli kunfluis, kaj la diferenco neniĝis.

Mi mallonge diris, ke mi jam lernis sufiĉe, mi ne bezonas pli, kaj mi foriris. Mi nek dankis ŝian instrulaboron, nek salutis ŝin adiaŭe, ili ja ne konas tion.

Sed el la pordo mi rerigardis. Zolema staris dorsturne, kaj ŝi daŭrigis sian laboron, kvazaŭ ŝi neniam estis min vidinta. En la momento, kiam ŝi plenumis al mi sian laboron, difinitan de la kazoo, nenio plu ligis ŝin al mi. Kvazaŭ mi neniam estus vivanta.

Homoj, kiuj laboras kune dum dek-dekkvin jaroj, povas vivi tiel unu apud la alia, ke eĉ sento de la plej malgranda ligilo ne elkreskas inter ili. Matene ili envenas sen saluto kaj eklaboras, tagmeze ili foriras kaj se iu, post dek-dekkvin jaroj iras al alia posteno, same sen adiaŭo li malaperas el la vivo de la aliaj.

Min trafis la sento de terura senpovo. Mi estas vive enterigita inter la mortintoj, sur ĉi tiu insulo, kies atmosferon vane spiregas la vivsoifanta pulmo. Kaj ne estas rifuĝo. Mi sekiĝos ĉi tie sen aero kaj vivo, por ke fine oni min enportu ĉi tien kaj Zolema sen ia emocio eltranĉu miajn okulojn, kies rideto kaj larmoj signifis al ŝi nur fremdan, nekonatan ekzotaĵon kaj por ke poste mia kadavro pluiru en la trogo, ĝis oni distranĉos ĝin je eroj, kaj la ĥemiistoj kunmetu ilin al “uzeblaj” materioj sur la bazo de la “kazoo”.

Kaj en Zolema eĉ tiam ne ekvibros unu sola rememoraĵo, ja eĉ iliaj gepatroj, prauloj estas nekonataj, fremdaj objektoj por ili, kiuj estas aŭ estis, sed ili ne eksentas eĉ eron de la ligilo.

La aero premegis min per terura pezo, mi preskaŭ sufokiĝis. Subite mi sentis kapturnon. De mia kolo la vestaĵon mi ŝiris per unu tiro. Mi ekŝanceliĝis.

Mi ekkapte apogiĝis al la pordfosto. Zolema sciis, ke mi estas ankoraŭ tie, sed ŝi eĉ ne pensis turniĝi. Ĉiu estas konvinkita, ke la alia faras ĝuste, kaj ĝis tiu ne ekparolas, neniu lin prizorgas.

La mondo turniĝis ĉirkaŭ mi, miaj piedoj senfortiĝis, miaj genuoj ekfleksiĝis. Mi ekkaptis seĝon, sed vane. Kune kun la seĝo mi teren-falis kaj sterniĝis sur la planko.

Pro la bruo Zolema turniĝis. Per unu saltpaŝo ŝi jam estis apud mi.

– Ĉu vi fartas malbone? – ŝi demandis.

– Ne! Lasu! – mi krietis. – Lasu min sola! Forportu vin! Vi ĉiuj forportu vin! Lasu min putri sola.

Ŝi staris embarasite. Ŝi ekiris reen, sed denove turniĝis kaj venis al mi. Poste vidante miajn larmojn kaj taŭzitaĵajn trajtojn, ŝi ekparolis:

– Vi tamen fartas malbone. Kial vi diras la aferojn tiaj, kiaj ne estas? (Ili ne havas vorton por la mensogo.)

Post mallonga hezitado ŝi demetis per rapida gesto sian mantelon, elkuris kaj post kelkaj sekundoj revenis kun siaj du kunlaborantoj.

La unua transprenis ŝian laboron, ili ambaŭ min ekprenis, suprenlevis per tiom da delikateco, je kiom nenia animhava homo estus kapabla. Eĉ sian spiradon retenante ili portis min al la korto, kie jam staris aŭto, en kiun mi estis enmetita. Zolema sidis apud mi, ŝi malfermis sur mia brusto la vestaĵon, verŝis en mian buŝon ian freŝigan fluidaĵon, kaj ni ekveturis.

Post kelkaj minutoj ni haltis. Ekstere du viroj nin atendis kun portlito. Ili singarde min ellevis, kuŝigis sur la portlito kaj transportis al la tie atendanta speciala elektra tramvagono. Ĝi estis la speciala transportvagono por malsanuloj. Ili kuŝigis min sur mole risortita gum-lito, kaj la vagono ekiris, kion mi vidis nur tra la fenestroj, ĉar nenia bruo aŭdiĝis, kaj movon mi ne sentis.

Zolema apude starante kliniĝis super min, kovris min, zorgeme atentis pri ĉiu mia movo, kaj mi denove eklarmis. Mian brakon mi etendis al ŝi, mi volis ŝin brakumi, sed mia brako dumvoje refalis.

Ja ĉio vana! Terura scio vidi ĉirkaŭe homojn kaj scii, ke ĉio estas trompiĝo. La amo ne estas amo, la boneco ne estas boneco, la korpoj interne estas malplenaj, kaj mi estas tute sola.

Min ekskuis senespera, furioza ploreĝo, miaj larmoj flukovris mian vizaĝon.

Ŝi alportis vaton kaj sorbigis miajn larmojn. Poste ŝi malfermis ian kranon, el kiu venis freŝiga arbaraodoro.

Post dek minutoj ni alvenis al la hospitalo. Ĉi tie mi jam estis atendata per portlito, oni min suprenportis per la lifto en iun ĉambron, kaj tie mi kuŝiĝis.

Al mi enpaŝis kuracisto. Zolema komunikis, de kie mi estas enportita, menciis, ke mi estas belohino kaj aldonis:

– Okaze de morto vi nepre sendu ankaŭ la diagnozon, ĉu la cerbo estas uzebla, aŭ ni devas ĝin forĵeti.

Ŝi turniĝis kaj foriris. Neniam plu mi vidis ŝin.

Mi preskaŭ eksplodis pro ploremo, sed mi ne kuraĝis plori. Mi diris, ke min kaptis nur pasema sveno, sed mi jam sentas min tute sana kaj por pruvi tion, kolektinte mian tutan forton, mi ekstaris.

La kuracisto min esploris, englutigis kuleron de eksterordinare malbonodora oleo kaj transsendis min al la belohina sekcio, kie mi enlitiĝis.

Naŭa ĉapitro

Ĉi tie ni venas al la plej malfacilaj tagoj de la aventurplena vojaĝo de l' aŭtoro, kiujn li pasigis inter la behinoj. – Ĉi tiu ĉapitro pritraktas la strangaĵojn de la unua tago.

La sekvantan tagon denove min vizitis Zatamon kaj diris, ke la afero detale estis pritraktita: li petis la opinion de la savista kuracisto, demandesploris Zoleman kaj laŭ la rezulto de tio ĉi ne estas malhelpo, ke mi eniru inter la behinojn.

Liaj vortoj min iom surprizis, kaj mi rimarkis, ke mi miras pri tia severeco. La hinoj ja ne kutimas influi la individuajn decidojn, kaj ĉiu homo faras laŭ sia opinio.

Zatamon diris, ke ĉi tio estas la sola deziro, kiu ne estas plenumbla laŭ la volo de la individuo, ĉar, – laŭ liaj vortoj, – ekzistas cerbomalsanuloj, kiuj pro manio imagas sin behinoj, kvankam la malsano estas nur “simpla” paranojo, kiu estas kuracebla, kaj ilia opinio ne estas alia, ol la ordinara fiksa ideo, kiam la malsanulo ekzemple kredas, ke li estas el vitro, au imagas sin korktirilo. Tiujn “pli facilajn” okazojn oni devas reteni al la grandaj perturboj de la behina vivo, kaj ĝuste pro la gravaj sekvoj de tiu decido ili esploris miajn simptomojn tiom detale.

Liaj vortoj denove igis min rideti, kaj mi certigis, ke mi ĉion eltenos.

Nun li stariĝis, kaj ni ekiris.

Ni trairis la parkon, kaj post mallonga tempo ni staris antaŭ alta muro.

Ĉe la pordo ni devis sonorigi. Jen, estis la unua pordo, sur kiu mi vidis seruron. Je mia demando li klarigis, ke inter la behinoj okazas multaj strangaj aferoj. Ili uzas la objektojn por aliaj celoj, ol tiuj estas farataj. Ili ofte postulas superflujajn aferojn, kaj se la postulon oni rifuzas, la vizaĝo de la behino strange deformiĝas, lia voĉo similiĝas al tiu de la meleagro, li kriadas, eĉ, se oni staras al li tute proksime, ili superflue rompas rompeblajn objektojn; ankoraŭ pli, ili ofte ekbatas iun, kvankam neniu petis tion. Verŝajne tio signifas pli gravan stadion de la malsano. Tial sur tiu pordo estas bezonata tiu stranga mekanismo, kies eco estas, ke nur per konvena instrumento ĝi estas venigebla en malfermeblan staton.

Kaj kiam la pordo malfermiĝis, li prenis la ŝlosilon el la manoj de la pordisto kaj klarigis ĝian funkcion, rimarkante, ke ĝin planis la inĝeniera sekcio de la hospitalo.

Ĝi estis la plej simpla pordega ŝlosilo kun glata ŝlosil-flugilo. Ĉe ni malŝlosus tiun pordon eĉ la plej mallerta ŝtelisto.

Mi aŭskultis la vortojn kaŝride, kaj ĝojplene mi atendis la renkontiĝon kun la unua behino.

Ho, se tiutempe mi estus sciinta, ke tute male: mi venas en la plej teruran frenezulejon de la mondo; ke en mia vivo sekvas ĉapitro, pri kiu la nura rememoro kunpremas mian koron!

Ni enpaŝis kaj venis al longa koridoro. Apud fenestro staris homo en kompatinda vestaĵo. Sur lia vesto faŭkis grandaj truoj, kaj kelkaj partoj pendis de li ĉifone. Ĉe mia elveno li rigardis min per kuntiritaj brovoj.

– Ĉu vi vidas, – diris Zatamon, – sur lia kapo estas longa tranĉo.

Mi ektime alrigardis, sed mi vidis nur la meze diskombitan frizaĵon, kiu igis min ĝoji. Unua signo de homa anima kulturo!

Li kondukis min en ĉambron, en kiu staris lito, tablo, seĝo kaj ŝranko. Plejparte konstruitaj en la muro. Poste li lasis min sola.

Ĉirkaŭrigardante, mia unua ekvido estis, ke kvankam la loĝejo estis sufiĉe normala, tamen ĉiu objekto estis en multe pli eluzita stato ol ĉe la hinoj. Eĉ pli, sur kelkaj mebloj mi konjektis malkovri la postsignojn de intenca difektado.

Precipe mizera estis la stato de iu elektra kuirforno. Ĝiaj lamenoj estis dense truitaj, la kroĉiloj rompiĝintaj, la duono de unu piedo mankis kaj estis apogita per brikoj.

Sed nun ĉio ĉi ne interesis min. Mi volis ekkoni mian novan patrion.

Mi eliris al la korto. Mi vidis antaŭ mi grandan teritorion, kiu estis borderita parte per muroj, parte per konstruaĵo. Ĝia fino apenaŭ estis videbla. Iuloke en la fono leviĝis monteto, surkreskita de arbustoj. Bela, suna vetero estis, multaj homoj promenadis. Ĉi tie mi vidis unuafoje homojn en grupoj. Ilia vesto estis same en pli-malpli ĉifona stato, kion mi tiam atribuis al la malzorgemo de la hinoj, kaj mi tiom pli simpatiis kun la behinoj.

Sub arbo iu homo starigis akvoglasojn sur la tablo, li verŝis pli-malpli da akvo en ilin kaj ekfrapadis sur ili kanton. La ceteraj ĉirkaŭstaris, kelkaj kantadis kaj – ridis!

Post la terura dezerto tio signifis al mi veran refreŝiĝon. Mi alkuris preskaŭ flugante pro ĝojo. Do, tamen!

Mi elektis la unuan.

– Mi estas Gulivero, – mi diris ridetante, liberiĝinte, kaj mi etendis al li mian manon.

Li seriozmiene turniĝis al mi.

– Pricc-prucc, – li diris, kaj sian montrofingron li metis sur sian nazon.

Tiajn vortojn mi ne konis, kaj ili tute ne povis troviĝi en la hina vortaro, kie nek la litero “r” ekzistas, nek du konsonantoj sekvas unu la alian. Kaj tiu movo per la montrofingro!

Malvarmo trakuris mian dorson. Eble li tamen estas frenezulo? Kvankam li aspektis antaŭe tiom normala! Kion nun fari? Se mi forkuros, eble li furioziĝos.

Vidante mian embarason li ekridegis.

La histeria ridego frostigis la sangon en miaj vejnoj, kaj mi rigardis tremante al la pordego, kiu neŝanĝeble fermiĝis malantaŭ mi.

En mia embaraso mi serĉis ian pretekson por lin trankviligi. Ian kaŭzon, kial mi lin alparolis.

– Mi volis nur demandi, – mi diris, – kiam kaj kie ni manĝos?

Sur liaj lipoj subite frostiĝis la rido, kaj li tuj turnis al mi la dorson. Ankaŭ la ceteraj malestime forturniĝis.

Uzante la momenton, mi rapide malaperis. Dum kelka tempo mi rigardis ĉiudirekte kaj serĉis okazon alparoli pli normalan homon, ĉar mi nepre volis ekkoni mian strangan medion. En mi mem mi grave riproĉis Zatomonon, ke oni min enportis sen ia informo. Tamen mi konsentis, ke se ĉi tie ja vivas animhavaj homoj, la hinoj certe ne povis min ĝuste informi.

Mi vidis, ke mi povas min konfidi nur al mia propra povo. Mi nepre devis ion ekscii pri ili.

Iu sidis sur benko kaj legis libron. Post mallonga hezito mi lin alparolis:

– Ĉu mi ĝenas vin per mia demando?

Tiu, metinte sian fingron sur la nazon, diris:

– Pricc-prucc, – kaj ridetis.

Do, ankaŭ ĉi tiu! Miaj genuoj kunfrapiĝis pro angoro. Mi staris senkonsile.

Sur liaj lipoj frostiĝis la rideto, kaj li turnis al mi la dorson.

Sed mi nepre devis paroli kun ili, mi ja nenion sciis kaj estis en la plej granda necerteco.

– Mi estis ĵus enportita, – mi diris petante, – mi estas senspertulo. Mi petas, respondu al mi. Kial vi diras pricc-prucc kaj forturniĝas?

Tiu subite moliĝante turniĝis al mi.

– Ho! Mi ne sciis. Tiam la okazo estas ja alia. Mi komprenas. Do, mi instruos vin. *Pricc-prucc* estas *belki*.

– Kio? – mi demandis embarase.

– Belki, – li respondis senhezite, dum mi ŝtele rigardis kiel rifuĝi, – vi ja ne komprenas tion, ĉar vi ne scias, kio estas la *ketni*.

– Ketni?

– Ketni. Se oni diras, *pricc-prucc*, vi devas rediri tion kaj meti vian fingron sur vian nazon, kaj tio estas la belki. Kaj la belki estas ketni. Se vi ne faras tion, vi ne kondutas ketni-maniere, kaj oni kompreneble *enoos* pro vi.

– Enoos?

– Nature! Ĉu oni tute ne enoas, se iu kondutas ne laŭ ketnia maniero? Kiel vi imagas?!

– Nature, nature, – mi diris trankviliĝante, – kaj kio estas tio?

– Jes. Ankaŭ pri tio vi ne scias. Do, kiam mi rerigardis en la libron, per tio mi montris, ke mi interne enoas pro vi. Atentu, ĉar vi eĉ riskas, ke vi estos batata, se vi ne estas ketnia homo.

– Se mi ne diras “*pricc-prucc*”?

– Nature! Kial vi miras? Ĉu ne memkomprenebla?

– Kaj se mi diras “*pricc-prucc*”?

– Tiam oni ridetas kaj gratas vian postaĵon, post kio vi regratas lian. Tio signifas, ke vi ambaŭ ne enoas unu pro la alia, kaj vi ambaŭ estas ketniaj homoj.

– Tio ja estas kretenaĵo! – mi diris ekkolere.

Li kuntiris siajn brovojn.

– Mi vin admonas ne paroli tiel pri la ketnio, ĉar vi estos elmetita al la plej grava enoo. Mi scias, ke vi estas ĵusveninto, sed ellernu la ketnion, kiu levas nin super la eksteran *bivag*-amason.

– Bivago?

– Bivago. Ĉar ili kondutas kiel bivag. Se ni belki-as al ili, ili ne priatentas. Eĉ se ni gratas ilian postaĵon, ili nur gapas idiote. Ili tute ne havas koncepton pri la ketni.

Nun li gratis mian postaĵon, kaj mi devis regrati lian! Por ke mi pruvu mian sanan cerbon!

La Leganto verŝajne koleretas pro la multaj behinaj vortoj kaj akuzas min pri neglektemo, aŭ eble pri gravmiena fanfaronemo, ĉar mi ne diras ilin en angla traduko. Do, mi jam komence devas deklari, ke la netradukitaj vortoj konformas al nenia vorto en la angla lingvo. Ili ĉiuj reprezentas tiajn specialajn maniojn, kiuj estas tradukeblaj al nenia kulturlingvo, ĉar tiuj konceptoj ĉe ni absolute ne ekzistas.

Por klarigo imagu la Leganto, ke iu pikas sian fingron per pinglo, forsvingas ĝin kaj ŝovas en sian buŝon. Tiu movo havas ordinaran anglan nomon: doloro. Sed se iu sen iu ajn normala kaŭzo metas sian fingron sur sian nazon kaj tion nomas belki, kiel mi traduku tion al la lingvo de la sancerbaj civitanoj de mia patrio?

Nun alia homo proksimiĝis al la benko. Stranga figuro estis la kompatindulo. Desuper liaj genuoj, ligite per ĉenoj, pendis du pezaj kupraj kubo, kiuj ĉiupaŝe dolorige frapiĝis al liaj kruroj, pro kio li paŝadis nur tre malrapide. Mi kompatis la malfeliĉulon.

Mia konatulo subite saltleviĝis, sian dekstran piedon kaptis per sia mano kaj dolormiene vekriis: vake! vake!

Tiu haltis, kun senlime serioza grimaco ekskuis la kuprajn kubojn sur la gamboj kaj diris afable ridetante:

– Kiel via nazo kreskas, *kaleb*?

– Vake, daŭre.

El ĉi tio mi vidis, ke la ekkapto de la piedo kaj la vake estis ne esprimo de doloro, sed ia nova frenezaĵo. Sed por ke oni ne rigardu min bivag, ankaŭ mi saltleviĝis, kaj metante mian fingron sur mian nazon mi diris:

– Pricc-prucc.

Responde mi ricevis profunde riproĉan rigardon. Mia konatulo ekpugnis mian kokson kun tima embaraso, post kio, eĉ pli embarasite, mi ekgratis la postaĵon de la kuprokubulo.

La kuprokubulo malestime trarigardis min de la kapo ĝis la plando kaj intencis pluiri, sed mia konatulo saltis antaŭ lin, kaj, metinte sian dekstran manplaton sur sian kapon, petegante klarigis:

– *Elak betik!* Ho, *kvari* al la bivago! Ĵus envenis la senvalorulo kaj ne scias, kio estas la ketni!

La kuprokubulo konsiderinde mildiĝis, per amika rideto ektuŝis la nazon de mia konatulo kaj poste la mian.

– Tio estas ja io alia, – li diris gracplene. – Kiel via nazo kreskas, *kaleb*? – li demandis min.

Mi gapis idiote, mi volis diri, ke ĝi ne kreskas, sed mia konatulo denove kokspugnis min, do mi preferis silenti. La kuprokubulo foriris, kaj mia konatulo, denove kaptante sian dekstran piedon, vekriis vake-vakeon kaj hurlis tiel, ke mi jam volis helpi lin, sed li forpuŝis min.

Mi larĝe malfermis buŝon kaj okulojn, kaj miaj piedoj radikiĝis en la teron.

Kiam la kuprokubulo jam sufiĉe malproksimiĝis, li turniĝis al mi kaj kolere riproĉis min:

– Kiel vi aŭdacis diri pricc-prucc al betiko, vi bivag!

– Ĉu ne vi mem tion instruis? – mi balbutis.

– Sed al *betiko*! Ĉu vi ne vidis sur liaj kruroj la *bilev*-ojn?

– Ĉu la kuprajn kubojn?

– Tiuj ne estas kupraj kubo, tiuj estas bilevoj.

– Do, ili ne estas el kupro?

– Nu... nu... – li diris ĝenate, – eble se ni esploras el tiu vidpunkto... ili eble estas el kupro, sed oni ne rajtas tion diri.

– Kaj kial ne, se ili estas tamen el kupro? – eksplodis el mi.

– Ĉar vi devas ekscii, ke ili ne estas el kupro! – li kriis. – Ili ne estas el materio, ili estas *anebao*! Pri tio oni ne rajtas diri, ke ili estas materio, ĉar ili estas nur la materia simptomo de la estado de la *bikruo*, kaj oni ne rajtas eĉ pripensadi, ĉu ili estas el materio aŭ ne.

– Mi tute ne havas ideon pri tio, kio estas la anebao kaj bikruo, sed, ke la kubo estis el materio, tio estas certa. Kia frenezo estas nei tion, kion oni vidas per siaj okuloj!

Jam nun anticipe mi rimarkas, ke neniam, neniun diris pri la bilevoj ke ili estas el materio. Iam mi vidis seruriston, kiu ĝuste tiam poluris du bilevojn, kaj ankaŭ li estis konvinkita, ke li havas inter la manoj esence nenion; pli ĝuste, ke ili estas la materia simptomo de la estado de la bikruo, kiu estas nek videbla, nek palpebla, kvankam ĝi troviĝis inter liaj manoj, kaj li ĝin vigle palpadis.

Pro tiuj vortoj min kaptis angoro. Mi demandis ŝajne trankvile:

– Kaj kio estas la bilevo?

– Ĝi signifas, ke ĝia portanto estas betiko.

– Kio estas la betiko? Kion li faras?

– Nenion! Betiko! Kaj la betiko estas elak! Ĉu vi komprenas? Kaj al elak-ulo la belki estas ne price-prucc, sed kiel mi faris: vi kaptas per la mano vian piedon kaj veas: “Vake! Vake!”, signife, ke via piedo doloras; ĉar vi ne rajtas porti sur ĝi bilevojn.

– Ĉu pro tio, ĉar mi ne portas bilevojn? – Mi tute konfuziĝis. – Ĝi ja dolorus ĝuste, se mi portus ilin!

– Silentu! – li diris time ĉirkaŭrigardante. – Mi volonte instruas vin, sed vi almenaŭ ne metu min en ĝenajn situaciojn. Do, ion tian vi ne rajtas diri!

– Fi! – mi kriis ekkolere. – Espereble vi ne intencas al mi imagigi, ke miaj piedoj doloras, ĉar mi ne portas bilevojn, kiuj ilin batadus? Eĉ la plej primitiva sana cerbo protestas kontraŭ tia afero!

– Mi konsilas je via propra intereso, – li diris severe, – ke vi ne parolu tiel. Ekzistas aferoj, pri kiuj ne eblas disputo aŭ apelacio al la sana cerbo, ĉar tiuj estas anebaj aferoj, kaj ĉiu ja scias, ke ni ĉiuj tre volonte portus la bilevojn, ĉar la betiko estas elako!

– Prefere mi ne estu betiko kaj elako, – mi diris kun profunda konvinkiĝo, post kio li ekridis.

– Ho, vi bivag! Malfeliĉa sensciulo! Mi konsilas diri nenion tian, ĉar la ceteraj vin priridegos! Kaj, se vi persiste asertados viajn stultaĵojn, eble oni eĉ koleriĝos kaj diros al vi: *lamiko*, kaj vi estos elmetita al tio, ke vi devas lin tuj trapiki per tranĉilo.

– Ĉu pro tio, ĉar oni diras “lamiko”?

– Memkompreneble!

– Kiu devigas min pro tio trapiki lin per tranĉilo?

Li rigardis min kompate.

– Ĉu vi tolerus, se iu dirus al vi “lamiko”?

– Kial mi ne tolerus, se mi havas pro tio nenian malutilon?

– Komprenu fine: ĉar tiu vorto estas *borema*! – li diris kun senlima soleneco.

Tio jam eksplodigis el mi la ridon.

– Nu, ili nur diru tion trankvile! Estu ĝi borema! Min tute ne incitas. Fino!

Li preskaŭ svenis pro konsterniĝo.

– Do, ĉu vi fakte estus faranta, ke vi ne ekkaptas la tranĉilon, se iu vin nomas lamik? – li demandis minace.

La rido frostiĝis sur miaj lipoj. Mi vere komencis ektimi.

– Kial? – mi demandis. – Kian danĝeron signifus al mi, se mi ne tranĉilpikas iun?

– Kian danĝeron? Ho, vi kompatinda fremdulo! Do, ĉu vi ankoraŭ ne konas la konsekvencojn?

– Ne. Absolute ne. Klarigu jam!

– Nu, atentu. Se vi ne ekkaptas tranĉilon okaze de borema, la behinoj kunsidas, konceptas protokolon kaj deklaras vin tranĉil-nekapabla!

– Kaj kion tio signifas al mi?

– Kaj tio signifas, ke – (nun li iome retiriĝis kaj sian montrofingron puŝis al mia brusto) – ke poste eĉ vin ne tranĉilpikos aliu!

Li metis siajn manplatojn sur sian kokson kaj atendis la efikon.

Unu minuton mi buŝmalferme gapis, poste denove erupciis el mi la rido.

Mi vidis, ke ĉi tie oni rajdadas sur kretene kunportitaj vortoj: antaŭ ĉi tiu vorto oni humiliĝas, de la alia naŭziĝas, sed la ĉefa kvalito de ĉiu vorto estas, ke ili havas nenian interrilation al la realo.

Mia konatulo kolere mansvingis:

– Vi havas nenian kapablon pri la ketnio! Atentu, ĉar, se mi ne instruos vin, vi estos elmetita al la plej granda enoo!

Mi jam konjektis, ke la enoo signifas malestimon, koleron aŭ ion similan, al kiu povas ligiĝi eĉ la tranĉilo, do mi prefere retenis la proteston de mia menso kaj revenis al la temo.

– Diru, kial la betikon interesis la kreskado de niaj nazoj?

– Ne la betikon, sed la elak-betikon!

– Vi mem diris betikon!

– Jes, mi diris, sed se vi diras, por vi li estas elak-betiko. Mi sidis sur ĉi tiu benko antaŭ vi.

Mi estis firme decidinta bridi mian sanan cerbon.

– Bone, – mi diris ŝajne tute trankvile, – do, kial lin interesis la kreskado de niaj nazoj?

– Unue lin ne interesis, ĉar betikon ne interesas la aferoj, li nur demandas. Due, eĉ se ĝi lin interesus, li demandas nur pro kutimo. Sed atentu: vi ne rajtas demandi pri la nazo de la betiko, nur li pri la via. Tio estas la ketnio.

Mi jam satiĝis per la ketnio. Mi intencis paroli pri pli sanaj aferoj.

– Diru: kiel oni kutimas ĉi tie manĝi? Kiel ni ricevas la manĝaĵon?

Li terure ektremis. Siajn manplatojn li metis sur sian buŝon kaj angore ĉirkaŭrigardis.

– Pst! Ne diru tian bivagaĵon! Vi devas diri: “Kiam kaj kiel ni ricevas la *spiritualaĵon*?”

– Spiritualaĵon? Ĉu ĉi tie oni ne manĝas?

– Pst! Pst! Almenaŭ ne tiom laŭte!

Li sidiĝis pli proksimen kaj flustre klarigis:

– La spiritualaĵo estas la sama, kion vi demandis, sed tiel diri estas malpermesate, ĉar tio estas *kave*.

– Do, la manĝaĵon oni ne rajtas nomi manĝaĵo, ĉar vi elpensis la vorton “kave”. Unu sence faritan vorton vi pruvigas per la alia, kaj vi fabrikas amase tiajn konceptojn imagitajn en la aeron. La vivon vi konfuzas en labirinton kaj malfaciligas, kaj la homo, kiu ne dancas tiun ĥimeran dancon de Vito, pro tiu vi “enoas”. Do diru: ĉu inter vi ne troviĝas inteligenta homo, kiu senindulge frakasus tiun stultegan mondon kaj manifestus, ke ne ni vivas por la vortoj, sed la vortoj estas por la vivo?

Li jam rigardis min komplete.

– Mi intencis nur helpi vin, – li diris. – Mi mem pardonas viajn vortojn, ĉar mi estas komprenema homo, kiu ĉiam diris, ke la malbonaj agoj ne devas deveni nepre el malbona intenco, sed ilia kaŭzo povas esti ankaŭ la nescio. Vi atakis tiom forte la anebaojn, ke pro tio ĉiuj estus enoantaj kaj nomus vin lamiko, eĉ vi ricevus gravan punon.

– Punon? – mi diris konsternite. – Do, al kiu mi volis malutili? Ĉu ne mi volis nur plifaciligi por vi la vivon? Mi volis liberigi vin de la idiotaĵoj, kiuj superflue malfaciligas la vivon, kaj ĉu vi eĉ enoas pro mi?

– Ne plu diru idiotaĵojn! – li kriis kun fajrerantaj okuloj.

Mi ektimis. Anstataŭ ke ili dankus la helpon, ili eĉ persekutas tiun, kies sana vido volas plibonigi iliajn vivojn. Ion tian fakte povas fari nur frenezuloj.

Ĝenerala kutimo estis inter ili, ke ili postulis unu de la alia ne la bonecon kaj moralecon, sed kelkajn devigajn mensogojn. La neo de la materiala ekzisto de la kuprokubo estis pli grava devo, ol tio, ke neniu mortpafu la apude starantan homon.

Do, mi konsilas al ĉiu, kiu venos inter la behinojn, ke li neniokaze provu esti bona kaj helpema, ĉar ilia plej karakteriza trajto estas, ke ili facile ekkaptas la gorĝon de la sancerbulo.

Do, mi preferis cedi kaj li daŭrigis:

– Prefere vi danku, ke via bona sorto vin kondukis al mi. La aliaj jam delonge estus vin portantaj al la betiko. Sed mi ne volas pri vi supozi malbonvolon, kaj malgraŭ viaj akraj atakoj ankoraŭ nun mi emas kredi, ke vi pliboniĝos per la ellerno de la ketni, ĉar vi nun ne konscias pri la terureco de viaj vortoj. Nu, price-pruce.

– Price-pruce, – mi diris, metante mian fingron sur mian nazon, pro kio li evidente ĝojis. Ni reciproke gratis la postaĵon unu de la alia, kaj mi forrapidis.

La Leganto verŝajne rimarkis, ke mi uzis jam tiajn vortojn, kiuj ne ekzistas en la hina lingvo, kiel la bon- kaj malbonintenco, puno, rido, ĝojo, ktp. Tiuj estis ankaŭ por mi tute novaj, sed la sencon mi eltrovis el la frazoj, kaj mi donas ilin en angla traduko. Mi komunikas nur tiujn vortojn en siaj originalaj formoj, kiuj signifas reale neekzistantajn aferojn, do en lingvo, farita de la prudento, ne povas ekzisti vorto pri tiuj.

Mi intencis atente ĉirkaŭstudadi mian novan patrion; do mi ekiris al la korto.

Post la longa, “L”-forma konstruaĵo mi vidis kelkajn grenej-similajn konstruaĵojn, pri kies destino ankoraŭ mi nenion sciis, sed tiom mi jam vidis, ke ili troviĝas en tre neglektita stato. Mi pensis, ke la behinoj ne scias konstrui.

Tiom pli mi estis surprizita, kiam malantaŭ tia domo mi vidis masonistan trabaron, kiu kovris sufiĉe bone aspektantan, konstruatan domon.

Sed la vera surpriziĝo sekvis nur nun.

Unu angulo de la konstruaĵo trans la trabaro jam estis preta, kaj la alia grupo de la laboristoj ĝin *detruadis* per hakpioĉoj!

Mi ne komprenis la interrilaton kaj, preninte al mi kuraĝon, demandis iun laboriston por kia celo servas la konstruaĵo.

Li respondis, ke ĝi estos loĝejo por la behinoj.

– Kial do vi detruas la pretan parton?

– Por ke ni ne estu senloĝejaj.

Mi gapis pro mirego. Plurfoje mi ripetis la demandon, sed li respondis ĉiam, ke la konstruita domo devas esti detruata, ĉar, se ĝi restus staranta, la homoj estus senloĝejaj.

– Mi tute ne komprenas, – deklaris mi fine.

– Mirinde, – li respondis, suspekteme esplorante mian vizaĝon. – Ĝi ja estas klara eĉ por la lasta skatolskuanto.

– Skatolskuanto? Kio estas tio?

La masonisto nun demetis la hakpioĉon kaj faris unu paŝon al mi.

– Ĉu eĉ tion vi ne komprenas? – kaj en liaj okuloj ekbriletis stranga lumo.

Mia tuta korpo frostotremis.

– Sed jes... nature... – mi balbutis teruriĝante, kaj subite mi turniĝis kaj forkuris. Feliĉe, la malsanulo min ne sekvis.

Nun jam senhalte mi rapidis en mian ĉambron, sed eĉ tie mi ne sentis min sekura, ĉar ĝi ne havis seruron sur la pordo.

Mi lasis la pordon malferme, por ke mi bone vidu la preterirantojn. Mi timis ĉion, kio sekvos, sed mi volis vidi ĉion por ke mi laŭeble restu malproksime de ili kaj sen skandaloj ellernu tiom, kiom estas necesa por eviti la insultojn.

Kiam mi kaŝe sidis en mia ĉambro, post kelkaj minutoj en la muro per si mem dekliniĝis malgranda tablo, kaj post tio tra la klappordo oni ŝovis sur ĝin pladon da manĝaĵo, kaj poste la pordo denove fermiĝis.

Do, la problemo de la manĝaĵo feliĉe solviĝis dank’ al la ĉionzorgaj hinoj, kaj mi bonapetite ekmanĝis. Ĉi tie mi ja vane demandus, ĉiuj estus konsternite forturniĝintaj aŭdante pri la “spiritualaĵo”, kaj mi eble mortus de malsato pro la “ketni”.

Post kelkaj minutoj preteriris virino sur la koridoro. Ŝi haltis antaŭ la malfermita pordo kaj ĵetis al mi rigardon. Ŝi tenis poŝtukon antaŭ sia buŝo (mi tiam ankoraŭ pensis, ke ŝia dento doloras), sed ankaŭ tiel mi rimarkis, ke ŝi ridetas.

Sed ĉio ĉi daŭris nur unu momenton, ĉar kiam ŝia rigardo trafis la manĝaĵon, ŝi ekkriis, svenis kaj terenfalas.

Mi saltleviĝis por helpi ŝin, sed jam aliaj ekscitite demandis unu la alian, kio okazis, kaj kiam unu el ili ekvidis sur mia tablo la manĝaĵon kaj en mia mano la kuleron, li kriegis al mi kun furioza mieno:

– Se vi spiritualaĵas, fermu la pordon, vi bivag!

– Oni devus eltranĉi la pulmon de tia ulo! – diris la alia.

El ie aŭdiĝis mallaŭta grumblo:

– Lamik...

La sango frostiĝis en miaj vejnoj. Jen la vorto, pro kiu mi devas tuj piki, nur mi ne scias kial. Miaj fingroj hezite manipulis per la tranĉilo.

Ekstere murmuro de konsterniĝo. Oni serĉis la grumblanton kaj rigardis min, kion mi faros.

– Tion oni tamen ne rajtas diri, – ekparolis unu.

– Li rajtas diri, kion li volas, – diris la alia.

– Ne rajtas.

– Rajtas!

– Kiu diris lamik?

– Vin ne koncernas la afero! – kaj li turniĝis al mi:

– Kia *beha* vi estas: *kona* aŭ *kemon*?

La mondo turniĝis antaŭ mi, kaj mi sciis nur, ke mi ion devas respondi por eviti la danĝeron, ĉar ĉi tie ĉio dependas de la vortoj.

– Kona, – mi diris aŭdace.

La vorto faris miraklon. La situacio tuj aliformiĝis. La amaso, kiu ĝis nun senescepte volis min formanĝi, disiĝis en du partojn. Unu parto intencis tuj disŝiri min, la alia parto, sub la gvido de la antaŭa demandanto, staris antaŭ mia pordo kaj klopodis ilin repuŝi. Sovaĝa blekado ekmuĝis, kaj baldaŭ eksplodis akra interbatado.

Mi pensis pri la svene kuŝanta virino, pri kiu ĉiuj forgesis. Mi petis ilin krie, ke ili ne tretu ŝin morta, sed ŝi malpli forgesis pri si mem, ĉar ricevinte la unuan piedbaton ŝi interrompis sian svenon kaj forkuris, kio min ne malpli surprizis, ol ĉiuj ĝisnunaj strangaĵoj.

Kaj sur la koridoro ĉiam pli kaj pli multaj miksiĝis en la batalon. Iu el miaj defendantoj tiel puŝiĝis al la pordo, ke ĝi klakante elŝiriĝis el siaj ĉarniroj, la vitrotabuloj tintante defalis, mi estis premita en angulon, kaj eĉ helpon mi ne povis voki, ĉar eble ĝuste per tio mi ofendas ian anebaon, aŭ similan. Verdire mi pleje deziris, ke ambaŭ partioj ekstermu unu la alian ĝis la lasta frenezulo, sed almenaŭ tiuj pereu, kiuj min volas bati.

Mia ĉi lasta deziro feliĉe plenumiĝis, ĉar post ĉirkaŭ kvinminuta vivriska batalo miaj atakantoj venkite forkuris kun sovaĝa hurlado.

Mia defendanto spiregante envenis al mi, sed vidante la manĝaĵon sur la tablo, li ruĝiĝante forturniĝis.

– *Kvari, kvari*, – li diris, kaj elirante li provis fermi la pordon, pro kio ĝi simple elĉarniriĝis kaj disfalis.

Nun mi, kaptite de subita ideo, ĵetis la litkovrilon sur mian manĝaĵon, kio fakte subite solvis la situacion. Mia vizitanto afable ridetante revenis kaj metante sian fingron sur sian nazon, spiregadis varman price-prucon kaj post reciproka grato de niaj postaĵoj, estiĝis inter ni tre amika humoro.

Mi havis definitive la senton, kiel dum sorĉista prezentado, kiam la sorĉisto diras: “hokus-pokus”, kaj el la cilindra ĉapelo elflugas kolombo. La spektanto nur ne scias, kiaspeca rilato estas inter la hokus-pokus kaj la kolombo.

Malgraŭ la konfuza situacio mi klopodis konduti laŭ ĝentilhoma maniero. Kelkvorte mi pardonpetis, ke mi ne povas esprimi la agrablan senton pro liaj agoj, sed sincere konfesante mi estas fremdulo, kaj en la hina lingvo al tio ne troviĝas esprimo.

Nur poste mi ekkomprenis, kian danĝeron povus kaŭzi mia sincereco, ĉar per tio mi konfesis ja tion, ke mi tute ne havas ideon pri la esenco de la kona, kaj mi tamen deklaris min kona antaŭ kelkaj minutoj.

Sed la behina kolonio estas la patrio de la surprizoj.

Nome, mia vizitanto, anstataŭ riproĉo, per gaja rideto esprimis sian ĝojon, ke mi jam komence konfesis min kona, kio pravas, ke mi tuj trasentis la *boeton*, kiun la kona donas.

Mi jam nun anticipas, ke pri la esenco de la boeto, mi neniam akiris ian ajn konon, same, kiel ili mem. Kio ĝi estas, neniue scias, ili nur diskutas, ĉu la kona, aŭ la kemon donas la veran boeton. Ĉirkaŭ tiu problemo elformiĝis la du partioj, aŭ mi ne scias, kiel nomeblaj grupoj, kiuj senĉese kverelas.

Mia nova konatulo klarigis, kiel oni nomas tiun senton, kiun ni havas, kiam nia malamiko kuŝas sur la tero aŭ kiam nin maljuste batas plifortulo; kion ni sentas kontraŭ tiuj, kiuj batalas kune kun ni; kian senton vekas la ekvido de la spiritalaĵo aŭ kion ni sentas kontraŭ betiko aŭ bivago.

Tiamaniere mi multon lernis, kiel ekzemple la vortojn ĝojo, ĉagreno, danko, gloro, malvenko, konsterniĝo, respekto, ktp. Mi komprenis, ke la kvari signifas specon de pardono, ketni estas vivregulo, kave estas simila al honto, sed ankaŭ tiuj ne tute konformas al la traduko kaj la ceteraj absolute ne havas respondaĵojn en la angla lingvo. Kion signifas la vake, elak, betik, bilev, lamik, borema, boeto, bivag, tion mi nek tiam, nek poste eksciis, vane mi demandadis. Ankaŭ ili tute ne sciis, nur klarigadis, ke ekzemple malrespekti la anebaojn estas malpermesata, ke oni devas humile konduti kontraŭ la betikoj, sed pri la esenco neniue sciis ion kaj eĉ demandi estis maldeca, ĉar tiam oni rigardis min suspekta.

Ĝuste tio karakterizas iliajn vortojn, ke oni ne nur ne rajtas pridubi ilian verecon, sed eĉ pripensi estas malpermesite. Oni devas nur kredi, sed ili ofte eĉ ne diras, kion kredi, nur kredi.

La situacio forte rememorigis min pri niaj frenezulejoj, kie oni same sentas la ĝojon, dankemon, amon, malamon, respekton, sed unu ĝojas, se li blupentras sian nazon, alia adoras anserplumon, alia indigne atakas la trian, se tiu ne volas trifoje kliniĝi antaŭ la akvokrano kaj diri “abrakadabra”, sed se tiu diras la abrakadabron, li ricevas mankison.

Kaj tiaspecaj abrakadabroj ĉi tie troviĝis multegaj, ekzemple la vorto “kona” mem.

Nome, mia defendanto, kiu cetere nomiĝis Zemoki, trankviligis min, ke mi ne timu, kaj se mi estas ie ajn minacata de atako, mi nur ekkriu: “vake kona!”, post kio multaj, apartenantaj al la kona, venos min helpi, kiuj ĉiuj estas bravaj kaj heroaj behinoj, dum la partianoj de la kemono estas aĉuloj, kiuj malamas la konaanojn, sed li ne povis diri kial. Li diris nur, ke la kemonanoj kredas, ke la kemono donas la veran boeton, kvankan estas ĝenerale sciata, ke ekster la kona eĉ paroli oni ne povas pri vera boeto. Ĉiuj erarvagadas, kiuj ne rekonas tion. Tial mi devas malami la kemonanojn.

Poste, per neatendita ŝanĝo, mi ricevis la instrukcion, se mi ekvidos cirklon desegnititan sur la muro, mi forgratu ĝin, kaj al ĉiu loko mi klopodu desegni kvadraton. Cetere, se iu, kiu desegnas kvadratojn sur la muroj, estas atakata de la kemonanoj, mi ne hezitu tuj helpi al li, ĉar ni devas kunlabori por la defendo de la kvadrato kaj, se necese, eĉ nian vivon oferi por la anebaoj.

Mia nova amiko adiaŭis per varma pricc-prucc, kaj mi intencis iome refreŝigi mian konfuzitan kapon.

Mi malfermis la fenestron, poste mi volis varmigi mian malvarmiĝintan manĝaĵon, kiu estis vera problemo, ĉar la kaduka elektra kuirforno ne volis funkcii.

Sur ĝia rompiĝinta kroĉilo mi sukcesis tiom riparadi per mia poŝtranĉilo, ĝis fine ĝi emis varmigi, sed tiam ĝiaj rompiĝintaj piedoj kolapsis. Fine mi laŭcirkonstance sukcesis ilin apogi; mi varmigis mian vespermanĝon (la pordon mi kurtenis per la litkovrilo), kaj, konsiderante la kondiĉojn, mi bonapetite satiĝis. Feliĉe, tiam mi ankoraŭ ne sciis, kiel mia kuirforno fariĝis tiom kaduka.

La Leganto eble trovas amuza la idiotaĵojn apenaŭ kredeblajn en Eŭropo. Eĉ ĉe ni ofte okazas, ke la frenezulo formanĝas sian poŝtukon, aŭ sin imagas kazea kuko, aŭ malpaciĝas kun la alia, ĉar tiu ne kredas, ke la kolbaso estas reĝa sceptro, tamen, ĉe ni eĉ inter la frenezuloj ne estas imageble, ke por neekzistantaj aferoj ili per pena cerbolaboro faru sensencajn vortojn, pro kiuj, kaj pro sensencaj geometriaj figuroj, la tuta frenezulejo pereigus kaj ekstermus unu la alian.

Do, la Leganto plenrajte povas dubi pri mia verdiremo kaj supozi, ke eble mi aŭdacas por facila efekto kolorigi mian vojaĝ-priskribon per aferoj, kiuj eble ne tute konformas al la vero, laŭ la metodo de kelkaj vojaĝantoj, kiuj por fanfaroni per siaj geografiaj kaj etnografiaj konoj kaj fidante je la malfacila kontrolebleco de siaj rakontoj, ofte trouzas la kredemon de la legantaro. Mi timas, ke la dubo de la Leganto eĉ kreskas dum la sekvontaĵoj; tial mi deklaras, ke mi multfoje trarigardis miajn vojaĝnotojn, kaj mi skribis en mian libron prefere pli malmulte ol kiom estis la efektiva vero.

Sed tio estas certa, ke post la vesperiĝo de la unua tago mi ĝemante rememoris pri la “teruraĵoj” dum la “stagnanta” vivo inter la hinoj. Mi estis soifa je okazoj, nu, mi do ricevis ilin, mi nur povu elteni per nervoj!

Deka ĉapitro

La aŭtoro aliĝas al la konao, kies signifo ankoraŭ ne estas klara al li. – Lia spiritalaĵo estas perforte forprenata. – Li ricevas strangan postenon. – La groteska teorio de la behinoj pri la nutreco de la ŝtoneroj. – Ni ekscias la signifon de la vorto “lamik”. – La strangaj ekonomiaj opinioj de la behinoj. – La fendologio.

Post kelkaj tagoj Zemoki enpaŝis en mian ĉambron kun mieno radiantanta de la ĝojo kaj tutkore gratante mian postaĵon li sciigis, ke min trafos granda ĝojo. Je miaj ekscititaj kaj ĝojplenaj demandoj mi ricevis la respondon, ke mi estas akceptita en la konao.

La respondo min iome malvarmigis; malcerte mi demandadis pri ĝia praktika valoro, sed mi ricevis denove la respondon, ke esti konaano estas granda feliĉo, ĉar tio donas la veran boeton. Kaj al la demando, kio estas la boeto, li respondis, ke la akiro de la boeto estas ĝojo kaj feliĉo.

Do, per tio mi denove ne iĝis pli saĝa, kaj anstataŭ feliĉo mi sentis konfuzon, sed tion mi ne kuraĝis tre laŭte publikigi. Jam nun mi rimarkas, ke la boeto estas same senenhava vorto, kiel la ketni: ia ago estas ketni, ĉar oni devas ĝin fari tiel, kaj inverse: tial oni devas ĝin fari, ĉar ĝi estas ketni. La plej ĉefa karaktertraĵo de iliaj konfuzaj stultaĵoj estas ĝuste tiu *circulus vitiosus*, tiu argumentado per si mem, malhavanta la fiksan punkton, per kiu ĝi alkroĉiĝas al la koordinatoj de la reala vivo.

Do, mi, tiel elmetita al iliaj kapricoj, ne tre kuraĝis diskuti, sed eĉ simulante ĝojon, mi demandis singarde, kiel mi devas kondukti por akiri la favoron de la boeto. Zemoki min trankviligis, ke li ĉion aranĝos, kaj foriris. Poste li revenis kun iu alia amiko, kiu – kiel mi eksciis, – nomiĝis Zeremble.

Zemoki kaj Zeremble vokis min por plenumi mian adeptiĝon. Ni trairis sur la granda korto kaj enpaŝis en malproksiman konstruaĵon, tra pordo, kies supra parto estis tiom kovrita de lignotabuloj, ke ni devis kliniĝi. Mi eĉ ne konjektis, kial ĝi estis farita tiel.

Nun ni venis en tre strangan ĉambron, kie eĉ unu meblo ne estis en tiu loko kaj stato, kiel ĝi devus esti. Mi vidis tablon, el kiu restis nur ĝia framo, sen la supra tabulo, sed ĝi havis dorsparton, simile al la seĝoj. El la malplena framo sur ŝnuroj pendis flavaj ŝtoneroj. Sur la dorsparto vidiĝis la makuloj de diversaj farboj, el kiuj tiriĝis defluaj strioj ĝis la tablo.

Alia tablo staris renverse, kun la piedoj supre, kaj la piedoj estis kovritaj per stranga litotuko, sed kiu jam estis uzebla nek por litotuko, nek por tablokovrilo, ĉar ĝi estis plene truita kaj tra la truoj estis tra- kaj trapelektita dika bastoŝnuro, sur kies finoj pendis flavaj ŝtoneroj.

Malantaŭ la tablo staris seĝo. La rando de ĝia sidplato estis breĉita kaj pintigita tiel, ke la femuroj de la sursidanto estis en la plej granda danĝero; ĝi havis trioble tiel grandan dorsapogilon ol kiel necesas, kaj ankaŭ tio estis senorde skulptita, kaj sur la sidplato dornoj estis fiksitaj, ke oni eĉ sursidi ne povis.

Entute la ĉambro faris la impreson, kvazaŭ ĉio estus ruinigita de vandaloj, aŭ kvazaŭ mi estus veninta en la hejmon de furiozantaj fantomoj.

Mian koron kunpremis angoro kaj abomeno, kaj min turmentis malbonaj antaŭsentoj. Time mi demandis Zemokion:

– Kio okazis ĉi tie?

Zemoki miris, per grandaj okuloj, komence li ne komprenis mian demandon, kaj nur malfacile mi eksciis, ke la ruinigon faris ne malamika armeo, sed la posedantoj mem. Al mia demando, kial ili tion faris, li respondis:

– Ĉar tiel ĝi estas *kipu*.

Do, alia nova vorto, eltrovita por pruvi per tiu alian stultaĵon. Nome, mi jam avertas la Leganton, ke li ne serĉu ian ajn sencon en ĉi tiu vorto. Ankaŭ ĝi estis unu el tiuj sensencaj vortoj, kies signifon neniu scias, sed por kiu devis ĉiu suferi, mizeriĝi kaj vivi en malkomforto.

La ekscio, ke la ruinigon faris ili mem, eĉ plifortigis mian malbonan antaŭsenton pri mia estonto.

Post kelkaj minutoj en la fono malfermiĝis pordo, kaj tra ĝi enpaŝis stranga homo. Desur liaj genuoj pendis la jam menciitaj kuprokuboj, do ankaŭ li estis betiko. De sur liaj ŝultroj pendis granda, akrakolora teksaĵo, kion kun iom da bonvolo oni povus rigardi pluvmantelo kaj verŝajne ĝuste tial ĝi estis plene truita, senorde entranĉita kaj plenpendigita per vitrorompaĵoj, por ke eĉ por tiu celo ĝi ne estu uzebla.

Nun la betiko ligis sub siajn plandojn du grandegajn ladajn telerojn, paŝis antaŭ min kaj murmurante nekompreneblajn vortojn, ekbatis mian kapon per malplena lada kuglo.

Mi, vidante, ke la ĉeestantoj tute ne ridis pri la groteskaĵoj, ne kuraĝis ekridi. Ili rigardis la tutan scenon kun kortuŝa soleneco kaj ekkriis vake-vake, kiam la telerplandulo aperis.

Post la fino de la manipulo ĉiu ĉirkaŭis min, gratis mian postaĵon kaj tre ĝojis, ke mi iĝis kona, kio, laŭ ilia aserto, estas granda ĝojo, ĉar mi tiel sukcesis akiri la veran boeton.

Ankaŭ mi ĝojis, ke ĝi tiel facile finiĝis, ĉar post la antaŭaĵoj mi atendis multe pli malbonajn aferojn. Bedaŭrinde mia ĝojo estis tro frua, kiel la Leganto baldaŭ vidos. Sed mi ne volas rompi la kronologian vicordon.

Elveninte de la betiko, mi jam ne povis retenigi mian rideton. Nome, mi rememoris pri mia fileto, kiu ĝojis kaj ĉarme aplaŭdis, se li ricevis frandaĵon, kaj mi imagis la konfuzoplenan vizaĝeton, kiun li estus montrinta, se mi dirus al li: “Ĝoju fileto, vi fariĝis kona kaj vi sukcesis akiri la veran boeton!”. Evidente, li havus la plej malbonajn konkludojn pri la cerbo de sia patro. En kia mallumo vivas la plenkreskuloj rilate eĉ al la infanoj de la glora angla ŝtato!

Dumvoje mi serioze demandis Zemokin, kian profiton mi havos el tio, ke mi iĝis kona. Mi postulis, li diru fine ion pozitivan, ne menciadu ĉiam nur la boeton.

Iliaj freneziĝintaj cerboj tiom senkorpiĝis en la fantasmagorioj, ke li komence tute ne komprenis la esencon de mia demando. Li asertadis, ke la anebaoj, al kiuj apartenas la kona, boeto, ketni, kipu kaj ceteraj fantomoj, ĉiuj estas pozitivaj realaĵoj, ĉar ili subtenas la homaron, kiu sen ili ne povus vivi. Kiu ne trasentas la anebaojn, tiu estas bivago, al kiu eĉ klarigi estas vane. Li deklaris ankoraŭ, ke la bivago estas perdita homo, en kiu mankas la enhavo.

Nur post longa penado mi sukcesis lin tiri sur la grizan, sed certan fundamenton de la reala vivo, ĝis fine li elbuŝigis la unuan konkretaĵon:

– Estonte ankaŭ vi rajtos partopreni en la *bukuo*.

– Kio estas buku?

– Vi rajtos batadi la kemonanojn, se ili sur la muroj desegnos siajn aĉajn cirklojn, aŭ se ili malhonorigas la kvadraton.

– Kiel oni povas malhonorigi geometrian figuron?

– Tiel, ke oni forviŝas ĝiajn pintojn, aŭ desegnas en ĝi diagonalojn.

Mi troviĝis en iom da embaraso.

– Nu, kaj poste? – mi demandis post iom da paŭzo.

– Kia “nu kaj poste”? Aŭ ĉu vi povus toleri, ke en la kvadraton oni desegnu diagonalojn?

Se konfesi sincere, mi ja estus kapabla por tio. Sed el la tono mi konjektis, ke pli konsilinde estas respondi per neo, do mi klopodis protesti kontraŭ tia kalumnia supozo. Mi deklaris, ke mi tuj eltretus la intestojn al tiu, kiu desegnos diagonalojn en la kvadraton. Tio evidente restarigis mian

ekŝancelitan reputacion. Zemoki trankviliĝinte deklaris, ke mi estas brava homo, kvankam mi tute ne konjektis kial. Almenaŭ tiom mi eksciis, ke mi estas inda por tio, ke la betiko ektuŝu mian nazon, kio estas, laŭ ili, tre bona afero kaj kiu okazas nur kun tre bravaj konaanoj.

Min multe pli interesis, la interbatado, kiel nova danĝero, sed kiam mi demandis pri ĝi, li respondis:

– Ĝi ne estas interbatado, ĝi estas bukuo.

– Antaŭe vi diris, ke mi devas bati la kemonanojn, kial ĝi ne estas interbatado, se ni devas bati unu la alian?

– Ne unu la alian, sed la kemonanojn.

– Kaj, la kemonanoj la konaanojn.

– Jes.

– Nu, kial ne unu la alian?

– Ĉar ni batas ne nin mem, sed la kemonanojn. Tio ja estas io alia. Ĝi ne estas interbatado, sed bukuo, kiun trafenbras la boeto. La interbatado estas aĉa afero, kiun ketnia homo ne faras, dum la buku estas por tio, ke ĝi faru la homon pli bona kaj nobla kaj evoluigu la solidarecon kaj la reciprokan respekton.

Mi demandis ankaŭ duafoje, sed evidentiĝis, ke mi bone komprenis. Ĉi tiuj firme kredas, ke ili tiel estas solidaraj kaj tiel respektas unu la alian, ke ili per bastonegoj draŝas al si reciproke la kapon.

Minutojn daŭris, ĝis mi sukcesis aranĝi miajn pensojn. Ne tial, kvazaŭ dum sola momento mi dubus pri la valoro de miaj privilegioj, sed la plej grava problemo por la sana cerbo estas kontraŭ la manuloj tiel sin esprimi, ke oni lin ne mortbatu kaj tamen li parolu logike. Ankaŭ poste min ofte endanĝerigis tiu eco de la sana cerbo, ke ĝi povas nur rekte iri facile kaj se ĝi provas lami, terenfalas. Vere, la behinoj ofte aperis al mi kvazaŭ talentaj, ke ili scias lami tiel rutine.

Do, ankaŭ nun mi respondis, ke el la vidpunkto de la kona eble plej oportune estus tiel venĝi sin je la aĉaj kemonanoj, ke ni tute ne zorgas pri la kvadrato. Ili nur stumpigu ĝin kaj endesegnu diagonalojn laŭplaĉe. Se ni ne reagos, ili mem krevos pro kolerego.

Zemoki kaj Zeremble konsternite rigardis unu al la alia kaj deklaris, ke nur mia nescio povas min senkulpiĝi, ĉar la cinika ofendo de la anebaoj estas granda peko, kaj per miaj vortoj mi elmetis min al la suspekto, ke mi kunsentas kun la kemonanoj.

La senfrukta penado vere muelis mian cerbon. Nur malfacile mi povis bridi mian ribelantan sanan cerbon, kaj mi promesis, ke mi klopodos alproprigi la kapablon pri la anebaoj.

Mia plej granda zorgo estis kiel eviti la minacantan interbatadon, do mi demandis:

– Kiel komenciĝas kutime la buku?

– Tiel, – respondis Zemoki, – ke la aĉaj kemonanoj enpenetras niajn ĉambrojn kaj frakasas niajn elektrajn kuirfornojn, post kio ĉiuj bonmoralaj konaanoj same enpenetras al la kemonaj ĉambroj kaj disrompas iliajn kuirfornojn. Sed okazas kelkfoje ankaŭ tio, ke la impertinenta sinteno de la kemonanoj provokas nian justan indignon kaj trudas al ni la bukuon. Tiam ni frakasas iliajn kuirfornojn, kaj poste ili la niajn.

Konsternige mi eksciis, kial mia kuirforno estas en tiom kaduka stato. Mi ankoraŭ demandis, kial oni devas fari tiun reciprokan teruran detruon.

– Nu, oni ja devas defendi la familian kuirfornon! – li respondis per la plej natura voĉo.

Post tio ni disiĝis, kaj mi enlitiĝis kun premaj sentoj. Fine mi decidis, ke mi estonte simple ne miksiĝos inter ilin, sed tiel, sendependiĝinte de ili, sen danĝeroj mi pasigos la duonjaran eksperimentan tempon, post kio mi liberiĝos. Feliĉe, ekstere ankoraŭ ekzistas la prudentaj hinoj,

kiuj ĉiutage endonas mian manĝaĵon, do, mi enfermiĝinte en mia ĉambro, pasigos en la korto nur la plej necesan tempon, kaj eĉ tie mi ne kontaktiĝos kun ili.

Ho, se mi tiam antaŭsentus la sekvontaĵojn, verŝajne ne estus veninta al miaj okuloj tiu trankviliga dormo, kiu baldaŭ min kaptis!

Ĉar la frenezo de la behinoj estas la plej terura el la danĝeraj epidemioj. Dume ĉe ni oni konas nur la hazardan infekton, ĉe la behinoj mi devis ekkoni la intencan infekton. Nome, oni ne povas de ili sin izoli, ili iras post la homo kaj devigas lin kune freneziĝi. Vane provas la sana cerbo la izoligon, vane oni promesas al ili, ke li silentos malgraŭ sia ĝusta sento kaj rigardos sen helpa vorto ilian memmortigan frenezdancon. La frenezumo estas ĉi tie ĝenerale deviga regulo. Kaj se temus nur pri la kredo de la anebaoj kaj ceteraj maniaĵoj, oni povus transnaĝi la tuton per tio, ke oni senĉese jesas al ĉiu afero.

Sed ilia frenezo kaŭzas konkretajn fizikajn suferojn al la anoj, el kiuj ne estas rifuĝo, kiel mi jam la sekvantan tagon devis sperti malĝoje.

Ĉar la postan tagon, post kiam tra la muro mi ricevis mian tagmanĝon, apenaŭ mi alsidiĝis, kiam Zemoki enpaŝis kun ĝojradianta mieno, akompanate de du aliaj kunuloj kaj komunikis, ke min trafis denove granda ĝojo.

Sur mia frunto elgutis terurŝvito, pro la nova granda ĝojo, kaj ne senmotive, ĉar Zemoki deklaris, ke la konsilantaro de la betikoj permesis al mi partopreni el la boeto kaj deponi mian spiritualaĵon.

Poste li ligis tukojn sur la okulojn de siaj kunuloj, kiuj palpiris al la manĝaĵo, tiun kovris per alia tuko kaj simple forportis.

Konsternite mi rigardis post ili; mi volis diri, ke mi ne povas resti malsata, sed ĉiu vorto pri la manĝado estas kave, pro kio ili indigniĝas. Do, mi balbute kaj ĉirkaŭdire klarigis al Zemoki, ke sen spiritualaĵo – laŭ mia opinio, – mi devos morti.

Zemoki bonvole respondis, ke la spiritualaĵo – laŭ ĝenerala scio – estas nur ŝarĝo por la vivo, dum la boeto por la honestaj kaj virtaj konaanoj estas ne ĉagrenaĵo, sed senfina ĝojo, mia spiritualaĵo nun ja venas al la betiko, per kio ĝi puriĝos senmakula kaj ŝanĝiĝos en la substanco-similan manifestiĝon de la ekzisto de la bikru. Per tio do mi servas la konaon, la ketni-on, la kipu-on, – do, se mi partoprenas en la favoroj de la boeto, ĝi signifas plezuron kaj honorigon al mi mem.

Mi devas konfesi, ke tiu plezuro min ne tute kontentigis, ĉar temis pri mia vivo.

Mi ne lasis Zemokin foriri, sidigis lin kaj petis lin eltrovi rimedon, ke mi povu partopreni ankaŭ en la favoro de la spiritualaĵo; fine tamen ne estas refuteble, ke ĉiuj homoj kulpas per tio.

La intima kunesto malligis ankaŭ la langon de Zemoki kaj li flustre konfesis al mi, ke bedaŭrinde eĉ li mem kutimas ĉiutage kulpi spiritualaĵon, kaj li promesis esti je mia helpo, nur petis min diskrete gardi liajn antaŭajn vortojn.

Mi certigis lin pri mia diskretemo, post kio ni detale pritraktis la aferon, kaj li konsilis, ke mi, volante partopreni en la spiritualaĵo, faru ian utilan laboron, ĉar mi tamen ne povas deziri, ke la betikoj nutru min senpage.

Pri tio mi ege miris, ĉar ĝenerale estas konate, ke la spiritualaĵon donas la hinoj, do, ĉi tie ĉiu vivas senpage kaj, se ni tamen serĉas distingon inter pago kaj senpageco, tiam nur la betikoj povas esti senpage vivantaj, ĉar ili simple forprenas mian spiritualaĵon.

Kiam mi komunikis ĉi tiun mian opinion, mi ricevis responde tian riproĉon, kvazaŭ mi mem estus forprenanta ilian spiritualaĵon. Li deklaris, ke tute male: kiel la abeloj sian mielon ricevas de la abelkulturisto, same ni ricevas de la betikoj nian spiritualaĵon.

Mi ne povis kredi al miaj oreloj, mi pensis, ke li erarŝanĝis la vortojn, sed, kiel evidentiĝis, ili fakte kredas, ke la abelkulturisto donas la mielon al la abeloj, kaj pro tio ni ĉiuj ŝuldas dankon al niaj

betikoj, kaj mi nur pripensu, kio okazus, se iutage la betikoj ĉesigus siajn funkciojn kaj ni ĉiuj mortus pro la malsato.

Al tio mi respondis, ke mi mem vidis per miaj propraj okuloj, ke la spiritaliaĵon donas la hinoj, sed li responde konsilis pli atenti pri miaj vortoj kaj ĉesigi la argumentadon per miaj okuloj, ĉar vera konaano ne povas diri tiajn kaveajn aferojn. Ni devas kredi, ke la spiritaliaĵon donas la betiko kaj ankaŭ, cetere, la homo havas ne nur okulojn, sed ankaŭ *bruhuo* kaj ĉi tiu estas pli grava.

La bruhuo signifas same neestantan aferon. Kompreneble la lingvo servas priskribi nur konceptojn, kiuj havas ian estantan esencon, do, mi povas nenion diri pri ĝia esenco, mi priskribos nur tion, kiam ili ĝin uzas:

La bruhuo estas la fina kaŭzo de la tuta kontraŭnatura mondkoncepto kaj vivmaniero.

Ekzemple, la difektado de la seĝo estas bezonata, ĉar ĝi estas kipu. Vakeon vekrii estas necesa, ĉar ĝi estas ketni, la kvadraton malhonorigi estas malpermesite, ĉar la kvadrato estas aneba kaj, se la sana cerbo demandas, kial entute necesas la ketni, kipu kaj anebaoj, tiam ili respondas: “Ĉar la homo havas bruhuo”. Do la bruhuo bezonas ĉian tian aferon, kiu por la homo mem tute ne estas bezonata.

Laŭ ĉi tio estas memkomprenebla la supozo, ke la bruhuo kiel prakaŭzon ni traduku per paranojo, sed la malsano de la behinoj superis la simptomojn de la paranojo kaj ankaŭ, cetere, ili parolis pri la bruhuo ne kiel pri stato, sed kiel pri io estanta, eĉ pli; kiel pri io samtempe estanta kaj neestanta. Nome, se mi demandis, kiel aspektas la bruhuo, ili konsternite rigardis min, nomis min bivag, sed ĝian formon ili ne povis priskribi.

Do Zemoki proponis bonvole, ke li helpos al mi akiri utilan okupiĝon, kaj ĝis tiam li donos al mi iom el sia spiritaliaĵo.

Post kelkaj tagoj li fakte kondukis min al iu betiko, kiu, konsidere al la persono de Zemoki, akceptis min tre afable. Mi klopodis, prenante mian dekstran piedon, superkriegi eĉ Zemokin per la vake-vake-veado, post kio li, nomante ankaŭ min kaleb, interesiĝis pri la kreskado de mia nazo kaj favore deklaris, ke li estas ema doni al mi oficon de beratnu, kvankam multaj bravaj konaanoj konkuras pri tiu posteno, eĉ tiaj, kiuj per mortobato de pluraj kemonanoj pruvis siajn kapablojn koncerne la anebaojn.

Per tio mi okupis mian postenon.

Tion, kion mi devis fari, mi priskribas kun hontruĝa vizaĝo. Mi konjektas, ke miaj sampatrianoj min malestimos, ĉar mi, estante angla ŝtatano, tamen tiom profunden mergiĝis. Nur tial mi ne povas prisilenti la okazintaĵojn, ĉar mia firma intenco estas ĉion rakonti rekte, sincere, konforme al la realo, dece al angla ĝentilhomo, eĉ se la verdiremo malutilas al mi.

Por mia senkulpigo mi mencias nur tion, ke mi estis devigata fari tion, krome mi estus elmetita al la malsato. Por trankviligi miajn samlandanojn, mi deklaras krome, ke mi neniam forgesis mian honoran devon al mia patrio, pro kio mi, en mia senhonora stato, neniam malkaŝis mian devenon al la behinoj kaj, se mi pri tio estis demandita, mi ĉiam deklaris min esti amerika ŝtatano.

Esperante ke mi sukcesis iom repacigi miajn amatajn samlandanojn, per mia korekta konduto, mi provas priskribi mian postenon. Tiu konsistis el du taskoj: la unua estis, ke en ĉiu tria tago oni pendigis al mia kolo strangan pecon de teksaĵo, truitan ĝis ĉifoniĝo, kaj mi devis ĉirkaŭporti brilan kvadraton sur la korto, dum antaŭ mi iris telerplanda betiko kun lada skatolo inter siaj manoj, kaj ĉirkaŭ mi oni ludis kanton per muzik-instrumentoj. Ia aparato disblovis malbonodoran gason, kaj fine mi devis ĵeti unu tre bonan vestaĵon en fajron.

Mia dua tasko estis la disdono de la flavaj ŝtoneroj. Mi scias, ke la Leganto jam antaŭe ridas kaj nekredeme akceptas miajn vortojn, sed, se mi volas persisti je la vero, mi tamen devas priskribi ĝin. Krom mia veremo min instigas al tio ankaŭ mia entuziasma patriotismo, ke per la konatigo de la

stultaĵoj de ĉi tiu senkultura kaj idiota hordo mi instruu miajn sampatrianojn al la respekto de la prudenta Granda Britio.

Do mia laste menciita tasko konsistis el tio, ke mi devis kolekti flavajn ŝtonerojn, kiujn en difinitaj tagoj mi portadis en la jam menciita lada skatolo, laŭte tintigante per skuado. Poste la betiko paŝis apud mi kaj, dufoje ekfrapante ties flankon per elmetita ŝtonero, mansignis, ke mi disdonu la enhavon. Kaj mi, malfermante ĝian fermoplaton, donis al ĉiu po unu pecon. La homoj pro tio, deliraj pro ĝojo, kaptis siajn dekstrajn piedojn per la mano, vake-vakeis kaj kaŝinte la flavajn ŝtonerojn sub siaj akseloj, disiris.

Kvankam jam tiu farso mem estas tre komika kaj superas la plej groteskan karnavalon, tamen la plej komika estas la klarigo: nome, tiuj malfeliĉuloj kredis, ke la flava ŝtonero tenata sub ilia akselo estas *nutra*, eĉ ili estis konvinkitaj, ke ĝi subtenas la vivon, la homan korpon, kaj ili benis pro tio la betikojn. La manĝon, kiel ni scias, la publika opinio malestimis kaj hontis, kvankam ja ĉiu manĝis. (La vorto “spiritualaĵo” servis por narkoti ilian konsciencon.)

Sed ilia manio ne elĉerpiĝis per tio. Aldomiĝis eĉ la kredo, ke nur tiu ŝtonero estas nutra, kies skatolo estis tuŝita de la betiko. Kiam mi ĝin kolektis, tiam ĝi ankoraŭ ne estis nutra.

Kaj ĝi nutris nur sub la akselo. Ili ĝin ne nur ne englutis, sed jam tuŝi ĝin per la buŝo signifis malhonorigon de la ŝtonero. Ĉe ili eĉ la ŝtonero estis malhonorigebla, ĉar, kiel ni scias, la manĝado kaj la buŝo estis hontindaj aferoj. Mi mem vidis juĝan proceson, kiam iu behino estis akuzita, ke kun flava ŝtonero sub sia akselo, li manĝis buterpanon. Kaj la juĝistoj tute seriozmiene priaŭskultis aron da atestantoj, sed tiuj refutis, ke la afero tiel estus okazinta. Tamen la akuzito estis kondamnita, ĉar pruviĝis, ke li, kun la flava ŝtonero sub sia akselo, menciis la buterpanon, per kio la ŝtonero jam estis malhonorigita. Ĉar estis regulo, ke tiam estas malpermesite eĉ pensi pri la spiritualaĵo.

Sed la frenezo de la subakseligo de la ŝtonero min tre incitis, kaj foje mi riskis antaŭ Zemoki la opinion, ke eble ĝi tamen ne estas nutra. Por pruvo mi argumentis, ke neniu vivanta estaĵo en la mondo nutriĝas ĉi-maniere. Sed Zemoki klarigis, ke ĝuste tiu fakto pravas la ŝtonerteorion, ĉar la homo havas bruĥon, do li ne apartenas al la vivantaj estaĵoj de la mondo, kaj li kompreneble havas tute aliajn bezonojn.

Mi respondis, ke laŭ tio, kiel mi ekkonis en la universitato de Oksfordo la anatomion de la homo, ĉiu nia organo, de la stomako ĝis la haroj, bezonas nutraĵojn kaj ne flavajn ŝtonerojn.

Sed Zemoki min atentigis, ke mi denove argumentas per miaj okuloj kaj spertoj, kio ne estas konsilinda, kaj li insiste min avertis eviti singarde la pridubon de la ŝtonernutriĝo, ĉar tiu estas ankaŭ aneba, kaj la behinoj estas tre ĝeniĝemaj koncerne sian bruĥon kaj similajn insultojn, ili jam ofte sange venĝis al pluraj lamikoj.

Jen mi denove aŭdis la danĝeran vorton “lamik”, pro kies mencio mi devas kapti tranĉilon, kaj pri kies signifo ankoraŭ tiam mi ne havis konjekton.

En tiu momento Zemoki dolorplene ekhurlis vake-vakeon, kaj alrigardante mi vidis proksimiĝi mian propran telerplandulon, antaŭ kiu iris alia behino kaj per verŝilo akvumis la herbaron.

Kompreneble ankaŭ mi ekkaptis mian piedon per la mano, kaj ni ambaŭ vetkriadis, ĝis la arlekena figuro malaperis. Poste mi demandis, kial oni akvumas la herbejon antaŭ mia betiko, sed li povis nur respondi, ke ĉar li estas betiko. Al mia demando, kial la betiko bezonas la akvumadon de la herbejo, li same respondis: “Ĉar li estas betiko.”

Mi gapis al li senkonsile, kaj li klarigis, ke ekzistas ankaŭ pli elakaj betikoj, antaŭ kiuj akvumadas eĉ du-tri behinoj. Ĉar ili estas – betikoj.

Mi jam kuraĝis nur tre mallaŭte kaj timeme esprimi mian opinion, ke la akvumo estas eble tamen ne la plej utila laboro.

– Rekonu, – li respondis, – ke vi ne rajtas tion aserti!

– Kial?

– Ĉar vi estas beratnu, kaj beratnu ne rajtas tion diri.

Do ne tial, ĉar ĝi ne estas vera, sed ĉar mi estas beratnu!

Nu mi preferis silenti kaj nur daŭrigi la disdonon de la flavaj ŝtoneroj.

Pli poste mi sukcesis konatiĝi eĉ kun pli fantaziaj okupiĝoj. El tiuj mi mencias nur pri la “Rust-Mezura kaj Registra Ofico”, al kiu mi ankoraŭ revenos en sekva ĉapitro.

Inter la strangaj postenoj mi devas mencii la figurgardistojn. En la korto, sur la pinto de iu lignokolono polurita lada kvadrato estis dratfiksita, Sub tiu senĉese, alterne nenifaradis du behinoj, kiuj prigardis, por ke ne provu iu ajn impertinenta kemonana fripono ŝtonĵete aŭ per maldecaj esprimoj senhonorigi la ladaĵon.

Laŭ sana cerbo plej oportune estus ĵeti la tutan ladan brokantaĵon al la rubaĵo, por ke ne estu kion ŝtonĵeti kaj gardi, sed nature, mi jam ne kuraĝis tiel rektan kaj sinceran opinion laŭtigi. Do, mi foje demandis al Zemoki nur tion, ĉu ne estus pli bone prefere doni ian laboron al la gardistoj, kio pli utilus al la kona. Zemoki indignite min saĝigis, ke ili faras por la gloro de la kona la plej honestan kaj utilan laboron.

Mi silentiĝis kaj klopodis laŭtigi mian konvinkiĝon, ke tia honesta estimo de la laboristoj ankaŭ por mi estas tre agrabla.

Sed vane, inter la behinoj ne eblas aserti ion sen la ofendo de iaspeca fantomo, ĉar nun mi tial ricevis riproĉon, ĉar mi nomis la figurgardistojn laboristoj.

Cetere mi ricevis por mia laboro monon, kies ekziston mi jam tute forgesis inter la hinoj. Mi devis porti la monon al la *Nutra kaj Vivdona Oficejo*, kie mi povis aĉeti manĝaĵon, sed malpli multan, ol kiom mi antaŭe ricevis de la hinoj, ĉar ĝian plej grandan parton formanĝis la betikoj. Ridinde, la plej realajn okupiĝojn mi vidis propre ĉi tie, en la Nutra kaj Vivdona Oficejo. Tiuj ĉi almenaŭ manipulis per estanta materialo, kvankam en aĉa kaj malica maniero.

Do mia nutrado estis multe pli malbona, kaj tiel mi ekkonis la alian koncepton, pri kiu mi inter la hinoj samtiel forgesis, kvazaŭ ĝi tute ne ekzistis sur la mondo: la materiajn zorgojn. Post ilia reviviĝo mi denove komencis atenti la aferojn el materiala vidpunkto, ĉar, dum mia manĝaĵo ne estis forprenita, mi tute ne pensis pri tio, kiel la aliaj nutriĝas.

Nun mi eksciis, ke inter la behinoj estas multaj malsatantoj, de kiuj oni konfiskas eĉ iliajn vestaĵojn, eĉ oni elĵetas ilin el iliaj ĉambroj, kaj multaj tranoktas sub la ĉielo. Mi ripetas: oni ne povas rifuĝi de la frenezo de la behinoj. Oni ne povas sin izoli, ĉar ili iras post la homo, konfiskas lian manĝaĵon, vestaĵon, kaj vane oni cedus kaj dirus: “bone, konfisku ĉion, nur lasu, ke mi vivu ermite en iu parto de la korto kaj tie mi kulturu por mi terpomon kaj frukton.” Ankaŭ tio estas malpermesita. La sola rimedo estas por la vivo, se oni enmiksiĝas kaj aktive partoprenas en ilia memmortiga rabio.

La libereco de la privata vivo absolute mankas. Ili kaptas la homon, prirabas, turmentas, ĉiutage devigas lin malkonfesi sian sanan spiriton kaj li ne havas unu solan minuton de ripozo, ĉar la frenezulejo senĉese kirliĝas ĉirkaŭ li, svingante skurĝon pelas lin suferi.

Kiel mi jam menciis, ili konfiskis eĉ la vestaĵon. Ties unu parton foruzis la betikoj, alian parton ili truis kaj tranĉadis ĉifona, ĉar nur tiel ili povas ĝin “uzi”. Krome mi eĉ devis – kvankam kordolore, – en ĉiu tria tago ĵeti en la fajron unu tutan vestaĵon; dum mi tenis altleve la kvadraton, la betiko skuadis la ŝtoner-skaton kaj la amaso hurlis vake-vakeon.

La behinoj ricevis nur uzitajn vestaĵojn, kaj ankaŭ tiujn ili devis porti longajn jarojn, dum oni bruligis kaj tranĉadis antaŭ iliaj okuloj la tute novajn, delikatajn vestaĵojn, ĉe kiu procedo ili vake-vakeis, ĉar ili kredis, ke sen tia detruado ili iradus senvestaj!

Mi volis foje tiel senkaŝe diri mian opinion al Zemoki, sed pro miaj malagrablaj spertoj mi demandis nur, kio necesigas la forbruligon de la vestaĵo sub la kvadrato.

– La boeto, – li diris. – Per tio ni akiras la emanantajn radiojn de la bikru por la buku kontraŭ la kemonanoj kaj la cirklo.

Mi ne povis ne rimarki, ke ĉi-okaze mi tamen ne opinias oportuna la bukuon, sed por ke mi evitu la akuzon, ke mi kunsentas kun la kemonanoj, mi rapide aldiris, ke mi volas pravigi nek la kemonanojn, nek la konaanojn, sed mi opinias plej oportuna, se ne estus kvadrato, nek cirklo, se ili ne kverelus pro la vortoj, se ne estus necese konfiski spiritualaĵon kaj vestaĵon sub la titolo de la boeto, se ambaŭ behaĵoj interpaciĝus, ĉesus la konceptoj de la anebaoj kaj la behinoj kunlaborante povus produkti pli multan spiritualaĵon, kaj ĉiu povus pli bone vivi kaj ankaŭ la betikoj ne havus malpli multe, sed eĉ ilia parto pliĝus.

Ĉu miaj Legantoj kredas aŭ ne, nun ili atakis min plej furioze. Ili certe pli facile tolerus, se mi kunsentus kun la kemonanoj, sed la sanan pensadon ili ne eltenas. Li konsilis, ke mi bridu mian langon. Ĉar miaj vortoj danĝere similas al tiuj frenezaĵoj, kiujn predikas kelkaj impertinentaj aŭdaculoj, sed kiuj estis vive bruligitaj.

Al mia demando, kial tio estas krimo, li respondis:

– Nu, ĉu por vi ne estas sufiĉe granda krimo puŝi la mondon en sangon, flamon kaj mizeron?

Li deklaris, ke tiujn doktrinojn disvastigas nur frenezaj bruligistoj por detrui la boeton, ketnion, kipuon kaj ĉiujn grandiozajn fruktojn de la civilizacio, kiuj nun nin feliĉigas. Kaj, se mi deziras scii, kiuj estas ĉi tiuj aĉaj bruligistoj, mi eksciis, ke ili estas la lamikoj!

Jen mi eksciis la signifon de tiu vorto, kiu estas ĉe ili la maksimumo de la honorinsulto kaj pro kiu mi tuj devas piki per tranĉilo. Do la sanan cerbon ili nomis lamiko, kion mi jam antaŭe konjektis, sed pri kio nun mi certiĝis definitive.

Mi eksilentis kaj cerbumis, kiel mi povus tamen helpi pri ilia kompatinda mizero, ne insultante samtempe iliajn mempereigajn frenezaĵojn.

Fine mi diris, ke mi tute ne intencas ofendi la anebaojn: restu do la kvadrato kaj la buku, sed oportuna estus sendi la multajn beratnuojn, akvumistojn kaj konfiskistojn al la kamparoj, kulturigrenon, mielon kaj fruktojn, per kio ili povus akiri pli multan spiritualaĵon.

– Ne eblas, – diris Zemoki, – ĉar, se la beratnuo ne portos la kvadraton kaj la akvumisto ne akvumos, ili ambaŭ perdos sian spiritualaĵon.

Mi devas konfesi, ke el tio nenium vorton mi komprenis. Mi pensis, ke li eble ne scias, pri kio mi parolis, kaj por komprenigi mian ideon, mi komencis paroli pri alia ekzemplo. Mi diris, ke se iam ĉiu behino ricevus ordonon konstrui domon, multe pli da domoj kreĝus ol nun, kiam multaj homoj kunloĝas en la sama ĉambro kun pluraj aliaj; eĉ ekzistas, ke iuj tranoktas sub la ĉielo.

Zemoki anstataŭ respondo brakplekte min kondukis al la domo, kiun mi vidis en la tago de mia alveno kaj el kiu unu parto estis konstruata, la alia detruata.

– Ĉu vi vidas? – li diris. – Kiel saĝe zorgas la konao pri tio, ke ĝiaj anoj havu loĝejon?

Ankaŭ la problemo de tiu stranga domo boris mian kapon per granda scivolo, do, uzante la okazon, mi demandis, kial, se ĝi servos por loĝejo, oni detruas ĝian alian parton. Sed li respondis same, kiel tiam la masonisto:

– Por ke ĝi ne estigu senloĝejecon.

Malkuraĝe mi rimarkis, ke pri la senloĝejecon helpas ĝuste la estado de la loĝejo.

Mi ne scias, kio estis tiam en mi tiel amuza, sed Zemoki komencis ridegi pri miaj vortoj, nomis min malfeliĉa bivag kaj deklaris, ke mi verŝajne ne konas eĉ la elementojn de la scienco de la loĝeja

ekonomio. Tiuj aferoj, kiuj al mi aperas tre komplikaj, ĉe ili estas memkompreneblaj eĉ por la lasta akvumisto.

Mi klopodis gardi mian trankvilon, kaj ĝentile mi petis, ke li klarigu al mi la sciencon de la behinoj pri la loĝeja ekonomio.

Zemoki sidigis min sur benkon kaj komencis paroli.

Li rakontis, ke iam ankaŭ la behinoj konstruis domojn, baze de la falsa ideo ke tio malgrandigos la loĝejan mizeron.

Sed la materiala justu kompreneble postulis, ke el la senloĝuloj ricevu loĝejon nur tiuj, kiuj partoprenis en la konstruado. Tial al la konstruantoj oni donis ĉiumonate bele presitan legitimaĵon, por kiu ili rajtis loĝi dum unu monato.

Kompreneble komence ili vane ricevis legitimaĵon, ankoraŭ ne estis sufiĉaj domoj kaj nur malmultaj povis ricevi loĝejon, sed ĉe la progreso de la konstruado, pli kaj pli el ili venis sub tegmenton. Do, provizore ĉio ŝajnis esti en ordo.

Sed kiam la programo de la konstruado finiĝis, la loĝantojn oni devis unu post la alia elloĝigi sur la korton, ĉar ili jam ne laboris konstrue, do ili ne povis ricevi novajn legitimaĵojn.

Tiel ekkonis la scienculoj, ke la konstruado estigas senloĝecon.

Mi provis kontraŭdiri, kial oni postulis de la konstruantoj novan legitimaĵon, se la domoj jam pretiĝis, kial oni ne lasis ilin konstante loĝi.

Zemoki respondis, ke tio estus maljusta kaj ke lamikeco estus postuli loĝejon por homo, kiu jam ne konstruas. Sed li konsentis, ke la problemo estas tre komplika kaj pro ĝia solvo la kona dungas multajn scienculojn kun bonega salajro, kiuj tage kaj nokte cerbumas pri tio. Tiuj jam sukcesis fiksi la sciencan tezon de la loĝeja ekonomio, kiu estas jena:

“La loĝejo elloĝigas la homon.”

Sed la solvon oni ankoraŭ longe ne malkovris, ĉar la problemo estas dilema: dum la daŭro de konstruo ekzistas legitimaĵo, sed ne ekzistas loĝejo, post la finiĝo de la konstruo ekzistas loĝejo sed jam ne ekzistas legitimaĵo. Komence oni provis tiun solvon, ke oni konstruigis eĉ pli multajn loĝejojn kaj intertempe la konstruantoj povis resti en siaj lokoj, sed tiel estiĝis ĉiam pli kaj pli multaj loĝejoj, pri kiuj oni nenion povis fari.

Do ĉiu konjektis tiam, ke la loĝejkonstrua laboro estas nur tiel komun-utila, se per ĝi ne kreiĝas loĝejoj. Tiel oni eltrovis, ke la homojn oni devas laborigi, sed la loĝejojn tuj poste detrui, por ke oni evitu la katastrofan senloĝecon.

– Sed tio verdire ne estas konstruado! – mi diris.

– Kompreneble ne! Nur tio mankus! Estas la saĝa prizorgo de la kona pri siaj anoj, ke ĝi donas detruan hakpioĉon en la manojn de la homoj, por ke ili ne restu senloĝaj. Tial ni devas estimi la konaon.

Pli kaj pli mi konvinkiĝis, ke ĉi tiujn homojn ia mistika forto forpuŝas de la realo kaj logiko. Vere, ili volas esti frenezaj. La realo estas ja tiel simpla kaj luma kaj la frenezaj delirdancoj estas ŝarĝoj muelantaj korpon kaj animon kaj tamen ĉi lastan ili elektas.

Mi devas pardonpeti de la regnanoj de la civilizita angla ŝtato, ke mi ilin tedas per la priskribo de tiaj idiotaĵoj, nur senkulpigis min la klopodo kompari tiujn stultaĵojn kun la inteligenteco de mia patrio, kiu tiaĵojn ne nur ne akceptus, sed eĉ ne komprenus. Per tio mi volas instrui miajn ŝatatajn sampatrianojn altetaksi kaj estimi la anglan ekonomian sciencon kaj la vivoformantan forton de la angla tero.

Por pruvi tion mi volas mencii ankoraŭ alian tian farsaĵon de la behina ekonomia pensado kaj matematika scienco, kies legado nepre plenigas niajn ŝatatajn sampatrianojn per la fiera konscio de la spirita supereco. Tio estas la sekvontaĵo:

En la kolonio vivis mil ducent kona-anoj, kiuj ricevis samtiom da manĝa porcio. La Nutra kaj Vivdona Oficejo kompreneble konfiskis ĉion, sed la betikoj donis al la popolo nur tiom da mono, ke ili povis reaĉeti nur naŭcent porciojn. Tricent porcioj do superrestis. Ĉi tiujn aĉetis la betikoj kaj iliaj proksimuloj, ĉar ili ricevis multe pli da mono.

Tio estas nur aĉa kaj malhumana agado, tamen mi nun volas paroli ne pri tio, sed pri ilia matematika senkapablo.

Nome, iam estis decidite, ke la salajro de la popolo estos malaltigata. Tio fakte okazis kaj en la sekvonta tago ili povis anstataŭ naŭcent, aĉeti nur 750 porciojn kaj la restintajn 150 porciojn ankaŭ la betikoj ne aĉetis, ĉar ili havis ankaŭ nur unu stomakon.

La popolo kapturiniĝis, kaj ŝanceliĝadis pro malsato, la manĝaĵoj kunamasigite putris en la Nutra kaj Vivdona Oficejo. En la sancerba Eŭropo jam ĉi tio sola estas nekredebla, sed ankoraŭ pli stranga estis la decido de la betikoj, kun kiu ili volis aranĝi la problemon.

Ĉu ne, sancerba homo tiaokaze, konvinkiĝinte pri sia eraro, disdonus la restaĵon inter la malsatuloj aŭ plialtigus la salajron de la popolo?

Ne! Kiel ajn nekredeble sonas, la betikoj tamen ordonis, ke la restintan manĝaĵon oni devas elverŝi!

Tian vandalan detruon mi mem ne volis kredi, ĝis per miaj propraj okuloj mi vidis la elverŝon de la manĝaĵo. Vidante tion mi konsilis al ili, ke, se jam ili ne scias kion fari per la spiritalaĵo, prefere ili ne konfisku ĝin de la behinoj. Sed ili klarigis, ke tion oni ne povas fari, ĉar tio estus *rabado* kaj signifus perfortan intervenon en la individuan vivon, sed la libereco de la individua vivo estas la fundamenta tezo de la behina civilizacio!

Cetere li avertis min, ke mi gardu min de tiaj lamik-manieraj vortoj.

Tamen la kulmino venas nur nun! Kiam mi demandis, kial ili elverŝas la restintan manĝaĵon, ili respondis, ke tial, ĉar ĝi estas tro multa!

Sed eĉ nun ni ne atingis la pinton!

Nome, ili estis tute konvinkiĝintaj, ke ili malsatas tial, ĉar ili havas tro multan manĝaĵon! Kaj pro siaj propraj stultaĵoj ili malbenis ne sin mem, sed la cirkonstancojn kaj la plenigon de siaj stomakoj ili esperis de la pliboniĝo de tiuj.

Jen estis do la behina matematiko!

Post ĉio ĉi verŝajne ne estas surprizo, se mi rakontas, ke same malamike ili staris kontraŭ la natursciencoj. Pli ĝuste, ili konis la ĥemion kaj fizikon, sed ili ne kuraĝis konfesi sian scion.

– Kiel tio eblas? – demandas verŝajne la Leganto, kiu en la civilizata Eŭropo estas kutimiĝinta, ke la sciencaj konoj estas ne nur ne honto, sed gloro.

Verdire ankaŭ mi mem ne povas tion kompreni kaj anstataŭ vastaj filozofadoj mi prefere konigas sen komentarioj *lafendologion*.

La ekziston de ĉi tiu stranga doktrino mi eksciis tiel, ke foje, kiam mi staris en la korto, iu behino retropaŝadante alproksimiĝis kaj al mi puŝiĝis. Li tiel tretis mian piedon, ke mi eksiblis pro la doloro.

Kaj li sen ia pardonpeto daŭrigis sian retroiradon.

– Bonvolu eble rigardi antaŭen! – mi murmuris grumble, sed tiu stoike respondis:

– Hodiaŭ estas plenluno.

Mi ne sciis, pri kio li parolas, kaj mi eĉ ne estus pli zorginta pri li, sed samtage mi vidis retropaŝadi almenaŭ ducent homojn, kiuj pro nenia prezo estus farintaj unu paŝon antaŭen.

Fine mi demandis Zemokin, kiu, aŭdante la aferon, elkore ridegis kaj trankviligis min, ke mi ne zorgu pri tio: ili estas maniaj idiotoj, kiuj kredas, ke se ili dum plenluno ne retropaŝadus, ili perdus la *grandboeton*.

Mi vere surpriziĝis kaj per sincera ĝojo mi devis konstati, ke tiu estis la unua inteligenta opinio de Zemoki. Sed mia ĝojo tuj estingiĝis, ĉar Zemoki deklaris:

– Kompreneble el tio eĉ unu vorto ne estas vera, ĉar – kiel ĉiu inteligenta homo scias, – la sola regulo de la grandboeto estas, ke oni ne trinku akvon, super kiu traflugis vesperto.

Mi jam ne kuraĝis ridi, mi nur plu demandis, kaj dum nia interparolo malkovriĝis jenaj fantaziaj aferoj:

La behinoj ĝenerale kredas, ke la nuboj kelkfoje frostiĝas ŝtonrigidaj. Tiam desupre ilin atakas iu tre stranga estaĵo kaj ilin disfendas. La sono de la fendiĝo estas la tondro.

Pri la figuro de tiu stranga estaĵo la opinioj estis diversaj. Eĉ ĝia agregateco ne estis klara antaŭ ili kaj kelkaj asertis, ke ĝi fendas la nubojn per siaj kornoj, dum laŭ aliaj tio okazas per ĝiaj piedoj. Pri tio daŭris grandaj disputoj, sed forte eraras la Leganto, se li kredas, ke eĉ unu sola el ili povis subteni sian opinion per pozitiva argumento. Se mi demandis, kial ĝi estas tiel, ĉiu respondis, ke tial, ĉar kiu ĝin klarigas alimaniere, tiu perdas la grandboeton. Kaj tion ĉiu timis.

Kompreneble ankaŭ pri la grandboeto ili ne havas difinitan imagon. (Mia ĝenerala sperto estis, ke ĝuste pri tiuj konceptoj, kiujn ili mem elcerbumis, ili scias nenion. La gravitan rapidiĝon ĉiu konis, la grandboeton neniun. Imagi oni povas kiel ajn. Kial ili ne imagis almenaŭ unuforme?) El iliaj klarigoj mi povis kompreni tiom, ke la perdo de la grandboeto estas iaspeca malsano, sed tamen ne tia. Eble mi povus nomi ĝin plago, sed kial ĝi estas plago, ankaŭ tion ili ne scias. Ofte ili diris pri iu aŭ alia, ke “tiu jam perdis la grandboeton”, sed ĉe tiuj mi povis konstati nek materialan mankon, nek sanan difekton. Tial al la Leganto, kiu provas cerbumadi pri la danĝeroj de la perdo de la grandboeto, mi rapidas deklari, ke ĉio vana. Iliaj vortoj ne havas sencon, ili timas nur la vortojn mem.

Despli estis surprize por mi ekscii, ke la kornpartianoj jam ofte mortigis homon pro siaj teorioj kaj longe batalis, por ke la homoj imagu ne tiun, sed ĉi tiun imagaĵon. Troviĝis eĉ tiaj homoj, kiuj malgraŭ la tranĉiloj tenataj ĉe ilia brusto kuraĝis deklari, ke la nubfendulo tondras ne per sia korno, sed per sia piedo, kaj anstataŭ prudente cedi ili preferis morti. Kian sencon havis trudi tiaspecajn cerb-ludojn ankaŭ al la aliaj, tio estas same enigmo por la sana racio, kiel tio, kian sencon havis la tuta afero.

Malgraŭ ĉia ĝisnuna nekredeblaĵo mi tamen devas deklari, ke mi ankoraŭ ne atingis la finon.

Nome – kaj nun sekvas la kulmino, – tiuj homoj bone konis la esencon de la tondro! Kiam mi provis klarigi al Zemoki, ke la tondro estas la sono, kiu sekvas la elektran transfajreradon, li certigis min, ke tio estas konata al ĉiu behino.

Mi demandis, kial ili tamen parolas pri la nubfendulo.

– Ĉar la nubfendulo ekzistas, – li respondis.

Kiam mi atentigis lin pri la kontraŭdiro inter liaj vortoj, li respondis, ke mi verŝajne havas nenian kapablon por la fendologio, kio ja estas grava morala manko. La fendologio estas tial vero, ĉar oni ĝin devas tiel diri kaj la homo estas racia estaĵo, do li devas konsideri la aferojn ne nur laŭ ties rigida realeco, sed li devas strebi pli alten. Kiun ne trafenstras la vereco de la fendologio, tiun nenio distingas de la senmensa besto, kiu senpense paŝtiĝas sur la herbejo kaj laŭ blinda instinkto elkuras el la ekbrulanta stalo.

Mi rimarkis, ke ĝuste tio, ke ni estas raciaj estaĵoj, postulas, ke ni klopodu trovi ĝustan imagon pri la aferoj, sed li severe min riproĉis, ke la ĝusta imago de la aferoj estas tiu, kiun instruas la fendologio, ĉar la homo tiun *bezonas*.

Per zorgema trapensado pri miaj oksfordaj studoj mi tamen ne povis rememori pri ia ajn tezo, laŭ kiu la homa organismo bezonus fendologion, sed finfine mi ne intencis komenci senesperan disputon kun la maniuloj. Anstataŭe mi demandis, kial ni bezonas ĝin.

– Ĉar tiu formas la behinon al behino! – li respondis fiere.

Pri la vereco de tiu aserto ankaŭ mi mem estis profunde konvinkiĝinta, mi nur ne sciis, kial fanfaroni per tio? Sed li eksplikis, ke la fendologio estas firma punkto, sur kiu la ŝanceliĝanto ĉiam povas sin apogi, kiu defendas la homojn kontraŭ la duboj kaj gvidas ilin al sekura haveno. La individuo same kiel la socio bezonas firman apogan punkton, sen kiu ni erarvagadus en la mallumo kaj sen helpo. Kaj sen tiu pilastro ruiniĝus ankaŭ la socio.

Pri la firmeco kaj neceseco de ĉi tiu punkto mi ja havis iom da dubo, sed por ne danĝerigi mian pozicion per senfrukta disputo, mi prefere petis lin klarigi, kiel rilatas la fendologio al la retroirado.

Tiel mi eksciis, ke pri la ecoj de la nubfendulo ili havas same diversajn imagojn, kiel pri ĝia formo.

Unu grupo proklamis, ke la nubfendulo vivas en groto kaj senĉese ridetas. Tion ili predikis kiel eternvalidan veraĵon kaj ankaŭ la betikoj ĝin toleris, eĉ aprobis.

Alia grupo asertis, ke la nubfendulo kelkfoje koleras, nome tiam, kiam iu behino dum plenluno ne retropaŝadas. Tiu behino perdas la grandboeton. Kompreneble ankaŭ ĉi tio estis eternvalida veraĵo: ili instruis ĝin en la lernejoj al la infanoj, kaj la betikoj ĝin aprobis.

Laŭ la tria grupo oni rajtas iri iel ajn dum plenluno, malpermesite estas nur trinki akvon, super kiu transflugis vespereto ĉar male la nubfendulo koleras kaj la behino perdas la grandboeton.

Kaj ĉiuj tri, akre inter si kontraŭdiraj elcerbumaĵoj estis aprobitaj de la betikoj kiel eternvalidaj veraĵoj. En la sama tempo, de la samaj betikoj!

Sed nur nun venas la kulmino!

Nome, ĉion ĉi la betikoj ne nur toleris, sed tute apogis. Sed se iu behino aŭdacis aserti, ke pri la ecoj de la nubfendulo neniu scias ion certan, ke mankas unueca opinio, do oni ne kreu al si necertajn imagaĵojn, sed restu sur la fizike malkovritaj partoj de la naturo, tiun homon ili deklaris lamik, liajn doktrinojn nomis infektaĵo kiu renversas la civilizacion kaj la disvastiganto estis grave punita! Ili eĉ deklaris, ke ankaŭ tiu perdas la grandboeton, kiu priaŭskultas la falsan doktrinon.

(Petege mi petas la Leganton, ke li ne ĵetu planken la libron! Ĉiun vorton mi skribas el mia vojaĝa notlibro. Ne ricevu mia animo la gracon de la Ĉielo, se mi eĉ unufoje mensogas!)

La plej groteska okazaĵo de mia beratnua ofico estis sendube la bilevumado de la *orelbetiko*, en kiu ankaŭ mi devis partopreni, por ke mi tintigu la ladskatolon de la flavaj ŝtoneroj.

Kiel ajn nekredeble sonas tiu historio, tamen mia vojaĝlibro ne estus kompleta sen ties priskribo.

Do la bilevumado de la orelbetiko okazis tiel, ke sur la oreloj de iu betiko oni pendigis du, terure grandajn, sur ĉenoj pendantajn kuprokubojn, poste du behinoj ekkaptis liajn piedojn kaj manojn kaj tiel balancante traportis lin en la korto, kie kolektiĝis ĉiu malsanulo de la frenezulejo. El liaj oreloj pendolis la kuprokuboj, kaj li tamen ridetis. Kune kun mi marŝis multaj akvumistoj kaj poste venis farsaj karikaturaĵoj. Estis iu, el kies nazo pendis longa stupo, alia kiu tenis sur sia etendita mano truitan brikon, kaj ĉiuj ili estis troŝarĝitaj per amaso da ĉifonitaj delikataj vestaĵoj, dum ĉirkaŭe la duonveste ĉifona amaso de la malsanuloj furiozis kaj hurlis, multaj jen ekkuŝis sur siaj ventroj, jen suprensaltadis, kelkaj terenfrapadis siajn ŝuojn kaj poste alten ĵetadis tiujn, dum el la gorgoj gargaris senartikaj, simiosimilaj blekoj.

Ĉiumomente mi timis, ke ili nin mortbatos, pri kio mi cetere tute ne estus miranta. Nur poste mi eksciis, ke la amaso hurlis ne pro indigno, sed pro ĝojo!

Kaj kiam mi demandis, kio ĝojinda troviĝas en tia malbela kaj abomena primoko de la natura homa digno, ili respondis:

– Nu, orelbetiko estas nur unu kaj li estas bilevumata nur en ĉiu oka jaro!

Dekunua ĉapitro

La aŭtoro venas en la skoro-n. – Ni konatiĝas kun la manieroj de la deformiĝo de la pensado. – La behinoj falsas la geometrion. – La konflikto de l' aŭtoro pro la infana bruĥuo, kiun li senintence ruinigas.

Verŝajne post ĉio ĉi mi jam ne diras novaĵon, komunikante, ke ilia malsana cerbo same ne indulgas la infanojn, eĉ pli, ĝuste la senkulpan animon de la infano ili infektas per la plej groteskaj mensogoj.

Por ke ni bone komprenu la sekvontaĵojn, mi devas rimarki, ke la malsano de la behinoj havas tre klare la karakteron de la infekta epidemio, tamen, kiel kuracisto, kiu same en la oksforda universitato (en la Reĝina Kolegio), kiel dum mia dekdujara praktiko akiris iom da modesta sperto pri psikiatrio, mi povas firme aserti, ke tiu stranga malsano ne estas heredebila. Pli precize: el la behina malsano estas heredebila nur la inklino, sed tiu neniam eksplodas per akutaj simptomoj sen malutilaj perfortaĵoj.

Sed, – kiel la Leganto jam scias, – la behinoj ne toleras inter si la raciecon kaj, kiel ili volis trudi la frenezon ankaŭ al mi, same la sancerbe naskiĝinta infano ne havas kontraŭ ili helpon kaj savon.

Neniu povas sin fortiri de la spirita kadukiĝo kaj, kiam la infano jam ellernis paroli, ili tuj metas siajn manojn sur lian animon kaj klopodas konfuzi lian klaran vidon en kio – mi devas konstati, – ili akiris fakte grandegan rutinon. Iliaj metodoj estas preskaŭ mirindaj pro sia sagaco kaj mi devis ofte primiri, vidante, ke se ĉi tiun grandegan fervoron ili uzus ne por kadukigo, sed por utila klerigo de la infano, ili verŝajne estus la plej perfekta socio de la mondo.

Estas preskaŭ konstaterite, kiel grandan energion ili malŝparas por tiu celo. La infanoj estas sendataj en specialan kadukigan instituton, kie oni ripetadas antaŭ ili la plej fantaziajn malverajn elpenaĵojn, ĝis la sendifekta, natura intelekto de la infano konfuziĝas, ĝis li vidas ĉion laŭ falsa aspekto, kaj se li jam perdis sian naturdonitan logikon, ili nomas lin: *skorobehino*.

Miaj Legantoj povas imagi, kiom maltaŭga estas tia skorobehino en la vivo, kaj mi kuraĝas aserti, ke en racia socio ili tute ne estus uzeblaj en ia ajn profesio.

Nur imagu ties sekvon, se tiaspeca skorobehino, kiu la manĝaĵon rigardas malestiminda fiaĵo, havus postenon en nutraĵvendejo. Aŭ, kian malutilon farus en tajlorejo tiuj, kiuj taksas pli altvalora la veston ĉifonigitan kaj pezigitan per ŝtonoj ol la sendifektan kaj komfortan formon, se ne menciis la interbatadojn, kiuj eksplodas, ĉar unu tablo estas ronda, alia kvadrata.

Nu, mi devas deklari, ke ili ne nur ne forigis la skorobehinojn el la postenoj, sed ili rigardis ilin pli taŭgaj, ol la klarajn kaj nedegenerintajn cerbojn, kaj ju pli konfuzajn imagojn havis la skorobehino pri la mondo, des pli grandan respekton li ricevis kaj des pli altrangajn postenojn li akiris. Kaj en kiu homo ankoraŭ briletis la fajrero de la klara logiko, tiu estis eksigita, kiel neuzebila. Kaj tio estis ankoraŭ la pli milda konsekvenco, kio okazis, se li nur ne laŭtigis sufiĉe la lernitajn malveraĵojn, sed se li provis laŭtigi la naturan *realon*, tiam li estis eĉ punata.

Mi ofte cerbumis, kio sekvus, se la prudentaj hinoj ne zorgus pri ili, kaj mi venis al la konkludo, ke ĉi tiu surkapen starigita socio malsatmortus en tre mallonga tempo, ja mortbatus sin mem. Absurde estas deklari militon al la naturo kaj matematiko. Mi povas aserti, ke nur vidinte la ŝtatestrojn de la behinoj, povas la eŭropa homo vere estimi kaj taksi sian prudentan patrimon kaj ties saĝan registaron.

Mi rememoras, kiel multe indignis la kulturita kaj humana loĝantaro de mia patrio pri la intenca kripligo de la piedoj de la ĉinaj virinoj. Mi ne scias, kiel ili opinius eksciante, ke la mondo havas parton eĉ pli malluman ol la malluma Azio, kie ne la piedoj de la homo, sed lia kapo, eĉ pli, lia diodonita sana cerbo estas kripligata, ĝis ĝi fariĝas neuzebila! Ĉar per kriplaj piedoj oni ankoraŭ povas vivi, sed, se la piedo, mano, lango kaj ĉiuj niaj organoj servas kriplan cerbon, la vivo povas esti nur aro da groteskaj kaj sencelaj suferoj, post kio la morto venas jam kiel saviĝo.

Mi koncedas, ke tiuj malfeliĉuloj sentas la suferojn kaj ĝojon inverse, sed ĉu estas imagebla korpo, kies sano plifortiĝus per la malestimo de la manĝado kaj per la malsatado?

Prave demandas la Leganto, kiel mi scias ĉion ĉi? Tiel, ke mi, bedaŭrinde, eĉ persone devis konatiĝi kun la instituto de la skoro.

Jam en la kvara tago de mia beratnua posteno, la betiko sendis min al la skoro, por ke mi tie disdonu la flavajn ŝtonerojn inter la infanoj.

Preninte al mi la ladan ŝtonerskatolon mi ekiris. Mi alvenis domon, kiu estis ĉirkaŭita de alta barilo. Ĝi jam estis konstruita de la behinoj, do, la Leganto povas imagi, kiel mizere ĝi aspektis.

Kio unue montriĝis al mi sur la korto, tio estis longa ligno-konstruaĵo, enhavanta ĉirkaŭ kvindek latrinajn niĉojn. Mi konjektis, ke tie minimume estas mil infanoj internigitaj, mi nur ne sciis kie, ĉar mi vidis entute nur malgrandan, stalsimilan konstruaĵon krom la latrinoj.

Enpaŝinte tien, mi vidis ĉirkaŭ kvindek geknabojn, kaj ankaŭ tiuj sidis dense unu apud la alia. Pli multaj eĉ ne estus havintaj lokon, kaj la aero estis preskaŭ netolerebla.

Super la enirejo estis brila kvadrato. Enirinte, ĉirkaŭe sur la muroj pendis bildoj, kies signifon mi ne povis kompreni. Sur la unua kuŝis behina kadavro kun eligitaj intestoj kaj sur ĝi dancis alia, furioza behino. Sur la alia bildo kuŝis surtere homo, kies kapo estis frakasita. El lia kapo fluus la sango. Li ridetis kaj sub ĝi estis surskribite: “Ho, kia plezuro!”

Sur la apuda bildo ia aĵo estis kovrita per tuko, sub kiu videblis la rando de la plado por manĝaĵo kaj estis surskribite: “Fi!”. Mi vidis bildojn pri kriplitaj mebloj kaj vestaĵoj, al iu seĝo mankis unu piedo, en ĝia dorsapogilo estis enigita malrekta najlego. La mezo de alia tablo estis truita kaj sur ĝi staris stango de balailo, sur kies pinto pendis stumpa argilpoto, granda kalkŝtono kaj mortinta rato. Surskribite estis: “Kipu”.

Inter la infanoj iradis la proko kun fajrerantaj, koleraj okuloj. Tiu estis plenkreskulo, kies profesio estis ripetadi la malveraĵojn al la infanoj, ĝis ili fine kredis tiujn. Ilia metodo rememorigis min pri mia malnova konatulo, kiu dresis sian hundon tiamaniere, ke li ĵetis al ĝi paperpeceton kaj se li diris: “Ho! kiel bona!”, la hundo devis ĝin kapti kaj gluti. Sed se li ĵetis peceton da viando kaj diris “Fi, kiel malbona!”, la hundo devis sin forturni. (Parenteze mi demandas, kio okazus al la hunda socio, se ĝi estus gvidata de tiaj hundoj?) Sed eĉ songe mi ne povis imagi, ke tia rezulto estas atingebla ankaŭ per la pensanta homa cerbo. Tamen estas verŝajne, ke la behinoj, kiuj tra jarcentoj sisteme kadukigis siajn cerbojn, jam denaske estas inklinaj al la behina malsano.

Kiam mi enpaŝis, la proko tien-reen paŝadis inter la infanoj kaj kelkfoje ekkriis:

– Kricc!

Ĉe tiu vorto la infanoj saltleviĝis, metis sian maldekstran manplaton sur la mezon de la dorso, la dekstran manon ili traŝovis sub la maldekstra genuo kaj kaptis la maldekstran orelon.

Je mia demando, kial necesas trudi al la infanoj tiajn neordajn pozojn, mi ricevis la respondon, ke la infanoj devas esti kutimigitaj al la – ordo!

Poste li kris ion al la infanoj, je kio la tuta grupo sin turnis al mi kaj dolore ekveis vake-vakeon.

Kaj mi malfermis la ladan skatolon kaj transdonis al la proko la flavajn ŝtonerojn.

Li ĝin transprenis kaj la ŝtonerojn ŝutis sur la tablon, poste li foriris kaj revenis kun plado, kovrita per tuko. Mi vidis, ke sub la tuko estis la plej delikataj frandaĵoj.

Tiujn li demetis apud la ŝtoneroj kaj unu post la alia elvokis la infanojn. Kiu etendis la manon al la frandaĵo, ties manon li bastonbatis tiel, ke ĝi tuj bluiĝis, kaj la ceteraj infanoj devis lin minaci per siaj pugnoj kaj kriadi “Kave!”. Kiu manetendis al la ŝtoneroj, ties postaĵon li ekgratis, dum la infanoj afable ridetis kaj diris: “ketni!”.

Post la disdono de la ŝtoneroj li komencis paroli al la infanoj pri tio, ke ege ni devas estimi ĉi tiun donacon, kiun la behinoj elbatalis al si per tiel multa kaj granda sangofero.

Kaj li rakontis longan historion pri la estinto de la behinoj, kiun mi konigas nur skize al la Leganto.

Li rakontis, ke la estinto de la behinoj dividiĝas en tri ĉefajn epokojn: komence estis la primitiva aŭ kruela epoko, poste venis la transira, aŭ duonkruela epoko, kaj poste sekvis la hodiaŭa, aŭ perfekta epoko.

Antaŭ longaj jarcentoj, dum la primitiva aŭ kruela epoko, la *butukoj* tiranis, trompis kaj rabadis la popolon. De la kolo de la butukoj pendis sur ŝnuro malantaŭe granda huffero kaj la popolo ne nur ne mortbatis, sed eĉ estimis ilin. (Ĉe tiuj vortoj la infanoj laŭte ekridis). La belki tiam okazis tiel, ke la homoj ĉe renkonto ŝovis sian fingron en la orelon de la alia, (la infanoj ridis eĉ pli laŭte), kaj ili rigardis kipu, se oni kudris diversajn flikojn sur la teksaĵon (la infanoj ŝanceliĝis pro ridego).

Sed sekvis certa behino, nomita Zeĉeĉe, kiu nomis la butukojn malnoblaj ĉarlatanoj, la ketnion kaj kipuon trompaĵo kaj manio. Li deklaris, ke la putrinta reĝimo de la butukoj devas esti detruota kaj li postulis la reĝimon de la racio.

La butukoj lin ekkaptis kaj senhaŭtigis vivantan. Sed Zeĉeĉe jam havis multajn adeptojn, kaj dum kvindek jaroj verŝiĝis la sango. Fine la zeĉeĉistoj forigis la butukojn kaj transprenis la regadon de la behinoj. Nun komenciĝis la transira, aŭ duonkruela epoko.

Sed la paco ne longe daŭris, ĉar la novaj registroj, kiuj nomis sin *batakoj*, same komencis turmenti kaj tirani la popolon, kiel la butukoj. Ili forprenis ĉion kaj nenion donis al la popolo. Desur iliaj zonoj pendis sur drato granda plumbopeco, kaj la popolo ne nur ne mortbatis, sed eĉ estimis ilin. (La infanoj ĉe tiuj vortoj preskaŭ eksplodis de la ridego). La belki estis, ke la homoj gratis la genuojn unu de la alia, kaj, se iu ŝmiris sur la tolaĵon diverskolorajn malpuraĵojn, tiu nomiĝis kipu. (La infanoj jam ruliĝis sur la tero).

Kaj tiam venis Zaĉaĉa la granda, kiu nomis la batakojn ĉarlatanoj, pri la ketni kaj kipu kuraĝe deklaris, ke ĝi estas trompaĵo kaj manio kaj postulis la reĝimon de la racio.

Zaĉaĉa estis kaptita de la batakoj, lia ventro estis distranĉita, liajn intestojn dumvive eltiritajn oni ĵetis al la hundoj, kaj poste liaj adeptoj estis ekstermataj per la plej sagaca krueleco. (Ĉe tiuj vortoj la infanoj ekploris).

Sed la adeptoj de Zaĉaĉa pli kaj pli multiĝis; sekvis sesdekjara sanginundo, dum kiu plurajn batakojn oni kaptis, poste ilin kunligis, iliajn dentojn unuope elrompis, iliajn langojn elbruligis, kaj poste ili estis laŭlonge trapikitaj per stango. (La infanoj saltante aplaŭdis kaj ĝojis).

Kaj fine la zaĉaĉistoj venkis. Ĉi tie komenciĝas la hodiaŭa, aŭ perfekta epoko, dum kiu la regadon faras la elak betikoj, de sur kies genuoj pendas honorindaj bilevoj, kiuj per sia prudento certigas la reĝimon de la racio. Kaj de tiam ĉiu ricevas el la flavaj ŝtoneroj, ĉu betiko, beratnu, proko, ĉu nur simpla akvumisto aŭ skoro-infano. (La infanoj saltante vakeis).

Li parolis ankaŭ pri certa Zuĉuĉu, kiu hodiaŭ forte agitas kontraŭ la ordo kaj trankvilo: li aŭdacas nomi la honorindajn betikojn fariseaj poŝtelistoj, li ribeligas kontraŭ la perfekta ketni kaj kipu, li postulas, ke oni dornplenigu ne la seĝon, sed la ŝrankon, ke la belki okazu per la ektiro de la orel-lobo kaj la registara potenco estu transdonita al la *bitekoj*, kaj ĉion ĉi li faras en la nomo de la racio, kvankam estas evidente, ke tiajn aferojn povas aserti nur freneziĝintaj furiozuloj, kiuj pli-malpli frue gajnos sian indan punon. (La infanoj abomenis, kaj skuante la pugnon ili postulis elbruligi la okulojn de Zuĉuĉu).

Mi povas aserti, ke eĉ la plej ekstrema fantazio de Grand Guignol ne elpensis ankoraŭ pli abomenan terurdramon ol tin, kiun ĉi tiuj rabiuloj reale efektivigis, Kaj anstataŭ kraĉinte pro memnaŭzo en la tubon de revolvero, pafi al si en la kapon, ili eĉ ĝojis, ke ili ĉion ĉi faris kaj ke ili sukcesis ĝin elbatali. (Kion elbatali? Neniu sciis, ili nur diris: la perfektan epokon).

Ankaŭ mi havis kelkfoje terurajn sonĝojn kaj okazis, ke mi sciis, ke mi sonĝas. Tiaokaze mi kolektis mian tutan forton kaj penadis vekiĝi. Post longa fortostreĉo mi fakte sukcesis vekiĝi al alia sonĝo, kiu alportis eble eĉ pli terurajn bildojn ol la unua. Kaj nur post longa tempo mi eksciis, ke ĝi estas ankaŭ sonĝo, kaj denove mi fortostreĉis kaj transvekiĝis al la – tria. Kaj ĉe ĉiu vekiĝo mi kredis, ke ĝi estas la definitiva kaj senduba maldormo.

Sed tiuj neniam vekiĝos.

Mi diras, ke dum la tuta terura rakonto mi tremis de frosto kaj profunde konvinkiĝis, ke la plej bela kaj plej nobla savo estus, se iu per unusola pugnofrapo forviŝus desur la serena vizaĝo de la kosmo ĉi tiun putran ulceron.

Poste mi demandis al Zemoki, kial ili difektas la senkulpan animon de la infanoj per tiaj teruraj abomenaĵoj. Li respondis, ke tial, por ke la infano pliriĉiĝu en sia moralo kaj kapabliĝu sekvi la pasintajn okazaĵojn kiel ekzemplon!

Sed ni reiru al nia temo.

La proko finis sian rakonton kaj deklaris, ke nun estos pritraktata la fendologio, pri kio parolos al ili la honorinda beratnu.

Mi ektimis, pensante, ke mi mem devas produkti iaspecan kolosan stultaĵon, dum kio mi nepre estus konfuziĝonta, sed feliĉe aliel okazis.

La infanoj ekstaris, ili grupiĝis al du partoj kaj la mezajn benkojn lasante malplene, ili sidiĝis ĉe ambaŭ randoj de la ĉambrego.

Nun envenis du beratnuoj kaj la proko foriris.

Je la enpaŝo de la beratnuoj la infanoj komencis pugnobatadi siajn fruntojn kaj vakeis tiom dolore, ke la fremdulo, nekonanta la cirkonstancojn, jure povus kredi, ke patromurdantoj bedaŭras kaj pentofaras siajn krimojn.

Nun la du beratnuoj staris antaŭ la du grupoj kaj sam-momente ekparolis.

La unua parolis pri tio, ke tiu homo, kiu trinkas akvon, super kiu traflugis vesperto, perdas la grandboeton. Kun tia homo amikiĝi estas malpermesite, ĉar li infektas eĉ tiun, kiu parolas kun li. Precipe malpermesite estas trinki el lia glaso.

La dua klarigis, ke dum plenluno oni rajtas nur retroiri kaj ne rajtas amikiĝi kun antaŭeniranta homo, ĉar tiu infektas nin. La ŝuon de tiaspecaj homoj oni devas forbruligi.

Ambaŭ deklaris, ke la alia parolas impertinentajn mensogaĵojn, kies vortojn aŭskulti estas malpermesite, ĉar ĉiuj vortoj estas veneno. Poste ili ambaŭ deklaris:

– Ho infanoj, estu vi piaj!

Al tiuj vortoj ambaŭ grupoj de la infanoj ekbruis, vespomaniere ili tumultigis, atakis unu la alian kaj furioze interbatadis. Ili rompis la glasojn unu de la alia, perforte detiris kaj disŝiris la ŝuojn de kelkiuj kaj intertempe ofendis unu la alian per tiom maldecaj kanajlaj esprimoj, kiujn mi ne povas komuniki al la Leganto.

La du beratnuoj rigardis la teruran scenon sen iu ajn emocio, kaj fine, por mia plej granda surprizo, ili brak-en-brake foriris kun la plej granda amikeco.

Mi staris senmove, kaj per malfermita buŝo mi gapis al ili.

Nur post la pordfermiĝo mi povis ekmoviĝi. Mi postkuris ilin kaj tremvoĉe demandis, kial ili parolis tiajn aferojn al la infanoj, kiuj okazigis la teruran scenon.

Ili rigardis al mi, kvazaŭ mi estus veninta el fremda planedo.

– Ni devas nobligi la karakteron de la infanoj, – diris la unua, – cetere ni ĉiuj fariĝus nekulturitaj kanibaloj.

Pro mia konfuziĝo mi apenaŭ povis elbalbuti, ke post ĉi tiuj vortoj mi jam tute ne komprenas la interrilaton inter iliaj prezentadoj kaj la nuna bona amikeco.

Ili ridetis.

– Ni servas ambaŭ al la sama nobla celo, se eble sur diversaj vojoj, – li diris. – Sed nun ni devas adiaŭi, ĉar ni rapidas.

Feliĉe alvenis la proko, kiu revenigis min al la infanoj.

Li antaŭ ĉio ektiris la orellobon de iu infano, ĉar li eligis la langon al alia knabo. La proko avertis ilin al mildeco kaj al estimo de niaj homfratoj, li nomis la knabon sentaŭga bubo, al kiu vane parolas la bonkora beratnu.

Poste li deklaris, ke nun estos pritraktata la geometrio.

Komence mi ne sciis, kiel tia serioza kaj ekzakta scienco venas ĉi tien; mi tamen trankviliĝis, ke mi fine aŭskultos ian klarsencan aferon. Baldaŭ ĉio evidentiĝis.

Ili pritraktis la cirklon, sed jam komence mi preskaŭ svenis pro mirego, ĉar li asertis, ke la cirklo havas du fokusojn kaj la sumo de la radio-vektoroj estas konstanta, kio, – ĝenerale sciate – estas la karakterizo de la elipso.

La vorto jam balanciĝis sur miaj lipoj por korekti lian eraron, kiam li rimarkis, ke la cirklo havas ankoraŭ unu regulon, nome, ke estas malpermesite diri pri ĝi, ke la punktoj de la cirkonferenco situas de la centro en la sama distanco.

Mi jam tute konfuziĝis. Do, se li scias kio estas la cirklo, kial estas malpermesite nur korekte paroli pri ĝi?

Tiel mi ne plu kuraĝis interrompi lin, nur sekvontatage mi demandis al Zemoki, kiu klarigis ke aserti pri la cirklo, ke ĝi estas ronda, estas tial malpermesite, ĉar ĝi estas la insigno de la kemonanoj. Kaj kiam mi pruvadis mian pravon per la geometriaj faktoj, kiuj tamen estas neŝanĝeblaj, li respondis, ke ne nur geometriaj faktoj ekzistas en la mondo, sed ankaŭ anebaoj, kaj tio estas pli grava fakto. Fidela konaano ne rajtas aserti la cirklon ronda.

Ili publike neas simplajn geometriajn faktojn, kiujn ĉe ni scias kaj publike asertas eĉ la eta infano. Kaj la plej interesa estas, ke ili mem tion ne faras pro konvinkiĝo, eĉ pli, ilia konvinkiĝo estas tute alia, sed ili tamen neas, ĉar: “tiel oni devas diri”. La homoj mensogas eĉ ne por aliuloj, sed por si mem, kaj tio radikiĝas tiel forte en ili, ke ili mortbatus tiun, kiu kuraĝus laŭte esprimi tion, kion ĉiu scias.

Mi ankaŭ demandis al Zemoki, ĉu li mem kredas ĉion ĉi, post kio li konfesis, ke li ne kredas, sed al la popolo tamen necesas tiel instrui la aferojn, ĉar, kvankam li mem estas inteligenta homo, se la profana amaso lernus la cirklon ronda, tio kaŭzus la plej danĝeran renversiĝon. Mi demandis, kial. Sed li ne povis doni klarigon. Li parolis pri iaspecaj rokfirmaj aferoj, pri ia fundamento, pri idea apogilo, pri iaspeca ordo, kiu devas esti sekurigata kaj kompreneble pri la bruĥo, kiun la behino ja havas, do, pri ĉiuj tiaj aferoj, kiuj nenian interrilaton havas kun ĉi tiu simpla geometria fakto, sed eĉ unu vorton mi ne aŭdis pri la demandita afero mem kaj vane mi petis klarigi la temon; li diris, ke li parolis ĝuste pri tiu, nur mi ne komprenis.

Sed ni reiru al la skoro. Post la elipsologio la infanoj elmetis kajerojn kaj la proko ordonis priskribi la cementfabrikadon.

La infanoj eksidis, skribis, kaj post dek minutoj la proko kolektis la kajerojn, trafoliumis ilin kaj fine elektis iun.

– Ĉi tiu estas la plej bona, – li diris kaj donis la kajeron al mi.

Mi komencis ĝin legi, sed mi mirege vidis, ke la infano tra du folioj skribis nur ĉi tiujn du vortojn: “vake betik, vake betik, vake betik” ktp.

Mi pensis, ke mi eraris, mi refoliumis la kajeron, sed tie mi jam vidis pli malnovajn skribaĵojn kun tiaspecaj titoloj: “La flegado de la katara malsanulo”, “Priskribo de la planedoj de la sunsistemo”, “La kalkulo de la surfaco de la triangulo”. Post la titoloj sekvis ĉie la senfina ripetado de la vakebetik tra paĝoj, kiun nur kelkfoje interrompis tiaj frazoj: “vake kona!”, “fimortu kemono!” aŭ “fi, spiritualaĵo!”.

Neimagebla!

Poste li klarigis al la infanoj strangajn fremdajn vortojn, kiuj tamen ne signifis iliajn maniojn, sed la objektojn de la ĉiutaga vivo: la tablo, seĝo, domo, mano, piedo, do, ĉiu objekto.

Mi miris, kial necesas instrui lingvon, kiun neniuj parolas. Al mia demando la proko respondis, ke skorobehino ja devas tion scii. Kompreneble mi denove demandis, kial li devas scii, sed li denove respondis, ke tial ĉar la ne-skorobehinoj ne scias la skoro-lingvon.

Poste li klarigis multegajn stultaĵojn: se ni iras apud iu, kiu estas pli ol sep jarojn pli juna ol ni, ni devas teni nian manplaton sur nia nuko. sur la korto ni devas iri piedpinte, sed en la ĉambro ni demetas unue la kalkanon. Li klarigis, je kiu tago de la monato ni devas antaŭenkombi nian hararon kaj je kiuj tagoj ni rajtas porti blupentritan ŝuon.

Kiam mi demandis la kaŭzon de tiaj reguloj, li respondis, ke tiaj estas necesaj, ĉar la ne-skorobehinoj, ne kondutas tiel.

Post mallonga tempo la proko deklaris, ke ĉiuj povas foriri, kaj ni kune kun la infanoj forlasis la kripligan instituton.

Sur la korto mi pardonpetis, ĉar mi devis momente flankeniri. Mi volis enpaŝi al unu el la niĉoj, sed la proko saltis al mi kaj, ekkaptinte mian manon, kriis:

– Kion vi volas, malfeliĉulo?

Mi devis senkaŝe nomi mian bezonon laŭ ĝia nomo, sed li min ne enlasis.

– Sed eksciu, ke tie estas farataj nur aĉaj funkcioj!

Embarase mi respondis, ke mi havas scion pri la aĉa destino de tiuj niĉoj, sed ni ĉiuj estas tamen homoj kaj mia veziko jam streĉiĝas ĝis krevo.

– Mi diras ĝuste pro tio, – li kriadis plu. – Ĉu vi scias, por kio estas tiuj niĉoj? Por la spiritualaĵo!

Tiel mi eksciis, ke ĉiu infano havas apartan niĉon, kaj ili rajtas manĝi la tagmanĝon nur tie, enfermiĝinte.

Kaj kiam mi interesiĝis pri ties kaŭzo, li menciis denove la ketnion. Per kio alia ili argumentus la kutimojn neargumenteblajn per racio, ol per fantasmagorioj, imagitaj en la aeron? Ĉar ĝi estas ketni! Ĝi estis regulo, sed neelkalkulebla kaj stulta. Idiota elcerbumaĵo, sen ia ajn reala bazo, kion mi per angla vorto eĉ proksimume ne povas traduki.

Mi ĉirkaŭrigardis senkonsile en la plej granda embaraso kaj volis demandi, kie estas ĉi tie la latrinoj, kiam mi senatende ekvidis naŭzan spektaklon.

La elvenintaj infanoj sur la korto unu post la alia elbutonumis siajn vestaĵojn kaj antaŭ la okuloj de la proko, sen ia ajn hontemo, malplenigis siajn vezikojn. Mi volas ĝuste konsternite atentigi la prokon, la vorto jam balanciĝis sur miaj lipoj, kiam mi ekvidis, ke la ekzemplon de la infanoj ankaŭ li sekvas sen ia ajn skrupulo.

Mi forturniĝis pro honto kaj ne povis reteni mian opinion pri ilia malbelega konduto, sed li tute ne ĝenis sin en sia funkcio, eĉ mire demandis, kial tio estus hontinda?

– Ĉar tiel postulas la deco! – mi respondis, sed kompreneble angle.

– Kio estas deco?

Verdire mi embarasiĝis, serĉadis la vortojn, kaj mi devis rekoni, ke ĉi tiuj malfeliĉuloj eĉ por la deco ne havas vorton. La Leganto povas imagi, en kia malfacila situacio mi troviĝis, sed eĉ proksimume mi ne povis traduki ĝin al la lingvo, kiu pretiĝis vere nur por aferoj, neestantaj en la naturo.

Karakteriza estas pri ili, ke kiam mi tamen provis ĉirkaŭdire klarigi la decon, li respondis, ke ĝi povas esti nur stulta manio sen ia reala bazo.

Kion alian mi povis atendi de frenezuloj?

Naŭzite ĝis la profundo de mia animo, mi rapide diris price-pruce kaj foriris, por ke hejme, aranĝonte miajn necesajojn, mi enfermiĝu en mia ĉambro kaj ĝis la morgaŭa “laboro” liberiĝu de iliaj frenezaj torturoj.

Sed la sorto, aŭ pli ĝuste, la frenezo ne lasis, ke mi finu la hodiaŭan tagon nur per tiom da aventuro.

Ĉar, kiam mi elpaŝis tra la pordo, infano, dum ludo, rifuĝante de sia kunulo kuregis kaj per tuta svingo karambolis kun mi. Mi kolere lin riproĉis.

– Malfermu viajn okulojn, fileto!

La infano senkomprene gapis al mi.

– Kion? – li demandis.

– Viajn okulojn! Rigardu antaŭen, se vi kuras!

– Kio estas miaj okuloj?

Mi jam volis lin insulti, ĉar mi kredis, ke li volas min nur inciti, sed la infano petis kun la plej serioza mieno, ke mi klarigu al li, kio estas la okuloj.

– Tiuj du brilaj kugloj super via nazo, – mi diris montrante.

– Kaj kial mi malfermu ilin?

– Por ke vi vidu!

– Ĉu vidi per la smeraldoj? – li demandis mirege.

Nun mi jam vidis, ke la infano ne konas siajn okulojn, kaj malgraŭ mia kolero mi klarigis per kelkaj vortoj, ke ili ne estas smeraldoj, sed okuloj per kiuj ni vidas, sed la infano nur ridis, poste subite turniĝis kaj kuris al la proko.

– Vake, vake, – li kriis ekscitite. – Tiu homo diris, ke la smeraldoj estas okuloj kaj mi devas vidi per ili!

Mi jam ne plu ĝenis min per li, mi volis ekiri al mia vojo, sed la proko per kelkaj impetaj paŝoj saltis al mi, ekkaptis mian brakon, flankentiris min kaj tie min riproĉis en ekscitita tono.

– Kial vi ruinigas tiun senkulpan etulon?

– Ĉu mi ruinigas?

– Ne neu! La infano scias ne per si mem, ke li havas okulojn, kaj li devas vidi per tiuj! Tion li povis lerni nur de vi!

Surprize mi staris. Mi tute ne neis, ke mi diris tion, mi nur demandis, kial tio estas ruinigo?

Li rigardis al mi eĉ pli konsternite.

– Ĉu laŭ vi ne estas ruinigo, se la infano ekkonas siajn organojn antaŭ sia tempo? Ĉu ne estas ruinigo, se li ekkonas, kion oni devas fari per ili?

Kontraŭ tio mi plej intense protestis, deklarante, ke tia falsa metodo havas nenian sencon: la infano pli-malpli frue ekkonos, por kio estas la okuloj, la organojn oni tamen ne povas uzi por aliaj celoj.

La destinon de la organoj ni ne kaŝi, sed plej eble frue malkaŝi devas al la infano. El la kaŝado la infano gajnas nur danĝerojn.

– Ho, vi aĉulo! Ĉu al vi ne estas danĝero, se la malforta burĝono malfermas siajn okulojn kaj volas vidi per tiuj?

Mi jam ege koleriĝis kaj ne povis min bridi. Mi konsilis al li, se li estas frenezulo, li kuracigu sin, sed ne molestu sur la publika strato normalcerbajn homojn. Vorto sekvis vorton, el la preterpaŝantoj multaj kolektiĝis ĉirkaŭ ni, al kiuj mi plende rakontis la aĉan insulton, sed ĉu miaj Legantoj kredas aŭ ne, ili ne silentigis mian insultanton, sed min riproĉis atake, kaj mi povis rifuĝi nur per rapida kuro elinter la frenezuloj. Kaj ili ankoraŭ tiam kriadis post mi, ke mi detruas la bruĥon de la infano!

Poste mi demandis ankaŭ al Zemoki la kaŭzon de tiu idiotaĵo, sed li parolis denove pri ordo, ketni, plantaĵo, kaj fundamenta ŝtono, nur al mia demando mi ne ricevis respondon, kaj mi ankoraŭ hodiaŭ ne scias, kiel mi tiam pekis, sed verŝajne en mia situacio ĉiu racia angla ŝtatano troviĝus en la sama necerteco.

Tiu konstanta necerteco kaj timego naskis en mi tre strangan senton, kiu nature, en la sana Granda Britio estas nekonata, kaj ĝuste pro tio estu al mi permesate, ĉefe por miaj nervokuracistoj-kolegoj, ĝin mencii, kiel psikologian noton.

Nome, iom post iom min penetris la sento, ke mi mem estas la senvalora, sentaŭga frenezulo. Ke devas ekzisti io, kion la behinoj ĉiuj konas, nur mi ne kapablas ellerni, ĉar tiu kapablo mankas en mi. Kvankam interne mi sentis spiton kontraŭ la idiotaĵoj, tamen iom post iom mi jam komencis kredi, ke tiu spitemo estas nur la kaŝado de mia senkapablo kaj ĝi estas laŭesence nur mia malestimo al mi mem.

Por ilustru tiun senton, eble mi povas kompari al tiu, kiel se oni longe rigardas de ponto la riveron. Post iom da tempo oni iluzias, ke la rivero estas la fiksa punkto kaj oni moviĝas. Ĉe mia alveno, kiam mi vidis ilian memturmentan stultecon, min ankoraŭ plenigis iom da memfido, mi estis konvinkita, ke mia racia helpo nenie estas tiel bezonata, kiel en ilia medio.

Sed mi devis sperti, ke ju pli publikutilan veraĵon mi diris, des pli akrajn atakojn mi ricevis kaj, eĉ se ili laŭokaze ne suferigis min, unu aferon mi neniam povis akiri: ke ili komprenu la duoble-duon. Naturajn faktojn, kiujn eĉ la seninteligenta animalo per si mem scias, ĉi tiuj neniam povis encerbigi. Al miaj vortoj la respondo estis ĉiam nur ĝisnaŭza ripetado de maniaĵoj kaj neestantaj fantasmagorioj. Inter la aŭdita vorto kaj ilia cerbo absolute ne estis interligo.

Ĉi tiu senespera senfrukteco, la obstina kaj neĉesigebla vortodraŝado, sed ĉefe la furioza persekuto de la sana cerbo ennervigis en min la senton, ke la malklera, malgranda kaj stulta estas mi mem. Kien ajn mi paŝis, mi ĉiam karambolis kun fantomoj, dum la logiko kaj la memkompreneblaj naturaj veraĵoj ĉi tie tute ne estis bazo de la penskomunikado.

Dekdua ĉapitro

Nun ni konatiĝas kun pli grava stadio de la behin-malsano: kun la kipu. – Malsamopinio inter Zemoki kaj Zeremble kaj ĝiaj sekvoj. – La manieroj de la malbonigo de la seĝo. – La superŝnuristoj. – Iu behino predikas la sanan cerbon. – Ni ekscias, ke la kipu estas por la pulmo. – Disputo pri la brusto de la virino kaj pri la papili-bilevoj. – La historio de iu fama mufruko.

Por ke oni ekkomprenu la kipuon, antaŭe al la Leganto mi devas rakonti malĝojan historion, al kiu estis oferita mia delikata vestaĵo ricevita de la hinoj.

Mi devas rememorigi la Leganton, ke jam ĉe mia alveno min surprizis, kiajn mizeraspektajn vestaĵojn portas la behinoj. Ĉiuj vestaĵoj estis traŝiritaj en kelkaj lokoj tiel, ke jam ĉe la plej malgranda venteto ili frostotremis. Krome ili surprizis la plej diversajn objektojn: ŝtonojn, skarab-kadavrojn, dentoskrapilojn, ostojn, ktp. La celon de ĉi lastaj mi ne komprenis, sed iliaj mizeraj ĉifonoj vekis en mi malgraŭ mia tuta naŭzo kompaton. Mi pensis kun iom da riproĉo pri la hinoj, kiuj, – kiel mi tiam opiniis, – tiel avare vestas ilin, ankoraŭ pli, eĉ la kudrofadenon ili envias al la malfeliĉuloj. Mi timeme pensis pri la tempo, kiam ankaŭ mia pura kaj sendifekta vestaĵo eluziĝos, kaj ankaŭ mi mem vestiĝos kiel almozetulo.

Sed provizore kun la agrabla kaj fiera sento de la riĉeco mi portis inter ili mian vestaĵon. Mi sentis min vera kinostelo, vidante la okulojn post mi turniĝintajn kaj aŭdante la interflustradojn, kiuj sekvis miajn paŝojn.

Ĉi tiu sensacio poste tamen fariĝis al mi iom ĝena, ĉar ĝin akompanis la konscienciproĉo, kiun ĉiu bonintenca homo sentas, se lian riĉecon sekvas la avida rigardego de la malriĉuloj.

Multe mi cerbumadis, kiel eblus helpi pri la ĉifoneco, de kiu ankaŭ Zemoki ne estis escepto. Sur liaj genuoj kaj sur la maldekstra sidvango oscedis grandaj truoj, de tiuj pendolis la ĉifonaj ŝiraĵoj de la drapo.

Foje mi fakte menciis al li mian bedaŭron kaj esprimis mian kompaton al la malriĉaj, ĉifonitaj amasoj.

Zemoki kunsente kapjesis, deklaris, ke por la vestado de la amasoj ankaŭ la betikoj faras ĉion fareblan, sed la problemo estas tre grava, ĉar bedaŭrinde la publiko ne povas akcepti pli multan vestaĵon, ĉar ili havas tre malmultan.

Mi sentis iom da konfuzo kaj deklaris, ke la fakto, ke la homoj havas malmultan vestaĵon, jam per si mem pravas, ke ili povas akcepti ankoraŭ pli multan, sed li respondis, ke tio pravas ĝuste la malon, nome, ke ili ne povas akcepti pli. Por ke la amaso ricevu vestaĵon, antaŭe estus necese, ke ili jam havu multe. Tio estas nerefutebla ekonomia tezo, kiun en la Nutra kaj Vivdona Oficejo elkalkulis homoj pli saĝaj ol ni.

Sed li tamen konfesis, ke multaj homoj iradas en mizeraj vestaĵoj, kaj aldiris:

– Ankaŭ vi ne povos estonte iradi en tia plorinda maskaĉo.

Mi tute ne estis preparita al tia respondo, sed Zemoki klarigis, ke mi povas maksimume hejme restadi en tia vesto, sed kiel beratnu, mi ne povas iri tiel inter la homojn, ĉar tian portas nur la tre malriĉaj homoj kaj eĉ tiuj nur por tre malpuraj laboroj.

Mi ne volis kredi al miaj oreloj, sed li duafoje diris la samon kaj decide deziris, ke mi tratranĉu mian veston.

Mi firme kredis, ke el li parolas nur la envio. Superece mi respondis, ke mi dankas, sed por mi estas taŭga ankaŭ la sendifekta vesto, sed Zemoki tre serioze kaj bonkore konsilis ne fari el mi frenezulon; beratnu devas ja zorgi, ke li aperu en bona vestaĵo.

Al tio mi respondis, ke mia vesto estas bona, ĉar ĝi estas sendifekta, kaj li pruvadis, ke tute kontraŭe: la tratanĉita vestaĵo estas pli bona, ĉar ĝi estas kipu, kaj ĝuste pro tio ĝin portas pli multaj homoj.

Nature mi ne estis tiom facile trompebla. Superece, eĉ kun iom da moko mi opiniadis pri la *kipuo*, post kio Zemoki rigardis min per profunda malestimo kaj ŝultrolevante foriris.

Mi pensis la aferon tute aranĝita, sed post kelkaj tagoj mi ricevis novan alvokon el multe pli grava loko.

Nome, tiam mia betiko mem atentigis min, ke mi klopodu tranĉadi mian veston, ĉar oni postulas de beratnu, ke li adaptiĝu al la prudentaj reguloj kaj ne vestiĝu kiel idioto.

Do, mi denove devis konstati, ke en la vivo ne estas okazo, en kiu oni povas sin izoli de la frenezo. Ili venas post la homon kaj lin devigas kunfreneziĝi.

Nun estis riskita mia posteno, mia ĉiutaga pano, do, kvankam dolorkore, mi devis fuŝi miajn vestojn.

Dum du tagoj mi esploradis, kiel aspektas la vera kipu-vesto, sed mi vidis preskaŭ tiom da manieroj da distranĉado, kiom da behinoj estis en la kolonio.

Fine mi konstatis, ke la plej multaj eltranĉis la drapon sur la maldekstra brusto kaj sur la dekstra sidvango kaj pendigis sur la kolumon hirundan plumon kaj majskarabon.

Do, inter pezaj ĝemoj ankaŭ mi tranĉis mian bonan veston, kaj min konsolis nur la scio, ke per tio mi almenaŭ certigas mian ĉiutagan panon kaj mian pozicion inter ili. Tiu scio iome trankviligis min kaj alitage, kiam mi en mia kipu-vestaĵo aperis antaŭ Zemoki, mi jam gaje lin price-pruce-is kaj afable ridetante montris mian kostumon, atendante la efikon.

Sed Zemoki por mia plej granda surprizo ekridegis:

– Ho, vi malfeliĉa bivag, kiel vi povis tiom fuŝi vian veston?

Eĉ haltis mia spiro, kaj mi povis nur balbute elbuŝigi, ke ĝuste li diris antaŭ kelkaj tagoj, ke mi devas tiel fari, kaj espereble mi ne estas nur viktimo de malsprita ŝerco.

Je tio li eĉ pli forte ridegis kaj diris, ke mi verŝajne nenion konjektas pri la kipu. Nome, ĉi tiu tranĉado tute ne estas kipu, ĉar ĉi tiun tranĉmanieron jam ĉiuj portas!

Tiel mi ekkonis, ke nek tio estas kipu, kion ĉiu portas, nek tio, kion neniu portas. Eĉ pli: kio hieraŭ estis kipu, hodiaŭ ne plu estas.

Mi estis nur scivola, kio estas do la kipu?

Do, post la difektado de mia vesto, en tia murdema humoro mi grumbladis dum kelkaj tagoj, kaj mi revadis pri tio, per kiaj elektitaj turmentoj mi ekzekutis Zemokin, se iam la sorto lin donus al miaj manoj.

Post kelkaj tagoj mi foje sidis sur benko, kiam Zemoki kaj Zeremble alvenis kaj per amika price-pruce sidiĝis apud mi.

Mi ĝene diris kelkajn ĝentilajn vortojn pri la vetero, je kio ili enue respondadis, kaj poste la parolo transiris al la dornumo de la seĝo.

Tial mi devis elkroĉiĝi el la diskurso kaj mi sentis, ke apud ili mi estas nur tolerata bivago.

Dum iom da tempo mi ĝene silentis, sed fine mi senkuraĝe demandis, kial entute la seĝo devas esti dornumita?

– Ĉar tio estas kipu – ili respondis.

– Sed kio estas kipu? – mi demandis, kaj mi decidis, ke nun mi ne lasos min subpremi, sed per logika menso mi kondukos la aferon, ĝis fine mi ilin pelos en konfuzon.

– Kipuo estas, kio estas agrabla, – ili respondis en la plej natura tono de la mondo.

Post tio mi postulis klarigi, kio estas por ili agrabla. Al tio ili lakone respondis:

– Tio, kio estas kipuo.

Mi devis konvinkiĝi, ke ĉi tiujn homojn oni ne povas konfuzi. Nome, ilia cerbo estas libera de la brido de la logiko, kiu retiras la gvidrimenon antaŭ la eraroj kaj kreas interligon inter la aŭditaj vortoj kaj la funkcio de la cerbo.

Mi tamen denove postulis klarigi, kian sencon havas la dornumo de la seĝo, sed ili respondis same per demando:

– Ĉu por vi estas tute egale, ĉu vi sidas sur glata aŭ sur dornplena seĝo?

– Tute ne. Ĉar sidi sur glata seĝo estas pli agrable.

Zemoki amuzate ridis pri miaj vortoj, humorplene pugnobatis mian dorson, rimarkis, ke mi estas bonhumora knabo, nur mi devas priatenti, ke mi ne malkaŝu mian bivagecon al aliaj.

Tio jam estis pli multe, ol mi povis toleri. Ke mi tamen ne esprimis tute senĝene mian opinion, kaŭzo por tio estis nur, ke intertempe en mia cerbo ekbrilis grandioza venĝa ideo.

Dece dankante la instruon mi hejmeniris kaj tie mi sekrete fiksas kelkajn lignajn dornojn sur mia seĝo. La sekvantan tagon mi atendis la okazon ensidigi Zemokin. Mia intenco estis eĉ, por la pli granda efiko, lin enpuŝegi dum la ĉeesto de atestantoj.

La sorto estis je mia helpo, ĉar mi trovis Zemokin kaj Zeremblen kune en la korto. Mi elkore invitis ilin en mian ĉambron, kion ili fakte akceptis, kaj kun humorplena interbabilado ni iris al mia hejmo.

Hejme mi atendis, ĝis Zemoki venis antaŭ la dornumitan seĝon, kaj tiam mi subite puŝpremis lin sur la “kipu”-on.

Li dolorplene ekhurlis, kaj mi elkore ridegante demandis, ĉu estas bongusta la sido en la kipu?

Zemoki saltleviĝis, ekrigardis la seĝon, kaj je mia grandega surprizo nun li komencis ridi.

– Ho, vi bivago... vi bivago... – li balbutis singultante pro ridego. – Nature, ĝi pikas, sed ĝi ne estas kipuo. Vidu! – li sin turnis al Zeremble, – laŭ li ĉi tio estas kipuo!

Zeremble alrigardis, kaj nun ili ambaŭ ekridis. La muroj ŝanceliĝis, kaj sur miaj lipoj frostiĝis la venĝplezuro.

– Kial? – mi demandis konsternite.

– Kial! Ĉu vi ne vidas, ke ĉi tiuj dornoj estas senkoloraj? Ho, mia amiko, oni devas ĝin pentri laŭ kipua maniero!

– Kaj tiam ĝi ne pikas?

– Kiel ĝi povus piki? La vera kipuo ne pikas. La vera kipuo lulas, ĉar ĝi estas kolora! Sed ho, kial mi klarigas tion al bivag!

Mi jam tute konfuziĝis, kaj tiuj ridegis plenbuŝe. Sur miaj lipoj balanciĝis kolera respondo, sed momente mi ekpensis, ke eble ili signas per la “pentro” ion alian, per kio oni moligas kaj komfortigas la dornojn. Mi singarde demandis:

– Kaj kiel oni devas ilin pentri?

La vizaĝo de Zemoki ŝanĝiĝis je emfaze serioza.

– Nu, aŭskultu: ĉi tiujn ĉe la rando ruĝe kaj la mezajn blue.

– Tio ja estas stultaĵo! – mi deklaris kun profunda konvinkiĝo.

– Vi pravas! – kriis al mi Zeremble, kaj pro la mirego mia mandiblo defalis.

– Vi pravas! – li daŭrigis plilaŭtiginte sian voĉon. – Vi havas pli da kapablo por la kipu.

Mi ne sciis kion diri. Momente mi pensis, ke lia cerbo kontraŭ espero resaniĝis.

– Tio estas vere stultaĵo, – li daŭrigis. – Ĉar oni devas la randajn pentri blue kaj la centrajn ruĝkolor.

Mi konvinkiĝis, ke ĉi tie ne ekzistas helpo, kaj mi eksilentis.

Sed tiuj akre ekdisputis, citis la majstrojn de la kipu, kaj post kvin minutoj ili sin ĵetis unu al la alia, ŝirante kaj batante sin reciproke. Al Zemoki rompiĝis du dentoj, la kapo de Zeremble ŝvelis kiel aerbalono kaj, kvankam intertempe ili frakasis sur siaj kapoj en pecojn ankaŭ mian “kipu”-seĝon, disŝiris mian litkovrilon en ĉifonojn kaj tretrompis la pordon de mia ŝranko, tamen mi povas firme aserti, ke dum mia ĉi tiea restado ĉi tiuj estis por mi la unuaj agrable pasigitaj minutoj.

Sed mia agrabla sento ne longe daŭris. Kiam mi poste restis sola, min kaptis timo, pensante, ke foje ankaŭ mi mem povos esti la pasiva subjekto de tia kipu-disputo, kaj tiam, – mi opiniis, – se eĉ la kompetentuloj de la kipu estas tiel draŝataj, kion oni faros al mi, malfeliĉa bivago?

Tial mi decidis, ke, kiom ajn vandala kutimo estas la kipu, mi ellernos la esencon de la kipu. Mi jam sciis, ke ĝi estas sencela kaj stulta, sed mi ankoraŭ kredis je la ekzisto de ia sistemo.

Mi komencis tiel, ke mi klopodis kunveni kun la majstroj de la kipu. Demandadi mi ne kuraĝis, sed mi solvis tiel la problemon, ke dirante ĝeneralaĵojn, mi flate laŭdis ilian laboron, kio – laŭ mia sperto – estas tre efika metodo kaj ekirigas la amikecon. La laŭdanton ili ne priridas, eĉ se li diras (laŭ ili) stultaĵojn.

Sed ĉiu majstro komencis per tio, ke li mallaŭdis la alian kaj pruvadis ke oni devas difekti kaj fuŝtranĉi la seĝon ne tiel, kiel la alia faras, ĉar ne tio estas la vera kipu.

Kaj, fakte, ĉiu rigardis nur sian propran galimation kipu, kaj ĉiu difinis ĝin diverse, kvazaŭ la diskuto temus pri aferoj, starantaj ekster ilia volo, kiel ekzemple la evoluo de la raso, aŭ la grupiĝo de la elektronoj. Sed la kipu estas kreita de ili mem, kaj la plej harstariga estas ke, dum ili tute precize konis la evoluon de la raso kaj la elektronojn, pri siaj propraj elcerbumaĵoj ili havis nenian komunan, unuecan aŭ precizan ideon. Ĉu ne estus pli facile elcerbumi unusolan ideon?

Jam tiutempe mi konjektis, ke mi neniam ellernos la regularon de la kipu, ĉar ĝi absolute ne ekzistas; nur tion mi ne povas kompreni ĝis hodiaŭ, sur kiu bazo ili tamen povas diskuti pri ĝi dum tagoj?

Ankaŭ la ceteraj vivreguloj de la behinoj estas ja amaso da frenezaĵoj neekzistantaj en la realo, sed ili estas almenaŭ reguloj. Sed la regulojn de la kipu neniu sciis, kaj oni tamen devis ilin sekvi, kvazaŭ ili ekzistus. Do, la kipu signifis ne nur neestantajn aferojn, sed eĉ tion oni ne sciis, kiamaniere tiuj ne ekzistas. La afero aspektis, kvazaŭ ili estus kreintaj la kipuon por tio, ke oni povu trovi eraron eĉ en tiu homo, kiu ellernis ĉiun regulon de ilia surkapen starigita vivo. Plej ĝuste mi povus diri, ke la kipu estas duagrada kretenaĵo.

Eble tute ne necesas diri, ke tiun duagradan malsaniĝon de la cerbo ili ne nur rimarkis, sed ili eĉ rigardis la kipuon la plej supera manifestiĝo de la homa menso kaj estis tre fieraj pri ĝi!

Kaj se iu dirus ĉe kipu-disputo, ke multe pli grava estus la konstruo de komforta seĝo, la malkovro de la serumo de la tuberkulozo, aŭ la enflikado de iu trua domtegmento, tiun li nomus malklera kaj idiota bivag.

Ili estis fakte konvinkitaj, ke la kipu estas la ĉefa celo de la vivo kaj la kreantaj sciencoj estas destinitaj nur subteni nian vivon por la “ĝuoj” de la plialtgrada kipu.

Tiu ĉi malsano amarigis ĉiun branĉon de la vivo kaj malebligis ankaŭ la validiĝon de la tekniko, kuracado kaj ceteraj utilaj sciencoj.

Ekzemple ili boris malgrandajn truojn tra la kulero tiel, ke la supo elfluis. La ortangulan formon de la klinko ili rektigis en linion tiel, ke oni povis la pordon malfermi nur prenante ĝin per ambaŭ manoj. En la fenestrojn ili enmasonis grandajn ŝtonojn tiel, ke por la sunradioj apenaŭ restis malgranda truo; eĉ pli, la tamen restintan vitran surfacon ili enŝmiris per diverskoloraj ŝmirajoj.

Kaj ili malbonigis ne nur la objektojn, sed ĉiun oportunan funkcion de la vivo. Se la behin iris al sia celo tiel, ke post ĉiu kvina paŝo li eksaltis kaj turnis ĉirkaŭ sia akso, ankaŭ tio estis specimeno de la kipuo. Multaj eĉ akompanis ĝin per monotona, konfuza hurlado. Kaj fine, se por la komuniko de la pensoj ili uzis ne tiujn vortojn, kies signifo konformas al la komunikaĵo, sed konfuzan galimation, kiu havis nenian interrilaton al la temo, ankaŭ tio nomiĝis kipuo.

Sed miaj Legantoj apartenas plejparte al la kulturita laika publiko, kiu serĉas en mia verko prefere la priskribon de la ekzotaj landoj por plivastigi sian etnografian kaj geografian scion, postulitajn de la civilizacio, dum la nervokuracistaj analizoj malpli interesas ilin.

Do, anstataŭ superflue elmontri mian modestan psikiatrian scion per la analizo de la kipuo, mi preferas provi la simptonan priskribon, pli interesan por la laika publiko, nome, kian seĝon la unuopaj kipumajstroj opiniis esti kipuo.

Mi jam menciis, ke la plej multaj fiksaj pintajn konusojn en la seĝojn, sed ankaŭ tie ĉi dividiĝis la opinioj: unu grupo fiksas tiujn en la dorsapogilon, alia asertadis, ke oni devas tiujn najli en la sidplaton. Estis, kiu puntigis la manapogilon de la seĝo, ke oni ne povis ĝin preni per la mano, kaj ĝi pikis la brakon, la alia najlis noditajn ŝnurojn sur la sidplaton, pro kies nodoj oni ne povis sursidiĝi.

Sed estis iu grupo, kiu asertis, ke la seĝo estas nur tiam bona, kiam ĝi estas simpla.

Sed ho, ne pensu la Leganto, ke ties cerbo saniĝis kaj volis pretigi normalan seĝon sen nodoj, dornoj kaj punktoj! Tute ne! Por ili la simpleco signifis, ke unu desegis de la seĝo la dorsapogilon, alia la piedojn, tria demetis la sidplaton, kiuj estis laŭ ili nur “komplikaĵo” kaj “afektaĵo”. La kvara diris, ke ĉio tio ankoraŭ ne estas sufiĉe simpla; la perfekta kipuo estas atingebla nur per la forigo de ĉiu parto de la seĝo. Unu el tiaj majstroj fiere montradis sian ĉambron, en kiu estis nenio kaj al la demando de la mireganta vizitanto li diris:

– Blanka seĝo en blanka aero.

La du grupoj tamen konsentis en tio, ke la seĝo estas por si mem kaj kiu faras seĝon nur por sursidi, kiel sensenta besto, tiu estas bivago.

– La seĝo por la seĝo! – ili diris facilgeste.

Cetere mi ĝenerale spertis, ke ju pli racie sonis iu ilia opinio, reale ĝi estis des pli freneza, kion la Leganto baldaŭ spertos.

Nome, tamen troviĝis tria grupo, kiu deklaris, ke la seĝo estas por ke ni povu komforte sidi, do ni ne metu noditajn ŝnurojn sur la sidplaton.

Ĉu ne, kiel racie ĝi sonas? Kaj nun mi petas la Leganton, ke li apogu sin fikse!

Ĉar tiuj, kiuj nomis sin superŝnuristoj, el ĉi tiu tute korekta premiso, venis al la konkludo, ke oni devas la nodojn ligi ne per la ŝnuro, sed per... aero!

– Ĉar, – ili diris, – la kipuo estas pli altgrada afero, sekve ĝi havas nenian interrilaton kun la utilaj objektoj. La kipuo estas alia kaj la seĝo estas ankaŭ alia, kaj la kipuo devas esti tute sendependa de la seĝo, por ke ĝi manifestiĝu en sia absoluta pureco.

Ĉi tiuj stariĝis sur la placoj, siajn okulojn ekstaze suprenturnis kaj per siaj manoj tuttage faris gestojn, kvazaŭ ili ligus nodojn. La amaso rigardis ilin kun pia respekto, multaj ĵuris, ke ili vidas la nodojn, kiu ne vidis, tiun ili nomis malprogresema bivag kaj asertis, ke tiuj nodoj superas ĉiujn ĝisnunajn. Tamen ekzistis kelkaj, kiuj priridis la tutan aferon, deklaris ĝin esti frivola kaj sensenca ĉarlatanaĵo, akuzis la superŝnuristojn per dekadenco, sed por eviti, ke la Leganto denove kreu al si

falsan opinion, mi rapidas diri, ke tiuj estis ŝnurpartianoj kaj opiniis, ke la nodo estas tamen bona nur, se ĝi estas ligita per ŝnuro, kaj sur la seĝo ĝi penetras en nian postaĵon.

Simila trompiĝo trafis min ne malofte. Tia okazo estis, ekzemple, kiam iu kipu-majstro diris al mi per tre serioza tono:

– Kiujn vi vidas ĉi tie ĵonglaĉi ĉirkaŭ la kipuoj, ĉiuj estas frenezuloj kaj ĉarlatanoj. La seĝo estas destinita, por ke ni sidu, kaj tiam ĝi estas bona, se ĝi estas komforta. La nodoj kaj dornoj same ne taŭgas sur ĝi, kiel sur la aero.

Mi esprimis mian varman kunsenton kaj demandis, kiel la behinoj kondutas kontraŭ li, havanta tian kuraĝan kaj veran opinion.

Li respondis, ke la behinoj lin rigardas bivag pro lia opinio.

Mi preskaŭ plorante falis al lia kolo. Varma, amika konversacio evoluis; ni kune mallaŭdis la tutan frenezulejon, ĝis li foje kontraŭ atendo deklaris:

– Plej kipua estas, kio estas utila, ĉar la kipuoj estas la utileco mem.

Tiam min komencis kapti ĝena sento de la disonanco. Mi time demandis:

– Do, se ne ekzistas kipuoj sendepende de la utileco, kial necesas la aparta esprimo: “kipu”?

– Ĉar la kipuoj ekzistas kaj naskiĝas kune kun la homo.

– Sed tamen, se la kipuoj estas la utileco mem! – mi kontraŭdiris. – Ĉar ĉu ne, kian sencon havas ĉi tiu frazo: “la plej animala estas, kio estas besto”?

– Kipuoj ekzistas kaj devas ekzisti, – li daŭrigis obstine: – Mi konsilas al vi legi multe, kaj vi komprenos, ke ĝin ni bezonas, ĉar ĝi estas la plej altgrada manifestiĝo de la homa menso, ĝi estas tio, kio faras la vivon vivo. Sen kipuoj ni ne povus vivi.

Mi eĉ dufoje demandis, sed pruviĝis, ke li diris kipuon. Ne vitaminojn kaj ne albumenojn. Ili firme kredas eble, ke ili sen kipuoj mortus pro beribero aŭ skorbuto.

Liaj vortoj efikis al mi kiel malvarma duŝo kaj per ĝentila grato de postaĵo mi rapide adiaŭis. Sed li ne reĝatis, ĉar li deklaris, ke la tuta ketni estas idiotaĵo; jam venis la tempo de la puriga revolucio, kiu donos novan, racian ketnion al la mondo, kiam la homoj ne gratas la postaĵojn unu al la alia kiel frenezuloj, sed senceremonie diros: “Racia menso, vake!” kaj ekfrotas sian frunton per la dikfingro.

Mi rememoris denove pri tiuj horrorplenaj sonĝoj, el kiuj mi klopodis vekiĝi, sed mi nur transvekiĝis al eĉ pli horrorplena.

Ĉi tiuj malfeliĉuloj ekde jarcentoj faras nenion alian, ol luktante kun siaj sonĝataj inkuboj, vekiĝi el unu sonĝo al la alia, el sufero al sufero, kiu diferencas de la antaŭa nur laŭ ekstera koloro, kaj ili neniam deskuos la katenojn de la sonĝo. Lunatikaj erarvagantoj, kiuj neniam povos fariĝi homoj.

Kaj nun la Leganto imagu mian situacion inter tiuj, kiuj do mem ne scias la sencon de la vortoj faritaj de ili mem en la aeron, vortojn, kiujn ili komentis laŭ mil manieroj, parolante pri ili dume, kiel pri vere estantaj aferoj. Tiu stranga decideco, kun kiu ili parolas pri siaj ĥimeroj, vere embarasas la aŭdanton, ĉar ili predikas per tia facileco kaj entuziasmo, ke la sanmensulo kredus, ke *ili parolas pri io*, kaj li eĉ hontas, ke ĉion ĉi li ne konas, li balbutas kaj decidas lerni. Komence tian senton havis ankaŭ mi, nur post longa tempo mi ekkonis, ke ĉio ĉi fakte ne havas sencon kaj eĉ etinfano, havante ne konfuzitan cerbon, scias multe, multe pli, ol ili, kiuj la konon de la artefaritaj fiksitaj ideoj – kies sencon ili tute ne konas, – rigardas nepre kondiĉo de la klereco.

Estas imageble, kiel mi sentis min en tia socio, kie la sumon de la duoble-du oni diras jen kvin, jen tri kaj laŭ ĉiaspeca regulo alie kaj alie, sed nur nepre ne kvar. La malfeliĉa sancerbulo provas tion sekvi, por ke li ne estu ekskomunikata, sed li estas senpova, ĉar li konas nur unu regulon: la naturan veron, kiun li povas elkalkuli per siaj fingroj, sed kiun eldiri estas terura kulpo. Kaj neniam li scias, kiel li devas aserti la aferojn en ĉi tiu momento.

Tia malfeliĉulo baraktas en eterna necerteco, ĉar kiel ajn li penadas, li ne povas ellerni la plej gravan: forgesi la aritmetikon.

Ofte mi petis de Zemoki ian direktigon, el kiu minimume mi povus ekkoni kiel kompreni la kipuon, kial ĝi entute ekzistas kaj kiel utilas, ĉar, se ĝiaj reguloj jam ne havas argumenton, ĝia ekzisto tamen devas havi ian kaŭzon. Sed li mansvinge aranĝis mian demandon.

– La kipuo estas instinkto, naskiĝinta kun la homo mem. Tiu, kiu naskiĝas sen tio, estas bivag, al kiu estas vane provi klarigi.

(Kvankam foje mi jam rimarkis, denove mi ripetas, ke tio ne pravas. La behina malsano ne estas heredebla. Mi povas firme aserti el mia propra sperto, ke kvar-kvinjaraj infanoj, kies instinktoj, do iliaj varmo, malsato, soifo kaj ceteraj sentoj estis sanaj, montris nenian interesiĝon al la dornita seĝo. Vidante la nodojn, ili aperigis nenian reagon, dum samtempe ili manetendis al la buterpano per videbla ĝojo kaj dum malvarma vetero ili sidiĝis per si mem apud la fornon. El la behina malsano la infano heredas nur la inklinon, kiu nur per longdaŭra, intenca infektado evoluas al malsano en la skoro kaj dum la vivo, pasigita inter la behinoj.)

Do, pri la kipuo mi sciis nur tiom, ke ĝiajn regulojn difinas ĉiu grupo alie, eĉ mi parolis ankaŭ kun tia homo, kiu diris, ke “la kipuo estas la homo mem”. Mi devas menciigi ankaŭ tiun strangaĵon, ke al la kipuo havas interrilaton ankaŭ tiaj aferoj, kiuj eĉ laŭ ili havas al ĝi nenian interrilaton.

Ne konsterniĝu la Leganto, mi kalkulis pri tio, ke la konfuzeco de miaj vortoj la Leganton jam igas dubi eĉ pri mia propra menso. Sed ĉi tiu specimeno de iliaj frenezaĵoj jam estas tiel konfuza, ke mi povas ĝin ankaŭ difini nur konfuzo. Miajn vortojn mi povos komprenigi eble pli bone per ekzemplo.

Zemoki rakontis iam al mi, ke li aĉetis per multa mono seĝon, kiun li rigardis kipuo, kaj eĉ surskribita estis la nomo de certa kipumajstro. (Verŝajne mi jam ne devas rimarki, ke la behinoj la difektadon de la seĝoj ne punis, sed ili eĉ klopodis, ke ankaŭ iliaj seĝoj estu difektitaj kaj por la difektanta ago de tiaj “kipu-majstroj” ili eĉ pagis.)

Nu, post iom da tempo pri la seĝo de Zemoki malkovriĝis, ke ĝin difektis ne tiu certa kipu-majstro, sed alia, kiu nur surfalsis la nomon. Post tio Zemoki kaptis la falsanton kaj lin trenis al la betiko, kiu grave punis lin, ĉar li – trompis!

Nu, mi jam sciis tiom, ke pri la kipuo oni preskaŭ povas diri, ke ĉiu behino havas pri ĝi alian opinion. Sed Zemoki ja vidis la seĝon antaŭ la aĉeto, ĉu ne? Do, se oni povus paroli almenaŭ pri individua kipu-opinio, li nepre devis scii, ĉu la kipupeco de la seĝo meritas la prezon, aŭ ne. Tamen li koleriĝis ne tial, ke ĝi ne estis sufiĉe kipu, sed nur tial, ke ĝi estis farita de alinoma behino.

Do verŝajne ankaŭ la nomo apartenas al la kipuo. Mi ankaŭ demandas, kiel devas soni la kipua nomo kaj kian nomon oni devas surskribi al ia dornsistemo, por ke oni ne estu punata, sed li min priridis kaj nomis min bivag tiel, ke eĉ hodiaŭ mi ne scias, ĉu la sono aŭ la vicordo de la literoj de la nomo influas la kipuon de la seĝo.

Mi timas, ke mi troŝarĝas la paciencon de la kulturita kaj prudenta Leganto de Granda Britio per la priskribo de ĉi tiu malsano, kiu feliĉe furiozas nur en landoj ekzotikaj, tiom malproksime situantaj de Eŭropo, ke miaj kunpatrianoj neniel devas timi ties enportadon, tamen mi devas ankoraŭ rimarki, ke la kipu-malsano fuŝis ne nur la objektojn, sed eĉ la parolon.

Mi jam foje menciis pri tio: nome, se iu por komunikado uzis ne tiujn vortojn, kiuj konformas al la komunikaĵoj, sed konfuzan galimation, kiu havas nenion komunan al la temo, oni eĉ tion nomis kipu.

Kompreneble la Leganto demandas, kiel eblas fuŝi la behinan parolon, kiu jam estas en si mem amaso de ĥimeraĵoj.

Nu, dum ilia normala parolo sonis tiel, kvazaŭ oni parolus pri io, la celo de la kipu-parolo absolute ne estis komuniki ion. Kiuj parolis tiamaniere, tiuj nomiĝis mufruk-oj kaj same ne estis mortbatitaj,

kiel la kipumajstroj, eĉ pli, ili estis estimataj kaj iliaj sensencaĵoj estis presitaj, kaj ili ricevis por tiuj monon.

La surpapere presitajn vorto-konglomeratojn ili nomis *enspiro*, por ĝin distingi de la “normalaj” skriboj. Kial ĝuste enspiro, tion ni baldaŭ vidos.

Foje Zemoki kaj Zeremble legis la “enspirojn” de iu tia mufruko, en kiu li komparis la bruston de la virino al artiŝoko boligita en lakto, al malva radiko kaj al papiliaj bilevoj, do, al ĉio tia, al kio la virina brusto havis nenian interrilaton. Ĉefe la lasta rikoltis grandan sukceson, ĉar ĝi estis plej malproksime ne nur de la virina brusto, sed ankaŭ de la realo, konsidere, ke la papilio ne havas bilevojn.

La Leganto tute ne povas imagi, kiel serioze ili diskutis pri ĉi tio, cerbumante, al kio estas plej simila la virina brusto.

Fine mi, kun mia malfeliĉa racia kapo volis helpi al ili kaj diris:

– La brusto de la virino estas eble plej simila al la brusto de iu alia virino.

Ili ekrigardis unu al la alia, kaj poste eksplodis per granda ridego, dirante, ke tio havas nenian sencon, tio eldiras nenion, ĉar tio estas – simple la vera fakto!

Do, tio havas nenian sencon, kio diras la veran fakton!

– Sed tiam kial vi parolas aferojn, pri kies malvereco vi mem estas tute konvinkitaj?

– Ĉar tiel ĝi estas kipuo.

Eĉ imagi mi ne povis, kiel eblas dum horoj disputi kaj rompi la kapon por fine elcerbumi ion, kio absolute ne estas respondo al la problemo. Se tio estas la kipuo, tiam mi tute ne scias, kial la kipuo estas necesa. Mi eĉ eldiris, ke la sana cerbo ĉion ĉi rigardas idiotaĵo.

– Ho, vi bivag! – ili diris. – Ĝi estas *enspiro*, kiu estas ne por la cerbo, sed por la *pulmo*!

Kion alian mi povus respondi, ol ke por la pulmo estas nur la oksigeno, kaj la vortojn akceptas nur la ĉeloj de la cerbo, sed vane mi menciis mian kuracistan diplomon akiritan en la oksforda universitato, tamen ili eĉ priridis min, nomis min denove bivago, kaj poste ili deklaris, ke mi absolute ne komprenas la vibrojn de la pulmo; mi fermu mian buŝon kaj klopodu prefere lerni, ĉar mi estas stulta, kiel iu senpulma hino.

(Eble eĉ menciigi ne necesas, ke la hinoj spiradas kun pulmo same, kiel iu ajn alia homo. Frenezaĵo estas supozi vivantan homon sen pulmo!)

Do oni verŝajne emus akcepti, ke la kipu-parolo estas tio, kio ne estas vera, do estas ne por la cerbo, sed por la pulmo. Tamen eĉ en tio ili estas nekonsekvencaj. Nome, la plej mirinda kaj por eŭropano la plej fantazia estas tio, ke se iu sukcesas elcerbumi ian nerealan kaj sensencan vort-konglomeraton, ili tamen ne diris, ke ĝi estas kipu, ĉar ĝi estas nevera kaj sensenca, sed ili ekkrias: “Kian veron li diras!” aŭ: “kiaj sencplenaj vortoj!” Nekredeble!

Zemoki emfaze konsilis, ke volante evoluigi mian pulmon, mi studu la “enspirojn” de la *mufruk*, legata de ili.

Interese estas, ke ĉiam, kiam ili devis nei ian evidentan veraĵon, ili ĉiam rekomendis al mi la librojn.

Ties kaŭzon mi devas klarigi:

En la prudenta Granda Britio la libro estas por tio, ke ĝi plivastigu nian scion kaj akrigu nian intelekton, dum ĉe la behinoj la libro servas tre strangan celon, nome tiun, ke ĝi malakrigu la intelekton kaj kredigu la kontraŭon de ĉio tio, kio estas al la sana intelekto memkomprenebla vero. La hontado de la manĝo, la ŝtoner-teorio, la respekto de la boeto, de la bilevoj kaj de la kvadrato same ne povus disvastiĝi sen libroj, kiel sen la skoro.

Mi tamen decidis studadi la enspirojn de la menciita mufruko kaj iom post iom mi eksciis jenon:

Ĉi tiu homo, kiam li ankoraŭ vivis inter la hinoj, lernis la kuracistan fakon. Jam en sia dudeka jaro li faris surprizon per siaj nenormalaĵoj. El la elektra izolrubando li eltranĉis striojn kaj surgluis tiujn al la dorso de sia vesto kaj eĉ al siaj haroj. Li elrompis ĉiun trian denton de kombilo, la kripligitan kombilon pikis en pecon de argilo, la tuton ŝtopis en ŝuon kaj starigis sur sia tablo.

Super lia bankuvo de sur la plafono pendis grandbuŝa blua botelo, kiun li hejmenportis el la universitata laboratorio. (Ĉe ni tio estus nomata ŝtelo, sed en la libera ekonomio de la hinoj mi ne povas uzi tiun vorton.) En la botelo estis kuglolagro, sekigita oranĝa ŝelo kaj kadavro de lacerto.

Sian poŝtukon li konsekvence lavadis en la supa plado kaj la petrolon li eltrinkis.

Jam ĉi tiuj estus sufiĉaj ĉe ni, ke li estu transportata por urĝa kuracado, sed la hinoj, kiuj nur en la plej esceptaj okazoj miksas sin en la privatan vivon, ne reagis al tiaj “malgravaj” simptomoj, parte, ĉar tiuj ne estis danĝeraj al la publiko, parte, ĉar ili pensis, ke li havas per tio ian celon.

Ili konsideris la aferon phi serioze nur, kiam lia malsano jam ĝenis ankaŭ aliajn en ties laboroj, kaj li fariĝis danĝera por la publiko.

Nome, iuvespere, sur la marbordo li haltigis hinan virinon kaj komencis klarigi al ŝi, ke la lunradioj havas albumenon kaj vitaminon, kiuj la homojn nutras kaj satigas.

La virino haltis kaj respondis, ke ŝi ne apartenas al la nutraĵesplora laboratorio kaj volis pluiri.

Sed la mufruk ne lasis ŝin.

– Tio ne koncernas la nutraĵesploron, – li diris ekscitite kaj komencis plu klarigi la radian vitaminon. Li eĉ firme asertadis, ke la lunradioj enhavas la nutrajn materiojn nur dum la samtempa ĉeesto de la virino.

– Do, komuniku ĝin al la radiologia aŭ optika instituto, – respondis la virino kaj volis ekiri.

Sed la mufruko ŝin kaptis, laŭte asertadis, ke ĉio tio ja koncernas la virinon kaj li jam komencis paroli pri tio, ke laodoro de la rezedo la homon suprenlevas de la tero kaj, ke la objektoj transformas sian materian estadon, kiam la luno leviĝas.

La virino, kiu estis konvinkita, ke la homa vorto havas bazon, haltis, notis liajn vortojn kaj ŝi mem raportis pri la afero al la koncernaj institutoj.

Tie oni esploris la lunradion per hina ĝisfundemo, sed ne trovis en ĝi vitaminon, eĉ dum la ĉeesto de virina korpo. Iun homon ili pesis sur analiza pesilo ĝis la milona parto de la miligramo kaj poste starigis apud li rezedon, sed kompreneble ili trovis nenian malpeziĝon. Same fiaskis ilia esploro pri la materia mekanismo de la objektoj.

Ĉar la mufruk ne anoncis sin en la institutoj, ili sciigis pri la rezulto la kuracistan fakultaton de la universitato, kie oni alvokis lin pli detale klarigi siajn spertojn pri siaj tezoj.

Anstataŭ respondo, li parolis pri tio, ke la kunfunkcio de la homaj organoj havas memstaran estadon, kiu laŭesence estas koloro, kiu dum la daŭro de la vivo pli kaj malheliĝas kaj je la tempo de la morto tute nigriĝas. Ke la homa sono havas guston: tiu de la suĉinfano estas acideta, tiu de la viro estas sala kaj tiu de la virino iom oranĝ-gusta.

Kaj kiam ili petis paroli pri la temo, li respondis:

– Ĝisfine mi parolis ĝuste pri tiu.

Vidante, ke la situacio ne estas plu duba, ili kaptis lin kaj portis al la behina kolonio, kie lia sanstato pli kaj pli malboniĝis kaj li akiris pli kaj pli da respekto inter la behinoj.

Do, mi devis legi la skribaĵojn de tiu ĉi mufruk.

Liaj libroj temis parte pri la boeto, parte pri la spiritualaĵo konsumita de la virinoj.

Pri la boeto li asertis, ke ĝi estas arbo elodoro, kies radikoj penetras en la pulmon kaj sur kies branĉoj la kona suprengrimpos; supere zumzumas la ombro de la Suno kaj malsupre bojas nigraj puloj.

Aliloke li asertis, ke la kunfunkcio de la organoj estas arko inter la naskiĝo kaj morto, sur kies pinto la sopirado de la pulmo muzikas kaj ĝi estas nenio alia ol lunfalĉilo, kiu ŝvebas sur la fadenoj de la spiritaliaĵo, konsumita de la virinoj, dum malsupre, en plado giganta, tempeste ondas nigra lakto. (Laŭvorte ĉi tiel!)

Tio jam transpasis la limon de mia toleremo. Mi kolere ĵetis la libron al Zemoki, demandante, kion li diras al tio? Li ĝin tralegis kaj vere entuziasmiĝis.

– Admirinda! – li ekkriis. – Kiel precize li vidas la vivon kaj la realon! “Ĝi ŝvebas sur la fadenoj de la spiritaliaĵo konsumita de la virinoj!” Admirinda!

Li preskaŭ svenis pro miro.

Mi same.

Sed mi ankoraŭ ne finis la historion de la mufruko.

Nome, iam aperis libro de li kun la titolo: “La vivo de la homo”, kies formo same kiel ĝia enhavo profunde diferencis al liaj ceteraj libroj. Inter aliaj li deklaris, ke la patrino lakto estas blanka, la montengrimpanto laciĝas kaj la tre maljuna homo estas malforta.

Zemoki kaj Zeremble plurfoje tralegis ĝin kaj longe cerbumadis pri ĝia senco. Dum horoj ili provadis eltrovi, sed malgraŭ ĉiu penado ili ne venis al konkreta solvo. Fine ili deklaris, ke la lastatempaj enspiroj de la mufruk fariĝas ĉiam pli konfuzaj.

Laŭ mi la enspiro havis tre evidentan sencon, kiun mi eĉ komunikis al ili, sed ili per naŭza mansvingo silentigis min.

Sed samtempe aro da junaj behinoj deklaris, ke ili tre bone povas kompreni la mufrukon kaj kiu lin ne komprenas, tiu estas bivago kaj lia cerbo maljuniĝis.

Sed miaj antaŭaj spertoj min singardemigis, kaj mi ne kuraĝis laŭtigi mian konsenton. Mi jam konjektis, ke malantaŭ la sobre sonantaj deklaroj kaŝiĝas des pli frenezaj ĥimeroj.

Kaj tiu mia konjekto fakte pruviĝis. Nome, ili ĉiuj pensis alian kaj alian enhavon sub la deklaroj pri la patrino lakto, montengrimpado kaj maljunegulo, sed mi neniam eksciis kian, kaj eĉ ili ne komunikis tion, nur diskrete deklaris, ke tio estas destinita al la pulmo kaj ne eblas komuniki per vortoj.

Ekzemple, se iu tia junulo ekvidis dornitan seĝon, jene li ekkriis:

– Ho jes, montengrimpi estas malfacila!

Se iu el tiaj junuloj alimaniere tranĉadis sian vestaĵon, tion li klarigis jene:

– Ho, jes, la patrino lakto blankas!

Kio estas la interrilato inter la aferoj, tion, nature, miaj Legantoj demandu ne de mi. Ĉe la behinoj la vortoj ne bezonas logikan interligon.

La afero jam nun sonas sufiĉe komike. Kial mi tamen okupiĝas tiel longe per tio, ties kaŭzo nur nun evidentiĝas.

Nome, Zemoki foje renkontiĝis kun la mufruk kaj demandis lin, kio estas la senco de siaj enspiroj.

Tiam okazis surpriza afero.

Nome, intertempe revenis la sana cerbo de la mufruko, pri kio la behinoj nature nenion sciis. Li respondis jene:

– La senco estas precize tio, kion mi skribis.

Zemoki dummomente konfuzite buŝmalfermis. Kiel li poste al mi deklaris, tiam li ankoraŭ suspektis nenian malbonaĵon kaj li serĉis eĉ sub la lastaj vortoj iun “sencon”, sed poste li tamen demandis honteme:

– Kiel kompreni ekzemple, ke la patrina lakto estas blanka?

– Tiel, ke ĝi estas fakte blanka, – diris la mufruko, – same, kiel la montengrimpado estas malfacila kaj la maljunegulo estas malforta. Sed tion ĉiu scias!

En Zemoki ekhaltis la spirado, li rapide adiaŭis kaj sekvontatage li rakontis la tuton al Zeremble.

Ili multe cerbumadis pri la respondo, sed fine ili venis al la konkludo, ke jam tamen devas ekzisti iaspeca difekto. Do, ili kuris al la junuloj kaj rakontis la tutan okazintaĵon.

Tiuj akceptis la komunikaĵon per furioza bruego, deklaris la tutan aferon fia kalumnio, Zemoki kaj Zeremble estis preskaŭ linĉitaj kaj fine oni ekkaptis ilin kaj trenis al la mufruko.

Alveninte la junuloj prezentis la aferon, petante, ke la mufruk mem deklaru sian opinion pri ĉi tiuj obskuraj friponoj kaj klarigu sian manifeston pri siaj enspiroj.

Tiam okazis la katastrofo.

Nome, la malfeliĉa mufruk nesingardeme ripetis sian respondon, diritan al Zemoki kaj li provis ĝin pruvi per sia *medicinista praktiko inter la hinoj*, ke la patrina lakto estas blanka kaj la maljunegulo estas malforta!

La amaso furioze ekbruegis, ili ĵetadis liajn librojn al lia kapo, ili postulis repagi la prezon kaj kriadis, ke se li perdis sian cerbon, li ne enmanigu la plumon!

La respekto de la perdo de la logika asociado de la ideoj iom rememorigis min pri unu superstiĉo de la obskura mezepoko: kiam oni honoris la epilepsion kiel sanktan ekstazon kaj nomis ĝin “*morbus sacer*”, t.e.: sankta malsano.

Sed rilate al la behinoj, kiom multe pli logika estis eĉ la mezepoka Eŭropo, kiu malgraŭ siaj multaj superstiĉoj, tamen bone sciis, ke la epilepsio estas malsano, kaj eĉ por momento ĝi ne malleviĝis tiel malalten, ke ĝi respektu en tiu la plej supran manifestiĝon de la homa menso.

Nun la Leganto povas vidi, kial mi ĉe la komenco de ĉi tiu ĉapitro nomis la kipuon duagrada idiotaĵo.

Sed mi kredas, ke el ĉi tio jam tro sufiĉas la menciitaj aferoj, ĉar jam mia propra kapo turniĝas ĉe la nura priskribo de la kipuo. Nu, imagu la Leganto, kiu en la racia Eŭropo ĉion ĉi ne aŭdis eĉ laŭ famo, kion signifis por mi ĉi tion *travivi*!

Dekdua ĉapitro

Nun ni konatiĝas kun pli grava stadio de la behin-malsano: kun la kipu. – Malsamopinio inter Zemoki kaj Zeremble kaj ĝiaj sekvoj. – La manieroj de la malbonigo de la seĝo. – La superŝnuristoj. – Iu behino predikas la sanan cerbon. – Ni ekscias, ke la kipu estas por la pulmo. – Disputo pri la brusto de la virino kaj pri la papili-bilevoj. – La historio de iu fama mufruko.

Por ke oni ekkomprenu la kipuon, antaŭe al la Leganto mi devas rakonti malĝojan historion, al kiu estis oferita mia delikata vestaĵo ricevita de la hinoj.

Mi devas rememorigi la Leganton, ke jam ĉe mia alveno min surprizis, kiajn mizeraspektajn vestaĵojn portas la behinoj. Ĉiuj vestaĵoj estis traŝiritaj en kelkaj lokoj tiel, ke jam ĉe la plej malgranda venteto ili frostotremis. Krome ili surprizis la plej diversajn objektojn: ŝtonojn, skarab-kadavrojn, dentoskrapilojn, ostojn, ktp. La celon de ĉi lastaj mi ne komprenis, sed iliaj mizeraj ĉifonoj vekis en mi malgraŭ mia tuta naŭzo kompaton. Mi pensis kun iom da riproĉo pri la hinoj, kiuj, – kiel mi tiam opiniis, – tiel avare vestas ilin, ankoraŭ pli, eĉ la kudrofadenon ili envias al la malfeliĉuloj. Mi timeme pensis pri la tempo, kiam ankaŭ mia pura kaj sendifekta vestaĵo eluziĝos, kaj ankaŭ mi mem vestiĝos kiel almozpetulo.

Sed provizore kun la agrabla kaj fiera sento de la riĉeco mi portis inter ili mian vestaĵon. Mi sentis min vera kinostelo, vidante la okulojn post mi turniĝintajn kaj aŭdante la interflustradojn, kiuj sekvis miajn paŝojn.

Ĉi tiu sensacio poste tamen fariĝis al mi iom ĝena, ĉar ĝin akompanis la konscienciproĉo, kiun ĉiu bonintenca homo sentas, se lian riĉecon sekvas la avida rigardego de la malriĉuloj.

Multe mi cerbumadis, kiel eblus helpi pri la ĉifoneco, de kiu ankaŭ Zemoki ne estis escepto. Sur liaj genuoj kaj sur la maldekstra sidvango oscedis grandaj truoj, de tiuj pendolis la ĉifonaj ŝiraĵoj de la drapo.

Foje mi fakte menciis al li mian bedaŭron kaj esprimis mian kompaton al la malriĉaj, ĉifonitaj amasoj.

Zemoki kunsente kapjesis, deklaris, ke por la vestado de la amasoj ankaŭ la betikoj faras ĉion fareblan, sed la problemo estas tre grava, ĉar bedaŭrinde la publiko ne povas akcepti pli multan vestaĵon, ĉar ili havas tre malmultan.

Mi sentis iom da konfuzo kaj deklaris, ke la fakto, ke la homoj havas malmultan vestaĵon, jam per si mem pravas, ke ili povus akcepti ankoraŭ pli multan, sed li respondis, ke tio pravas ĝuste la malon, nome, ke ili ne povas akcepti pli. Por ke la amaso ricevu vestaĵon, antaŭe estus necese, ke ili jam havu multe. Tio estas nerefutebla ekonomia tezo, kiun en la Nutra kaj Vivdona Oficejo elkalkulis homoj pli saĝaj ol ni.

Sed li tamen konfesis, ke multaj homoj iradas en mizeraj vestaĵoj, kaj aldiris:

– Ankaŭ vi ne povos estonte iradi en tia plorinda maskaĉo.

Mi tute ne estis preparita al tia respondo, sed Zemoki klarigis, ke mi povas maksimume hejme restadi en tia vesto, sed kiel beratnu, mi ne povas iri tiel inter la homojn, ĉar tian portas nur la tre malriĉaj homoj kaj eĉ tiuj nur por tre malpuraj laboroj.

Mi ne volis kredi al miaj oreloj, sed li duafoje diris la samon kaj decide deziris, ke mi tratranĉu mian veston.

Mi firme kredis, ke el li parolas nur la envio. Superece mi respondis, ke mi dankas, sed por mi estas taŭga ankaŭ la sendifekta vesto, sed Zemoki tre serioze kaj bonkore konsilis ne fari el mi frenezulon; beratnu devas ja zorgi, ke li aperu en bona vestaĵo.

Al tio mi respondis, ke mia vesto estas bona, ĉar ĝi estas sendifekta, kaj li pruvadis, ke tute kontraŭe: la tratanĉita vestaĵo estas pli bona, ĉar ĝi estas kipu, kaj ĝuste pro tio ĝin portas pli multaj homoj.

Nature mi ne estis tiom facile trompebla. Superece, eĉ kun iom da moko mi opiniadis pri la *kipuo*, post kio Zemoki rigardis min per profunda malestimo kaj ŝultrolevante foriris.

Mi pensis la aferon tute aranĝita, sed post kelkaj tagoj mi ricevis novan alvokon el multe pli grava loko.

Nome, tiam mia betiko mem atentigis min, ke mi klopodu tranĉadi mian veston, ĉar oni postulas de beratnu, ke li adaptiĝu al la prudentaj reguloj kaj ne vestiĝu kiel idioto.

Do, mi denove devis konstati, ke en la vivo ne estas okazo, en kiu oni povas sin izoli de la frenezo. Ili venas post la homon kaj lin devigas kunfreneziĝi.

Nun estis riskita mia posteno, mia ĉiutaga pano, do, kvankam dolorkore, mi devis fuŝi miajn vestojn.

Dum du tagoj mi esploradis, kiel aspektas la vera kipu-vesto, sed mi vidis preskaŭ tiom da manieroj da distranĉado, kiom da behinoj estis en la kolonio.

Fine mi konstatis, ke la plej multaj eltranĉis la drapon sur la maldekstra brusto kaj sur la dekstra sidvango kaj pendigis sur la kolumon hirundan plumon kaj majskarabon.

Do, inter pezaj ĝemoj ankaŭ mi tranĉis mian bonan veston, kaj min konsolis nur la scio, ke per tio mi almenaŭ certigas mian ĉiutagan panon kaj mian pozicion inter ili. Tiu scio iome trankviligis min kaj alitage, kiam mi en mia kipu-vestaĵo aperis antaŭ Zemoki, mi jam gaje lin price-pruce-is kaj afable ridetante montris mian kostumon, atendente la efikon.

Sed Zemoki por mia plej granda surprizo ekridegis:

– Ho, vi malfeliĉa bivag, kiel vi povis tiom fuŝi vian veston?

Eĉ haltis mia spiro, kaj mi povis nur balbute elbuŝigi, ke ĝuste li diris antaŭ kelkaj tagoj, ke mi devas tiel fari, kaj espereble mi ne estas nur viktimo de malsprita ŝerco.

Je tio li eĉ pli forte ridegis kaj diris, ke mi verŝajne nenion konjektas pri la kipu. Nome, ĉi tiu tranĉado tute ne estas kipu, ĉar ĉi tiun tranĉmanieron jam ĉiuj portas!

Tiel mi ekkonis, ke nek tio estas kipu, kion ĉiu portas, nek tio, kion neniu portas. Eĉ pli: kio hieraŭ estis kipu, hodiaŭ ne plu estas.

Mi estis nur scivola, kio estas do la kipu?

Do, post la difektado de mia vesto, en tia murdema humoro mi grumbladis dum kelkaj tagoj, kaj mi revadis pri tio, per kiaj elektitaj turmentoj mi ekzekutus Zemokin, se iam la sorto lin donus al miaj manoj.

Post kelkaj tagoj mi foje sidis sur benko, kiam Zemoki kaj Zeremble alvenis kaj per amika price-pruce sidiĝis apud mi.

Mi ĝene diris kelkajn ĝentilajn vortojn pri la vetero, je kio ili enue respondadis, kaj poste la parolo transiris al la dornumo de la seĝo.

Tial mi devis elkroĉiĝi el la diskurso kaj mi sentis, ke apud ili mi estas nur tolerata bivago.

Dum iom da tempo mi ĝene silentis, sed fine mi senkuraĝe demandis, kial entute la seĝo devas esti dornumita?

– Ĉar tio estas kipu – ili respondis.

– Sed kio estas kipu? – mi demandis, kaj mi decidis, ke nun mi ne lasos min subpremi, sed per logika menso mi kondukos la aferon, ĝis fine mi ilin pelos en konfuzon.

– Kipuo estas, kio estas agrabla, – ili respondis en la plej natura tono de la mondo.

Post tio mi postulis klarigi, kio estas por ili agrabla. Al tio ili lakone respondis:

– Tio, kio estas kipuo.

Mi devis konvinkiĝi, ke ĉi tiujn homojn oni ne povas konfuzi. Nome, ilia cerbo estas libera de la brido de la logiko, kiu retiras la gvidrimenon antaŭ la eraroj kaj kreas interligon inter la aŭditaj vortoj kaj la funkcio de la cerbo.

Mi tamen denove postulis klarigi, kian sencon havas la dornumo de la seĝo, sed ili respondis same per demando:

– Ĉu por vi estas tute egale, ĉu vi sidas sur glata aŭ sur dornplena seĝo?

– Tute ne. Ĉar sidi sur glata seĝo estas pli agrable.

Zemoki amuzate ridis pri miaj vortoj, humorplene pugnobatis mian dorson, rimarkis, ke mi estas bonhumora knabo, nur mi devas priatenti, ke mi ne malkaŝu mian bivagecon al aliaj.

Tio jam estis pli multe, ol mi povis toleri. Ke mi tamen ne esprimis tute senĝene mian opinion, kaŭzo por tio estis nur, ke intertempe en mia cerbo ekbrilis grandioza venĝa ideo.

Dece dankante la instruon mi hejmeniris kaj tie mi sekrete fiksas kelkajn lignajn dornojn sur mia seĝo. La sekvantan tagon mi atendis la okazon ensidigi Zemokin. Mia intenco estis eĉ, por la pli granda efiko, lin enpuŝegi dum la ĉeesto de atestantoj.

La sorto estis je mia helpo, ĉar mi trovis Zemokin kaj Zeremblen kune en la korto. Mi elkore invitis ilin en mian ĉambron, kion ili fakte akceptis, kaj kun humorplena interbabilado ni iris al mia hejmo.

Hejme mi atendis, ĝis Zemoki venis antaŭ la dornumitan seĝon, kaj tiam mi subite puŝpremis lin sur la “kipu”-on.

Li dolorplene ekhurlis, kaj mi elkore ridegante demandis, ĉu estas bongusta la sido en la kipu?

Zemoki saltleviĝis, ekrigardis la seĝon, kaj je mia grandega surprizo nun li komencis ridi.

– Ho, vi bivago... vi bivago... – li balbutis singultante pro ridego. – Nature, ĝi pikas, sed ĝi ne estas kipuo. Vidu! – li sin turnis al Zeremble, – laŭ li ĉi tio estas kipuo!

Zeremble alrigardis, kaj nun ili ambaŭ ekridis. La muroj ŝanceliĝis, kaj sur miaj lipoj frostiĝis la venĝplezuro.

– Kial? – mi demandis konsternite.

– Kial! Ĉu vi ne vidas, ke ĉi tiuj dornoj estas senkoloraj? Ho, mia amiko, oni devas ĝin pentri laŭ kipua maniero!

– Kaj tiam ĝi ne pikas?

– Kiel ĝi povus piki? La vera kipuo ne pikas. La vera kipuo lulas, ĉar ĝi estas kolora! Sed ho, kial mi klarigas tion al bivag!

Mi jam tute konfuziĝis, kaj tiuj ridegis plenbuŝe. Sur miaj lipoj balanciĝis kolera respondo, sed momente mi ekpensis, ke eble ili signas per la “pentro” ion alian, per kio oni moligas kaj komfortigas la dornojn. Mi singarde demandis:

– Kaj kiel oni devas ilin pentri?

La vizaĝo de Zemoki ŝanĝiĝis je emfaze serioza.

– Nu, aŭskultu: ĉi tiujn ĉe la rando ruĝe kaj la mezajn blue.

– Tio ja estas stultaĵo! – mi deklaris kun profunda konvinkiĝo.

– Vi pravas! – kriis al mi Zeremble, kaj pro la mirego mia mandiblo defalis.

– Vi pravas! – li daŭrigis plilaŭtiginte sian voĉon. – Vi havas pli da kapablo por la kipu.

Mi ne sciis kion diri. Momente mi pensis, ke lia cerbo kontraŭ espero resaniĝis.

– Tio estas vere stultaĵo, – li daŭrigis. – Ĉar oni devas la randajn pentri blue kaj la centrajn ruĝkolor.

Mi konvinkiĝis, ke ĉi tie ne ekzistas helpo, kaj mi eksilentis.

Sed tiuj akre ekdisputis, citis la majstrojn de la kipu, kaj post kvin minutoj ili sin ĵetis unu al la alia, ŝirante kaj batante sin reciproke. Al Zemoki rompiĝis du dentoj, la kapo de Zeremble ŝvelis kiel aerbalono kaj, kvankam intertempe ili frakasis sur siaj kapoj en pecojn ankaŭ mian “kipu”-seĝon, disŝiris mian litkovrilon en ĉifonojn kaj tretrompis la pordon de mia ŝranko, tamen mi povas firme aserti, ke dum mia ĉi tiea restado ĉi tiuj estis por mi la unuaj agrable pasigitaj minutoj.

Sed mia agrabla sento ne longe daŭris. Kiam mi poste restis sola, min kaptis timo, pensante, ke foje ankaŭ mi mem povos esti la pasiva subjekto de tia kipu-disputo, kaj tiam, – mi opiniis, – se eĉ la kompetentuloj de la kipu estas tiel draŝataj, kion oni faros al mi, malfeliĉa bivago?

Tial mi decidis, ke, kiom ajn vandala kutimo estas la kipu, mi ellernos la esencon de la kipu. Mi jam sciis, ke ĝi estas sencela kaj stulta, sed mi ankoraŭ kredis je la ekzisto de ia sistemo.

Mi komencis tiel, ke mi klopodis kunveni kun la majstroj de la kipu. Demandadi mi ne kuraĝis, sed mi solvis tiel la problemon, ke dirante ĝeneralaĵojn, mi flate laŭdis ilian laboron, kio – laŭ mia sperto – estas tre efika metodo kaj ekirigas la amikecon. La laŭdanton ili ne priridas, eĉ se li diras (laŭ ili) stultaĵojn.

Sed ĉiu majstro komencis per tio, ke li mallaŭdis la alian kaj pruvadis ke oni devas difekti kaj fuŝtranĉi la seĝon ne tiel, kiel la alia faras, ĉar ne tio estas la vera kipu.

